# LA PROCESO

# F.Kafka



romantraduko

| | |
|---|---|
| **Aŭtoro** | F. Kafka |
| **Titolo** | La proceso |
| **Tradukis** | Dorothea Kaiser & Hans-Georg Kaiser (Donjo & Cezar) laŭ la eldono de la eldonejo Parkland: Franz[1] Kafka „Romane und Erzählungen“ |
| **Lingve kontrolis** | Vladimir Türk |
| **Aranĝis** | Frank Vohla & Hans-Georg Kaiser |
| **Finredakto** | je la 16-a de oktobro en la jaro 2016 |

# Unua ĉapitro

## Arestigo – Interparolado kun sinjorino Grubaĥ – Poste fraŭlino Brosisto

Iu certe kalumniis sinjoron K., ĉar sen tio, ke li faris ion malbonan, oni arestis lin iumatene. La kuiristino de sinjorino Grubaĥ, lia ĉambroluigantino, kiu alportis ĉiutage je la oka la matenmanĝon al li, ĉifoje ne venis. Tio ankoraŭ neniam okazis. K. atendis ankoraŭ dum iom da tempo, vidis de sia kapkuseno la maljunulinon, kiu loĝis transe de li kaj observis lin kun scivolemo tute nekutima ĉe ŝi. Sed poste, samtempe kaj malagrable tuŝita kaj malsata, li sonorigis. Tuj iu frapis kaj viro, kiun li ankoraŭ neniam vidis en tiu loĝejo, enpaŝis. Li estis svelta kaj tamen fortika, li surhavis malvastan nigran veston, kiu, simila al la vojaĝkostumoj, estis provizita per diversaj faldoj, poŝoj, bukoj, butonoj kaj zono, kaj sekve de tio, sen tio, ke oni klariĝus por kio ĝi servu, ŝajnis precipe praktika.

„Kiu vi estas?“ demandis K. Kaj eksidis tuj duone

rektiĝinta en la lito. Sed la viro ignoris la demandon, kvazaŭ oni devus toleri lian aperon, kaj siaflanke li nur diris: „Vi sonorigis?“

„Anna alportu al mi la manĝon“, diris K. kaj li provis, komence silente, konstati per atentemo kaj pripensado, kiu la viro fakte estas.

Sed tiu ne tro longe elmetis sin al liaj rigardoj, sed turnis sin al la pordo, kiun li malfermis iomete, por diri al iu, kiu evidente staris ekstere apud la pordo: „Li volas, ke Anna alportu la matenmanĝon al li.“

Sekvis en la apuda ĉambro malgranda ridado, laŭ la tono ne estis tute certe, ĉu ne pluraj personoj partoprenis ĝin.

Kvankam la fremda viro per tio ne povis ekscii ion, kion li ne sciis jam pli frue, li nun tamen diris kvazaŭ en tono de sciigo al K.: „Tio ne eblas.“

„Tio estus nova“, diris K., saltis el la lito kaj surmetis rapide sian pantalonon. „Mi tamen volas vidi, kiaj homoj estas en la apuda ĉambro kaj kiel sinjorino Grubaĥ respondecigos tiun ĝenon vidalvide al mi.“ Kvankam li tuj

ekpensis, ke li ne devus diri tion laŭte kaj, ke li per tio kvazaŭ agnoskis la gardorajton de la fremdulo, sed tio tiumomente ne ŝajnis grava al li.

Almenaŭ la fremdulo tion tiel komprenis, ĉar li diris: „Ĉu prefere vi ne volas resti ĉi tie?“

„Mi nek volas resti ĉi tie nek esti alparolata de vi, tiom longe, kiom vi ne prezentas vin al mi.“

„Mi diris tion bonintence“ diris la fremdulo kaj malfermis nun libervole la pordon. En la apuda ĉambro, en kiun K. pli lante[2] eniris ol li intencis, ĝi aspektis unuavide preskaŭ tute same tiel, kiel en la vespero antaŭe. Estis la loĝoĉambro de sinjorino Grubaĥ, eble estis en tiu ĉambro, tro plenŝtopita per mebloj, kovriloj, porcelanaĵoj kaj fotografaĵoj[3], nun iom pli da spaco ol kutime. Oni ne tuj ekkonis tion, tiom malpli, ĉar la plej esencan ŝanĝon kaŭzis la ĉeesto de viro, kiu sidis ĉe la malfermita fenestro kun libro, de kiu li nun suprenrigardis. „Vi estus devinta resti en via ĉambro! Ĉu Francĉjo tion ne diris al vi?“

„Jes, sed kion vi celas?“ diris K. kaj rigardis de la nova

konato al la nomito Francĉjo – kiu restis staranta en la pordo – kaj poste denove reen. Tra la malfermita fenestro denove ekvideblis la maljunulino, kiu kun vera scivolemo de aĝegulino estis irinta al la nun transe troviĝanta fenestro, por povi vidi ankaŭ plu ĉion. „Mi volas ja la sinjorinon Grubaĥ – ", diris K., li faris movon, kvazaŭ li volus forŝiri sin de ambaŭ viroj, kvankam tiuj staris malproksime de li kaj intencis iri plu.

„Ne", diris la viro ĉe la fenestro, ĵetis la libron sur malgrandan tablon kaj ekstaris. „Vi ne rajtas foriri, vi estas ja arestita."

„Tiel ŝajnas", diris K. „Kaj kial do?" li demandis poste.

„Ni ne estas komisiitaj diri tion al vi. Iru en vian ĉambron kaj atendu. La tribunala proceduro kontraŭ vi ja jam komenciĝis, kaj vi ekscios ĉion ĝustatempe. Mi transiras la limojn de mia komisio, se mi parolas tiel amikece al vi. Sed mi esperas, ke neniu krom Francĉjo aŭdas tion, kaj tiu mem kontraŭ ĉiu regularo afablas al vi. Se vi ankaŭ plu tiel bonŝancos, kiel ĉe la elekto de viaj gardistoj, vi povos esti fidoplena."

K. volis sidiĝi, sed nun li vidis, ke en la tuta ĉambro ne estis sidloko, krom la fotelo ĉe la fenestro.

„Vi ja ankoraŭ akceptos, kiel ĝusta ĉio ĉi dirita estas“, parolis Francĉjo kaj samtempe kun la alia viro iris renkonte al li. Precipe la laste nomita estis konsiderinde pli alta ol K. kaj frapis ofte sur lian ŝultron. Ambaŭ kontrolis la noktĉemizon de K. kaj diris, ke li nun devos surmeti multe pli aĉan ĉemizon, sed, ke ili tamen konservos por li tiun ĉemizon, tiel, kiel liajn ceterajn vestojn, kaj ke ili tiukaze, se lia afero havos favoran rezulton, redonos ilin al li.

„Estos pli bone, se vi donos la vestojn al ni anstataŭ al la deponejo“, ili diris, „ĉar en la deponejo ofte okazas malklaraĵoj, kaj krome oni vendas tie ĉiujn vestojn post certa tempo, sen konsideri, ĉu la koncerna proceduro finiĝis ĉu ne. Kaj kiom longe daŭras tiaj procesoj, speciale en la lasta tempo! Lastfine vi ja efektive ricevus de la deponejo la enspezon, sed tiu enspezo unue estas jam per si mem malgranda, ĉar ĉe la vendo ne decidas la suma alto de oferto, sed la suma alto de la subaĉeto, kaj eĉ pli malpliiĝas tiaj enspezoj laŭsperte, se ili estas plu

transdonataj de mano al mano kaj de jaro al jaro.“ K. apenaŭ priatentis tiujn parolojn, la disponrajton pri siaj aĵoj, kiun li eble havis ankoraŭ, li ne taksis alte, multe pli grave estis por li ricevi klarecon; sed en la ĉeesto de tiuj homoj li eĉ ne povis pripensi, denove kaj denove puŝis lin oficiale amikece la ventro de la dua gardisto – povas estis ja nur gardistoj – kiam li rigardis supren, li ekvidis je ties dika korpo maladekvatan sekan ostecan vizaĝon kun tre flanken turnita nazo, la vizaĝo transen de li komunikis kun la alia gardisto. Kiaj homoj ili estas? Pri kio ili parolis? Al kiu instanco ili apartenas? K. vivis ja en lando kun leĝigita konstitucio, ĉie regis paco, ĉiuj leĝoj plene validis, kiu kuraĝas ataki lin en ties loĝejo? Li ĉiam inklinis al tio ĉion akcepti kiel eble plej senafliktite, la plejan malbonon li akceptis nur tiukaze, se la plej malbona ekis okazi, li zorgis sin ne jam antaŭe pri la estonteco, eĉ tiukaze ne, se minacis kio ajn. Sed en tiu kazo tio ne ŝajnis ĝusta al li, kvankam oni povis rigardi la tuton kiel ŝercon, kiel krudan ŝercon, kiun la kolegoj en la banko aranĝis pro nekonataj kaŭzoj, eble tial, ĉar li havas sian tridekjaran naskiĝtagon, kompreneble tio eblas, eble li devus nur iel ridi al la vizaĝoj de la gardistoj, kaj ili

kunridus, eble ili estis servoviroj de la stratangulo, ili aspektis ne malsimile al ili – sed tamen li ĉifoje, fakte jam ekde la unua rigardo al la gardisto Francĉjo, estis firme decidita ne koncedi eĉ la plej etan avantaĝon, kiun li eble havas kontraŭ tiuj homoj. Ke oni povus diri iam poste, ke li ne komprenas ŝercojn, K. konsideris kiel tute malgrandan danĝeron, sed bone li rememoris – kvankam alikaze ne estis lia kutimo lerni el spertoj – pri kelkaj por si mem malgravaj kazoj, dum kiuj li kondutis, diference de liaj amikoj, konscie nememgarde, sen la plej eta sento por la eblaj sekvoj, li do kondutis nememgarde kaj tial estis punata per la rezulto. Tio ne denove okazu, almenaŭ ne ĉifoje; se estus komedio, li volus kunludi.

Ankoraŭ li estis libera. „Permesu", li diris kaj iris rapide inter la gardistoj en sian ĉambron.

„Li ŝajnas esti prudenta", li aŭdis post si. En sia ĉambro li tuj malfermŝiris la tirkestojn de sia skribotablo, tie ĉio kuŝis bonorde, sed ĝuste la legitimaĵajn paperojn, kiujn li serĉis, li ne tuj povis trovi pro sia ekscitiĝo. Fine li trovis sian biciklistan legitimilon kaj jam volis iri kun ĝi al la gardistoj, sed tiam la papero ŝajnis al li tro bagatela kaj li

serĉis plu, ĝis li trovis la naskiĝatestilon. Kiam li denove revenis en la apudan ĉambron, ĝuste malfermiĝis la transa pordo, kaj sinjorino Grubaĥ intencis eniri tien. Oni vidis ŝin nur momenton, ĉar apenaŭ rigardinte sinjoron K., ŝi embarasiĝis, pardonpetis kaj malaperis, ege memgarde fermante la pordon. „Ja envenu, mi petas“, K. nur sukcesis diri ankoraŭ. Sed nun li staris kun siaj paperoj meze de la ĉambro, vidis ankoraŭ al la pordo, kiu ne malfermiĝis denove, kaj estis reatentigita nur per la alvoko de la gardistoj, kiuj sidis ĉe la eta tablo de la malfermita fenestro, kaj kiel K. nun ekvidis, matenmanĝis. „Kial ŝi ne envenis?“ li demandis.

„Ŝi ne rajtas“, diris la pli granda gardisto. „Vi estas ja arestita.“

„Kiel mi povas esti arestita? Kaj eĉ tiamaniere?“

„Nun, vi do rekomencas tion, ĉu ?“ la gardisto diris kaj trempis buterpanaĵon en la mielobareleton. „Tiajn demandojn ni ne respondas.“

„Vi devos respondi ilin“, diris K. „ĉi tie estas miaj

legitimaĵoj, montru nun viajn kaj antaŭ ĉio la arestordonon.“

„Dio, mia!“ diris la gardisto. „Domaĝe, ke vi ne povas akcepti vian situacion, ke vi ŝajne insistas senutile inciti nin, tiujn, kiuj nun verŝajne el ĉiuj viaj kunhomoj plej proksime staras al vi.“

„Estas tiel, do fidu tion“, diris Francĉjo, kiu ne levis la kafotason, kiun li tenis permane, al sia buŝo, sed longe rigardis al K., verŝajne signifoplene, sed nekompreneble.

K. cedis, sen deziri tion, al interrigarda dialogo kun la okuloj de Francĉjo, sed tiam tamen frapis sur siajn paperojn kaj diris: „Ĉi tie estas miaj legitimaĵoj.“

„ Sed kial ili interesu nin?“ vokis nun jam la granda gardisto. „Vi kondutas pli malbone ol infano. Kaj kion vi celas do? Ĉu vi volas per tio rapide fini vian grandan malbenitan proceson, ĉar vi diskutas kun ni, kun la gardistoj, pri legitimaĵoj kaj arestordono? Ni estas subrangaj dungitoj, kiuj apenaŭ scias ion pri legitimaĵa papero, kaj kiuj ne havas alian rilaton al via afero ol tiun,

ke ili gardas vin ĉiutage dum dek horoj kaj estas pagataj por tio. Tio estas ĉio, kio ni estas, sed tamen ni sufiĉe kapablas kompreni, ke la altaj instancoj, al kiuj ni servas, antaŭ ol ili ordonos tian areston, tre precize informiĝis pri la kialoj de la aresto kaj pri la persono de la arestito. Rilate al tio eraro ne eblas. Nia instanco, laŭ tio, kion mi scias pri ĝi, kaj mi konas nur la plej subajn rangojn, ja ne serĉas la kulpon eble eĉ ĉe la loĝantaro, sed, kiel estas skribite en la leĝo, estas altirata de la kulpo kaj devas elsendi nin, la gardistojn. Tio estas la leĝo. Kiel eraro povus esti pri tio?“

„Tiun leĝon mi ne konas“, diris K.

„Des pli malbone por vi“, diris la gardisto.

„Kaj ĝi certe ekzistas, mi supozas, nur en viaj kapoj“, diris K., li intencis enŝteliĝi iel en la pensojn de la gardistoj, volis gvidi ties pensojn favore al si aŭ kvazaŭ civitaniĝi en ili.

Sed la gardisto diris nur rifuzante: „Vi sentos ĝin.“

Francĉjo enmiksiĝis kaj diris: „Atentu, Vilhelmo, li

koncedas, ke li ne konas la leĝon kaj samtempe li asertas esti senkulpa.“

„Vi tute pravas, sed al li oni povas komprenigi nenion“, diris la alia.

K. respondis nenion pli; ĉu mi eĉ pli konfuzigu min pro la babilaĉo de tiuj plej subaj organoj? Ili mem koncedas esti tiaj. Ĉiukaze ili parolas ja pri aferoj, kiujn ili tute ne komprenas. Ilia certeco eblas nur pro ilia stulteco. Kelkaj vortoj, kiujn mi interparolos kun homo egalranga al mi, faros ĉion nekompareble pli klara ol la plej longaj interparoloj kun ili. Li iris kelkajn fojojn en la libera spaco de la ĉambro antaŭen kaj malantaŭen, transe li vidis la maljunulinon, kiu estis tirinta al al fenestro eĉ multe pli aĝan maljunulon, kiun ŝi ĉirkaŭbrakis ĉe la koksoj. K. devis fini tiun prezentadon. „Konduku min al via superulo“, li diris.

„Se li deziros tion; sed ne pli frue“, diris la gardisto nomita Vilhelmo. „Kaj nun mi konsilas al vi“, li aldonis, „ke vi iru en vian ĉambron, ke vi kondutu trankvile kaj atendu tion, kion oni decidos pri vi. Ni konsilas al vi, ke vi

ne distru vin per senutilaj pensoj, sed koncentriĝu, oni postulos vian tutan energion. Vi traktis nin ne tiel, kiel laŭus al nia komplezemo al vi. Vi forgesis, ke ni, ni estu kio ajn, almenaŭ nun kontraŭe al vi estas viroj liberaj, tio ne estas malgranda avantaĝo. Tamen ni pretas, se vi havas monon, alporti por vi malgrandan matenmanĝon el la transa kafodomo."

Sen respondi tiun proponon, K. staris silente dum iom da tempo. Eble ambaŭ, se li malfermus la pordon de la apuda ĉambro aŭ eĉ la pordon de la antaŭĉambro, tute ne kuraĝus malhelpi lin, eble tio estus la plej facila solvo de la tuta afero, se li puŝus la aferon ĝis la ekstremo. Sed eble ili tamen kaptus lin, kaj se li estus ĵetita jam teren, estus perdita ankaŭ lia supereco, kiun li nun retenis kontraŭe al ili en certa rilato. Tial li preferis la sekurecon de la solvo, kiun devos rezultigi la laŭnatura okazado, kaj li reiris en sian ĉambron, sen tio, ke plia vorto estus dirita de lia flanko aŭ flanke de la gardistoj.

Li ĵetis sin sur la liton kaj prenis de la lavotablo belan pomon, kiun li hieraŭ vespere preparis por la matenmanĝo. Nun ĝi estis lia ununura matenmanĝo kaj,

kiel li ĉiukaze certigis al si, kiam li faris la unuan grandan mordon, ĝi estas multe pli bona ol estus la matenmanĝo el la kota noktkafejo, kiun li povus ricevi pere de la favoro de la gardistoj. Li bonfartis kaj estis optimisma. En la banko, estas vere, li forestis hodiaŭ antaŭtagmeze de sia servo, sed tio, pro la relative alta pozicio, kiun li havis tie, facile senkulpigeblus. Ĉu li donu la veran kaŭzon por sia foresto? Li pensis fari tion. Se oni ne kredus al li, kio kompreneblus en tiu kazo, povus atesti sinjorino Grubaĥ, aŭ ankaŭ la gemaljunuloj el transe, kiuj nun certe jam remarŝas al la fenestro transe de lia ĉambro. K. miris, ke, almenaŭ el la vidpunkto de la gardistoj, ili pelis lin en la ĉambron kaj tie lasis lin sola. Kvankam tie li havus dekfoje la okazon mortigi sin. Sed samtempe li demandis sin, ĉifoje el sia vidpunkto, kiun kaŭzon li povus havi fari tion. Eble tial, ĉar la du apudĉambruloj sidis kaj forkaptis lian matenmanĝon? Estus tiel sensence mortigi sin, ke eĉ, se li havus la deziron, li ne kapablus fari tion pro sensenco. Se la spirita limigiteco de la gardistoj ne estus tiel okulfrapa, tiukaze oni povus supozi, ke ankaŭ ili, sekve de la sama konvinko, ne estus konsiderintaj tion danĝera lasi lin sola. Eble ili nun, se ili emus observi lin,

kiel li iras al murŝranko, en kiu li konservas bonan brandon, kiel li nun, por anstataŭi la matenmanĝon, unue eltrinkas glaseton kaj poste akceptas duan kun la celo kuraĝigi sin, la lastan nur pro memgardo por la malverŝajna kazo, ke tio estus necesa.

Jen voko el la apuda ĉambro tiom timigis lin, ke liaj dentoj klakis tinte la glason. „La inspektoro vokas vin!“ diris Francĉjo.

Estis nur la kriado, kiu timigis lin, tiu konciza, hakeca, militeca kriado, pri kiu li ne opiniis kapabla la gardiston Francĉjo. La ordono mem estis tre bonvena al li. „Finfine!“ li vokis respondante, fermriglis la murŝrankon kaj tuj rapidis en la apudan ĉambron. Tie staris la du gardistoj kaj ĉasis lin, kvazaŭ tio tute memkompreneblus, malantaŭen en ties ĉambron.

„Kion vi permesas al vi?“ ili vokis. „Ĉu vi volas montri vin antaŭ la inspektoro en tiu ĉemizo? Li traktos vin per batoj, kaj nin kun vi!“

„Lasu min, ĉe la diablo!“ vokis K., kiu jam estis puŝita

malantaŭen ĝis sia vestoŝranko. „Se oni atakas min en mia lito, oni ne povas supozi trovi min en festkostumo.“

„Helpas nenio“, diris la gardistoj, kiuj ĉiam, se K. kriis, fariĝis tute trankvilaj, ja preskaŭ malĝojaj, kaj tiel konfuzis aŭ kvazaŭ rekonsciigis lin.

„Ridindaj ceremonioj!“, li ankoraŭ grumble diris, sed levis jam kostumon de la seĝo kaj tenis ĝin dum certa tempo ambaŭmane, kvazaŭ li antaŭmontrus ĝin por la juĝo de la gardistoj. Ili kapneis.

„Ĝi devas esti nigra kostumo“, ili diris. K. sekve de tio ĵetis surteren la kostumon kaj diris – li mem ne sciis, kiusence li diris tion – : „Ja ne estas jam la ĉefa juĝdebato.“

La gardistoj ridetis, sed ripetis: „Devas esti nigra kostumo.“

„Se mi tiel rapidigas la aferon, tio konvenas al mi“, diris K., mem malfermis la vestokeston, serĉis longe en multaj vestoj, elektis sian plej bonan nigran kostumon, ĵaketokostumon, kiu pro la talio preskaŭ levis bruon inter

konatoj. Li eltiris nun ankaŭ alian ĉemizon kaj komencis zorgeme vesti sin. Sekrete li supozis, ke li akcelis la tutan aferon per tio, ĉar la gardistoj forgesis devigi bani lin. Li observis ilin, ĉu ili eble tamen memorus pri tio, sed ili kompreneble tute ne ekpensis tion, anstataŭ tio Vilhelmo ne forgesis forsendi Francĉjon kun la sciigo al la inspektoro, ke K. vestas sin.

Kiam li jam komplete vestis sin, li devis iri proksime antaŭ Vilhelmo tra la nun vaka apudĉambro en la sekvantan, kies pordo jam malfermiĝis ambaŭflanke. Tiu ĉambro, kiel K. precize sciis, estis ekloĝata antaŭ ne longe de iu fraŭlino Brosisto, de skribmaŝinistino, kiu kutime tre frue iris al la laboro, malfrue hejmvenis kaj kun kiu K. interŝanĝis ne multe pli ol la salutvortojn. Nun la ŝranketo apud ŝia lito estis puŝita kiel debatotablo mezen de la ĉambro, kaj la inspektoro sidis malantaŭ ĝi. Li metis krucforme la gambojn unu sur la alian, kaj apogis sin per brako sur la dorsa apogilo de la seĝo.

En angulo de la ĉambro staris tri junaj homoj kaj rigardis la fotografaĵojn de fraŭlino Brosisto, kiuj troviĝis en mato pendigita surmure. Je la klinko de la malfermita fenestro

pendis blanka bluzo. Ĉe la transa fenestro, la gemaljunuloj staris denove antaŭen kliniĝinte, sed ilia societo pligrandiĝis, ĉar malantaŭ ili, ege elstare leviĝinte super ilin, staris viro kun surbruste malfermita ĉemizo, kiu perfingre premis kaj turnis sian ruĝeman pintbarbon.

„Ĉu Josef K.?“ la inspektoro demandis, eble nur por koncentrigi la distritajn okulojn de K. al si mem. K. kapjesis. „Vi eble estas tre surprizita pro la okazaĵoj de la hodiaŭa mateno, ĉu?“

La inspektoro demandis kaj rearanĝis ŝovante per ambaŭ manoj la malmultajn aĵojn, kiuj kuŝis sur la ŝranketo, la kandelon kun alumetoj, libron kaj pinglokusenon, kvazaŭ estus aĵoj, kiujn li bezonas por la debato.

„Certe“, diris K., kaj la sento de bonfarto stari finfine antaŭ prudenta homo kaj povi interparoli kun li, kortuŝis lin. „Certe, mi estas surprizita, sed neniukaze mi estas tre surprizita.“

„Ne tre surprizita, ĉu ?“ demandis la inspektoro kaj starigis nun la kandelon en la mezon de la tableto, dum li

grupigis la aliajn aĵojn ĉirkaŭ ĝin.

„Vi eble miskomprenas min“, K. rapidis rimarki. „Mi opinias“, tiumomente K. interrompis sin kaj ĉirkaŭrigardis pro fotelo. „Mi ja povas sidiĝi, ĉu ?“ li demandis.

„Ne kutimas“, respondis la inspektoro.

„Mi opinias“, diris K. nun sen plia paŭzo, „ke mi efektive estas tre surprizita. Sed, se oni estas tridek jarojn en la mondo kaj sole devis trabarakti sin, kiel estis mia sorto, tiukaze oni estas hardita kontraŭ surprizoj kaj ne plu tro atentas ilin. Speciale ne la hodiaŭan.“

„Kial speciale ne la hodiaŭan?“

„Mi ne volas diri, ke mi konsideras la tuton ŝerco, por tio la preparoj, kiuj estis entreprenitaj, estas tro ampleksaj. Ĉiuj membroj de la pensiono devus partopreni, kaj ankaŭ ĉiu el vi, tio transirus la limojn de ŝerco. Mi do ne dirus, ke tio estas ŝerco.“

„Tute ĝuste“, diris la inspektoro kaj rigardis, kiom da

alumetoj estas en la skatoleto.

„Sed aliflanke“, K. daŭrigis kaj turnis sin samtempe al ĉiuj kaj volonte eĉ estus turninta sin al la triopo ĉe la fotografaĵoj, „sed aliflanke la afero ne povas gravi tro. Mi konkludas el tio, ke mi estas akuzita, sed mi povas trovi eĉ ne la plej etan kulpon, pro kiu oni povus akuzi min. Sed ankaŭ tio estas flanka afero, la ĉefa demando estas, kiu akuzis min? Kiu instanco gvidas la proceduron? Ĉu vi estas oficistoj? Neniu el vi surhavas uniformon, se oni vian kostumon“ – tiumomente li turnis sin al Francĉjo – „ne nomu uniformo, sed pli verŝajne ĝi estas ja vojaĝkostumo. Pri tiuj demandoj mi postulas klarecon, kaj mi estas konvinkita, ke post tiu klarigo ni plej kore povos adiaŭi reciproke.“

La inspektoro renversis per bato la alumetoskatoleton sur la tablo. „Vi tre eraras“, li diris. „Tiuj sinjoroj ĉi tie kaj mi por via afero tute malgravas, ni eĉ preskaŭ nenion scias pri ĝi. Ni povus surhavi la plej laŭregularajn uniformojn, kaj tamen via afero neniel pli malbone status. Mi ankaŭ ne povas diri al vi, ĉu estas akuzita vi, aŭ pli precize dirate, mi ne scias ĉu estas vi. Vi estas arestita, tio pravas,

plian mi ne scias. Eble la gardistoj babilaĉis ion alian, sed tiukaze estis nur babilaĉo. Sed kvankam mi nun ne respondas viajn demandojn, mi ja tamen almenaŭ povas konsili al vi, ke vi pensu malpli pri ni kaj pri tio, kio okazos al vi, pensu prefere pri vi mem. Kaj ne faru tian bruon pri la sento de via senkulpeco, tio ĝenas la ne tro malfavoran impreson, kiun ni cetere havas jam pri vi. Kaj vi entute estu pli retenema pri viaj paroloj, preskaŭ ĉion, kion vi diris antaŭe, estus komprenebla ankaŭ el via konduto, se vi dirus nur kelkajn vortojn, krome estis nenio, kio favorus tre por vi.“

K. gapis al la inspektoro. Ĉu li ĉi tie ricevis lernejajn instruojn de homo kiu eble estas eĉ pli juna ol li mem? Ĉu pro lia sincereco oni punis lin per riproĉo? Kaj pri la kaŭzo de sia aresto kaj pri ties komisiaj ordonintoj li eksciu nenion, ĉu? Li fariĝis iom ekscitita, iris tien kaj ĉi tien, kion neniu malhelpis. Li ŝovis siajn manumojn malantaŭen, palpis sian bruston, reordigis sian hararon, preteriris la tri sinjorojn kaj diris: „Estas ja sen senco.“. Tial ili turniĝis al li kaj komplezeme, sed serioze rigardis lin. Kaj K. finfine denove haltis antaŭ la tablo de la

inspektoro. „La prokuroro Hasterer estas mia intima amiko“, li diris, „ĉu mi rajtas telefoni al li?“

„Certe“, diris la inspektoro, „sed mi ne scias, kiun sencon tio havu, krom tio, se vi eble devos priparoli privatan aferon kun li.“

„Kiun sencon?“ K. vokis pli terurigite ol ĉagreniĝinte. „Sed kiu estas vi? Vi celas sencon kaj mem faras la plej sensencan, kio eblas, ĉu ne? Ĉu tio ne perpleksigus eĉ ŝtonon? La sinjoroj unue atakis min, kaj nun ili sidas aŭ staradas ĉi tie kaj devigas rajdi min antaŭ ili la kurson por progresintoj. Kiun sencon tio havu, se mi telefonus al la prokuroro, se mi laŭdire estas arestita, ĉu? Bone, mi ne telefonos.“

„Tamen faru“, la inspektoro diris kaj etendis manon al la antaŭĉambro kun la telefono: „Bonvolu do telefoni.“

„Ne, mi ne plu volas“, diris K. kaj iris al la fenestro. Transe la societanoj ankoraŭ estis ĉe la fenestro, kaj ŝajne nur nun, ĉar K. iris al la fenestro, estis iom ĝenataj rilate kvietan observadon. La gemaljunuloj intencis leviĝi, sed

la viro post ili trankviligis ilin. „Ankaŭ tie estas spektantoj tiaj“, K. tute laŭte vokis al la inspektoro kaj montrofingris eksteren. „For de ĉi tie“, li vokis poste transen. La triopo efektive tuj retroevitis kelkajn paŝojn, la gemaljunuloj eĉ ĝis malantaŭ la viron, kiu kovris ilin per sia larĝa korpo kaj, kiel konkludeblis el liaj lipomovoj, diris ion ajn, kiu pro la distanco nekompreneblis. Sed tute ili ne malaperis, sed ŝajne atendis la momenton, kiam ili denove povus proksimiĝi nerimarkate al la fenestro. „Sintrudemaj, senrespektaj homoj ili estas!“ diris K., retroturnante sin al la ĉambro. La inspektoro eble konsentis al li, kiel K. supozis ekkoni per rigardo flanken. Sed estis same tiel bone ebla, ke li tute ne aŭskultis lin, ĉar li premis manon firme sur la tablon, kaj ŝajne komparis ties fingrolongojn. La du gardistoj sidis sur valizo kovrata per ornama kovrilo kaj frotis siajn genuojn. La tri junaj homoj apogis siajn manojn sur la koksoj kaj ĉirkaŭrigardis sencele. Estis kviete, kiel en iu forgesita oficejo.

„Nu, sinjoroj miaj“, vokis K., ŝajnis al li dum momento, kvazaŭ li portus ĉiujn sur siaj ŝultroj. „Laŭ via aspekto mia afero estas certe finita. Mi opinias, ke estas plej bone

ne plu pensi pri la pravigiteco aŭ nepravigiteco de via agado kaj doni al la afero per reciproka manpremo pacigan finon. Se ankaŭ vi havas mian opinion, jen bonvolu – “ kaj li paŝis al la tablo de la inspektoro kaj etendis manon al li. La inspektoro levis la okulojn, ronĝis siajn lipojn kaj rigardis al la etendita mano de K.; ankoraŭ tiam K. supozis, ke la inspektoro akceptos la manpremon. Sed tiu leviĝis, prenis duran rondan ĉapelon, kiu kuŝis sur la lito de fraŭlino Brosisto, kaj surkapigis ĝin atenteme per ambaŭ manoj tiel, kiel oni faras tion ĉe la provado de novaj ĉapeloj.

„Kiel simpla ĉio ŝajnas al vi!“, li diris dum tio al K. „ni donu al la afero pacigan finon, vi opinias, ĉu? Ne, ne, tio vere ne eblas. Per tio mi aliflanke ne volas diri, ke vi malesperiĝu. Ne, ja kial? Vi estas nur arestita, nenio pli. Tion mi devis sciigi al vi, mi faris tion kaj vidis ankaŭ, kiel vi akceptis tion. Tio sufiĉas por hodiaŭ kaj ni povos adaŭi nin, sed nur provizore, vi ja nun certe volos iri en la bankon, ĉu?“

„Ĉu en la bankon?“, demandis K., „mi ja pensis, ke mi estas arestita.“ K. demandis kun certa spito, ĉar li,

kvankam lia manpremo ne estis akceptita, sentis sin, speciale de kiam leviĝis la inspektoro, pli kaj pli sendependa de ĉiuj tiuj homoj. Li ludis kun ili. Li havis la intencon, en la kazo, ke ili forirus, postkuri ilin ĝis la dompordo kaj oferti al ili sian arestigon. Tial li ripetis ankaŭ: „Kiel mi iru en la bankon, kvankam mi estas arestita?“

„Aĥ, tiel“, diris la inspektoro, kiu estis jam je la pordo, „vi miskomprenis min. Vi estas arestita, certe, sed tio ne malhelpu vin plenumi vian profesion. Krome vi ne estu malhelpata en via kutima vivmaniero.“

„Tiukaze la arestiteco ne estas tre terura“, diris K. kaj proksimiĝis al la inspektoro.

„Mi opiniis tion neniam alie“, diris tiu.

„Sed tiukaze ŝajne eĉ la sciigo de la arestigo ne estis tre necesa“, diris K. kaj proksimiĝis eĉ pli. Ankaŭ la aliaj jam proksimiĝis. Ĉiuj nun kolektiĝis en malvasta spaco ĉe la pordo.

„Tio estis mia devo“, diris la inspektoro.

„Estis stulta devo“, diris K. necedeme.

„Povas esti“, diris la inspektoro, „sed ni ne perdu nian tempon per tiaj paroloj. Mi supozis, ke vi volas iri en la bankon. Ĉar vi atentas ĉiujn vortojn, mi aldonas: mi ne devigas vin iri en la bankon, mi nur supozis, ke vi deziras tion. Kaj por plifaciligi tion al vi kaj por fari vian alvenon en la banko kiel eble plej malokulfrape, mi disponigis tiujn tri sinjorojn, viajn kolegojn, al vi.“

„Kiel?“ vokis K. kaj mire gapis la triopon. Tiuj tiel nekarakterizaj anemiaj junaj uloj, kiujn li ankoraŭ nun havis en la memoro nur kiel grupon ĉe la fotografaĵoj, estis efektive oficistoj el lia banko, ne kolegoj, tio estus tro intime dirite kaj ĝi pruvis fendon en la ĉioscio de la inspektoro, sed subrangaj oficistoj el la banko ili estis efektive. Kiel K. povis pretervidi tion? Ja kiel obsedita li evidente estis de la inspektoro kaj de la gardistoj por ne ekkoni tiun triopon?! Jen la rigida, la manojn svinganta Korvoŝtejner, jen la blonda Kuliĥ kun la profunde metitaj okuloj kaj Kaminer kun la neeltenebla rideto pro daŭra muskola trostreĉo.

„Bonan matenon“, diris K. post iom da tempo kaj etendis manon al la korekte kliniĝantaj sinjoroj. „Mi ja tute ne rekonis vin. Nun ni do iru al la laboro, ĉu?“ La sinjoroj kapjesis ridante kaj fervore, kvazaŭ ili atendis tion dum la tuta tempo, sed kiam K. rimarkis la mankon de sia ĉapelo postrestinta en lia ĉambro, ili ĉiuj kuris laŭvice por alporti ĝin, kio konkludigis almenaŭ certan embarasitecon de ili. K. staris kviete kaj postrigardis ilin tra la du malfermitaj pordoj, la lasta kompreneble estis la indiferenta Korvoŝtejner, kiu nur elegante trotis. Kaminer transdonis la ĉapelon kaj K. eksplicite devis diri al si, kiel tio necesis cetere ankaŭ ofte en la banko, ke la rideto de Kaminer ne estis intenca, ja, ke li tute ne povas rideti intence. En la antaŭĉambro malfermis tiam sinjorino Grubaĥ, kiu tute ne aspektis kulpokonscia, la loĝejan pordon al la tuta socio, kaj K. vidis tiel, kiel tiom ofte malsupren sur ŝian antaŭtukan bendon, kiu tiom nenecese profunde tranĉis sin en ŝian fortikan korpon. Malsupre K. decidis, kun la horloĝo enmane, uzi aŭtomobilon por ne pli ol necese pligrandigi la tridekminutan malfruiĝon. Kaminer kuris al la angulo por alkonduki la aŭtomobilon, la du aliaj evidente provis

distri sinjoron K., kiam Kuliĥ subite montris al la transa dompordego, en kiu ĵus aperis la granda viro kun la blonda pinta barbo, kaj, en la unua momento iom embarasite pri tio, ke li montras sin nun en sia tuta grando, retropaŝis al la muro kaj sin apogis. La gemaljunuloj certe ankoraŭ estis sur la ŝtuparo. K. ĉagreniĝis pri Kuliĥ, ĉar tiu atentigis pri la viro, kiun li mem jam pli frue ekvidis, ja kiun li eĉ atendis. „Ne rigardu tien!“ li diris krude, sen rimarki, kiel orelfrapa tia parolmaniero devas esti al plenkreskintaj viroj. Sed klarigo ne necesis, ĉar ĝuste alvenis la aŭtomobilo. Oni sidiĝis kaj ekveturis. Jen K. memoris, ke li tute ne rimarkis la forveturadon de la inspektoro kaj de la gardistoj, la inspektoro kaŝe kovris la tri oficistojn kaj la oficistoj siaflanke la inspektoron.Grandan spiritĉeeston tio ne pruvis, kaj K. ekintencis tiurilate observi pli precize. Sed spite al tio li ankoraŭ turniĝis kaj kliniĝis super la malantaŭan randon de la aŭtomobilo, por ke li eble ankoraŭ vidu la inspektoron kaj la gardistojn. Sed tuj li returniĝis kaj apogis sin leĝere aŭtangule sen eĉ fari la provon serĉi iun. Kvankam ne ŝajnis tiel, li ĝuste en tiu momento bonvenigus kelkajn konsolajn vortojn, sed la

sinjoroj ŝajne estis iom lacigitaj, Korvoŝtejner rigardis dekstre el la veturilo, Kuliĥ maldekstre, kaj nur Kaminer kun sia rikano estis je dispono, ŝerci pri tio la humanismo bedaŭrinde malpermesus.

En tiu printempo K. kutime pasigis la vesperon en tiu maniero, ke post la laboro, se tio ankoraŭ eblis – ĉar li sidis plej ofte ĝis la naŭa vespere en la oficejo – li faris sola aŭ kun oficistoj promeneton kaj poste iris en bierejon, kie li kutime kunsidis ĝis la dekunua vespere ĉe rezervita tablo por regulaj gastoj plej ofte kun jam ne plu junaj sinjoroj. Sed estis ankaŭ esceptoj de tiu regulo, se K. ekzemple kun la bankdirektoro, kiu tre ŝatis ties laborkapablon kaj fidindecon, estis invitita al aŭtomobilveturo aŭ al vespermanĝo en ties vilao. Krome K. unufoje ĉiusemajne iris al ino kun la nomo Elinjo, kiu dumnokte ĝis la malfrua mateno servis en vinejo kiel kelnerino, kaj kiu dum la hela tago akceptis vizitantojn nur en la lito.

Sed en tiu ĉi vespero – la tago rapide pasis kun streĉita laboro kaj kun multaj honorantaj kaj amikecaj naskiĝdeziroj – celis K. tuj iri hejmen. En ĉiuj paŭzetoj de

la taglaboro li pensis pri tio; sen precize scii, kion opinii, ŝajnis al li, kvazaŭ pro okazaĵoj de la mateno estis kaŭzita granda malordo en la tuta loĝejo de sinjorino Grubaĥ, kaj ke ĝuste li necesis reordigi ĉion. Kiam denove ĉio ĉi estos reordigita, estos estingita ĉiu spuro de tiuj okazaĵoj kaj ĉio ree deruliĝos kiel antaŭe. Speciale de la tri oficistoj li ne plu devas timi ion, ĉar ili estis reabsorbitaj de la granda oficistaro, iu ŝanĝiĝo je ili ne rimarkeblis. K. ofte unuope kaj kune vokis ilin en sian oficejon, pro neniu alia celo krom observi ilin; sed ĉiam li povis foririgi ilin kontentigite.

Kiam li alvenis je la deka vespere antaŭ la domo, en kiu li loĝas, li renkontis en la dompordo junulon, kiu tie staris kun vaste apartaj gamboj kaj fumis pipon.

„Kiu vi estas?“ tuj demandis K. kaj ŝovis sian vizaĝon proksime al la junulo, oni ne vidis multon en la malhela koridoro.

„Mi estas la filo de la domvartisto, sinjora moŝto“, respondis la junulo, prenis la pipon el la buŝo kaj paŝis flanken.

„La filo de la domvartisto, ĉu?“ demandis K. kaj frapis per sia bastono senpacience sur la plankon.

„Ĉu lia sinjora moŝto deziras ion? Ĉu mi alkonduku la patron?“

„Ne, ne“, diris K., en ties voĉo esprimiĝis iel pardonemo, kvazaŭ la junulo faris iun malicaĵon, kaj li kvazaŭ pardonas al li. „Estas en ordo“, li diris poste kaj iris plu, sed antaŭ ol li surgrimpis la ŝtuparon, li ankoraŭ returniĝis.

Li intencis rekte iri en sian ĉambron, sed tial, ĉar li volis interparoli kun sinjorino Grubaĥ, li frapis tuj ŝian pordon. Ŝi sidis kun trikŝtrumpo ĉe la tablo, sur kiu troviĝis ankoraŭ monteto de malnovaj ŝtrumpoj. K. senkulpigis sin distrite, ke li venas tiom malfrue, sed sinjorino Grubaĥ estis tre afabla kaj ne volis aŭskulti senkulpigon. Ŝi diris, ke en lia kazo ŝin ĉiam eblas alparoli kaj, ke li scias bone, ke li estas ŝia plej bona kaj plej plej kara luanto. K. ĉirkaŭrigardis en la ĉambro, ĝi estis ree tute en sia malnova stato. Ankaŭ la matena manĝilaro, kiu frue troviĝis sur la eta tablo ĉe la fenestro,

estis jam forportita. „Inaj manoj ja faras multon en kvieto“, li pensis. Li ja eble tuj estus frakasinta la manĝilaron, sed certe ne kapablus elporti ĝin. Li rigardis sinjorinon Grubaĥ kun certa dankemo.

„Kial vi laboras ankoraŭ tiom malfrue?“ li demandis. Ili sidis nun ambaŭ ĉe la tablo kaj K. de tempo al tempo kaŝis manon en la ŝtrumpoj. „Estas multe da laboro“, ŝi diris, „dum la tago mi apartenas al la luantoj; se mi volas reordigi miajn aferojn, restas al mi nur la vesperoj.“

„Mi faris al vi hodiaŭ certe eksterordinaran laboron, ĉu?“

„Kial?“ ŝi demandis, fariĝante iom pli fervora, la trikaĵo kuŝis surmane.

„Mi celas la sinjorojn, kiuj hodiaŭ matene estis ĉi tie.“

„Tion do“, ŝi diris kaj retrankviliĝis. „Tio ne faris tro da laboro al mi.“

K. observis silente, kiel ŝi denove levis la trikŝtrumpon. Ŝi ŝajne miras, ke mi parolas pri tio, li pensis, ŝi ŝajne pensas, ke ne estas bone, ke mi parolas pri tio. Des pli

grave estas, ke mi faras tion. Nur kun maljunulino mi povas paroli pri tio.

„Tamen, laboron tio certe kaŭzis“, li diris tiam „sed ne okazos ankoraŭfoje.“

„Ne, tio ne povos reokazi“, ŝi diris certige kaj ridetis preskaŭ melankolie al K.

„Ĉu vi opinias tion serioze?“ demandis K.

„Jes“, ŝi diris pli mallaŭte „sed antaŭ ĉio vi ne tro afliktiĝu pri tio. Kio ne okazas en tiu ĉi mondo?! Ĉar vi tiel konfideme parolas al mi, sinjoro K., mi ja povas konfesi al vi, ke mi iomete orelumis malantaŭ la pordo, kaj ke ankaŭ ambaŭ gardistoj tion kaj tion rakontis al mi. Temas ja pri via bonfarto kaj tio vere estas korafero por mi, eble pli ol por mi decas, ĉar mi ja estas via luigantino. Do, mi aŭdis tion kaj tion, sed mi ne povas diri, ke mi aŭdis tro malbonan. Ne. Vi ja estas arestita, sed ne tiel, kiel oni arestas ŝteliston. Se oni estas arestita kiel ŝtelisto, tiukaze tio estas terura, sed tiu arestigo – . Ŝajnas al mi kvazaŭ eruditaĵo“, ŝi senkulpigis sin, „mi petas pri pardono, se mi

diras stultaĵon, sed ĝi ŝajnas al mi kvazaŭ iu eruditaĵo, kiun mi ne komprenas, sed kiun mi ankaŭ ne devas kompreni."

„Estas tute ne stultaĵo, kiun vi diris, sinjorino Grubaĥ, almenaŭ havas ankaŭ mi parte vian opinion, sed mi prijuĝas la aferon ankoraŭ pli severe ol vi, kaj eĉ ne rigardas tion eruditaĵo, sed eĉ entute neniaĵo. Oni superruze surprizis min, jen tio, kio okazis. Se mi tuj estus leviĝinta post la vekiĝo, sen lasi konfuzi min per la forestado de Anna, kaj sen konsidero de kiu ajn, kiu barus al mi la vojon, estus irinta al vi, se mi ĉifoje ne esceptokaze estus manĝinta en la kuirejo, se mi estus petinta vin, ke vi alportu la vestaĵojn el mia ĉambro, koncize dirate, se mi estus aginta prudente, okazus nenio pli. Ĉio, kio intencis fariĝi, estus sufokita. Sed oni estas ja tiel malmulte preparita. Ekzemple en la banko mi estas antaŭpreparita, tie io tia neniel povus okazi al mi, mi havas tie propran serviston, la komunan telefonon kaj la oficejan telefonon starantan antaŭ mi sur la tablo, seninterrompe venas homoj, klientoj kaj oficistoj, krome kaj antaŭ ĉio alia mi estas tie ĉiam en konekto al la

laboro, tial spiritĉeesta, farus al mi preskaŭ plezuron, tie esti elmetita al tia afero. Nu, tio ja pasis kaj mi eĉ ne plu volis paroli pri tio, nur vian prijuĝon, la prijuĝon de prudentulino, mi volis aŭdi kaj mi tre ĝojas, ke ni samopinias. Sed nun vi devos etendi manon al mi, tia samopiniado devas esti emfazita per manpremo."

Ĉu ŝi etendos manon al mi? La inspektoro ne etendis manon al mi, li pensis kaj rigardis la sinjorinon alie ol antaŭe, pli kontroleme. Ŝi leviĝis, ĉar ankaŭ li leviĝis, ŝi estis iom embarasita, ĉar ŝi ne komprenis ĉion, kion diris K. Sed pro tiu embaraso ŝi diris jenon, kion ŝi tute ne volis diri kaj kio ankaŭ ne decis en tiu momento: „Ne tiom afliktiĝu pri tio, sinjoro K.", ŝi havis kvazaŭ plorojn en la voĉo kaj kompreneble forgesis ankaŭ la manpremon.

„Mi vere ne pensas, ke mi afliktiĝis pro tio", diris K., subite lacigite kaj akceptante la senvalorecon de ĉiuj konsentoj fare de la ino.

Ĉe la pordo li demandis ankoraŭ: „Ĉu sinjorino Brosisto estas hejme?"

„Ne“, diris sinjorino Grubaĥ kaj ridetis ĉe tiu seka sciigo kun iom tro malfrua prudenta kunsento. „Ŝi estas en la teatro. Ĉu vi ion deziras de ŝi? Ĉu mi ion sciigu?“

„Aĥ, mi volis nur iom interparoli kun ŝi.“

„Mi bedaŭrinde ne scias, kiam ŝi revenos; se ŝi estas en la teatro, ŝi kutime revenas hejmen malfrue.“

„Tio estas ja tute indiferenta“, diris K. kaj turniĝis jam kun klinita kapo al la pordo por foriri, „mi volis min nur senkulpigi ĉe ŝi, ke mi uzis ŝian ĉambron hodiaŭ.“

„Tio ne necesas, sinjoro K. Vi estas tre respektema, la fraŭlino ja tute ne scias ion, ekde la mateno ŝi ankoraŭ ne estis hejme, ankaŭ estas jam ĉio reordigita, rigardu mem.“ Kaj ŝi malfermis la pordon al la ĉambro de fraŭlino Brosisto.

„Dankon, mi fidas al vi“, diris K., sed iris poste tamen al la malfermita pordo. Luno radiis kviete en la malhelan ĉambron. Laŭ tio, kio videblis, efektive ĉio estis je sia loko, ankaŭ la bluzo ne plu pendis je la klinko de la fenestro. Okulfrape alte kuŝis la kusenoj en la lito, ili

troviĝis parte en la lunlumo. „La fraŭlino revenas ofte malfrue“, diris K. kaj rigardis sinjorinon Grubaĥ, kvazaŭ ŝi respondecus pri tio.

„Nu, junaj homoj ja estas tiaj!“ diris sinjorino Grubaĥ sin senkulpigante.

„Certe, certe“, diris K., „sed tio ankaŭ troigeblas.“

„Tio povas esti, diris sinjorino Grubaĥ, „vi tiom pravas, sinjoro K. Eble eĉ en tiu kazo. Mi certe ne volas kalumnii sinjorinon Brosisto, ŝi estas bona, kara knabino, afabla, ordigema, ĝustatempa kaj laborema, mi ŝatas ĉion tion tre, sed unu afero pravas, ŝi estu pli fiera, pli retiriĝema. Mi vidis ŝin en tiu monato jam dufoje en flankaj stratoj kaj ĉiam kun alia sinjoro. Tio estas tre embarasiga por mi, mi rakontas tion, ĉe la vera Dio nur al vi, sinjoro K., sed ne eviteblos, ke mi ankaŭ kun la fraŭlino mem parolos pri tio. Tio cetere estas ne la ununura, kio faras ŝin suspekta al mi.“

„Vi estas tute sur la falsa vojo“, diris K. kolere kaj preskaŭ ne kapable kaŝi tion, „cetere vi evidente miskomprenis

mian rimarkon pri la fraŭlino, tiel mi ne opiniis tion. Mi avertas vin eĉ sincere diri ion al la fraŭlino, vi tute eraras, mi konas la fraŭlinon tre bone, el tio, kion vi diras, estas nenio vera. Cetere, eble mi troigas, mi ne volas malhelpi vin, diru al ŝi, kion vi volas. Bonan nokton."

„Sinjoro K.", diris sinjorino Grubaĥ petante kaj postrapidis lin ĝis la pordo, kiun li jam malfermis, „mi ja ankoraŭ tute ne volas interparoli kun la fraŭlino, kompreneble mi volas antaŭe ankoraŭ plu observi ŝin, nur al vi mi konfidis tion, kion mi scias. Fine tio ja devas esti laŭ la senco de ĉiu luanto, se oni provas teni la pensionon pura, kaj nenio alia estas mia strebado ĉe tio."

„La pureco!" vokis K. ankoraŭ tra la fendo ĉe la pordo, „se vi volas teni pura la pensionon, vi devas unue nuligi mian luprenon." Poste li fermbatis la pordon, mallaŭtan frapadon li ne plu atentis.

Kontraŭe al tio, ĉar li ne tute havis emon dormi, li decidis ankoraŭ ne dormi kaj ĉe tiu okazo ankaŭ konstati, kiam venos fraŭlino Brosisto. Eble tiam ankaŭ eblus, kiel ajn malkonvena la horo estus, ankoraŭ iom interparoli kun

ŝi. Kiam li rigardis el la fenestro, apogante sin sur ĝi, kaj kunpremis la lacajn okulojn, li pensis dum momento eĉ pri tio puni sinjorinon Grubaĥ kaj persvadi sinjorinon Brosisto kun li ĉesigi la luprenon. Sed tio ŝajnis tuj terure troigite al li, kaj li havis eĉ la suspekton kontraŭ si mem, ke li intencis ŝanĝi la loĝejon pro la okazaĵoj enmatene. Nenio estus pli sensenca kaj antaŭ ĉio pli sensukcesa kaj pli malestiminda ol tio.

Kiam li estis sata pri la elrigardado en la vakan straton, li kuŝigis sin sur la kanapon, malferminte iom la pordon al la antaŭĉambro por povi vidi tuj de la kanapo ĉiun, kiu paŝas en la loĝejon. Ĝis ĉirkaŭ la dudektria li trankvile kuŝis fumante cigaron sur la divano. Sed tiam li ne plu eltenis tie, sed iris por certa tempo en la antaŭĉambron, kvazaŭ li povus per tio plirapidigi la alvenon de fraŭlino Brosisto. Li ne havis specialan sopiron al ŝi, li eĉ ne povis precize memori, kiel ŝi aspektas, sed nun li volis paroli kun ŝi, kaj ĝi incitis lin, ke ŝi maltrankviligis kaj malordigis per sia malfrua alveno eĉ la finon de tiu tago. Ŝi kulpis ankaŭ, ke li ne vespermanĝis je tiu tago, kaj ke li rezignis pri tiutage intencita vizito de Elinjo. Ambaŭ

aferojn li tamen ankoraŭ povus plenumi per tio, se li irus nun en la vinrestoracion, en kiu Elinjo estas servistino. Li ankoraŭ volis fari tion post la interparolo kun fraŭlino Brosisto.

Pasis jam la duono antaŭ noktomezo, kiam iu aŭdeblis en la koridoro de la domo. K., kiu, sin fordonanta al siaj pensoj, en la antaŭĉambro iris laŭte tien kaj tien, kvazaŭ ĝi estus lia propra ĉambro, fuĝis malantaŭ sian pordon. Estis fraŭlino Brosisto, kiu estis veninta. Frostotreme ŝi kuntiris malvastan silkan ŝalon ĉirkaŭ siajn malvastajn ŝultrojn, dum ŝi fermis la pordon. En la sekva momento ŝi estos iranta en sian ĉambron, en kiun K. noktomeze certe ne rajtis urĝe eniri; li nun do devis paroli al ŝi, sed malbonŝance li forgesis ekfunkciigi la elektran lumon en sia ĉambro, tiel, ke lia antaŭenpaŝado el la malhela ĉambro havus la ŝajnon de atako kaj almenaŭ devus timigi. Pro sia senhelpeco kaj por ne perdi tempon, li flustris tra la fendo ĉe la pordo: „Fraŭlino Brosisto.“ Tio sonis kiel peto, ne kiel alvoko.

„Ĉu iu estas tie?“ demandis fraŭlino Brosisto kaj ĉirkaŭrigardis per grandaj okuloj. „Estas mi“, diris K. kaj

elpaŝis antaŭen. „Aĥ, sinjoro K.!“ diris kun rideto fraŭlino Brosisto. „Bonan vesperon.“ Kaj ŝi etendis manon al li. „Mi volis interŝanĝi kelkajn vortojn kun vi, ĉu vi permesos tion al mi?“

„Ĉu nun?“ demandis fraŭlino Brosisto, „ĉu tio devas esti nun? Estas iom strange, ĉu ne?“

„Mi atendas vin ekde la dudekunua.“

„Nu do, mi estis en la teatro, mi ja ne sciis ion pri tio.“

„La kaŭzo por tio, kion mi intencas diri al vi, ekestis nur hodiaŭ.“

„Tiel do, laŭprincipe mi ja ne estas kontraŭ tio, krom tio, ke mi estas renversige laca. Do venu dum kelkaj minutoj al mia ĉambro. Ĉi tie ni povas interparoli neniukaze, ni vekus ja ĉiujn kaj tio pro ni estus al mi eĉ pli malagrabla ol pro la homoj. Atendu ĉi tie, ĝis mi faros lumon en mia ĉambro, kaj tiam ĉi tie forŝaltu la lumon.“ K. faris tiel, sed tiam li ankoraŭ atendis ĝis fraŭlino Brosisto lin ankoraŭfoje mallaŭte invitis veni.

„Sidiĝu“ ŝi diris kaj montris al la kanapo, ŝi mem restis staranta ĉe litfosto spite al la laceco, pri kiu ŝi parolis; ŝi demetis eĉ ne sian ĉapeleton ornamitan per abundo da floroj. „Kion vi do celas? Mi estas vere scivola.“ Ŝi krucigis leĝere la gambojn.

„Vi eble diros“, komencis K., „ke la afero ne estas tiel urĝa, por priparoli ĝin nun, sed – “

„Enkondukojn mi preteraŭdas ĉiam“, diris fraŭlino Brosisto.

„Tio faciligas mian taskon“, diris K. „Via ĉambro hodiaŭ matene, kvazaŭ per mia kulpo, estis iom malordigita, tio okazis fare de fremdaj homoj kontraŭ mia volo, kaj tamen, kiel dirite, per mia kulpo, tial mi volas peti pri pardono.“

„Mia ĉambro, ĉu?“ demandis fraŭlino Brosisto kaj rigardis anstataŭ al la ĉambro kontrole sinjoron K.

„Estas tiel“,diris K., kaj nun ambaŭ je la unua fojo reciproke rigardis la okulojn, „la speco kaj maniero laŭ kiu tio okazis, per si mem ne indas mencion.“

„Sed tamen fakte estas la interesaĵo“, diris fraŭlino Brosisto.

„Ne“, diris K.

„Nu“, diris fraŭlino Brosisto, „mi ne volas penetri en la sekreton, sed, se vi insistas pri tio, ke ĝi estas malinteresa, mi same ne volas kontraŭdiri ion. La senkulpigon, pri kiu vi petas, mi volonte donas al vi, speciale tial, ĉar mi ne povas trovi spuron de malordo.“ Ŝi rondiris, la platajn manojn profunde metinte al la koksoj, en la ĉambro. Ĉe la muromato kun la fotografaĵoj de la patrino ŝi restis staranta. „Ja rigardu!“ ŝi vokis. „Miaj fotografaĵoj efektive estas disĵetitaj. Tio estas ja malica. Estis do iu sen rajtigo en mia ĉambro.“

K. kapjesis kaj malbenis kviete la oficiston Kaminer, kiu ne povis bridi sian tristan, sensencan viglecon. „Estas strange“, diris fraŭlino Brosisto, „ke mi estas devigita malpermesi ion, kion vi mem devus malpermesi al vi, eksplicite dirite, paŝi dum mia ĉeesto en mian ĉambron.“

„Mi ja klarigis al vi, fraŭlino“, diris K. same irante al la

fotografaĵoj, „ke ne estis mi tiu, kiu misuzis viajn fotografaĵojn; sed ĉar vi ne akceptas tion, mi devas konfesi al vi, ke la esplorkomisio venis ankaŭ kun tri bankoficistoj, el kiuj tiu, kiun mi ĵetos ĉe la unua sekva bonŝanco el la banko, verŝajne manprenis la fotografaĵojn. Jes, estis esplora komisio ĉi tie“, aldonis K., ĉar la fraŭlino demandeme rigardis lin.

„Pro vi?“ demandis la fraŭlino.

„Jes“, respondis K.

„Neeble!“ vokis la fraŭlino kaj ridis.

„Tamen“, diris K., „ĉu vi eble pensas, ke mi estas senkulpa?“

„Nu, senkulpa…“ diris la fraŭlino, „mi ja tuj ne volas paroli verdikte, eble kun gravaj sekvoj, krome mi ja ne konas vin, devas esti ja certe grava krimulo, al kiu oni tuj sendas esplorkomisionon sur la nukon. Sed ĉar vi estas libera – , mi konkludas almenaŭ el via trankvilo, ke vi ne forkuris el la prizono, – tial vi ja ne povis delikti tian krimon.“

„Jes“, diris K., „sed la esplorkomisio ja povis cedi, ke mi estas senkulpa aŭ ne tiom kulpa, kiom oni supozis.“

„Certe, tio povas esti“, diris fraŭlino Brosisto tre atenteme.

„Pripensu“, diris K., „vi ne tre spertas pri juraj aferoj, ĉu?“

„Jes, mi ne spertas“, diris fraŭlino Brosisto, „kaj mi jam ofte bedaŭris tion, ĉar mi volas scii ĉion, kaj speciale juraj aferoj interesegas min. La juĝejo havas strangan altirforton, ĉu ne? Sed tiurilate mi certe kompletigos miajn sciojn, ĉar sekvamonate mi komencos labori kiel oficistino en kancelaria oficejo.“

„Tio estas tre bona“, diris K., „Vi tiam iom povos helpi al mi en mia proceso.“

„Tio povus esti“, diris fraŭlino Brosisto, „ja kial ne? Mi uzas volonte miajn sciojn.“

„Ankaŭ mi opinias tion serioze“, diris K. „aŭ almenaŭ duone serioze, tiel, kiel vi opinias ĝin. Por havigi advokaton, por tio la afero estas tro bagatela, sed

konsiliston mi vere bezonus."

„Jes, sed, se mi estu konsilisto, mi devus scii, pri kio temas", diris fraŭlino Brosisto.

„Jen la tubero en la afero", diris K., „tion mi mem ne scias."

„Tiukaze vi do mistifikis min", diris fraŭlino troiigite seniluziiĝinte, „estis tute malnecese elekti tiun malfruan noktotempon." Kaj ŝi foriris de la fotografaĵoj, kie ili tiom longe staris unuigite.

„Sed ne, fraŭlino", diris K., mi ne ŝercas. Kial vi ne volas fidi al mi?! Tio, kion mi scias, mi jam diris al vi. Eĉ pli ol mi scias, ĉar tio ne estis esplorkomisio, mi nomas ĝin tiel, ĉar mi ne scias alian nomon por tio. Oni esploris nenion, oni nur arestis min, sed fare de komisio."

Fraŭlino Brosisto ree sidis sur la kanapo kaj denove ridis. „Kiel do estis?" ŝi demandis.

„Terure", diris K., sed li nun tute ne pensis pri tio, sed estis tute kaptita de la aspekto de fraŭlino Brosisto, kiu

apogis la vizaĝon sur manon – la kubuto troviĝis sur la kuseno de la kanapo – dum la alia mano lante karesis kokson.

„Tio estas tro ĝenerala“, diris fraŭlino Brosisto.

„Kio estas tro ĝenerala?“ demandis K. Tiam li rememoris kaj demandis: „Ĉu mi montru al vi, kiel ĝi estis?“ Li volis moviĝi kaj tamen ne foriri.

„Mi estas jam laca“, diris fraŭlino Brosisto.

„Vi venis tiel malfrue“, diris K.

„Nun ĝi finiĝas eĉ per tio, ke mi ricevas riproĉojn, estas ankaŭ pravigite, ĉar mi ne estu enlasinta vin. Ankaŭ necesa ĝi ja ne estis, kiel montriĝis.“

„Estis necese, tion vi vidos nur nun“, diris K. „Ĉu mi rajtas translokigi la noktotableton de via lito ĉi tien?“

„Kion vi arogas?“ diris fraŭlino Brosisto, „tion vi kompreneble ne rajtas fari!“

„Tiukaze mi ne povos montri ĝin al vi“, diris K. ekscitite, kvazaŭ oni per tio kaŭzus supermezuran damaĝon al li.

„Nu, se vi bezonas ĝin pro prezento, tiukaze do transmetu la tableton“, diris fraŭlino Brosisto kaj aldonis post iom da tempo per malpli forta voĉo: „Mi estas tiel laca, ke mi permesas pli ol estas bona.“

K. metis la tableton en la mezon de la ĉambro kaj sidiĝis malantaŭ ĝi. „Vi devas imagi la disdonadon de la personoj laŭfakte, estas tre interese. Mi estas la inspektoro, tie sur la valizo sidas la du gardistoj, ĉe la fotografaĵoj staras tri junaj uloj. Je la fenestra klinko pendas, kion mi mencias nur preterire, blanka bluzo. Kaj nun la afero komenciĝas. Ja, mi forgesas min mem. La plej grava persono, do mi, staras ĉi tie antaŭ la tableto. La inspektoro sidas tre oportune kun krucigitaj gamboj, li lasas pendi brakon trans la brakapogilon, jen fi-kondutulo de la plej aĉa speco. Kaj nun ĉio do efektive komenciĝas. La inspektoro vokas, kvazaŭ li volus veki min, li preskaŭ krias, ankaŭ mi bedaŭrinde devas krii por povi komprenigi tion al vi, cetere estas nur mia nomo, kiun li tiom krias.“

Fraŭlino Brosisto, kiu ridante aŭskultis lin, metis montrofingron al la buŝo, por malhelpi krii sinjoron K., sed estis tro malfrue. K. estis tro en la rolo, li vokis lante: „Josef K.!“, cetere ne tiom laŭte, kiom li minacis fari, sed tamen tiel, ke la voko, post subita elpuŝo, ŝajne disvastiĝis nur iom post iom en la ĉambro.

Jen ĉe la pordo de la apudĉambro ĝi frapis kelkajn fojojn, forte, mallonge kaj rapide. Fraŭlino Brosisto paliĝis kaj metis manon sur la koron. Sinjoro K. ekteruriĝis precipe forte tial, ĉar li ankoraŭ dum certa tempo malkapablis pensi pri io alia krom pri la okazaĵoj de la mateno kaj pri la fraŭlino, al kiu li montris tion. Apenaŭ li rekolektis fortojn, li saltis al fraŭlino Brosisto kaj prenis manon de ŝi. „Timu nenion“ li flustris: „Mi ĉion reordigos. Sed kiu povas esti? Ĉi tie apude estas ja nur la loĝoĉambro, en kiu dormas neniu.“

„Tamen“, flustris fraŭlino Brosisto en orelon de K., „de hieraŭ loĝas ĉi tie nevo de sinjorino Grubaĥ, kapitano. Ĝuste momente alia ĉambro ne estas libera. Ankaŭ mi forgesis tion. Kial vi tion devis krii!? Mi estas malfeliĉa pri tio.“

„Pri tio tute ne ekzistas kaŭzo“, diris K., kaj kisis, kiam ŝi tiumomente resinkis en la kusenon, ŝian frunton.

„For, for“, ŝi diris kaj rapide rektiĝis „foriru do, foriru do, kion vi volas, li ja aŭskultas ĉe la pordo, li aŭdas ja ĉion. Kiom vi turmentas min!“

„Mi ne foriros pli frue ol tiam, kiam vi iom trankviliĝos“, diris K. „Venu al la alia angulo de la ĉambro, tie li ne povos aŭdi nin.“ Ŝi lasis sin konduki tien.

„Vi ne pripensas“, li diris, „ke ja temas pri malagrablaĵo por vi, sed tute ne pri danĝero. Vi scias, kiel min fakte tre ŝatas sinjorino Grubaĥ, kiu en tiu afero ja decidas, speciale tial, ĉar la kapitano estas ŝia nevo, kaj kiel ŝi ĉion, kion mi diras, nepre akceptas. Ŝi krome cetere ankaŭ estas dependa de mi, ĉar ŝi pruntepreniS sufiĉe grandan monsumon de mi. Ĉiun el ŝiaj proponoj pri klarigo pri nia kunveno mi akceptos, se ĝi estos nur iom laŭcela, kaj mi garantias, ke sinjorino Grubach akceptos la klarigon ne nur publike, sed ankaŭ efektive kaj sincere. Min vi ĉe tio neniel devas protekti. Se vi volas disvastigi, ke mi atakis vin, sinjorino Grubaĥ en tiu senco estos

instruuata kaj ŝi akceptos ĝin sen perdi la konfidon al mi, tiom ŝi ŝatas min.“ Fraŭlino Brosisto rigardis, kviete kaj iom kunsinkinte antaŭ si, sur la plankon.

„Kial sinjorino Grubaĥ ne supozu, ke mi atakis vin?“ aldonis K. Antaŭ si li vidis ŝian ruĝecan hararon, dislimigitan, malalte pufigitan kaj firme kuntenitan. Li supozis, ke ŝi turnos la rigardon al li, sed ŝi diris kun neŝanĝita pozo: „Pardonu, sed mi estas per la subita frapado tiom timigita, ne tiom pro la sekvoj, kiujn la ĉeesto de la kapitano povus havi. Estis tiom kviete post via krio, kaj jen frapis, tial mi tiom ektimis, krome mi sidis proksime de la pordo, jen ĝi frapis preskaŭ apud mi. Pri viaj proponoj mi dankas, sed mi ne akceptas ilin. Por ĉio, kio okazas en la loĝejo, mi povas transpreni la respondecon, kaj eĉ kontraŭ ĉiu. Mi miras, ke vi ne rimarkas, kiom ofendaj estas viaj proponoj por mi, memkompreneble, la bonajn intencojn mi certe rekonas. Sed nun foriru, eklasu min sola, mi bezonas tion eĉ pli ol antaŭe. El la malmultaj minutoj, pri kiuj vi petis, fariĝis nun duono de horo kaj pli.“

K. kaptis ŝin ĉemane, poste ĉe manartiko: „Sed vi ne

pensas malice pri mi, ĉu?“ li diris.

Ŝi forŝovis lian manon kaj respondis: „Ne, ne, mi estas neniam kaj al neniu malica“. Li kaptis denove ŝian manartikon, ŝi nun toleris tion kaj kondukis lin tiel al la pordo. Li havis la firman intencon foriri. Sed ĉe la pordo, kvazaŭ li tie ne atendus pordon, li hezitis, tiun momenton uzis fraŭlino Brosisto por deŝiri sin, por malfermi la pordon kaj gliti en la antaŭĉambron. Kaj de tie ŝi mallaŭte diris al K.: „Nun venu do, bonvolu. Ĉu vi vidas“ – ŝi montris al la pordo de la kapitano, el sub kiu penetris lumbrileto – „li ekŝaltis la lumon kaj interparolas pri ni.“

„Mi jam venos“, diris K., kuris antaŭen, kaptis ŝin, kisis ŝian buŝon kaj poste la tutan vizaĝon tiel, kiel soifa besto per la lango prilekadas haste la fine trovitan fontakvon. Lastfine li kisis ŝin sur la kolon, kie estas la gorĝo, kaj tie liaj lipoj longe haltis. Brua sono el la ĉambro de la kapitano levis lian rigardon. „Nun mi foriros“, li diris, li volis nomi ŝin laŭ la baptonomo, sed ne sciis ĝin. Ŝi kapjesis lace, translasis manon por kiso al li, jam duone turniĝinte flanken, kvazaŭ ŝi ne scius ion pri tio kaj iris klinite en sian ĉambron. Mallonge post tio, K. kuŝis en la

lito. Li tre baldaŭ ekdormis, antaŭ la dormado li ankoraŭ pensis pri sia konduto, li estis kontenta pri ĝi, sed miris, ke li ne estis ankoraŭ pli kontenta. Pro la kapitano li serioze akfliktiĝis pri fraŭlino Brosisto.

# Dua ĉapitro

## Unua esplorado

Oni informis sinjoron K. telefone, ke sekvadimanĉe okazos esploradeto de lia afero. Oni atentigis lin pri tio, ke tiun esploradon sekvos regule, eĉ se eble ne ĉiusemajne, sed tamen ofte, pliaj. Unuflanke ĝi estas laŭ la ĝenerala intereso, se la proceso rapide finiĝos, aliflanke la esploradoj devas esti ĉiuflanke detalaj, kaj tamen ili pro la penoj ligitaj al ĝi neniam daŭru tro longe. Tial oni elektis la elirvojon de tiuj rapide sinsekvaj mallongaj esploradoj. La dimanĉon oni difinis tial kiel esplortagon, por ke K. ne estu ĝenata en sia profesia laboro. Oni antaŭkondiĉis, ke li akceptos la tagon, sed, se li deziros alian daton, oni tiel bone, kiel eblos aranĝos tion laŭ li. La esploroj ekzemple eblus ankaŭ en la nokto. Sed tiam sinjoro K. certe ne estus sufiĉe freŝa. Ĉiukaze oni uzos la dimanĉon, tiom longe, kiom K. ne kontraŭos. Estas memkompreneble, ke li nepre devos veni, pri tio oni ja antaŭe certe ne devos speciale atentigi lin. Oni diris al li la nombron de domo, al kiu li venu, estis domo en tre

ekstera antaŭurba strato, en kiu K. estis ankoraŭ neniam. Sen respondi, K. surpendigis la aŭskultilon; li tuj decidiĝis dimanĉe iri tien, estis certe necese, la proceso komenciĝos, kaj li devos alfronti ĝin, tiu unua esplorado estu ankaŭ la lasta. Li staris ankoraŭ pripenseme ĉe la aparato, jen li aŭdis post si la voĉon de la vicdirektoro, kiu volis telefoni, sed K. baris la vojon al li.

„Ĉu malbonaj sciigoj?“ demandis leĝere la vicdirektoro, ne por ekscii ion, sed por forigi sinjoron K. de la telefono.

„Ne, ne“, diris K., paŝis flanken, sed ne foriris. La vicdirektoro prenis la aŭskultilon kaj diris, dum li atendis telefonan konekton, trans la aŭdotubon: „Unu demando, sinjoro K.: Ĉu vi faros al mi dimanĉe frue la plezuron kunveturi sur mia velboato? Fariĝos sufiĉe granda societo, certe ankaŭ kun viaj konatoj. Inter aliaj ankaŭ la prokuroro Hasterer. Ĉu vi kunvenos? Ja venu do!“

K. provis atenti pri tio, kion diras la vicdirektoro. Ne estis negrave por li, ĉar tiu invito de la vicdirektoro, kun kiu li neniam bone akordiĝis, estis paciga provo de ties flanko kaj montris, kiom grava K. fariĝis en la banko, kaj kiom

valora lia amikeco aŭ almenaŭ lia senpartieco ŝajnis al la duarange plej alta oficisto de la banko. Tiu invito estis humiliĝo fare de la vicdirektoro, eĉ se ĝi estis dirita trans la aŭskultila tubo nur pro la atendo de telefona konekto. Sed K. devis sekvigi duan humiligon al li, li diris: „Mi tre dankas! Sed dimanĉe mi ne havos tempon, mi jam havas devigon“.

„Domaĝe“, diris la vicdirektoro kaj turnis sin al la telefona interparolado, kiu ĵus estis konektita. Estis ne mallonga interparolado, sed K. dum la tuta tempo pro sia mensa malĉeesto restadis apud la aparato. Nur kiam la vicdirektoro sonoris la parolfinon, li ektteruriĝis kaj diris por iom senkulpigi sian senutilan ĉeeston: „Oni ĵus telefonis al mi, por ke mi bonvole venu al ie, sed oni forgesis sciigi al mi je kiu horo.“

„Demandu do ankoraŭ duan fojon“, diris la vicdirektoro.

„Ne gravas“, diris K., kvankam per tio lia jam antaŭe mankohava senkulpiĝo eĉ pli senvalidiĝis. La vicdirektoro parolis ankoraŭ dum la forirado pri aliaj aferoj. K. devigis sin respondi, sed pensis unuavice pri tio, ke estos plej

bone iri tien dimanĉe je la naŭa antaŭtagmeze, ĉar je tiu horo en labortagoj ĉiuj juĝejoj komencas labori.

Dimanĉe la vetero estis morna. K. estis tre lacigita, ĉar li pro festeto ĉe la rezervita tablo en la gastejo restis ĝis la profunda nokto. Preskaŭ li tro longe dormis. Haste, sen havi tempon pripensi ion kaj kunmeti la diversajn planojn, kiujn li elpensis dum la semajno, li vestis sin kaj kuris sen matenmanĝi en la antaŭurban kvartalon asignitan al li. Estis strange, ke li renkontis, kvankam li havis malmulte da tempo por ĉirkaŭrigardi, la tri oficistojn implikitajn en sian aferon, la sinjorojn Korvoŝtejner, Kuliĥ kaj Kaminer. Ambaŭ unue nomitaj en tramo transverse krucis lian vojon, sed Kaminer sidis sur la teraso de kafodomo, kaj ĝuste kiam K. preteriris, li scivole etendiĝis trans la balustradon. Ĉiuj ŝajne postrigardis lin kaj miris, kial piediris ilia superulo – estis certa spitemo, kiu detenis sinjoron K. esti veturigata. Li malŝategis eĉ la plej etan fremdan helpon pri sia afero, li ankaŭ ne volis postuli ion de iu kaj per tio eĉ nur iomete inici tiun; fine li havis eĉ ne la plej etan emon humiligi sin antaŭ la esplorkomisiono per tro da ĝustatempeco.

Tamen li kuris nun por kiel eble plej bonŝance alveni ankoraŭ antaŭ la naŭa, kvankam li eĉ ne estis vokita je certa horo.

Li supozis rekoni la domon jam el granda distanco je iu signo, kiun li mem ne precize imagis, aŭ pro speciala moviĝo antaŭ la enirejo.

Sed la Julistrato, en kiu la esploro okazu, kaj en kies komenco K. haltis dum momento, havis sur ambaŭ flankoj preskaŭ tute unuformajn domojn, altajn, grizajn ludodomojn priloĝatajn de malriĉuloj. Nun, dimanĉe matene, la plej multaj fenestroj estis okupitaj, viroj kun manikoj apogis sin tie kaj fumis aŭ tenis malgrandajn infanojn atenteme kaj kareseme super la fenestrorando. Aliaj fenestroj estis alte plenigitaj kun litaĵoj, sur kiuj dummomente aperis la hirta kapo de ino. Oni reciproke vokis trans la strateton, tia voko efikis ĝuste grandan ridadon super K. Regule disdividite estis en la longa strato malgrandaj diversaj nutraĵaj vendejoj troviĝantaj sub la stratnivelo kaj atingeblaj per kelkaj ŝtuparoj. Tie eniris kaj eliris inoj aŭ staris sur la ŝtuparoj kaj babilis. Komercisto de fruktoj, kiu rekomendis siajn varojn

supren al la fenestroj, tiel malatentema kiel K., preskaŭ ĵetis teren lin per sia ĉaro. Trivita gramofono, kiu finserviĝis en pli bonaj urbokvartaloj, ĝuste komencis terure misludi.

K. iris pli profunde en la strateton, lante, kvazaŭ li nun jam havus tempon, aŭ kvazaŭ vidus lin la esplora juĝisto el iu fenestro kaj do scias, ke K. alvenis. Estis mallonge post la naŭa. La domo estis tre larĝa, preskaŭ nekutime vastigita, speciale la pordega enirejo estis alta kaj larĝa. Ĝi evidente estis uzata por la frajtajn ĉarojn apartenantaj al la diversaj varaj deponejoj, kiuj nun barite ĉirkaŭis la kortegon kaj havis la surskribojn de firmaoj, el kiuj K. konis kelkajn el la banka negoco. Male al sia kutima konduto li haltis iom por rigardi pli detale ĉiujn eksterajn aspektojn ĉe la enirejo de la korto. Proksime de li sidis nude pieda viro sur kesto kaj legis gazeton. Sur manĉaro balanciĝis du knaboj. Antaŭ pumpilo staris malforta juna knabino en noktvesta ĵaketo kaj rigardis al K., dum la akvo torentis en ŝian ladokruĉon. En angulo de la korto inter du fenestroj estis streĉita ŝnuro, sur kiu jam pendis tolaĵoj por sekiĝi. Viro staris malsupre kaj estris la

laborojn per kelkaj vokoj.

K. turniĝis al la ŝtuparo por atingi la esploradan ĉambron, sed tiam denove staris kviete, ĉar li vidis en la korto krom tiu ĉi ŝtuparo ankoraŭ tri diversajn ŝtuparojn kaj krom tiuj kondukis ŝajne aldone malgranda trairejo fine de la korto en duan korton. Li ĉagreniĝis, ke oni ne priskribis pli precize la situon de la ĉambro al li, estis ja stranga neglekto aŭ indiferenteco, per kiu oni traktis lin, li intencis konstati tion tre laŭte kaj klare. Fine li tamen grimpis la ŝtuparon supren kaj ludis pensante kun la memoro pri eldiro de la gardisto Vilhelmo, ke la juĝejo de la kulpo estas altirata, el kio fakte konkludeblas, ke la esplorada ĉambro devas troviĝi ĉe la ŝtuparo, kiun K. elektis hazarde.

Li ĝenis suprenirante multajn infanojn, kiuj ludis sur la ŝtuparo kaj kiuj lin, kiam li paŝis tra ilia vico, malice rigardis. „Se mi je sekva fojo denoveaperos ĉi tie“, li diris al si, „mi devos aŭ kunpreni sukeraĵojn por gajni ilin aŭ bastonon por ilin bati.“ Iom antaŭ la atingo de la unua etaĝo li devis ankoraŭ atendi dum certa tempo ĝis ludokuglo finis sian vojon. Du malgrandaj knaboj kun

pinĉitaj vizaĝoj de plenkreskaj vagabondoj intertempe tenis lin ĉe la pantalonduonoj; se li volus deskui ilin, li devus dolorigi ilin, kaj li timis ilian kriadon.

En la unua etaĝo komenciĝis la efektiva serĉado. Ĉar li ja ne povis demandi pri la esplorkomisio, li eltrovis certan ĉarpentiston Lanz – la nomo enkapiĝis al li, ĉar la kapitano, la nevo de sinjorino Grubaĥ, tiel nomiĝas – kaj li volis nun demandi en ĉiuj loĝejoj, ĉu tie loĝas iu ĉarpentisto Lanz, por tiel rivevi la okazon rigardi en la ĉambrojn. Sed montriĝis, ke tio eblis plej ofte sen malfacilaĵoj, ĉar preskaŭ ĉiuj pordoj estis malfermitaj, kaj la infanoj en- kaj elkuris. Estis kutime unufenestraj ĉambretoj, en kiuj oni ankaŭ kuiris. Kelkaj inoj tenis bebon sur brako kaj manipuladis per la libera mano sur fornoplato. Junulinoj, ŝajne vestitaj nur per kiteloj, kuris plej diligente tien kaj reen. En ĉiuj ĉambroj la litoj ankoraŭ estis uzataj, kuŝis tie malsanuloj aŭ ankoraŭdormantoj aŭ personoj, kiuj tie etendiĝis en vestoj. Ĉe la loĝejoj, kies pordoj estis fermitaj, frapis K. kaj demandis, ĉu tie loĝas certa ĉarpentisto Lanz. Plej ofte malfermis ino, aŭskultis la demandon kaj turnis sin en la

ĉambron al iu, kiu leviĝis el lito. „La sinjoro demandas, ĉu ĉi tie loĝas iu ĉarpentisto Lanz.“

„Ĉarpentisto Lanz, ĉu?“ li demandis el la lito.

„Jes“, diris K., kvankam tie sendube ne troviĝis la esplorkomisiono, kaj tial lia tasko estis fakte finita. Multaj pensis, ke K. efektive tre interesiĝas pri tio trovi la ĉarpentiston, ili dum longa tempo pripensis tion, menciis ĉarpentiston, kiu tamen ne nomiĝas Lanz, aŭ diris nomon, kiu havis tute malgrandan similecon kun Lanz, aŭ ili demandis la najbaron aŭ akompanis sinjoron K. al tre malproksima pordo, kie laŭ ilia opinio tia viro eble loĝas kiel subluanto, aŭ kie iu estas, kiu eble povos informi lin pli bone ol ili mem. Fine K. apenaŭ plu devis demandi mem, sed estis sen tio tirata tra la etaĝoj. Li bedaŭris sian planon, kiu unue ŝajnis tre praktika al li. Antaŭ la kvina etaĝo li decidis fini la serĉadon, li adiaŭis sin de afabla juna laboristo, kiu volis konduki lin pli supren, kaj iris malsupren. Sed poste denove ĉagrenis lin la sensenceco de tiu entrepreno, li ankoraŭfoje retroiris kaj frapis la unuan pordon de la kvina etaĝo. La unua, kion li vidis en la malgranda ĉambro, estis granda

murhorloĝo, kiu montris jam la dekan horon.

„Ĉu loĝas certa ĉarpentisto Lanz ĉi tie?“ li demandis.

„Bonvolu“, diris juna ino kun nigraj, lumantaj okuloj, kiu ĝuste lavis porinfanan tolaĵon en tino. Ŝi gestis per malseka mano al la malfermita pordo de la apudĉambro.

K. supozis, ke li paŝas en kunsidejon. Urĝa pelmelo de plej diversaj homoj – neniu okupiĝis pri la eniranto – plenigis mezgrandan, dufenestran ĉambron, kiu tute proksime al la plafono estis ĉirkaŭata de interna balkono, kiu estis same tute okupita, kaj kie la homoj nur klinite povis stari kaj per la kapoj kaj dorsoj puŝiĝis al la plafono, K., al kiu la aero estis tro sufoka, denove eliris kaj diris al la juna ino, kiu verŝajne miskomprenis lin: „Mi demandis pri ĉarpentisto, certa Lanz, ĉu?“

„Jes“, diris la ino, „bonvolu eniri.“ K. eble ne obeus ŝin, se la ino ne irus renkonte al li, manpreninte la pordoklinkon kaj dirante: „Post via eniro mi devos fermi, neniu rajtos plu eniri.“

„Tre prudente“, diris K., „sed ja jam nun tie tro

plenplenas.“ Sed poste li tamen denove eniris.

Inter du viroj, kiuj interparolis tuj apud la pordo, – unu el ili faris per ambaŭ vaste etenditaj manoj la geston de monnombrado kaj la alia firme rigardis al la okuloj de K. –etendiĝis mano al sinjoro K. Estis malgranda, ruĝvanga knabo.

„Venu, venu“, li diris. K. permesis, ke li konduku lin. Montriĝis, ke en tiu pelmelo de svarmanta urĝado kaj interpuŝado tamen liberis malvasta vojo, kiu eble dispartigis du partiojn; tion konkludeblis ankaŭ tial, ĉar K. vidis en la unuaj vicoj dekstre kaj maldekstre apenaŭ vizaĝon turnatan al li, sed nur la dorsojn de la homoj, kiuj turnis siajn parolojn kaj gestojn nur al anoj de sia partio. La plej multaj el ili surhavis longajn, loze malsupren pendantajn nigrajn dimanĉajn kostumojn. Nur la vestoj konfuzis sinjoron K., alikaze li rigardus la tuton kiel politikan distriktkunvenon.

En la alia fino de la halo, al kiu K. estis kondukita, staris sur tre malalta kaj tro plenigita podio malgranda tablo starigita transverse, kaj post ĝi sidis proksime de la rando

sur la podio malgranda, dika, kraĉospira viro, kiu ĝuste interparolis meze de granda ridado kun dorsflanka staranto, kiu metis kubuton sur la fotelan dorsapogilon kaj krucigis la gambojn. Kelkfoje li levis rapide la alian brakon supren, kvazaŭ li karikature imitus iun. La knabo, kiu kondukis K.-on, devis peni por prezenti sian sciigon. Jam dufoje li provis sciigi ion, dum li staris sur la pintoj de la piedfingroj, sen tio, ke la viro supre atentus lin. Nur kiam iu el la personoj sur la podio atentigis pri la knabo, turnis sin la viro al li kaj kliniĝinte aŭskultis ties mallaŭtan raporton. Poste li eltiris sian horloĝon kaj rigardis rapide al K. „Vi estus devinta aperi antaŭ horo kaj kvin minutoj“, li diris. K. intencis respondi ion, sed li ne havis tempon, ĉar tuj kiam la viro jam parolis, sin levis en la dekstra haloparto ĝenerala grumblado.

„Vi estus devinta aperi antaŭ horo kaj kvin minutoj“, ripetis nun la viro kun pli aŭtoritata voĉo kaj rigardis nun rapide en la halon. Tuj la grumblado fariĝis pli forta kaj ĝi perdiĝis nur iom post iom, ĉar la viro ne plu diris ion. Estis nun pli kviete en la halo ol ĉe la eniro de K. Nur la homoj sur la ĉirkaŭa balkono ne ĉesis fari rimarkojn.

Ŝajnis ke ili estas pli malbone vestitaj ol tiuj malsupre, laŭ tio, kion oni povis diferencigi en la duonlumo, en malklaro kaj polvo. Kelkaj el ili estis kunhavis kusenojn, kiujn ili metis inter la kapon kaj la plafonon por ne vundpremi sin.

K. decidis pli observi ol paroli, sekve li rezignis pri defendo pro sia laŭdira malfruiĝo kaj diris nur: „Eĉ, se mi do venis tro malfrue, mi nun ĉeestas.“ Aplaŭdo sekvis denove el la dekstra haloparto. K. pensis, ke ili estas facile gajneblaj homoj. Ĝenis lin nur la kvieto en la maldekstra hala parto, ĝuste tiu troviĝis malantaŭ li kaj tie leviĝis nur tute izolita manklakado. Li pripensis, kion li povus diri por gajni ĉiujn je unu fojo aŭ, se tio ne eblus, almenaŭ dum certa tempo gajni ankaŭ la aliajn.

„Jes“, diris la viro, „sed mi ne estas plu devigita nun pridemandi vin“, – denove la grumblado, sed ĉifoje miskomprenebla, ĉar la viro daŭrigis, per mansigno silentigante la homojn, – „sed esceptokaze mi intencas fari ĝin ankoraŭ hodiaŭ. Sed tia malfruiĝo tute ne okazu denove. Kaj nun paŝu antaŭen!“ Iu saltis malsupren de la podio, tiel, ke loko liberiĝis por K., sur kiun li grimpis

supren. Li staris proksime premite al la tablo, la urĝado post li estis tiom granda, ke li devis rezisti ĝin por ne puŝi malsupren la tablon de la esplorjuĝisto kaj eble eĉ tiun de la podio mem.

Sed la esplorjuĝisto ne atentis pri tio, sed sidis sufiĉe oportune sur sia fotelo kaj prenis, post kiam li diris al la viro malantaŭ si finvorton, malgrandan notlibron, la solan aĵon sur sia tablo.

Ĝi estis lernejkajereca, malnova, tute trivita pro multe da foliumado.

„Do“, diris la esplorjuĝisto, foliumis en la kajero kaj turnis sin konstattone al K.: „Ĉu vi estas ĉambrofarbisto?“

„Ne“, diris K., sed unua prokuristo en granda banko.“ Tiun respondon sekvis ĉe la dekstra partio malsupre ridado, kiu estis tiel elkora, ke K. devis kunridi. La homoj apogis sin per la manoj sur siajn genuojn kaj skuiĝis kvazaŭ pro gravaj tusaj atakoj. Ridis eĉ unuopuloj sur la galerio. La tute koleriĝinta esplorjuĝisto, kiu verŝajne kontraŭ la homoj malsupre estis senpotenca, provis

rekompenci sin je la galerio, suprensaltis, minacis la galerion, kaj liaj brovoj, kutime ne frapantaj atenton, kunŝoviĝis volbe tufaj, nigraj kaj grandaj super ties okuloj.

Sed la maldekstra haloparto estis ankoraŭ tiam kvieta, la homoj tie staris en vicoj, turnis siajn vizaĝojn al la podio, aŭskultis la vortojn, kiuj supre estis interŝanĝataj, same tiel trankvilaj kiel la bruo de la alia partio, ili toleris eĉ, ke unuopuloj el siaj vicoj tie ĉeokaze agis kun la alia partio kune. La homoj de la maldekstra partio, kiuj cetere estis malpli multnombraj, eble estis esence simile tiel sensignifaj, kiel tiuj de la dekstra partio, sed la trankvilo de ilia konduto faris ilin laŭŝajne pli signifoplenaj. Kiam K. tiam komencis paroli, li estis konvinkita paroli laŭ ties senco.

„Via demando, sinjoro esplorjuĝisto, ĉu mi estas ĉambrofarbisto, – pli precize dirate, vi eĉ ne demandis, sed asertis mian profesion – , tio estas ekzemplodona por la tuta maniero de la procedo, kiu estas entreprenata kontraŭ mi. Vi povus objĵeti, ke tio ja tute ne estas procedo, kaj vi tute pravus, ĉar ĝi estas procedo nur

tiukaze, se oni agnoskas ĝin kiel tian. Sed mi agnoskas ĝin do nun dum momento, kvazaŭ pro kompato. Oni ne povas alie krom kompateme konduti al ĝi, se oni volas atenti la procedon efektive. Mi ne diras, ke ĝi estas procedo fuŝe neglektema, sed mi volis oferti tiun priskribon al vi por memekkono."

K. interrompis sin kaj rigardis malsupren al la halo. Kion li diris, estis akra, pli akra ol li intencis, sed tamen ĝusta. Ĉeokaze li ja meritus aplaŭdon, sed tamen ĉiuj silentis, oni atendis evidente streĉite la sekvan, eble antaŭpreparîĝis eksplodo en la kvieto, kiu farus al ĉio ĉi finon. Ĝenis, ke nun malfermiĝis la pordo al la halofino, la juna lavistino, kiu verŝajne estis fininta sian laboron, enpaŝis, kaj spite al ĉiu atentemo, kiun ŝi uzis, ŝi frapis la atenton de kelkaj rigardoj. Nur la esplorjuĝisto senpere ĝojigis lin, ĉar li ŝajne tuj estis trafita de la vortoj. Li aŭskultis lin ĝis tiu momento starante, ĉar li estis surprizita de la parolado de K., post kiam li rektiĝis por la galerio. Nun, en la paŭzo, li sidiĝis iom post iom, kvazaŭ tio ne estu rimarkata. Verŝajne por trankviligi sian mienon, li reprenis la kajereton.

„Tio ne helpas“, daŭrigis K., „ankaŭ via kajereto, sinjoro esplorjuĝisto, konfirmas tion, kion mi diras.“

Kontenta pri tio, ke li aŭdas nur siajn trankvilajn vortojn en la kunstarantaro de fremduloj, K. kuraĝis eĉ forpreni senhezite la kajeron de la esplorjuĝisto kaj levi ĝin per siaj fingropintoj per meza folio, tiel, kvazaŭ li timus tuŝi la kajeron, tial pendis la folioj ambaŭflanke priskribitaj, makulitaj kaj flavrandaj malsupren. „Jen la aktoj de la esplorjuĝisto“, li diris kaj lasis fali la kajeron sur la tablon. „Legu ĝin nur plu, sinjoro esplorjuĝisto, tiun kulplibron mi vere ne timas, kvankam ĝi estas nealirebla al mi, ĉar mi povas tuŝi ĝin nur per du fingroj kaj ne prenus ĝin permane.“

Povis esti nur signo de profunda humiligo aŭ almenaŭ ĝi devis esti rigardata tiel, ke la esplorjuĝisto kaptis la kajereton, post kiam ĝi falis sur la tablon, kaj provis iom reordigi ĝin kaj denove prenis ĝin antaŭ si por legi en ĝi.

La vizaĝoj de la homoj en la unua vico estis tiom atentostreĉite turnitaj al K., ke li rigardis dum certa tempo malsupren al ili. Ili ĉiuj estis jam ne junaj viroj,

kelkaj el ili blankbarbaj. Ĉu eble estas ili tiuj, kiuj decide povas influi la tutan kunstarantaron, kiu ankaŭ per la humiligo de la esplorjuĝisto ne permesis forpeli sin el sia senmoveco, en kiun ili falis de la parolado de K.?

„Kio okazis al mi“, daŭrigis K., iom pli mallaŭte ol antaŭe, dum li rastis ĉiam denove la vizaĝojn en la unua vico, kio donis al lia parolado iom konfuzitan impreson, „kio okazis al mi, estas ja nur unu kazo, kaj kiel tia ne tre grava, ĉar mi ne prenas tion tre grava, sed ĝi estas signo de procedo, kiel ĝi estas uzata kontraŭ multaj. Por tiuj mi parolas ĉi tie, ne por mi mem.“

Senintence li levis subite la voĉon. Ie iu manklakis per levitaj manoj kaj vokis: „Brave! Ja kial ne? Brave! Kaj denove brave!“ Tiuj en la unua vico mane tuŝis tie kaj tie siajn barbojn, neniu turniĝis malantaŭen pro la elvoko. Ankaŭ K. trovis ĝin negrava, sed li estis tamen vigligita; li nun tute ne plu trovis necesa, ke ĉiuj aplaŭdu, sufiĉis, se la ĝenerala publiko komencis pripensi la aferon, kaj se nur ĉeokaze iu estos gajnita per prisvado.

„Mi ne celas paroladan sukceson“, diris K. superece, „ĝi

certe ne atingeblas de mi. La sinjoro esplorjuĝisto verŝajne parolas multe pli bone ol mi, tio apartenas ja al ties profesio. Kion volas mi, tio estas nur la publika priparolado de publika misstato. Aŭskultu: Antaŭ dek tagoj oni arestigis min, pri la fakto de la arestigo mem mi ridas, sed tio ne apartenu ĉi tien. Oni atakis min frue en la lito, eble oni havis la ordonon – laŭ tio, kion diris la esplorjuĝisto, tio ne ekskludeblas – arestigi iun ĉambrofarbiston, kiu estas same tiom senkulpa kiel mi mem, sed oni elektis min. La apudĉambro estis okupita de du krudaj gardistoj. Se mi estus danĝera rabisto, oni ne pli bone povus antaŭprepari ĝin. Tiuj gardistoj krome estis demoralizita kanajlaro, ili plenŝtopis miajn orelojn per sia babilaĉo, ili volis, ke mi subaĉetu ilin, ili volis pretekste logi tolaĵojn kaj vestojn de mi, ili volis monon por laŭdire porti manĝon al mi, post kiam ili manĝis mian propran manĝon senhonte antaŭ miaj okuloj. Tio eĉ ne sufiĉis. Oni kondukis min en trian ĉambron antaŭ la inspektoron. Estis la ĉambro de damo, kiun mi tre ŝatas, kaj mi devis observi, kiel per la ĉeesto de la gardistoj kaj la inspektoro ili kvazaŭ malpurigis tiun ĉambron pro mi, sed sen mia kulpo.

Ne estis facile resti trankvila. Sed mi sukcesis, kaj mi demandis la inspektoron tute trankvile, – se li estus ĉi tie, li devus konfirmi tion – , kial oni arestis min. Kion respondis tiam la inspektoro, kiun mi ankoraŭ nun vidas antaŭ mi, sidanta sur la fotelo de la menciita damo kiel reprezentanto de la plej obtuza orgojlo? Sinjoroj miaj, li respondis fakte nenion, eble li vere ne sciis ion, li arestis min kaj estis kontenta pri tio. Li faris eĉ ankoraŭ ceteron kaj kondukis en la ĉambron de tiu damo tri range malaltajn oficistojn de mia banko, kiuj okupiĝis pri tio, pripalpi kaj malordigi fotografaĵojn el la posedo de la damo. La ĉeesto de tiuj oficistoj havis kompreneble ankoraŭ alian celon, ĝi havis la taskon disvastigi la sciigon por damaĝi mian publikan reputacion, tiel, kiel la ĉeestoj de mia ludonantino kaj de ties servistino, kaj speciale por skuegi mian pozicion en la banko. Sed nenio el tio sukcesis eĉ nur minume, eĉ mia ludonantino, tute simpla persono, – mi volas mencii ŝian nomon ĉi tie honorige, ŝi nomiĝas sinjorino Grubach – , eĉ sinjorino Grubach estis sufiĉe komprenema konvinkiĝi pri tio, ke tia arestigo ne signifas pli ol atenco, kiun ne sufiĉe gardataj buboj entreprenas sur strateto. Mi ripetas, al mi

la tuta afero alportis nur malagrablaĵojn kaj ĉeokazan ĉagrenon, sed ĉu ĝi ne estus povinta havi eĉ pli aĉajn sekvojn?“

Kiam K. sin interrompis kaj rigardis al la silenta esplorjuĝisto, li supozis rimarki, ke tiu ĝuste donas perrigarde signon al iu en la aro. K. ridetis kaj diris: „Ĝuste apud mi la esplorjuĝisto donas al iu el vi sekretan signon. Estas do homoj inter vi, kiuj de ĉi tie supre estas direktataj. Mi ne scias, ĉu la nuna signo efikigu sibladon ĉu aplaŭdon, kaj mi rezignas tute konscie ekscii la signifon de la signo per tio, ke mi tro frutempe perfidas la aferon. Por mi tio estas tute indiferenta, kaj mi publike rajtigas la sinjoron esplorjuĝisto ordoni al siaj pagitaj oficistoj tie malsupre anstataŭ per sekretaj signoj, per laŭtaj vortoj, per tio, ke li foje diros: ‚Siblu nun!‘ Kaj alian fojon: ‚Nun aplaŭdu!‘ “

Embarasite aŭ senpacience la esplorjuĝisto ŝoviĝis sur sia fotelo tien kaj tien. La viro malantaŭ li, kun kiu li interparolis jam pli frue, kliniĝis denove al li aŭ por ĝenerale kuraĝigi lin aŭ por doni al li specialan konsilon. Malsupre la homoj interparolis mallaŭte, sed vigle.

Ambaŭ partioj, kiuj antaŭe ŝajne havis tute kontraŭajn opiniojn, intermiksiĝis, kelkaj el ili montris perfingre al K., kaj aliaj al la esplorjuĝisto. La nebula sufoka aero en la ĉambro estis tre molesta, ĝi eĉ malhelpis precizan observadon de la pli malproksimaj starantoj. Precipe la galeriajn vizitantojn tio certe ĝenis. Ili estis devigitaj, sed kun timemaj flankrigardoj al la esplorjuĝisto, meti mallaŭtajn demandojn al la partoprenanta kunstarantaro por ekscii pli detalan. La respondojn oni donis sub la protekto de antaŭmetitaj manoj same tiel mallaŭte.

„Mi tuj finos la paroladon“, diris K. kaj batis, ĉar sonorilo ne ĉeestis, per pugno sur la tablon, timigite pri tio disiĝis tuj la kapoj de la esplorjuĝisto kaj de ties konsilisto. „La tuta afero estas malproksima de mi, tial mi juĝas ĝin trankvile, kaj vi povas havi, sub la kondiĉo ke vi havas iun intereson pri la laŭdira juĝejo, grandan avantaĝon, se vi aŭskultas min. Viajn reciprokajn priparoladojn pri tio, kion mi prezentas al vi, mi petas transŝovi ĝis pli posta tempo, ĉar mi ne havas tempon kaj baldaŭ foriros.“

Tuj fariĝis kviete, tiom K. jam regis la kunstarantaron. Oni ne plu kriis pelmele kiel komence, oni eĉ ne plu

aplaŭdis, sed oni jam ŝajnis konvinkita aŭ almenaŭ sur la vojo tien.

„Ne estas dubo“, diris K. tre mallaŭte, ĉar ĝoĵigis lin la streĉita ekaŭskultado de la tuta kolektiĝintaro, en tiu kvieto ekestis murmurado, kiu estis pli incitiga ol la plej ekstaza aplaŭdo, „ne estas dubo, ke troviĝas malantaŭ ĉiuj diroj de tiu juĝejo, en mia kazo, do malantaŭ la arestigo kaj la hodiaŭa juĝista esploro, granda organizo. Organizo, kiu okupas ne nur subaĉeteblajn gardistojn, ridindajn inspektorojn kaj esploristajn juĝistojn, kiuj en la plej bona kazo estas modestaj, sed kiu vivtenas krome juĝistaron de alta kaj plej alta rango, kun multnombra malhavebla sekvantaro da servistoj, skribistoj, policanoj kaj aliaj helpantoj, eble eĉ de ezekutistoj, mi ne hezitas pro timemo diri eĉ tiun vorton. Kaj la senco de tia granda organizo, sinjoroj miaj, ĉu? Ĝi estas tiu, ke senkulpaj personoj estas arestataj, kaj ke kontraŭ ili estas ekmetata procedo sensenca, kaj plej ofte, kiel en mia kazo, senrezulta. Kiel ĉe tiu sensenceco de la tuto lasus eviti sin la plej fia korupteco de la oficistaro? Tio estas malebla, tiun eĉ la plej alta juĝisto je si mem ne kapablus realigi.

Tial la gardistoj provas tiri de la korpo de arestito la vestojn, tial inspektoroj enrompas fremdajn loĝejojn, tial senkulpuloj anstataŭ esti pridemandataj estu prefere malhonorigitaj antaŭ tutaj kolektiĝantaroj. La gardistoj rakontis nur pri deponejoj, en kiujn oni portas la posedon de la arestitoj, mi volus foje vidi tiujn deponejojn, en kiuj putras la pene perlaborita posedo de la arestitoj, se ĝi ne estas ŝtelita de ŝtelemaj deponejaj oficistoj.“

K. estis interompita de kriĉado ĉe la halofino, li priombrigis la okulojn por povi rigardi tien, ĉar la obtuza taglumo faris la sufokan aeron blankeca kaj blindiga. Temis pri la lavistino, kiun K. tuj ĉe ŝia enveno ekkonis kiel esencan ĝenon. Ĉu ŝi do estis kulpa ĉu ne, oni ne povis ekkoni. K. vidis nur, ke viro tiris ŝin en angulon ĉe la pordo kaj tie premis ŝin al si. Sed ne ŝi kriĉis, sed la viro, li havis buŝon larĝigitan kaj rigardis al la plafono. Malgranda cirklo formiĝis ĉirkaŭ ambaŭ, la galeriaj vizitantoj proksime ŝajnis entuziasmigitaj pri tio, ke la seriozeco, kiun K. enkondukis en la kolektiĝintaron, tiel estis interrompita. K. pro la unua impreso volis tuj kuri tien, li pensis krome, ke ĉiuj preferus tie krei ordon kaj

almenaŭ mansigni la paron el la halo, sed la unuaj vicoj antaŭ li restadis tute firmaj, neniu moviĝis kaj neniu lasis eliri sinjoron K. Male, oni malhelpis lin, maljunaj viroj etendis brakon antaŭen kaj iu mano – li ne havis sufiĉe da tempo por rigardi malsupren – kaptis lin malantaŭe ĉekolume. K. fakte ne plu pensis pri la paro, estis al li, kvazaŭ oni limigus lian liberecon, kvazaŭ oni do serioze arestus lin, kaj senrespekte li saltis de la podio malsupren. Nun li staris vidalvide kun la homamaso. Ĉu li juĝis la homojn ĝuste? Ĉu li tro fidis la efikon de siaj vortoj? Ĉu ili ŝajnigis sin aliuloj, tiom longe, kiom li parolis kaj tiumomente, kaj ĉu ili, kiam li komencis siajn konkludojn, estis sataj pri tiu imago? Kiaj vizaĝoj ĉirkaŭ li! Malgrandaj nigraj okuloj hastis tien kaj ĉi tien, la vangoj pendis malsupren, tiel, kiel ĉe drinkuloj, la longaj barboj estis rigidaj kaj maldensaj, kaj se oni palpis ilin, estis kvazaŭ oni formus nur ungegojn, ne tiel kvazaŭ oni palpus barbojn. Sed inter la barboj – kaj tio estis la efektiva malkovro, kiun K. faris – briletis sur la supervestaj kolumoj insignoj de diversaj grandoj kaj koloroj. Ĉiuj havis tiujn insignojn, tiel longdistance, kiom oni povis vidi ilin. Ĉiuj kunapartenis, la laŭŝajnaj partioj

dekstre kaj maldekstre. Kaj ubite turniĝante, li vidis la samajn insignojn ĉe la kolumo de la esplorjuĝisto, kiu, kun la manoj sur sia sino, trankvile rigardis malsupren. „Tiel do“, vokis K. kaj kvazaŭ ĵetis la brakojn alten, la subita ekkono pretendis spacon, „vi ja ĉiuj estas oficistoj, kiel mi vidas, vi estas ja la korupta bando, kontraŭ kiu mi parolis, vi urĝis vin proksimen kiel aŭskultantoj kaj fi-spionoj, vi formis laŭŝajnajn partiojn, kaj unu el ili aplaŭdis por kontroli min, vi volis lerni kiel oni tentu senkulpulojn! Nu, vi ne estas sen utilo ĉi tie, mi esperas, aŭ vi interparolis pri tio, ke iu atendis la defendon de la senkulpeco de vi, aŭ – lasu min aŭ mi batos“, vokis K. al tremanta maljunulo, kiu ŝovis sin precipe proksimen al li – „aŭ vi vere lernis ion. Kaj per tio mi deziras bonŝancon al via metio.“ Li prenis rapide sian ĉapelon kuŝintan sur la rando de la tablo, kaj urĝis sin en la ĝenerala silento, ĉiukaze estis silento pro perfekta suprizo, al la elirejo. Sed la esplorjuĝisto ŝajne estis eĉ pli rapida ol K., ĉar li atendis lin jam ĉe la pordo.

„Unu momenton“, li diris. K. haltis, sed ne rigardis al la esplorjuĝisto, sed al la pordo, kies klinkon li jam

mankaptis. „Mi volis vin nur atentigi pri tio“, diris la esplorjuĝisto, „ke vi hodiaŭ – ŝajne tio ankoraŭ ne konsciiĝis al vi – prirabis vin de la avantaĝo, kiun pridemando por arestito signifas en ĉiu kazo.“

K. alridis porden. „Vi friponoj“, li vokis, „mi donacas al vi ĉiujn pridemandadojn“, li malfermis la pordon kaj rapide kuris sur la ŝtuparo malsupren. Post li leviĝis la bruo de la denove viviĝinta kolektiĝantaro, kiu komencis priparoli ŝajne laŭ la maniero de studantoj.

# Tria ĉapitro

## En la malplena kunsideja halo - La studento - La kancelarioj

K. atendis dum la sekva semajno de tago al tago denovan interkomprenigâdon, li ne kapablis akcepti, ke oni prenis lian rezignon pri pridemandadoj laŭvorte, kaj kiam la atendita interkomprenigô ĝis sabato vespere efektive ne okazis, li supozis, ke oni invitis lin kviete silente en la saman domon por la sama tempo. Tial li dimanĉe denove iris tien, ĉifoje li iris rekte sur ŝtuparoj kaj irejoj, kelkaj homoj kiuj memoris lin, salutis lin ĉe siaj pordoj, sed li devis demandi neniun pli kaj baldaŭ atingis la ĝustan pordon. Kiam li frapis,oni tuj malfermis, kaj sen plu rigardi malantaŭen al la konata ino, kiu plu staris ĉe la pordo, li tuj intencis iri en la apudan ĉambron.

„Hodiaŭ ne estas kunsido“, diris la ino.

„Kial ne estas kunsido?“ li demandis kaj ne volis akcepti tion. Sed la ino konvinkis lin, per tio ke ŝi malfermis la pordon de la apuda ĉambro. Ĝi estis efektive senhoma kaj

pro sia senhomeco ĝi aspektis eĉ pli mizera ol je la lasta dimanĉo. Sur la tablo, kiu staris sen ŝanĝoj sur la podio, kuŝis kelkaj libroj. „Ĉu mi rajtas rigardi la librojn?“ demandis K., ne pro speciala scivolemo, sed nur por ke li ne ĉeestu tute sen senco ĉi tie.

„Ne“, diris la ino kaj fermis denove la pordon, „tio ne estas permesata. La libroj apartenas al la esplorjuĝisto.“

„Tiel do“, diris K. kaj kapjesis, „ĉu la libroj do estas leĝolibroj? Ĝi apartenas ja al la maniero de tiu ĉi speco de justico, ke oni kondamnas onin ne nur sen kulpo, sed eĉ sen scio.“

„Verŝajne estas tiel“, diris la ino, kiu ne tute komprenis lin.

„Nu, tiukaze mi denove foriros“,diris K.

„Ĉu mi sciigu ion al la esplorjuĝisto?“ demandis la ino.

„Vi konas lin, ĉu?“ demandis K.

„Kompreneble“, diris la ino, „mia edzo estas ja juĝeja

servisto."

Nur nun rimarkis K., ke la ĉambro, en kiu lastfoje staris nur lavkuvo, nun estis tute meblita loĝoĉambro. La ino rimarkis lian mirigitecon kaj diris: „Jes, ni havas ĉi tie senkostan loĝejon, sed ĉe kunsidaj tagoj ni devas malplenigi la ĉambron. La okupo de mia edzo havas kelkajn malavantaĝojn."

„Mi ne miras tiom pri la ĉambro", diris K. kaj rigardis ŝin malice, „sed multe pli pri tio, ke vi estas edziniĝinta."

„Ĉu vi eble aludas pri la okazaĵo en la lasta kunsido, per kiu mi ĝenis vian parolon?" demandis la ino.

„Kompreneble", diris K., „hodiaŭ tio ja jam pasis kaj preskaŭ estas forgesita, sed tiam ĝi rekte kolerigis min. Kaj nun vi diras mem, ke vi estas edziniĝinta ino."

„Ne estis via malavantaĝo, ke via parolo estis finita. Oni poste ankoraŭ malfavore juĝis ĝin."

„Povas esti", diris K. deturnige, „sed vin tio ne senkulpigas."

„Mi estas senkulpigita de ĉiuj, kiuj konas min“, diris la ino, „tiu, kiu brakumis min tiam, persekutas min delonge. Mi ĝenerale eble ne estas aloga, sed por li mi estas. Kontraŭ tio ne estas protekto, ankaŭ mia edzo jam cedis al tio; se li volas reteni sian okupon, li devas toleri ĝin, ĉar tiu viro estas studento kaj antaŭvideble li ricevos multe da potenco. Li ĉiam persekutas min. Ĝuste antaŭ ol vi venis, li foriris.“

„Tio konvenas al ĉio alia ĉi tie“, diris K., „ĝi ne surprizas min.“

„Vi volas ŝanĝi diversajn aferojn ĉi tie, ĉu?“ respondis la ino lante kaj kontrolante, kvazaŭ ŝi dirus ion, kio estas danĝera kaj por ŝi kaj por K. „mi jam konkludis tion el via parolo, kiu persone tre plaĉis al mi. Cetere mi aŭdis nur parton de ĝi, la komencon mi preterlasis, ĉar dum ties fino mi kuŝis kun la studento sur la planko. – Estas ja tiel naŭze ĉi tie“, ŝi diris post paŭzo kaj ekkaptis manon de K. „Ĉu vi pensas, ke plibonigo sukcesos al vi?“

K. ridetis kaj turnis unu el siaj manoj inter ŝiaj molaj manoj. „Fakte“, li diris, „mi ne estas komisiita profesie

atingi plibonigojn ĉi tie, kiel vi esprimas tion, kaj se vi dirus tion ekzemple al la esplorjuĝisto, oni ridus pri vi aŭ punus vin. Fakte mi libervole certe ne estus enmiksiĝinta en tiajn aferojn, kaj mian dormon la neceso de plibonigo de tiu justico ĝenus neniam. Sed per tio, ke mi laŭdire estas arestita – oni vere arestis min – oni devigis min ĉi tie enmiksiĝi, kaj ja pro mi. Sed, se dum tio mi iel povos esti utila ankaŭ al vi, mi volonte akceptas tion. Ne nur pro amo al proksimulo, sed ankaŭ tial, ĉar ankaŭ vi povas helpi al mi."

„Nu, sed kiel mi povus tion?" demandis la ino.

„Ekzemple per tio, ke vi montros al mi la librojn sur tiu tablo."

„Ja certe", vokis la ino kaj tiris lin plej rapide post si mem. Ili estis malnovaj, trivitaj libroj, unu el la kovriloj en la mezo estis preskaŭ disrompita, la partoj kuntenis sin reciproke nur per fibroj.

„Kiel malpura ĉio ĉi estas", diris K. kapskuante, kaj la ino almenaŭ supraĵe forviŝis per sia antaŭtuko la polvon,

antaŭ ol K. povis etendi manon al la libroj. K. malfermis la unuan libron, jen aperis malĉasta bildo. Viro kaj ino sidis nudaj sur kanapo, la fia intenco de la desegnisto estis klare ekkonebla, sed lia mallerteco estis tiel granda, ke fine tamen videblis nur viro kaj ino, kiuj tro korpe elstaris de la bildo, ili sidis rektaj kaj pro malĝusta perspektivo nur pene turniĝis unu al la alia. K. ne foliumis plu, sed rigardis nur ankoraŭ la titolbildon de la dua libro, estis romano kun la titolo „La plagoj, kiujn Gretinjo devis suferi de sia edzo Joĉjo“. „Jen la leĝolibroj, kiuj ĉi tie estas studataj“, diris K., „kaj de tiaj homoj mi estu juĝata.“

„Mi helpos al vi“, diris la ino. „Ĉu vi volas?“

„Ĉu vi efektive povus tion, sen endanĝerigi vin mem? Vi ja diris antaŭe, ke via edzo estas tre dependa de superuloj.“

„Tamen mi volas helpi al vi“, diris la ino, „sekvu min, ni devos priparoli tion. Pri mia danĝero ne parolu plu, mi timas la danĝeron nur tie, kie mi volas timi ĝin. Sekvu min.“ Ŝi montris al la podio kaj petis lin sidiĝi kun ŝi sur

la ŝtuparon. „Vi havas belajn malhelajn okulojn“, ŝi diris, post kiam ŝi sidiĝis, kaj rigardis sinjoron K. de malsupre vizaĝen. „Oni diras al mi, ke ankaŭ mi havas belajn okulojn, sed viaj estas multe pli belaj. Cetere ili tuj frapis mian atenton tiam, kiam vi la unuan fojon enpaŝis ĉi tien. Ili estis ankaŭ la kaŭzo, kial mi pli poste iris en la kunsidejon, kion mi alikaze faras neniam, kaj kio certagrade estas eĉ malpermesita al mi.“ Tio estas do ĉio, pensis K., ŝi ofertiĝas al mi, ŝi estas fi-virta kiel ĉiuj ĉirkaŭe, ŝi estas malsata pri la juĝejaj oficistoj, kio ja eblas kompreni, kaj salutas tial ĉiun ajn fremdulon per komplimento pri ties okuloj. Kaj K. silente ekstaris, kvazaŭ li laŭte parolis siajn pensojn kaj tiel klarigis al la ino sian konduton.

„Mi ne pensas, ke vi povas helpi al mi“, li diris. „Por vere povi helpi al mi, oni devus havi rilatojn al altrangaj oficistoj. Sed vi certe konas nur la malaltrangajn oficistojn, kiuj ĉi tie amase vagadas. Tiujn vi certe konas tre bone kaj ĉe ili vi povus sukcesigi tion kaj ĉi tion, tion mi ne pridubas, sed la plej grava, kion oni povus sukcesigi ĉe ili, estus por tio, kiel la proceso finiĝos lastfine, tute

sensignifa. Sed vi per tio estus fuŝinta la amikecon de kelkaj amikoj. Tion mi ne volas. Daŭrigu viajn ĝisnunajn rilatojn al tiuj homoj, ja ŝajnas al mi, ke ili por vi estas malhavigeblaj. Mi ne diras tion sen bedaŭro, ĉar, por tamen ankoraŭ iel respondi vian komplimenton, ankaŭ vi plaĉas al mi, speciale se vi rigardas min tiel malgaja kiel nun, por kio cetere tute ne ekzistas kaŭzo viaflanke. Vi apartenas al tiu societo, kontraŭ kiu mi devas batali, sed vi fartas en ĝi tre bone, vi amas eĉ la studenton, kaj se vi ne amas lin, vi almenaŭ preferas lin kompare al via edzo. Tion oni povis facile ekkoni el viaj vortoj."

„Ne!" ŝi vokis plu sidante kaj kaptis manon de K., kiun li ne sufiĉe rapide fortiris de ŝi.

„Vi nun ne rajtas foriri, vi ne rajtas foriri kun malĝusta juĝo pri mi! Ĉu vi nun vere kapablus foriri? Ĉu mi vere estas senvalora tiom, ke vi eĉ ne volas komplezi min per tio, ke vi ankoraŭ restos dum iom da tempo?"

„Vi miskomprenas min", diris K. kaj sidiĝis, „se vi vere deziras, ke mi restadu ĉi tie, mi restos volonte, mi havas ja tempon, mi venis ja al ĉi tie, ĉar mi atendis, ke hodiaŭ

okazos kunsido. Per tio, kion mi diris antaŭe, mi volis vin nur peti en la proceso ne entrepreni ion por mi. Sed ankaŭ tio ne devas ofendi vin, se vi pripensas, ke min tute ne interesas, kiel la proceso finiĝos, kaj, ke mi nur ridos pri verdikto. Sub la kondiĉo, ke efektive okazos finiĝo de la proceso, kion mi tre pridubas. Mi supozas multe pli, ke la procedo sekve de pigreco aŭ forgesemo aŭ eble eĉ sekve de timo de la oficistaro estas jam ĉesigita aŭ baldaŭ ĉesigota. Sed certe eblas ankaŭ, ke pro espero pri konsiderinda subaĉeto la proceso ŝajne estas daŭrigata, tute vane, kiel mi povas diri jam hodiaŭ, ĉar mi subaĉetas neniun. Estus almenaŭ unu komplezo, kiun vi povus plenumi, se vi sciigos al la esplorjuĝisto aŭ al iu alia, kiu volonte disvastigas gravajn sciigojn, ke mi neniam kaj per neniuj artifikaĵoj, pri kiuj la sinjoroj certe riĉe disponas, estos persvatebla pri subaĉeto. Tio estus tute vana, tion vi povos diri tute publike al ili. Cetere, oni eble jam mem rimarkis tion, kaj eĉ, se tio ne estus tiel, min tio vere ne tre interesas, ke oni jam nun ekscios ĝin. Per tio oni ŝparus ja nur laboron al la sinjoroj, sed ankaŭ kelkajn malagrablaĵojn al mi, kiujn mi tamen volonte ŝarĝos sur min, se mi scias, ke ĉiu el ili samtempe estos bato al la

aliaj. Kaj ke estos tiel, por tio mi volas zorgi. Cetere, ĉu vi fakte konas la esploristan juĝiston?“

„Kompreneble“, diris la ino, „Pri tiu mi pensis eĉ unue, kiam mi ofertis helpon al vi. Mi ne sciis, ke li estas nur malaltranga oficisto, sed, ĉar vi diras tion, ĝi verŝajne estas ĝusta. Tamen mi pensas, ke la raporto, kiun li liveros supren, almenaŭ havos certan influon. Kaj li skribas tiom da raportoj. Vi diris, ke la oficistoj estas pigraj, sed certe ne ĉiuj, speciale ne tiu esplorjuĝisto, li skribas tre ofte raportojn. Ekzemple je la lasta dimanĉo daŭris la kunsido ĝis vespere. Ĉiuj homoj foriris, sed la esplorjuĝisto restis en la halo, mi devis porti lampon al li, mi havis nur kuirejan lampeton, sed li estis kontenta pri ĝi kaj tuj komencis skribi. Intertempe venis ankaŭ mia edzo, kiu je tiu dimanĉo ĝuste forpermesis, ni alportis la meblojn, rearanĝis nian ĉambron, poste ankoraŭ venis najbaroj, ni ankoraŭ interparoladis ĉe kandelo, koncize, ni forgesis la esploristan juĝiston kaj enlitiĝis por dormi. Subite en la nokto, estis certe jam profunde en la nokto, mi vekiĝis, apud la lito staris la esplorjuĝisto kaj kaŝis la lumon de la lampo permane, tiel, ke sur mian edzon ne

falu lumo, tio estis nenecesa atentemo, mia edzo tiom forte dormas, ke ankaŭ la lumo ne vekigus lin. Mi tiom teruriĝis, ke mi preskaŭ ekkriis, sed la esplorjuĝisto estis tre afabla, li avertis min esti atentema, li flustris al mi, ke li skribis ĝis tiu momento, ke li nun reportis la lampon al mi, kaj ke li neniam forgesos la vidaĵon, kiam li trovis min dormanta. Per ĉio ĉi mi volis diri al vi nur, ke la esplorjuĝisto efektive skribas multajn raportojn, speciale pri vi, ĉar via pridemandado certe estis unu el la unuavicaj temoj de la dimanĉa kunsido. Tiaj longaj raportoj ja ne povas estis tute sen signifo. Krome vi ja el la okazaĵo povas ekkoni, ke la esplorjuĝisto aspiras min, kaj ke mi ĝuste nun en la unua tempo, cetere li certe rimarkis min nur nun, povas havi grandan influon al li. Ke lia intereso pri mi estas granda, por tio mi havas nun ankaŭ aliajn pruvojn. Hieraŭ pere de la studento, al kiu li tre fidas, kaj kiu estas lia kunlaboranto, li sendis donace silkajn ŝtrumpojn al mi, laŭdire tial, ĉar mi ordigas la kunsidejon, sed tio estas nur preteksto, ĉar tia laboro estas ja mia devo kaj por ĝi mia edzo ricevas la pagojn. Estas belaj ŝtrumpoj, rigardu“ – ŝi etendis la gambojn, suprentiris la jupon ĝis supren al genuo kaj ankaŭ mem

rigardis la ŝtrumpojn, „estas belaj ŝtrumpoj, sed fakte tro delikataj kaj por mi ne taŭgaj.“

Subite ŝi interrompiĝis, metis manon sur manon de K., kvazaŭ ŝi volus trankviligi lin, kaj flustris: „Silentu, Berthold observas nin.“ K. levis lante la rigardon. En la pordo de la kunsidejo staris juna viro, li estis malalta, havis iom kurbigitajn gambojn kaj provis doni al si indon per mallonga nedensa ruĝeca plenbarbo, en kiu li seninterrompe vagadigis la fingrojn. K. rigardis lin scivoleme, li estis ja la unua studento de la nekonata juroscienco, kiun li kvazaŭ renkontis en la formo de homa ekzemplero. Jen viro, kiu verŝajne iam avancos al pli alta oficista posteno. Sed la studento ŝajne tute ne okupiĝis pri K., li mansalutis la inon nur per fingro, kiun li tiris dum momento el la barbo, kaj iris al la fenestro, la ino kliniĝis al K. kaj flustris: „Ne koleru pri mi, mi petas vin plurfoje, ankaŭ ne pensu malbone pri mi, mi devas nun iri al li, al tiu monstra homo, rigardu nur liajn kurbigitajn gambojn. Sed mi tuj revenos, kaj tiam mi iros kun vi, se vi kunprenos min, mi iros tien, kien vi volas, vi povos fari kun mi, kio plaĉos al vi, mi estos feliĉa, se mi estos for de

tie ĉie kiel eble plej longtempe, sed plej prefere ĉiam.“ Ŝi ankoraŭ karesis manon de K., salte leviĝis, kaj kuris al la fenestro. K., ankoraŭ aŭtomate provante ekpreni manon de ŝi, kaptis aeren. La ino tentis lin efektive, spite al ĉiu pripensado li ne trovis konvinkan kaŭzon, kial li ne cedu al la tento. La efemeran suspekton, ke la ino kaptu lin por la tribunalo, li rebatis senpene. Kiamaniere ŝi povus kapti lin? Li ja certe ĉiam tiom liberos, ke li tuj povos disbati la tutan tribunalon, almenaŭ, se temas pri li mem. Ĉu li ne havu tiun ioman konfidon al si mem? Kaj ŝia oferto pri helpo aŭdiĝis sincere kaj eble ne estis senvalora. Kaj eble ne estis pli bona venĝo al la esplorjuĝisto kaj al ties adeptaro ol tiu, ke li forprenos tiun inon de ili al si mem. Tiukaze iam povus okazi, ke la esplorjuĝisto post streĉa laboro je mensogoraportoj pri K. trovus en malfrua nokto la liton de la ino vaka. Kaj vaka tial, ĉar ĝi apartenas al K., ĉar apartenas tiu ino ĉe la fenestro, tiu pompa, fleksebla kaj varma korpo en malhela robo el kruda kaj peza ŝtofo, efektive nur al K.

Post kiam li tiel forigis la suspektojn kontraŭ tiu ino, la mallaŭta interparolado de ambaŭ ĉe la fenestro fariĝis tro

longa por li, li frapis per maleolo la podion kaj poste ankaŭ per la pugno. La studento rigardis mallonge trans la ŝultron de la ino al K., sed ne lasis ĝeni sin, li ja eĉ premis sin proksime al la ino kaj ĉirkaŭbrakis ŝin. Ŝi klinis profunde la kapon kvazaŭ ŝi atente aŭskultus lin. Li kisis ŝin, kiam ŝi kliniĝis, laŭte sur la kolon, sen konsiderinde interrompi la paroladon. K. vidis konfirmita per tio la tiranecon, kiun la studento laŭ la plendoj de la ino ekzercis al ŝi, li ekstaris kaj iradis en la ĉambro tien kaj ĉi tien. Li pripensis kun flankaj rigardoj al la studento, kiel li eble plej rapide povos forigi lin, kaj tial tio ne estis nebonvena al li, kiam la studento, evidente ĝenata de K. per ties ĉirkaŭirado, kiu parte jam fariĝis sovaĝa trotado, rimarkis: „Se vi estas senpacienca, vi povas foriri. Vi estus povinta foriri ankaŭ jam pli frue, neniu rimarkus vian mankon. Ja, vi eĉ estus devinta foriri pli frue kaj tre rapide, do jam, kiam mi enpaŝis." En tiu rimarko eble eksplodis kia ajn kolero, ĉiukaze se en ĝi estis ankaŭ la orgojlo de estonteca tribunala oficisto, kiu parolas al malplaĉa akuzito. K. restis tute proksime staranta ĉe li kaj diris ridete: „Mi estas senpacienca, tio estas ĝusta, sed tiu malpacienco plej simple forigeblos per tio, ke forlasos nin

vi. Sed, se vi eble venis al ĉi tie por studi – mi aŭdis, ke vi estas studento – mi volas volonte liberigi lokon por vi kaj foriri kun la ino. Cetere, vi ankoraŭ multe devos studi antaŭ ol vi estos juĝisto. Kvankam mi ankoraŭ ne tre precize konas vian jurisdikcion ankoraŭ, mi supozas tamen, ke sole per krudaj paroloj, kiujn vi efektive jam impertinente bone kapablas uzi, la afero ankoraŭ tute ne estas farita.“

„Oni ne estu permesinta vagadi lin tiel libere“, diris la studento, kvazaŭ li volus doni al la ino klarigon pri la ofenda parolo de K., „tio estis misago. Mi diris tion al la esplorjuĝisto. Oni estus devigita reteni lin inter la pridemandoj almenaŭ en ties ĉambro. De tempo al tempo la esplorjuĝisto estas nekomprenebla.“

„Senutilaj paroloj“, diris K. kaj etendis manon al la ino, do, venu.“

„Aĥ, tiel“, diris la studento, „ne, ne, ŝin vi ne ricevos.“ Kaj per forto, kiun oni ne supozus pri li, li levis ŝin sur brakon kaj kuris kun klinita dorso, kareseme rigardante al ŝi, al la pordo. Certa timemo pro K. ĉe tio ne estis

pretervidebla, tamen li kuraĝis eĉ inciti sinjoron K., ĉar li mankaresis kaj premis la inon per la libera brako. K. kuris kelkajn paŝojn apud li, preta kapti lin, kaj se devus esti gorĝopremi, jen la ino diris: „Tio ne helpas, la esplorjuĝisto ordonos rekonduki min, mi ne rajtas iri kun vi, tiu ĉi monstra fiulĉĵo“, dum tio ŝi transverse viŝis la vizaĝon de la studento, „tiu monstra fiulĉjo ne lasas min.“

„Kaj vi ne volas, ke oni liberigu vin, ĉu?“ kriisK. kaj metis manon sur ŝultron de la studento, kiu kaptis per siaj dentoj al ŝi.

„Ne!“ kriis la ino kaj forpuŝis sinjoron K. per ambaŭ manoj.„ne, ne, tion tute ne, ja kion vi imagas?! Tio estus mia pereo. Do lasu lin, ho ve, mi petas vin, lasu lin do, li ja nur plenumas la ordonon de la esplorjuĝisto kaj portas min al li.“

„Tiukaze li do kuru kaj vin mi ne volas plu vidi“, diris K. kolere pro seniluziiĝo kaj puŝis la dorson de la studento tiel, ke tiu stumblis kaj tuj poste, pro plezuro pri tio, ke li ne falis, saltis kun sia ŝarĝo eĉ pli alte ol antaŭe. K. paŝante sekvis ilin malrapide, li ekakceptis, ke tio

sendube estis la unua malvenko, kiun li spertis de tiuj homoj. Kompreneble ne ekzistis kaŭzo ektimemi pro tio, li nur tial malvenkis, ĉar li provokis la batalon. Se li restadus hejme kaj vivus sian kutiman vivon, li estus milfoje supera al ĉiu el tiuj homoj kaj povus forigi ĉiun per piedbato de sia vojo. Kaj li imagis la plej ridindan scenon, kiu okazus ekzemple, se tiu mizera studento, tiu orgojla infano, tiu kurbogamba barbulo starus antaŭ la lito de Elinjo kaj petus kun falditaj manoj pri indulgo. Al K. plaĉis tiu imago tiom, ke li decidis, se iam iel ekestus okazo por tio, kunpreni la studenton al Elinjo.

Pro scivolemo K. ankoraŭ rapidis al la pordo, li volis vidi, kien la ino estas kondukata, la studento ja ne portus eble eĉ la inon surbrake transstraten, ĉu? Montriĝis, ke la vojo estis multe malpli longa. Tuj transe de la loĝejo kondukis malvasta ligna ŝtuparo verŝajne al la subtegmentejo. Ĝi havis kurbiĝon tian, ke ĝia fino ne videblis. Sur tiu ŝtuparo la studento portis la inon supren, jam tre mallrapide kaj ĝemante, ĉar li estis malfortigita pro la ĝistiama kurado. La ino mansalutis malsupren al K. kaj provis montri per supren-kaj malsuprentirado de la

ŝultroj, ke ŝi estas senkulpa pri la forrabo, sed multe da bedaŭro pro tiu gesto ne ekkoneblis. K. rigardis ŝin senesprime kiel fremdulinon, li volis nek malkaŝi, ke li estas seniluziigita nek, ke li facile povus venki la seniluziigon.

La paro jam malaperis, sed K. staris ankoraŭ en la pordo. Li devis supozi, ke la ino ne nur trompis lin, sed per la aserto, ke ŝi estas portata al la esplorjuĝisto, ankaŭ mensogis. La esplorjuĝisto ja ne sidus sur planko de la subtegmento, atendante ŝin. La ligna ŝtuparo klarigis nenion, egale, kiom ajn longe oni rigardus ĝin. Jen K. rimarkis notfolieton apud la suprenirejo. Li iris transen kaj legis infanece mallertan surskribon: „Suprenirejo al la juĝejaj kancelarioj.“ Ĉi tie en la subtegmento de ludomo do estas la juĝejaj kancelarioj, ĉu? Tio ne estas loko, kiu kapablas veki multe da respekto. Kaj por akuzito estas trankvilige imagi, pri kiom malmulte da monrimedoj disponas la juĝejo, se ĝi instalis siajn kancelariojn tie, kien la luprenantoj, kiuj ja mem apartenas al la plej povraj, ĵetas sian senutilan fatrason. Tamen ne estis ekskludeble, ke oni havis sufiĉe da mono, sed ke la

oficistaro ĵetas sin sur ĝin antaŭ ol ĝi estas uzata por juĝejaj celoj. Tio estis laŭ la ĝistiamaj spertoj de K. eĉ tre verŝajna, tamen tia koruptiĝo de la juĝejo, kiu por akuzito estis senhonoriga, estis esence eĉ pli trankviliga ol estus la povreco de la juĝejo. Nun K. komprenis ankaŭ, kial oni hontis ĉe la unua pridemandado inviti la akuziton en la subtegmenton, sed preferis molesti lin en ties loĝejo. En kia alta socia pozicio ja troviĝis K. kompare al la juĝisto, kiu sidas en subtegmento, dum li mem havas en banko grandan ĉambron kun antaŭĉambro kaj tra giganta vitrotabulo povas rigardi sur la viglan urboplacon malsupren! Certe li ne havas kromenspezojn el subaĉetoj aŭ defraŭdoj kaj per la servisto ne povas portigi inon surbrake en la oficejon. Sed pri tio K., almenaŭ en tiu ĉi vivo volonte volus rezigni.

K. staris ankoraŭ antaŭ la murafiŝa notfolieto, kiam viro sur la ŝtuparo supreniris, rigardis tra la malfermita pordo en la loĝoĉambron, el kiu oni povis vidi ankaŭ la kunsidejon, kaj fine demandis sinjoron K., ĉu li ĉi tie antaŭ mallonge vidis inon.

„Vi estas la juĝeja servisto, ĉu?“ demandis K.

„Jes“, diris la viro, „aĥ, tiel do, vi estas la akuzito K., nun ankaŭ mi rekonas vin, estu bonvenigata.“ Kaj li etendis manon al K., kiu tute ne atendis tion. „Sed hodiaŭ ne estas kunsido anoncita“, diris la juĝeja servisto poste, kiam K. silentis.

„Mi scias“, diris K. kaj rigardis la civilan veston de la juĝeja servisto, kiu havis kiel ununuran oficialan signon krom kelkaj kutimaj butonoj ankaŭ du butonojn orumitajn, kiuj ŝajne estis detranĉitaj de malnova oficira mantelo. „Mi parolis antaŭ certa tempo kun via edzino. Ŝi ne plu estas ĉi tie. La studento portis ŝin al la esplorjuĝisto.“

„Nu, do“, diris la esplorjuĝisto, „ĉiam oni forportas ŝin de mi. Hodiaŭ estas ja dimanĉo, kaj mi estas devigita al neniu laboro, sed nur por forigi min de ĉi tie oni forsendis min kun sciigo, kiu ĉiuokaze estas senutila. Tamen oni ja forsendis min ne malproksimen, tiel, ke mi esperis, ke tiukaze, se mi tre rapidos, mi eble revenos ankoraŭ sufiĉe frutempe. Mi do kuris tiom rapide, kiom mi povis, mi kriis al la oficejo, kien mi estis sendita, mian sciigon tiel senspire haste tra la fendo ĉe la pordo, ke oni apenaŭ

komprenis ĝin, mi rekuris, sed la studento rapidis ankoraŭ pli ol mi, sed li havis ja pli mallongan vojon, li devis kuri nur malsupren sur la subtegmenta ŝtuparo. Se mi ne estus tiom dependa, mi jam delonge estus dispreminta la studenton ĉi tie je la muro. Ĉi tie apud la murafiŝo. Pri tio mi revas ĉiam. Ĉi tie, iomete super la planko, li estas firmpremita, kun etenditaj brakoj kaj disetenditaj fingroj, kun la kurbaj gamboj formantaj cirklon, kaj ĉirkaŭata de sangoŝprucaĵoj. Ĝis nun tio estas nur revo.“

„Alia helpo ne eblas, ĉu?“ demandis K. ridete.

„Mi scias neniun alian“, diris la juĝeja servisto.„Kaj nun tio fariĝos ja ankoraŭ pli aĉa, ĝis nun li portis ŝin nur al si. Sed nun li portas ŝin, kion mi ja atendis jam delonge, ankaŭ al la esplorjuĝisto.“

„Ĉu via edzino tute ne kulpas pri tio?“,demandis K., li devis devigi sin resti trankvila ĉe tiu demando, tiom forte sentis nun ankaŭ K. la ĵaluzon.

„Jes, certe“, diris la esplorjuĝisto, „ŝi eĉ plej multe kulpas.

Ŝi ja kroĉis sin al li. Kio koncernas lin mem, li postkuras ĉiujn inojn. Nur en tiu ĉi domo li estas jam elĵetita el kvin loĝejoj, en kiujn li enŝteliĝis. Sed mia edzino estas tute certe la plej bela en la tuta domo, sed ĝuste mi ne rajtas defendi min.“

„Se estas tiel, tiukaze helpo certe ne eblos“, diris K.

„Sed kial ne?“ demandis la juĝeja servisto. „ La studenton, kiu estas malkuraĝulo, oni foje devus, se li volas tuŝi mian edzinon, tiom trakti per pugnoj, ke li kuraĝos fari tion neniam plu. Sed mi ne rajtas fari tion kaj aliaj ne faras la komplezon al mi, ĉar ĉiuj timas lian potencon. Nur viro kiel vi povus fari tion.“

„Sed kial ĝuste mi?“ demandis K. mirigite.

„Vi estas ja akuzita“, diris la juĝeja servisto.

„Jes“, diris K., „sed des pli mi ja devus timi, ke, eĉ se li eble ne influos la specon de la procesfino, tamen verŝajne influos la antaŭan esploradon.“

„Jes, certe“, diris la juĝeja servisto, kvazaŭ la opinio de K.

same tiel ĝustas kiel la propra. „Sed ĉe ni kutime ne okazas procesoj, kiuj tute ne promesas sukceson.“

„Mi ne havas vian opinion“, diris K., „sed tio min tamen ne malhelpu ĉeokaze trakti la studenton.“

„Mi estus tre dankema al vi“, diris la juĝeja servisto iom formale, li fakte tamen ne fidis pri la plenumebleco de sia plej insista deziro.

„Eble meritus tion ankaŭ aliaj el viaj oficistoj“, daŭrigis K., „aŭ eble eĉ ĉiuj same, ĉu?“

„Jes, jes“, diris la juĝeja servisto, kvazaŭ temus pri io memkomprenebla. Poste li rigardis sinjoron K. konfideme, kiel li ne faris tion ĝis tiam spite al ĉiu sia afableco, kaj li aldonis: „Oni ja ĉiam ribelemas.“ Sed la interparolado ŝajne tamen komencis fariĝi iom malagrabla al li, ĉar li finis ĝin per tio, ke li diris: „Nun mi devas prezenti min en la kancelario. Ĉu vi volas kuniri?“

„Mi havas nenion por fari tie“, diris K.

„Vi povos rigardi la kancelariojn. Okupiĝos neniu pri vi.“

„Ĉu ĝi do estas rigardinda?“ demandis K. heziteme, sed li tre emis kuniri.

„Nu“, diris la juĝeja esploristo, „mi pensas, ke tio interesos vin.“

„Bone“, diris K. fine, „mi kuniros.“ Kaj li kuris pli rapide ol la juĝeja servisto sur la ŝtuparo supren.

Ĉe la enirejo li preskaŭ falis, ĉar post la pordo estis plia ŝtupo. „La publikon oni ne tre konsideras“, li diris. „Oni tute ne konsideras ĝin“, diris la esplorjuĝisto. „Rigardu nur la atendoĉambron ĉi tie.“ Estis longa irejo, de kiu kondukis krude ĉarpentitaj pordoj al la unuopaj sekcioj de la subtegmento. Kvankam ne ekzistis rekta aliro de lumo, tamen ne estis tute malhele, ĉar kelkaj sekcioj havis en la direkto al la irejo anstataŭ unuecaj lignaj tabulaj vandoj nur latlatisojn, kiuj tamen etendiĝis ĝis la plafonoj, tra kiuj penetris kelke da lumo kaj tra kiuj oni povis vidi ankaŭ unuopajn oficistojn skribantajn ĉe tabloj aŭ ĝuste starantajn ĉe latiso kaj observantajn tra la fendoj la homojn sur la irejo. Estis, ŝajne, ĉar estis dimanĉo, nur malmultaj homoj sur la irejo. Ili aspektis tre modestaj. En

preskaŭ regulaj distancoj unu de la aliaj ili sidis sur la du vicaj lignobenkoj, kiuj troviĝis ambaŭflanke de la irejo. Ĉiuj neglekte vestis sin, kvankam la plej multaj el ili laŭ vizaĝesprimo, sinteno, barbofrizo kaj multaj apenaŭ konstateblaj detaletoj apartenis al la pli altaj homtavoloj. Ĉar ne estis vestohokoj, ili metis la ĉapelojn, verŝajne tial, ĉar ĉiu krom la unua sekvis la ekzemplon de alia, sub la benkon. Kiam tiuj, kiuj sidis plej proksime al la pordo, ekvidis sinjoron K. kaj la juĝejan serviston, ili leviĝis por saluti; ĉar tion vidis la apudaj, ili supozis, ke ankaŭ ili salutu, tiel ke ĉe la preterirado de ambaŭ leviĝis ĉiuj. Ili staris neniam tute rektaj, la dorsoj estis klinitaj, la genuoj fleksitaj, ili staris kiel surstrataj almozpetantoj. K. atendis la juĝejan serviston iom malantaŭ li irantan kaj diris: „Kiom humiligitaj ili devas esti.“

„Jes“, diris la juĝeja servisto, „ili estas akuzitoj, ĉiuj, kiuj staras ĉi tie, estas akuzitoj.“

„Vere!“ diris K. „Tiukaze ili estas ja miaj kolegoj.“ Kaj li turnis sin al la plej proksima granda, svelta, preskaŭ jam grizharara viro. „Kial vi atendas ĉi tie?“ demandis K. ĝentile. Sed la neatendita alparolo konfuzigis la viron, kio

aspektis eĉ pli embarasiga, ĉar temis evidente pri mondosperta viro, kiu aliloke certe sciis regi sin, kaj la superecon, kiun li gajnis kontraŭ multaj aliaj, ne fordonis facile. Sed ĉi tie li ne sciis, kion respondi al tia simpla demando, kaj li rigardis al la aliaj, kvazaŭ tiuj estus devigitaj helpi al li, kaj kvazaŭ neniu povus atendi respondon de li, se tiu helpo ne okazus. Jen la juĝeja servisto alpaŝis kaj por trankviligi kaj por instigi la viron, li diris: „La sinjoro ĉi tie demandas ja nur kial vi atendas. Do, bonvolu respondi.“ La voĉo de la juĝeja servisto, verŝajne konata al li, efikis pli bone: „Mi atendas –“ li komencis kaj haltis. Evidente li elektis tiun komencon por respondi tute precize al tiu demando, sed poste li ne trovis la daŭrigon. Kelkaj el la atendantoj proksimiĝis kaj ĉirkaŭstaris la grupon, la juĝeja servisto diris al ili: „For, for, liberigu la irejon.“ Ili iom retropaŝis evite, sed ne ĝis siaj pli fruaj sidlokoj. Intertempe la demandito rekolektis fortojn kaj respondis eĉ kun eta rideto: „Antaŭ monato mi metis kelkajn pruvproponojn pro mia afero kaj atendas la plenumon.“

„Vi ja ŝajne tre penas, ĉu?“, diris K.

„Jes“, diris la viro, „estas ja afero mia.“

„Ĉiu ne pensas kiel vi“, diris K., „ekzemple ankaŭ mi estas akuzita, sed mi entreprenis, tio tiom veras, kiom mi volas fariĝi beata, nek pruvproponon nek ion ajn tian. Ĉu vi tion do pensas vere necesa?“

„Mi ne scias precize“, diris la viro denove tute malcerte, li evidente supozis, ke K. mistifikas lin, tial li pro timo fari iun novan eraron plej prefere estus tute ripetinta sian pli fruan respondon, sed antaŭ la senpacienca rigardo de K. li diris nur: „Kio koncernas, min, mi metis pruvproponojn.“

„Ĉu vi do ne pensas, ke mi estas akuzita?“ demandis K.

„Ho, bonvolu, certe“, diris la viro kaj paŝis iom flanken, sed en la respondo ne estis fido, sed nur timo.

„Vi do ne fidas min?!“ demandis K. kaj kaptis lin, senkonscie instigite per la humila konduto de la viro, ĉe brako, kvazaŭ li volus devigi lin fidi. Sed li ne volis dolorigi lin, li ankaŭ nur tre softe atakis lin, tamen la viro ekkriis, kvazaŭ K.prenus lin ne per du fingroj, sed per

ardanta tenajlo. Tiu ridinda kriado faris lin tuj ĝisgorĝe sata al K.; se oni ne volas akcepti, ke li estas akuzata, tiukaze tio estas eĉ pli bona; eble li eĉ supozis lin juĝisto. Kaj li prenis lin tiam adiaŭe eĉ pli firme, li retropuŝis lin ĝis la benko kaj iris plu.

„La plej multaj akuzitoj estas tre sentemaj“, diris la juĝeja servisto. Malantaŭ ili kolektiĝis nun preskaŭ ĉiuj atendantoj ĉirkaŭ la viro, kiu jam ĉesis krii, kaj ŝajne ili pridemandis lin pri la okazaĵo tute detale. Renkonte al K. venis tiumomente gardisto, kiu unuavice ekkoneblis je sabro, kies ingo almenaŭ laŭ la koloro konsistis el aluminio. K. miris pri tio kaj eĉ provis tuŝi ĝin permane. La gardisto, kiu venis pro la kriado, demandis pri la okazintaĵo. La juĝeja servisto provis trankviligi lin per kelkaj vortoj, sed la gardisto klarigis, ke li tamen ankoraŭ mem devos esplori tion, li salutis soldatece kaj iris plu kun tre hastaj, sed etdistance mezuritaj paŝoj, verŝajne pro podagro.

K. ne okupiĝis longe pri li kaj pri la societo sur la irejo, precipe tial, ĉar li vidis proksimume meze de la irejo la eblon dekstre eniri tra senporda enirejo. Li

interkomunikadis kun la juĝeja servisto pri tio, ĉu tio estas la ĝusta vojo, la juĝeja servisto kapjesis kaj K. nun efektive tie eniris. Li trovis molesta, ke li ĉiam devas iri unu aŭ du paŝojn antaŭ la juĝeja servisto, tio almenaŭ je tiu loko povus ekestigi la impreson, kvazaŭ li arestite estus antaŭkondukota. Li do ofte atendis la juĝejan serviston, sed tiu ĉiam tuj denove postrestis. Fine K., por fari finon al sia malbonfarto, diris: „Nun mi vidis, kiel tio aspektas ĉi tie, mi volas nun foriri.“

„Vi ankoraŭ ne vidis ĉion“, diris la juĝeja servisto tute nemalice.

„Mi ne volas vidi ĉion“, diris K., kiu cetere sentis sin efektive tute laca, „mi volas foriri, kiel oni atingas la elirejon?“

„Ĉu vi eble jam forgesis la vojon?“ demandis la juĝeja servisto mirigite. „Vi iru de ĉi tie ĝis la angulo kaj poste dekstren sur la irejo malsupren rekte ĝis la pordo.“

„Kunvenu“, diris K. „montru al mi la vojon, mi ne trovos ĝin, estas ĉi tie tiom da vojoj.“

„Tio estas la ununura vojo “, diris nun iom riproĉe la juĝeja servisto, „mi ne povas retroiri kun vi, mi devos ja transdoni mian sciigon kaj jam perdis multe da tempo pro vi.“

„Kunvenu!“ ripetis K. nun pli akre, kvazaŭ li fine malkovrus malveron de la juĝeja servisto.

„Ne kriu tiom“, flustris la juĝeja servisto, „estas ja ĉi tie ĉie oficejoj. Se vi ne volas reiri sola, iru do ankoraŭ iom kun mi aŭ atendu ĉi tie, ĝis mi estos transdoninta mian sciigon, tiam mi ja volonte povos reiri kun vi.“

„Ne, ne“, diris K., „mi ne atendos kaj vi nun devos iri kun mi.“ K. ankoraŭ tute ne ĉirkaŭrigardis en la ejo, en kiu li estis, nur kiam nun malfermiĝis unu el la multaj lignaj pordoj troviĝantaj ĉirkaŭe, li enrigardis. Junulino, kiu ŝajne pro la laŭta parolado de K. estis alvokita, eniris kaj demandis: „Kion vi deziras, sinjoro?“ Malantaŭ ŝi en la foro oni vidis proksimiĝi ankaŭ viron en la morna lumo. K. rigardis al la juĝeja servisto. Tiu diris ja, ke neniu okupiĝos pri K., kaj nun proksimiĝis eĉ duopo, necesis ne multo por frapi la atenton de la oficistaro. Ili postulos

klarigon de lia ĉeesto. La ununure komprenebla kaj akceptebla estis tiu, ke li estis akuzito kaj volis ekscii la daton de la sekva pridemandado, sed ĝuste tiun klarigon li ne volis doni, precipe tial, ĉar ĝi ankaŭ ne estis la vera, ĉar li venis ja pro scivolemo aŭ, kio kiel klarigo estis eĉ pli malebla, pro la sopiro konstati, ke la interno de tiu jurisdikcio estis same tiel naŭza kiel ties eksteraĵo. Kaj ŝajnis eĉ, ke li pravis pri tiu supozo, li ne volis plu enpenetri, li estis sufiĉe premita de tio, kion li vidis ĝis tiam, li ĝuste en tiu momento ne estis en la stato povi alfronti pli altan oficiston, kiu povus aperi post ĉiu pordo, li volis foriri, kaj nepre kun la juĝeja servisto aŭ sola, se tio devus esti.

Sed lia silenta starado devis frapi la atenton, kaj efektive la junulino kaj la juĝeja servisto rigardis lin tiel, kvazaŭ en la sekva minuto iu granda ŝanĝiĝo devus okazi je li, kiun observi ili ne volis preterlasi. Kaj sur la sojlo de la pordo staris nun la viro, kiun K. antaŭe rimarkis en la foro, li firmtenis sin je la supra trabo de la malalta pordo kaj balanciĝis iom sur la piedfingroj, tiel, kiel senpacienca spektanto. Sed la junulino tamen unue ekkonis, ke la

konduto de K. kaŭzis ioma malbonfartiĝo, ŝi alportis fotelon kaj demandis: „Ĉu vi bonvolas sidiĝi?“ K. sidiĝis tuj kaj apogis sin, por sidi pli sekure, per la kubutoj sur la fotelaj brakoj. „Vi havas iom da kapturniĝoj, ĉu?“ ŝi demandis lin. Li havis nun ŝian vizaĝon proksime antaŭ si, ĝi havis severan esprimon, kiel havas tian kelkaj inoj ĝuste en sia plej bela junulina tempo. „Ne afliktiĝu pro tio“, ŝi diris“, „tio estas nenio eksterordinara ĉi tie, preskaŭ ĉiu travivas tian atakon, kiam li alvenas je la unua fojo ĉi tien. Ĉu vi estas je la unua fojo ĉi tie? Nu do, tio sekve tion ne estas eksterordinara. Suno arde sunumas ĉi tie la tegmentan trabaron, kaj la varmega ligno faras la aeron tre sufokiga kaj peza. La loko tial por oficejaj ĉambroj ne tre taŭgas, kiajn ajn grandajn avantaĝojn ĝi tamen ofertas. Sed koncerne al la aero, ĝi estas dum tagoj de granda klienta frekvento, kaj tiu okazas preskaŭ ĉiutage, apenaŭ plu spirebla. Se vi tiukaze ankoraŭ pripensas, ke ĉi tie ankaŭ ofte tolaĵoj estas pendigataj por sekigado – oni povas malpermesi tion ne tute al la luprenantoj – , vi ne plu miros, ke vi eksentis vin iom malbonfarta. Sed oni fine kutimiĝas tre bone pri la aero. Se vi venos al ĉi tie je dua- aŭ tria fojo, vi apenaŭ plu

sentos la premigitecon ĉi tie. Ĉu vi jam fartas pli bone?“ K. ne respondis, tio estis tro embarasiga por li, ke li per tiu subita malforto estis elmetita al tiuj homoj, krome li sentis sin, kiam li nun eksciis la kaŭzon de sia malbonfarto, ne pli bone, sed eĉ iom pli malbone. La junulino tuj rimarkis tion, ŝi prenis, por refreŝigi sinjoron K., hokostangon apogitan al vando, kaj malfermpuŝis per ĝi luketon, kiu troviĝas ĝuste super K. kaj kiu kondukas rekte eksteren. Sed falis tiom da fulgo tra ĝi, ke la junulino tuj devis ree fermtiri la lukon kaj per sia naztuko forviŝi la fulgon de la manoj de K., ĉar K. estis tro laca por fari tion mem. Li volonte volis sidi plu, ĝis li sufiĉe refortiĝos por foriri, sed tio devus okazi des pli frue, ju malpli oni prizorgus lin. Sed tiam la junulino krome diris: „Ĉi tie vi ne rajtas restadi, ĉi tie vi ĝenas la trafikon. – K. demandis per rigardoj, kiun trafikon li do ĝenas.

„Mi kondukos vin, se vi akceptas tion, en la malsanulan ĉambron. Helpu al mi, bonvolu“, ŝi diris al la viro en la pordo, kiu tuj proksimiĝis. Sed K. ne volis esti en la malsanula ĉambro, ĝuste tion li volis ja eviti, ke li estos kondukata plu, ju pli li irus plu des pli aĉe ja devus fariĝi.

„Mi ja certe povos iri", li tial diris kaj ekstaris tremante, dorlotite de la oportuna sidado. Sed poste li ne povis elteni la rektan staradon. „Mi tamen ne povas", li kapskue diris kaj ĝemante residiĝis. Li memoris pri la juĝeja servisto, kiu spite al ĉio ĉi ja senprobleme povus elkonduki lin, sed li ŝajne jam delonge estis for. K. trarigardis inter la junulino kaj la viro, kiuj staris antaŭ li, sed ne povis trovi la juĝejan serviston.

„Mi supozas", diris la viro, cetere elegante vestita kaj frapante la atenton speciale pro griza kamizolo, kiu finiĝis en du longaj akre tranĉitaj pintoj, „la malbonfarton de la sinjoro kaŭzas la atmosfero ĉi tie, tial estos plej bone kaj ankaŭ plej agrable por li, se ni ne kondukos lin unue en la malsanulan ĉambron, sed tuj tute el la kancelarioj."

„Estas tiel", vokis K. kaj pro jubila ĝojo preskaŭ ankoraŭ interrompis la parolon de la viro, „mi certe tuj bonfartiĝos, mi ankaŭ ne estas tiom malforta, nur iom da subteno sub la akseloj mi bezonos, mi ne kaŭzos multe da peno al vi, krome la vojo ja ne estas longa, konduku min nur al la pordo, mi tiam ankoraŭ sidos dum iom da tempo sur la ŝtupoj kaj baldaŭ rekolektos fortojn, mi kutime ja

tute ne suferas pro tiaj malfortigaj atakoj, eĉ al mi mem tio estas surprizo. Ankaŭ mi estas ja oficisto kaj kutimiĝis pri oficeja aero, sed ĉi tie ĝi ŝajne estas tro aĉa. Vi diris tion mem. Bonvolu do havi la afablecon iom konduki min, ĉar mi havas kapturniĝojn, kaj mi malbonfartos, tuj, kiam mi leviĝos.“ Kaj li levis la ŝultrojn por plifaciligi al ili la prenadon sub la brakoj.

Sed la viro ne sekvis la postulon, sed tenis la manojn senmove en la pantalonpoŝoj kaj ridis laŭte. „Atentu“, li diris al la junulino, „mi do trafis la celon. La sinjoro nur ĉi tie malbonfartas, ne ĝenerale.“

Ankaŭ la junulino ridetis, sed ŝi batis softe per la fingropintoj de mano sur brakon de la viro, kvazaŭ li permesis al si tro drastan ŝercon al K.

„Sed kion vi pensas“, diris la viro ankoraŭ plu ridante, „mi ja vere intencas elkonduki la viron.“

„Tiukaze estas bone“, diris la ino, dum ŝi klinis momente sian gracian kapon. „Ne troigu la gravecon de tiu ridado“, diris la ino al K., kiu, denove malgajiĝinta, gapis antaŭ

sin, ŝajne ne bezonante klarigon.

„Tiu sinjoro – mi ja rajtas vin prezenti, ĉu?“ (la sinjoro per mansigno donis la permeson ) – „Tiu sinjoro do estas la sciigisto. Li donas al la atendantaj procespartioj ĉiujn sciigojn, kiujn ili bezonas, kaj ĉar nia jurisdikcio en la loĝantaro ne estas tre konata, oni petas pri multaj sciigoj. Li scias pri ĉiuj demandoj respondon. Vi povas testi lin, se vi foje emas pri tio. Sed tio ne estas lia sola avantaĝo, lia dua avantaĝo estas liaj elegantaj vestoj. Ni, tio estas la oficistaro, interkonsentiĝis iam, ke pro la inda unua impreso oni elegante vestu la sciigiston, kiu sen interrompo kaj ja kiel unua intertraktas kun la procespartioj. Ni aliaj, kiel vi povas vidi jam je mi, bedaŭrinde estas tre malbone kaj ekstermode vestitaj; tio ankaŭ ne havas multe da senco elspezi iom por la vestoj, ĉar ni estas preskaŭ seninterrompe en la kancelarioj, ni ja ankaŭ dormas ĉi tie. Sed, kiel dirite, por la sciigisto ni iam pensis necesa belan vestaĵon. Sed ĉar ĝi ne estis ricevebla de nia administrado, kiu estas iom stranga en tiu rilato, ni kolektis monon – ankaŭ procespartioj partoprenis, – kaj ni aĉetis por li tiun belan veston kaj ankaŭ aliajn. Ĉio do

estus preparita por fari bonan impreson, sed pro lia ridado li fuŝas tiun kaj timigas la homojn.“

„Tiel estas“, diris la sinjoro mokeme, „sed mi ne komprenas, fraŭlino, kial vi rakontas al la sinjoro ĉiujn niajn intimaĵojn, aŭ pli precize, urĝas ilin al li, li ja tute ne volas ekscii ilin. Observu nur, kiel li, evidente okupata pri siaj propraj aferoj, sidas tie.“

K. eĉ ne emis kontraŭdiri ion, la intenco de la ino povus esti bona, ŝi eble koncentriĝis pri tio lin distri aŭ doni al li la eblon kolekti fortojn, sed la rimedo ne taŭgis.

„Mi devis klarigi vian ridadon al li“, diris la ino. „Ĝi estis ja ofenda.“

„Mi supozas, ke li pardonus eĉ pli fiajn ofendojn, se mi fine elkondukus lin.“

K. diris nenion, eĉ ne rigardis supren, li toleris, ke ambaŭ intertraktis pri li kiel pri aĵo, tion li eĉ plej preferis. Sed subite li sentis manon de la sciigisto surbrake, kaj manon de la ino sur la alia brako. „Ek do, malforta viro“, diris la sciigisto.

„Mi tre dankas al vi ambaŭ “, diris K., ĝoje suprizite. Li leviĝis lante kaj gvidis mem la fremdajn manojn al tiuj lokoj, kie li plej bezonis apogon.

„Ŝajnas tiel“, diris la junulino mallaŭte al orelo de K., dum ili proksimiĝis al la irejo, „kvazaŭ mi speciale volus meti la sciigiston en helan lumon, sed oni fidu pri tio, mi volas diri la veron. Li ne havas ŝtonan koron. Li ne estas devigata elkonduki malsanajn klientojn kaj li faras tion tamen, kiel vi vidas. Eble neniu el ni estas tiom ŝtonkora, eble ni ĉiuj volonte helpus, sed kiel juĝejaj oficistoj ni facile aspektas, kvazaŭ ni estus ŝtonkoraj kaj volus helpi al neniu. Mi kvazaŭ eĉ suferas pro tio.“

„Ĉu vi ankoraŭ volas iom sidiĝi ĉi tie?“ demandis la sciigisto, ili jam estis en la irejo kaj ĝuste antaŭ la akuzito, al kiu K. parolis pli frue. K. preskaŭ hontis antaŭ li, pli frue li staris tiel rekte antaŭ la akuzito, kaj nun duopo devis apogi lin, lian ĉapelon la sciigisto balancis sur siaj disigitaj fingroj, la frizo estis detruita, la hararo pendis al li sur la ŝvitkovritan frunton. Sed la akuzito ŝajne rimarkis nenion pri tio, humile li staris antaŭ la sciigisto, kiu rigardis super lian kapon transen kaj provis klarigi

nur sian ĉeeston. „Mi scias“, li diris, „ke la plenumo de miaj proponoj hodiaŭ ankoraŭ ne eblas. Sed mi tamen venis ĉi tien, mi pensis, ke mi tamen povus atendi ĉi tie, estas dimanĉe, mi havas ja tempon kaj ĉi tie mi ĝenas neniun.“

„Vi ne devas senkulpigi vin tiom“, diris la sciigisto, „via zorgemo estas ja tute laŭdinda. Kvankam vi nenecese okupas ĉi tie lokon, sed mi tamen ne volas malhelpi vin detale observi la progreson de viaj aferoj, tiom longe, kiom tio ne estos ĝena al mi. Se oni vidis homojn, kiuj neglektis sian devon hontige, oni lernas pacienci al homoj, kiuj estas tiaj, kiaj vi. Sidiĝu.“

„Kiel bone li scias paroli al procespartoprenantoj“, flustris la junulino. K. kapjesis, sed tuj denove rektiĝis, kiam la sciigisto ree demandis lin: „Ĉu vi ne volas sidiĝi ĉi tie?“

„Ne“, diris K., „mi ne volas ripozi.“ Li diris tion kiel eble plej certe, envere bonfartigis lin sidiĝi. Li estis kvazaŭ marmalsana. Li pensis, ke li estas sur ŝipo, kiu troviĝas sur altegaj ondoj. Li havis senton, kvazaŭ la akvo ĵetiĝas kontraŭ la lignaj vandoj, kvazaŭ venas el la profundo de

ondoj bruado de rompiĝantaj ondokrestoj, kvazaŭ la irejo balanciĝas transverse kaj kvazaŭ la atendantaj procespartioj ambaŭflanke estus levitaj kaj sinkigitaj. Des pli malkompreneblaj estis la trankvilo de la junulino kaj de la viro, kiuj kondukis lin. Li estis translasita al ili, se ili lasus lin, li devus renversiĝi kiel breto. El iliaj malgrandaj okuloj migris akraj rigardoj tien kaj ĉi tien, iliajn samtaktajn paŝojn K. sentis sen kunpaŝi, ĉar li preskaŭ estis portata de paŝo al paŝo. Fine li rimarkis, ke ili parolas al li, sed li ne komprenis ilin, li aŭdis nur la bruon, kiu plenigis ĉion kaj tra kiu ŝajne sonis neŝanĝite alta tono kiel de sireno.

„Pli laŭtu", li flustris kun klinita kapo kaj hontis, ĉar li sciis, ke ili parolas sufiĉe laŭte, eĉ kvankam nekompreneble por li. Jen fine, kvazaŭ vando antaŭ li disŝiriĝus, blovis freŝa aero renkonte al li kaj li aŭdis diri apud si: „Unue li volis foriri kaj nun oni povas diri al li centfoje, ke ĉi tie estas la elirejo, kaj li ne moviĝas."

K. rimarkis, ke li staras antaŭ la elireja pordo, kiun la knabino jam malfermis. Li havis senton, kvazaŭ ĉiuj fortoj per unu fojo revenis al li. Por gajni antaŭguston de

la libero li tuj paŝis sur ŝtuparan ŝtupon kaj adiaŭis de tie siajn akompanantojn, kiuj kliniĝis malsupren al li.

„Mi tre dankas“, li ripetis, li plurfoje premis al ambaŭ la manojn kaj delasis ilin nur, kiam li supozis vidi, ke ili, kutimigitaj pri la kancelaria aero, apenaŭ eltenis la relative freŝan aeron blovantan de la ŝtuparo. Ili apenaŭ povis respondi, kaj la ino eble estus brue falinta, se K. ne estus ferminta kiel eble plej rapide la pordon.

K. staris ankoraŭ dum momento kviete, li glatigis kaj ordigis antaŭ poŝospegulo la hararon, levis sian ĉapelon, kiu kuŝis sur la sekva interŝtupara plataĵo – la sciigisto ŝajne ĵetis lin tien – kaj poste kuris sur la ŝtuparo malsupren, tiel freŝe kaj kun tiaj longaj saltoj, ke li preskaŭ ektimis pro tiu ŝanĝiĝo. Tiajn surprizojn lia alitempe tute stabila sanstato ankoraŭ neniam havigis al li. Ĉu eble lia korpo volis revolucii kaj prepari novan proceson kontraŭ li, ĉar li tiel senpene eltenis la malnovan? Li ne tute rifuzis la penson ĉe sekva okazo iri al kuracisto, sed ĉiukaze li volis – pri tio li povis konsili al si mem – uzi ĉiujn estontajn dimanĉajn antaŭtagmezojn pli bone ol tiun.

# Kvara ĉapitro

## La amikino de fraŭlino Brosisto

En la sekva tempo al K. tute ne eblis interŝanĝi eĉ nur kelkajn vortojn kun fraŭlino Brosisto. Li provis proksimiĝi al ŝi plej diversmaniere, sed ŝi ĉiam povis malhelpi tion. Tuj post sia oficeja tempo li alvenis hejmen, restadis sidante sur sia kanapo en sia ĉambro sen funkciigi la lumon kaj okupiĝis pri nenio alia krom observi la antaŭĉambron. Se ekzemple preteriris la servoknabino kaj fermis la pordon de la ŝajne senhoma ĉambro, li ekstaris por certa tempo kaj denove malfermis ĝin. Matene li ekstaris horon pli frue ol kutime por eventuale renkonti fraŭlinon Brosisto sola, kiam ŝi iras en la oficejon. Sed neniu el tiuj provoj sukcesis. Poste li skribis al ŝi leteron kaj al la oficejo kaj al loĝejo, kaj en tiuj ankoraŭfoje provis rajtigi sian konduton, li ofertis al ŝi ĉian kontentigon, promesis neniam transiri la limojn, kiujn ŝi metos kaj petis ŝin nur doni la eblon unufoje paroli kun ŝi, precipe tial, ĉar li ankaŭ ne povos komisii ion ĉe sinjoro Grubaĥ, tiom longe, kiom li antaŭe ne estos

interkonsiliĝinta kun ŝi. Fine li sciigis al ŝi, ke li atendos je la sekva dimanĉo la tutan tagon en sia ĉambro signon de ŝi, ke ŝi donos al lia peto la perspektivon pri ties plenumo, aŭ ke ŝi almenaŭ klarigos al li, kial ŝi ne volas plenumi lian peton, kvankam li ja promesis obei al ŝi pri ĉiuj deziroj. La leteroj ne revenis, sed ankaŭ ne sekvis respondo. Male al tio dimanĉe estis signo, kies klareco estis sufiĉa. Tuj matene rimarkis K. tra la ŝlosiltruo precipan movadon en la antaŭĉambro, kiu baldaŭ ekkompreneblis. Instruistino de la franca, ŝi cetere estis germanino kaj nomiĝis Lundo, jen malforta, palvizaĝa, iom lamira ino, kiu ĝis tiam loĝis en propra ĉambro, transloĝiĝis en la ĉambron de fraŭlino Brosisto. Dum horoj oni vidis ŝin treniĝe troteti tra la antaŭĉambro. Ĉiam ankoraŭ estis iu tolaĵo aŭ forgesita kovrileto aŭ libro, kiuj speciale estis prenitaj kaj transportataj en la novan loĝejon.

Kiam fraŭlino Grubaĥ portis al K. la matenmanĝon, – ŝi translasis, de kiam ŝi tiom kolerigis sinjoron K., eĉ ne la plej etan priservon al la ĉambristino – K. ne povis reteni sin alparoli ŝin je la unua fojo post kvin tagoj. „Kial

hodiaŭ estas tiom da bruo en la antaŭĉambro?“ li demandis, dum li enverŝis la kafon, „ĉu oni ne povus interrompi tion? Ĉu oni ĝuste dimanĉe devas reordigi ĉambron?“ Kvankam K. ne rigardis supren al sinjorino Grubaĥ, li rimarkis tamen, ke ŝi elspiris kvazaŭ plifaciligite. Eĉ la severajn demandojn de K. ŝi komprenis kiel pardonon aŭ kiel komencon de pardono. „Oni ne reordigas ion, sinjoro K.“, ŝi diris, „nur fraŭlino Lundo transloĝiĝas al fraŭlino Brosisto kaj portas siajn aĵojn transen.“ Ŝi diris nenion plu, sed atendis, kiel K. akceptos tion. Aŭ ĉu li permesos al ŝi paroli plu. Sed K. provis ŝian reagon, li kirlis pripenseme la kafon per kulero kaj silentis. Poste li rigardis al ŝi kaj diris:„Ĉu vi jam cedis pri via pli frua suspekto rilate al fraŭlino Brosisto?“

„Sinjoro K.“, vokis sinjorino Grubaĥ, kiu nur atendis tiun demandon, kaj etendis al K. siajn falditajn manojn. „Vi apenaŭ povis akcepti ĉeokazan rimarkon. Mi ja eĉ iomete ne pensis pri tio ofendi vin aŭ iun alian. Vi konas min ja jam sufiĉe longe, sinjoro K. por povi esti konvinkita pri tio. Vi tute ne scias, kiom mi suferis dum la lastaj tagoj! Mi laŭdire kalumnias miajn luprenantojn! Kaj vi, sinjoro

K. pensis tion ebla! Kaj vi diris, ke mi ĉesigu vian lukontrakton, ĉesigu vian lukontrakton!“ La lasta elvoko jam sufokiĝis, kiam ŝi ekploris, ŝi levis la antaŭtukon antaŭ la vizaĝon kaj laŭte plorsingultis.

„Ja ne ploru, sinjorino Grubaĥ“, diris K. kaj rigardis el la fenestro, li pensis nur pri fraŭlino Brosisto kaj pri tio, ke ŝi prenis fremdan inon en sian ĉambron.“ Ja ne ploru“, li diris plian fojon, kiam li returnis sin en la ĉambron kaj sinjorino Grubaĥ ploris ankoraŭ. „Tion tiam ja ankaŭ mi ne opiniis tiel seriozege. Ni reciproke simple miskomprenis nin. Tio iam povas okazi eĉ al longjaraj amikoj.“

Sinjorino Grubaĥ ŝovis la antaŭtukon sub la okulojn por vidi, ĉu K. vere paciĝis.

„Nu jes, estas tiel“, diris K. kaj, ĉar laŭ la konduto de sinĵorino Grubaĥ konkludeblis, ke la kapitano perfidis nenion, li kuraĝis nun aldoni: „Ĉu vi vere pensas, ke pro fremda ino mi povus malamikiĝi al vi?“

„Tio ja ĝuste tiel estas“, sinjoro K.“, diris sinjorino

Grubaĥ. Estis ŝia malfeliĉo, ke tiukaze, se ŝi sentas sin nur iom pli libera, tuj devas diri ion nelertan. „Mi demandas min seninterrompe: Kial sinjoro K. tiom afliktiĝas pro la fraŭlino Brosisto? Kial li kverelas pro ŝi kun mi, kvankam li scias, ke ĉiu malbona vorto el lia buŝo prenas de mi la dormon? Mi diris ja pri la fraŭlino nenion alian krom tio, kion mi mem vidis per la propraj okuloj.

K. diris nenion pri tio, li estus devinta elĵeti de la ĉambro ŝin jam pro la unua vorto, sed tion li ne volis fari. Li kontentiĝis pri tio trinki la kafon kaj sentigi al sinjorino Grubaĥ ŝian superfluecon. Ekstere oni aŭdis denove la treniĝantan iradon de fraŭlino Lundo, kiu iris tra la tuta antaŭĉambro. „Ĉu vi aŭdas tion?“ demandis K. kaj montris permane al la pordo.

„Jes“, diris sinjorino Grubaĥ kaj ĝemis, „mi volis helpi al ŝi kaj ankaŭ helpigi fare de la ĉambristino, sed ŝi estas kaprica, ŝi volas ĉion mem porti transen. Mi miras pri fraŭlino Brosisto. Min ofte molestas, ke fraŭlino Lundo estas mia luprenantino, sed fraŭlino Brosisto prenas ŝin eĉ en sian ĉambron.“

„Tio tute ne devas aflikti vin“, diris K. kaj dispremis la sukerajn restaĵojn en la taso. „Ĉu vi pro tio eventuale havas damaĝon?“

„Ne“, diris sinjorino Grubaĥ, „per si mem tio estas tute bonvena al mi, mi ricevos per tio aldonan liberan ĉambron kaj tie povos loĝiĝi mian nevon, la kapitanon. Mi timas jam delonge, ke li povus esti ĝeninta vin en la lastaj tagoj, dum kiuj mi devis lasi loĝi lin apude en la loĝoĉambro. Li ne estas tre respektema.“

„Kiaj ideoj!“ diris K. kaj leviĝis. „Pri tio ja ne temas. Vi ŝajne eĉ pensas, ke mi tro senteme reagas, ĉar mi ne povas elteni la migrojn de la fraŭlino Lundo – nun ŝi denove reiras.“

Sinjorino Grubaĥ sentis sin sufiĉe senpotenca. „Ĉu, sinjoro K., mi diru, ke ŝi prokrastu la restantan parton de la transloĝiĝo? Se vi volas, mi faros tion tuj.“

„Sed ŝi ja transloĝiĝu al fraŭlino Brosisto!“ diris K.

„Jes“, diris sinjorino Grubaĥ, ŝi ne tute komprenis, kion K. opiniis.

„Nu do", diris K., „tiukaze ŝi ja devas transporti siajn aĵojn."

Sinjorino Grubaĥ nur kapjesis. Tiu ĉi silenta senhelpeco, kiu ekstere ne aspektis alie ol spito, incitis sinjoron K. eĉ pli. Li komencis iri en la ĉambro de la fenestro ĝis la pordo tien kaj reen kaj prenis per tio al sinjorino Grubaĥ la eblon retiriĝi, kion ŝi alie verŝajne estus farinta. K. ĝuste denove atingis la pordon, kiam iu frapis. Estis la ĉambristino, kiu sciigis, ke fraŭlino Lundo volonte interŝanĝus kelkajn vortojn kun sinjoro K., kaj ke ŝi tial petas lin veni en la manĝoĉambron, kie ŝi atendos lin. K. aŭskultis la ĉambristinon pripenseme, tiam li turnis sin kun preskaŭ mokega rigardo al la ektimigita fraŭlino Grubaĥ. Tiu rigardo ŝajne esprimu, ke K. jam delonge antaŭvidis tiun inviton de sinjorino Lundo, kaj ke ĝi ankaŭ tre bone akordiĝas kun la turmentado, kiun li devis sperti je tiu dimanĉa antaŭtagmezo de la luprenantoj de sinjorino Grubaĥ. Li retrosendis la ĉambristinon kun la respondo, ke li tuj venos, iris poste al la vestokesto por ŝanĝi la vestojn kaj havis kiel respondon por sinjorino Grubaĥ, kiu mallaŭte plendis pri la molesta persono, nur

la peton, ke ŝi jam forportu la matenmanĝan ilaron.

„Vi ja preskaŭ nenion tuŝis“, diris sinjorino Grubaĥ.

„Nu, ek do, forportu ĝin!“ vokis K. Li havis la senton, kvazaŭ fraŭlino Lundo estus en ĉion iel enmiksita kaj farus ĉion naŭza.

Kiam li iris tra la antaŭĉambro, li vidis al la fermita ĉambropordo de fraŭlino Brosisto. Sed li ne estis invitita tien, sed en la manĝoĉambron, kies pordon li kvazaŭ malfermŝiris sen frapi.

Estis tre longa, sed malvasta unufenestra ĉambro. Tie estis nur tiom da loko, ke oni nur oblikve povis starigi en la anguloj ĉe la pordoflanko du ŝrankojn, dum la cetera loko estis komplete okupita per la longa manĝotablo, kiu komenciĝis proksime ĉe la pordo kaj atingis preskaŭ ĝis la granda fenestro, kiu tiel fariĝis preskaŭ nealirebla. La tablo estis jam aranĝita kaj eĉ por multaj personoj, ĉar dimanĉe preskaŭ ĉiuj luprenantoj tie tagmanĝas. Kiam K. enpaŝis, proksimiĝis fraŭlino Lundo de la fenestro laŭ flanko de la tablo renkonte al K. Ili salutis sin reciproke

silente. Poste diris fraŭlino Lundo, kiel ĉiam nekutime rektiginte ka kapon: „Mi ne scias, ĉu vi konas min.“

K. rigardis ŝin per kunpinĉitaj okuloj. „Certe“, li diris, „vi loĝas ja jam dum pli longa tempo ĉe sinjorino Grubaĥ.“

„Sed vi okupiĝas, kiel mi pensas, ne tre pri la pensiono“, diris fraŭlino Lundo.

„Ne“, diris K.

„Ĉu vi ne volas sidiĝi?“ diris fraŭlino Lundo.

Ili ambaŭ tiris silente du fotelojn el la ekstera finaĵo de la tablo kaj sidiĝis vidalvide unu antaŭ la alia.

Sed fraŭlino Lundo tuj denove ekstaris, ĉar ŝi forgesis sian retikuleton sur la fenestra breto kaj ekiris por alporti ĝin; ŝi trotis treniĝeme tra la tuta ĉambro. Kiam ŝi revenis, iom svingante la retikuleton, ŝi diris: „Mi volas nur komisie de mia amikino interŝanĝi kelkajn vortojn kun vi. Ŝi volis veni mem, sed ŝi sentas sin hodiaŭ iom malbonfarta. Ŝi volas senkulpigi sin, kaj ke vi aŭskultu min anstataŭ ŝi. Ŝi ankaŭ ne povus diri ion alian al vi, ol

mi diros. Male, mi pensas eĉ, ke mi povos diri al vi eĉ pli, ĉar mi estas ja relative neenvolvita. Ĉu tion ne pensas ankaŭ vi?“

„Kio estus do direnda?“ respondis K., kiu estis sata pri tio vidi la okulojn de fraŭlino Lundo daŭre direktataj al siaj lipoj. Jam per tio ŝi arogis al si regadon pri tio, kion li diros ankoraŭ. „Fraŭlino Brosisto al mi evidente ne volas permesi la personan debaton, pri kiu mi petis ŝin.

„Tiel estas“, diris fraŭlino Lundo, „aŭ pli bone dirite, tiel tute ne estas. Vi esprimas tion strange akre. Ĝenerale debatoj estas nek permesataj nek okazas la malo. Sed povas okazi, ke oni rigardas interparolajn debatojn necesaj, kaj tiel estas ĝuste en tiu ĉi kazo. Nun, post via rimarko, mi povas ja paroli malkaŝe. Vi petis mian amikinon skribe aŭ perbuŝe pri interparlado. Sed ĉar mia amikino scias, mi almenaŭ devas supozi tion, pri kio temas ĉe tiu interparolado, tial ŝi estas konvinkita, pro kaŭzoj, kiujn mi ne konas, ke tio estus utila por neniu, se la interparolado efektive okazus. Cetere ŝi rakontis al mi nur hieraŭ kaj nur tute preterire pri tio, ŝi diris dum tio, ke ankaŭ vin tiu interparolado ja ne tre povas interesi, ĉar

vi nur per hazardo ekhavis tian penson, kaj ankaŭ vi mem eĉ sen speciala klarigo ekkonus, se ne jam nun, tiukaze do tre baldaŭ, la sensenecon de la tuta afero. Mi respondis, ke tio eble estas prava, sed ke mi rigardas por kompleta klarigo avantaĝa sciigi al vi esprimitan respondon. Mi ofertis transdoni tiun taskon al mi, post certa hezito mia amikino cedis al mi. Mi esperas nun, ke mi agis ankaŭ laŭ via senco; ĉar eĉ la plej malgranda dubo pri la plej eta malcerto ĉiam estas turmentiga, kaj se oni povas facile forigi ĝin, kiel en tiu ĉi kazo, ĝi okazu prefere tuj."

„Mi dankas al vi", diris K. tuj, li lante stariĝis, rigardis fraŭlinon Lundo, poste trans la tablon, kaj post tio el la fenestro – la transflanka domo troviĝis subsune – kaj iris al la pordo. Fraŭlino Lundo sekvis lin kun kelkaj paŝoj, kvazaŭ ŝi ne tute fidus al li. Sed antaŭ la pordo ambaŭ devis retroeviti, ĉar ĝi malfermiĝis kaj kapitano Lanc enpaŝis. K. rigardis lin je la unua fojo elproksime. Li estis granda, ĉirkaŭ kvardekjara viro, kun sunbrunigita karnoplena vizaĝo. Li riverence kliniĝetis, kio validis ankaŭ por K., iris al fraŭlino Lundo kaj kisis honorige ŝian salutmanon. Li moviĝis tre lerte. La ĝentileco al la

fraŭlino K. frape distingiĝis de la traktado, kiun ŝi spertis fare de K. Tamen fraŭlino Lundo ŝajne ne estis ofendita, ĉar ŝi volis eĉ prezenti lin al la kapitano, kiel K. supozis konstati. Sed K. ne volis esti prezentata, ĉar li ne kapablus iel esti afabla, nek al la kapitano nek al fraŭlino Lundo. La manokiso ligis ŝin laŭ li al grupo, kiu sub la ŝajno de tuta naiveco kaj senegoismo volis deteni lin de fraŭlino Brosisto. Sed K. ne nur supozis ekkoni tion, li ekkonis ankaŭ, ke fraŭlino Lundo elektis bonan, sed tamen dueĝe tranĉantan rimedon. Ŝi troigis la signifon de la rilato inter fraŭlino Brosisto kaj K.; ŝi troigis antaŭ ĉio la signifon de la petita interparolo kaj provis samtempe turni la aferon tiel, kvazaŭ estus K., kiu troigas ĉion. Ŝi seniluziiĝu. K. ne volis troigi ion, li sciis, ke fraŭlino Brosisto estis simpla skribmaŝinista fraŭlino, kiu longe ne povos rezisti al li. Ĉe tio li intence ne konsideris, kion li eksciis de fraŭlino Grubaĥ pri fraŭlino Brosisto. Ĉion ĉi li pripensis, dum li apenaŭ salutinte forlasis la ĉambron. Li volis tuj iri en sian ĉambron, sed eta rido de fraŭlino Lundo, kiun li aŭdis malantaŭ si el la manĝoĉambro, ekpensigis lin, ke li eble ambaŭ, kaj la kapitanon kaj fraŭlinon Lundo, povus surprizi. Li ĉirkaŭrigardis kaj aŭskultis, ĉu el iu de la

ĉirkaŭaj ĉambroj atendeblas ĝeno, sed estis ĉie kvieto, nur la interparolado el la manĝoĉambro estis aŭdebla kaj el la irejo kondukanta al la kuirejo la voĉo de sinjorino Grubaĥ. La okazo estis bonŝanca. K. iris al la ĉambropordo de fraŭlino Brosisto kaj frapis mallaŭte. Ĉar nenio moviĝis, li frapis ankoraŭ foje, sed ankoraŭ nun ne sekvis respondo. Ĉu ŝi dormas? Ĉu ŝi vere malbonfartas? Ĉu ŝi neas sian ĉeeston nur tial, ĉar ŝi divenas, ke povas esti nur K., kiu frapis tiom mallaŭte? K. supozis, ke ŝi neas sian ĉeeston kaj frapis ankoraŭ pli laŭte, fine li malfermis la pordon, ĉar la frapado ne sukcesis, atenteme kaj kun la sento, ke li agas ne laŭorde kaj krome eĉ senutile. En la ĉambro estis neniu. Cetere ĝi apenaŭ plu memorigis pri la ĉambro, kiun K. konis. Ĉe la muro estis metitaj nur du litoj unu post la alia, tri foteloj proksime de la pordo estis abunde kovritaj per vestaĵoj kaj tolaĵo, unu el la ŝrankoj estis malfermita. Fraŭlino Brosisto verŝajne foriris dum fraŭlino Lundo en la manĝoĉambro elokvente parolis al K. K. pri tio ne estis tre perpleksa, ĉar li apenaŭ plu atendis renkonti fraŭlinon Brosisto senprobleme, li entreprenis tion preskaŭ nur pro spito al fraŭlino Lundo. Sed des pli embarasige estis vidi por li,

dum li fermis la pordon, kiel fraŭlino Lundo kaj la kapitano interparolas en la malfermita pordo de la manĝoĉambro. Ili eble staris tie jam de tiam, kiam K. malfermis la pordon, ili evitis ĉiun ŝajnon, ke ili eventuale eĉ observas sinjoron K., ili interparolis mallaŭte kaj sekvis la movojn de K. per rigardoj nur tiel, kiel oni dum interparolado distrite rigardas flanken. Sed la rigardoj ŝarĝis sinjoron K. tamen tiom peze, ke li rapidis atingi laŭmure sian ĉambron.

# Kvina ĉapitro

## La skurĝisto

Kiam K. en unu el la sekvaj vesperoj pasigis la koridoron, kiu disigis la oficejon de la ĉefŝtuparo – li iris ĉifoje preskaŭ laste hejmen, nur en la ekspedejo laboris ankoraŭ du servistoj ĉe la malgranda lumkeglo de inkandeska lampo – li aŭdis post la pordo, malantaŭ kiu li supozis ĉiam nur kameron por fatraso sen iam rigardi en ĝin, laŭtan eligon de suspiro. Li haltis mirigite, kaj ankoraŭfoje aŭskultis por konstati, ĉu li ne eraras. – Fariĝis dum certa tempo kviete, sed tiam tamen denove aŭdeblis suspiroj. – Unue li volis alkonduki iun el la servistoj, oni eble povus bezoni atestanton, sed tiam kaptis lin tiom nebridebla scivolo, ke li fakte preskaŭ malfermŝiris la pordon. Estis, kiel li ĝuste supozis, ĉambreto por fatraso. Neŭzeblaj malnovaj presaĵoj, renversitaj vakaj argilaj inkboteletoj kuŝis post la sojlo. En la kamero mem staris tri viroj, kliniĝinte en la malalta ejo. Lumon donis kandelo fiksita sur breto.

„Kion vi faras ĉi tie?“ demandis K., tro haste pro ekscitiĝo, sed ne tre laŭte. Unu el la viroj, kiu evidente regis la aliajn kaj unue turnis la rigardon al K., troviĝis en speco de malhela ledovesto, kiu lasis nuda la kolon ĝis profunde sur la brusto kaj la tutajn brakojn. Li ne respondis. Sed ambaŭ aliaj vokis: „Sinjoro! Ni estas skurĝendaj, ĉar vi denuncis nin ĉe la esplorjuĝisto!“

Nur nun ekkonis K., ke efektive estis la gardistoj Francĉjo kaj Vilhelmo, kaj ke la tria mantenis skurĝon por skurĝi ilin.

„Nu“, diris K. kaj fikse gapis ilin, „mi ne denuncis vin, mi diris nur, kio okazis en mia loĝejo. Kaj tute senriproĉinde vi ja ne kondutis.“

„Sinjoro“, diris Vilhelmo, dum Francĉjo evidente volis protekti sin malantaŭ li kontraŭ la tria. „Se vi scius, kiom malbone ni estas pagataj, vi juĝus pli bone pri ni. Mi devas nutri familion, kaj Francĉjo volis edziĝi, oni provas pliriĉigi sin tiom bone, kiom eblas, nur per laboro tio ne sukcesas, eĉ ne per la plej streĉa. Via fajna tolaĵo forlogis min, kompreneble estas malpermesite tiel agi, estas

neleĝe, sed estas tradicio, ke la tolaĵo apartenu al la gardistoj. Estis ĉiam tiel, fidu al mi; tio estas ja komprenebla. Kion tiaj aĵoj ankoraŭ signifu plu por tiu, kiu estas tiom malbonŝanca esti arestita? Sed, se tiu parolas publike pri tio, la puno devas sekvi.“

„Tio, kion vi diris, mi ne sciis, mi ankaŭ neniel postulis vian punadon. Por mi estis afero de principo.“

„Francĉjo“, Vilhelmo diris, turnante sin al la alia gardisto, „ĉu mi diris al vi ĉu ne, ke la sinjoro ne postulis punadon? Nun vi aŭdas, ke li eĉ ne sciis, ke ni estu punendaj.“

„Ne lasu tuŝi vin per tiaj paroloj“, diris la tria al K.,„ĉar la puno estas tiel justa kiel neevitebla.“

„Ne fidu al li“, diris Vilhelmo kaj interrompis sin nur por rapide turni la manon al la buŝo, sur kiun li ricevis skurĝobaton. „Oni punas nin nur tial, ĉar vi denuncis nin. Alikaze nenio okazus al ni, eĉ se oni ekscius, kion ni faris. Ĉu oni povas nomi tion justeco? Ni ambaŭ, speciale mi, dum longa tempo kiel gardistoj tre bone plenumis niajn taskojn. – Vi mem devas koncedi, ke ni bone gardis laŭ la

vidpunkto de la jurisdikcio – ni havis la perspektivon avanci, kaj certe mem fariĝus baldaŭ skurĝistoj kiel tiu ĉi, kiu bonŝancis per tio, ke neniu denuncis lin, ĉar tia denunco okazas vere nur tre malofte. Kaj nun, sinjoro, ĉio estas perdita, nia kariero finita, ni devos fari ankoraŭ multe pli subordigitan laboron ol estas la gardista servo, kaj krome ni ricevas nun tiun terure dolorigajn skurĝobatojn.“

„Ĉu la skurĝo vere povas kaŭzi tiajn dolorojn?“ demandis K. kaj kontrolis la skurĝon, kiun la skurĝisto svingadis antaŭ li.

„Ni ja devos tute nudigi nin“, diris Vilhelmo.

„Aha, tiel do“, diris K. kaj rigardis la skurĝiston detale, li estis sunbrunigita kiel matroso kaj havis sovaĝan, freŝan vizaĝon.

„Ĉu ne estas eblo ŝpari al ambaŭ la skurĝadon?“ li demandis lin.

„Ne“, diris la skurĝisto kaj skuis kun rideto la kapon. „Senvestigu vin!“ li ordonis al la gardistoj. Kaj al K. li

diris: „Vi ne devas akcepti ĉion de ili, pro la timo pri la skurĝado ili fariĝis jam iom mensmalsanaj. Kion ekzemple tiu ĉi“ – li montris al Vilhelmo – „diris pri sia ebla kariero, estas tute ridinda. Rigardu, kiel grasa li estas, – la unuaj skurĝobatoj entute perdiĝos en la graso. – Ĉu vi scias, kial li grasiĝis? Li havis la kutimon formanĝi de ĉiuj arestitoj la matenmanĝon. Ĉu li manĝis ankaŭ vian matenmanĝon? Nu, mi ja diris. Sed viro kun tia ventro neniam kaj neniel povus fariĝi skurĝisto, tio estas tute ekskludita.“

„Ekzistas ankaŭ tiaj skurĝistoj“, asertis Vilhelmo, kiu ĝuste malfermis sian pantalonan zonon.

„Ne“, diris la skurĝisto kaj tuŝmovis la skurĝon tiel transverse de lia kolo, ke tiu tremetis, „vi ne aŭskultu nin, sed vin senvestigu.“

„Mi bone rekompencus vin, se vi lasus forkuri ilin“, diris K. kaj eltiris, sen ankoraŭfoje rigardi la skurĝiston – tiaj negocoj kun ambaŭflanke malsuprenrigardantaj okuloj estas entreprenataj plej bone – sian monujon.

„Ĉu vi do volas denunci ankaŭ min?“, diris la skurĝisto, „kaj ankaŭ al mi ankoraŭ havigi skurĝadon? Ne! Ne!“

„Estu prudenta“, diris K., se mi celus punigi tiujn ambaŭ, mi ja nun ne volus elaĉeti ilin. Mi simple povus fermbati la pordon, nenion plu voli aŭdi aŭ vidi kaj iri hejmen. Sed mi ja ne faras, envere mi serioze volas liberigi ilin; se mi estus diveninta, ke ili povas esti punendaj aŭ eĉ nur puneblaj, mi neniam estus sciiginta iliajn nomojn. Mi ja tute ne pensas, ke ili kulpas, kulpa estas nur la organizo, kulpaj estas la altaj oficistoj.“

„Tiel estas!“ vokis la gardistoj kaj tuj ricevis baton sur siajn jam nudajn dorsojn.

„Se vi havus ĉi tie sub via skurĝo altan juĝiston“, diris K. kaj premis, dum li parolis, malsupren la skurĝon, kiu jam denove estis leviĝonta. „Mi efektive ne malhelpus ekskurĝi vin, male, mi donus al vi eĉ monon, por ke vi bone fortikigu vin por la bona afero.“

„Kion vi diras, sonas ja fidinda“, diris la skurĝisto, „sed mi ne permesas korupti min. Mi estas dungita por skurĝi,

kaj tial mi skurĝas.“

La gardisto Francĉjo, kiu eble atendis bonan eliron de la enmiksikiĝo de K. kaj tial sufiĉe retenis sin ĝis tiam, paŝis nun vestita nur per pantalono al la pordo, kroĉiĝis surgenuiĝante al brako de K. kaj flustris: „Se vi ne povas atingi liberigon por ni ambaŭ, almenaŭ provu liberigi min. Vilhelmo estas pli maljuna ol mi, kaj en ĉiu rilato malpli perceptema ol mi, li krome ricevis jam iam antaŭ kelkaj jaroj facilan skurĝopunon, sed mi ankoraŭ ne estas malhonorigita kaj mi agis tiel ja nur pro instigo de Vilhelmo, kiu estas mia instruisto kaj bona kaj malbona. Malsupre antaŭ la banko atendas mia kompatinda fianĉino la eliron de la afero, mi ja tiom mizere hontegas.“ Li sekigis per la surtuto de K. sian vizaĝon tute kovritan de fluintaj ploroj.

„Mi ne plu atendas“, diris la skurĝisto, prenis la skurĝon ambaŭmane kaj batadis Francĉjon, dum Vilhelmo kaŭris en angulo kaj sekrete observis ilin sen la kuraĝo turni la kapon. Jen leviĝis krio, kiun Francĉjo elpuŝis, nedividita kaj sen ŝanĝo, ĝi ŝajne ne devenis de homo, se de torturita ilo, la tuta koridoro resonis de ĝi, la tuta domo devis aŭdi

ĝin.

„Ne kriu tiom“, vokis K., li ne povis reteni sin, dum li atente rigardis al tiu flanko, el kiu devis veni la servistoj. Li puŝis Francĉjon, ne forte, sed sufiĉe forte, ke la senprudentulo falis planken kaj permane kvazaŭ spasme rastis la plankon; la batojn li tamen ne evitis, la skurĝo trovis lin ankaŭ surplanke. Dum li turniĝadis, ties pinto regule svingiĝadis suben kaj malsupren. Kaj jam aperis malproksime servisto, kaj kelkajn paŝojn post tiu dua. K. rapide fermĵetis la pordon, paŝis al unu el la kortegaj fenestroj kaj malfermis ĝin. La kriado tute ĉesis. Por ne lasi proksimiĝi la servistojn, li vokis: „Estas mi!“

„Bonan vesperon, sinjoro prokuristo!“ oni responde vokis. „Ĉu io okazis?“

„Ne, ne“, respondis K., „krias nur hundo sur la korto.“ Kiam la servistoj tamen ne moviĝis, li aldonis: „Vi povas reiri al via laboro.“ Por ne devi komenci interparolon kun la servistoj, li kliniĝis el la fenestro. Kiam li post certa tempo denove rigardis al la koridoro, ili jam foriĝis. Sed K. restadis nun ĉe la fenestro, iri en la fatrasan kameron li

ne kuraĝis kaj ankaŭ iri hejmen li ne volis. Estis malgranda kvarangula kortego, al kiu li rigardis malsupren, ĉirkaŭe troviĝis oficejoj, ĉiuj fenestroj nun jam estis malhelaj, nur la supraj kaptis rebrilon de la lunlumo. K. per rigardoj provis streĉe penetri en la malhelon de kortega angulo, en kiu kelkaj manĉaroj estis kunveturigitaj. Turmentis lin, ke li ne sukcesis malhelpi la skurĝadon, sed ne estis kulpo lia, ke ne sukcesis, se Francĉjo ne estus kriinta – certe la batoj dolorigis, sed en tia decida momento oni devas regi sin, – se li ne estus kriinta, K. certe ankoraŭ tre verŝajne trovus rimedon persvadi la skurĝiston. Se la tuta subranga oficistaro estis kanajlaro, kial tiukaze ĝuste la skurĝisto, kiu havis la plej malhumanan oficon, permesu escepton? K. bone observis ankaŭ, kiel ĉe la rigardo de la monbileto brilis ties okuloj, li ŝajne nur tial serioze komencis la skurĝadon por ankoraŭ iom pli altigi la sumon de la koruptado. Kaj K. ne intencis ŝpari, ĉar li efektive celis liberigi la gardistojn; ĉar li jam komencis batali kontraŭ la fieco de tiu jurisdikcio, tial estis tute kompreneble, ke li atakas ĝin ankaŭ de tiu flanko. Sed en tiu momento, kiam Franĉjo komencis krii, kompreneble ĉio estis finita. K. ne povis

permesi, ke la servistoj kaj eble eĉ aldone iuj ajn homoj venus kaj surprizus lin kun la societo dum la intertraktadoj en la fatrasa kamero. Tiun sinoferon efektive povis postuli de li neniu. Se li havus tiun intencon, estus ja preskaŭ pli facile, se K. sin mem senvestigus kaj sin ofertus al la skurĝisto kiel anstataŭulo por la gardistoj. Cetere, la skurĝisto certe ne estus akceptinta tiun anstataŭigon, ĉar per tio, sen gajni avantaĝon, li tamen grave perturbus sian devon kaj verŝajne duoble perturbus ĝin, ĉar K. tiom longe, kiom K. partoprenis la proceson, certe devis esti rigardata kiel netuŝebla por ĉiuj oficistoj de la juĝejo. Tamen povus ekzisti ankaŭ specialaj reguloj. Ĉiukaze K. ne povis fari alion krom fermbati la pordon, kvankam ankaŭ per tio ne ĉiu danĝero por K. jam estis forigita. Ke li laste ankoraŭ puŝis Francĉjon, estis bedaŭrinda kaj senkulpigebla nur pro la ekscitiĝo de K.

Malproksime li aŭdis la paŝojn de la servistoj; por ne frapi ilian atenton, li fermis la fenestron kaj iris al la ĉefŝtuparo. Ĉe la pordo de la fatrasa kamero li haltis iom kaj aŭskultis. Estis tute kviete. Povus esti, ke la viro per la

skurĝado mortigis ilin, ili estis ja tute sub ties potenco. K. jam etendis manon al la klinko, sed rapide retiris ĝin. Helpi li povus al neniu plu kaj la servistoj certe tuj venos; sed li ĵuris al si mem, ke li ankoraŭ parolos pri la afero por punigi laŭorde la verajn kulpulojn, la altajn oficistojn en tia grado, kia li kapablos pri tio, el kiuj ja ankoraŭ neniu kuraĝis montri sin al li. Kiam li iris malsupren sur la perono de la banko, li observis atente ĉiujn preterirantojn, sed eĉ en la pli vasta ĉirkaŭo ne estis videbla knabino, kiu atendas iun. La rimarko de Francĉjo, ke lia fianĉino atendas lin, montriĝis kiel mensogo tamen pardonebla, ĉar ĝi havis nur la celon, veki pli grandan kompaton.

Ankoraŭ je la sekva tago K. ne povis liberigi sin enpense de la gardistoj; li estis distriĝema dum la laboro kaj devis, por tamen povi plenumi ĝin, restadi en la oficejo ankoraŭ iom pli longe ol je la tago antaŭe. Kiam li hejmirante denove estis preterironta la kameron kun fatraso, li malfermis ĝin kvazaŭ pro kutimo. Pri tio, kion li vidis anstataŭ la atenditan malhelon, li apenaŭ kapablis trankviliĝi. Ĉio estis senŝanĝita, tiel, kiel li trovis ĉion je la

antaŭa vespero ĉe la malfermado de la pordo: la presaĵoj kaj la inkboteletoj tuj post la sojlo, la skurĝisto kun la skurĝo, la gardistoj ankoraŭ tute senvestitaj, la kandelo sur la breto, kaj la gardistoj komencis plendi kaj vokis: „Sinjoro!“ Tuj K. fermĵetis la pordon kaj per la pugnoj batis sur ĝin, kvazaŭ ĝi tiel pli firme estus fermita. Preskaŭ plorante li kuris al la servistoj, kiuj trankvile laboris ĉe la kopimaŝinoj kaj mirigite interrompis sian laboron. „Finfine malplenigu la kameron por fatraso!“ li vokis. „Ni ja dronas en koto!“ La servistoj estis pretaj fari tion je la sekva tago, K. kapjesis, nun vespere li ne plu povis devigi ilin al la laboro, kiel li fakte intencis. Li iom sidiĝis por teni la servistojn dum certa tempo proksime, li implike miksis kelkajn kopiojn, per kio li supozis veki la impreson, ke li kontrolas ilin, kaj tiam, ĉar li ekkomprenis, ke ili ne kuraĝus foriri kun li samtempe, li iris lace kaj senpripenseme hejmen.

# Sesa ĉapitro

## La onklo – Lenjo

Iam posttagmeze – K. ĝuste estis okupita antaŭ ol la poŝtaĵoj eliros – premiĝis ĉambren inter du servistoj, kiuj enportis skribaĵojn, la onklo Karlo de K., jen malgranda bienulo el la kamparo. K. ektimis la vidaĵon malpli ol li ektimis ĝin jam antaŭ pli longa tempo ĉe la imago, ke la onklo venos. La onklo devis veni, pri tio K. estis certa jam dum monato. Jam tiam li supozis vidi lin, kiel li iom kliniĝinte, kun la kunpremita Panama ĉapelo je la maldekstra mano, jam de malproksime etendis al li la dekstran manon kun senrespekta rapideco trans la skribotablon, ĉion renversigante, kio baris ties vojon. La onklo ĉiam rapidis, ĉar persekutis lin la malfeliĉiga penso, ke dum la ĉiam nur unutaga restado en la ĉefurbo li devos plenumi ĉion, kion li intencis plenumi, kaj krome ne preterlasu sin ankaŭ al ofertantiĝanta interparolado aŭ negoco aŭ plezuro. Ĉe tio K., por kiu la onklo estis la iama kuratoro, estis speciale devigita esti helpema pri kio ajn al la onklo kaj krome tranoktigi lin hejme ĉe si. „La fantomo

de la kamparo“ li kutime nomis lin.

Tuj post la salutado – sin sidiĝi sur la brakseĝon, kion K. proponis al li, li ne havis la tempon – li petis K.-on pri mallonga interparolado sen ĉeesto de aliaj. „Estas necese“, li diris, pene glutante, „necesas por mia trankviligo.“

K. tuj sendis la servistojn el la ĉambro, kun la ordono, ke ili enlasu neniun.

„Kion mi aŭdis, Josefo?“ vokis la onklo, kiam ili estis solaj, li sidiĝis sur la tablon, ŝtopis sub sin sen rigardi tien, diversajn paperojn por povi sidi pli oportune. K. silentis, li sciis, kio okazos, sed, subite malstreĉita de la streĉa laboro, tia, kia li estis, li fordonis sin unue al agrabla elĉerpiteco kaj rigardis tra la fenestro sur la transan stratflankon, de kiu estis videbla de lia sidloko nur malgranda, triangula sektoro, peco de malplena domomuro inter du magazenaj montrofenestroj.

„Vi rigardas el la fenestro, ĉu?!“ vokis la onklo kun levitaj brakoj. „Pro la ĉielo, Josefo, respondu do al mi! Ĉu estas

vere, ĉu tio povas esti ĝusta?“

„Kara onklo“, diris K. kaj deŝiriĝis de sia distriteco, „mi ja eĉ ne scias, kion vi celas.“

„Josefo“, diris la onklo avertante, „la veron vi ĉiam diris, laŭ tio, kion mi scias. Ĉu mi komprenu viajn lastajn vortojn kiel malbonegan aŭguron?“

„Mi ja divenas, kion vi celas“, diris K. lante obeeme, „vi verŝajne eksciis ion pri mia proceso.“

„Tiel estas“, diris la onklo, lante kapjesante. „Mi eksciis ion pri via proceso.“

„Kaj de kiu?“ demandis K.

„Erna skribis al mi“, diris la onklo. „Ŝi ja ne havas iun rilaton al vi, vi bedaŭrinde ne okupiĝas multe pri ŝi. Kaj tamen ŝi eksciis tion. Hodiaŭ mi ricevis la leteron kaj kompreneble tuj veturis ĉi tien. Pro neniu alia kaŭzo, sed ŝajne estas sufiĉe da kaŭzo. Mi povas antaŭlegi al vi la parton de la letero, kiu koncernas vin.“ Li tiris la leteron el la monpaperujo. „Jen ĝi. Ŝi skribas: ‚Josefon mi longe

ne plu vidis, en la antaŭa semajno mi estis foje en la banko, sed Josefo estis tiom okupita, ke oni ne enlasis min; mi atendis preskaŭ horon, sed tiam mi devis iris hejmen, ĉar mi havis unuhoran pianolecionon. Mi volonte estus parolinta kun li, eble troviĝos okazo en la sekva tempo. Je mia nomtago li sendis al mi grandan skatolon kun ĉokolado, tio estis tre kara kaj ĝentila. Mi tiam forgesis skribi tion al vi,nur nun, ĉar vi demandas min, mi memoras pri tio. Ĉokolado, tion vi devas scii, perdiĝas en la pensiono ja tuj. Apenaŭ oni atingis la konscion, ke oni ricevis donace ĉokoladon, ĝi estas jam perdita. Sed, se temas pri K., mi volas ankoraŭ sciigi al vi la sekvan. Kiel menciite oni ne enlasis min al li en la banko, ĉar li ĵus intertraktis kun sinjoro. Jam dum certa tempo trankvile atendinte, mi demandis serviston, ĉu la intertraktado daŭros ankoraŭ longan tempon. Li diris, ke tio certe tiel estos, ĉar verŝajne temas pri proceso, kiu estas entreprenata kontraŭ la sinjoro prokuristo. Mi demandis, kia proceso tio estas, ĉu li ne eraras, sed li diris, ke li ne eraras, ke estas procecso kaj eĉ grava, sed, ke pli li ne scias. Li diris, ke li mem volonte helpus al la sinjoro prokuristo, ĉar tiu estas bona kaj justa sinjoro,

sed, ke li ne scias kiel komenci, kaj, ke li deziras, ke influhavaj sinjoroj subtenos lin. Ke tio ankaŭ certe okazos, kaj ke fine la proceso eliros bonŝance, sed ke provizore la afero statas tute nebone, kiel tio konkludeblas el la humuro de la sinjoro prokuristo. Kompreneble mi ne cedis tro tro da graveco al tiu parolado, mi ankaŭ provis trankviligi la ŝtipkapulan serviston. Mi malpermesis al li paroli pri tio al aliaj kaj mi pensas, ke ĉio ĉi estas nur babilaĉo. Tamen estus eble bone, se vi, plej kara patro, ĉe via sekva vizito okupiĝos pri la afero,vi facile ekscios pli detalan, kaj se necesos, vi povos interveni helpe de via granda, influhava konataro. Sed, se tio ne necesos, kio ja plej verŝajnas, ĝi baldaŭ donos al via filino okazon brakumi vin, kion ŝi ĝojigus' – „Jen bona infano“, diris la onklo, kiam li finis sian antaŭlegadon kaj forviŝis kelkajn plorojn el la okuloj. K. kapjesis, sekve de la diversaj ĝenoj en la lasta tempo li tute forgesis tiun Erna, eĉ ŝian naskiĝtagon li forgesis, kaj la rakonto pri la ĉokolado esti evidente nur eltrovita por defendi lin rilate al la geonkloj. Tio estis tre kortuŝa, kaj per la teatrobiletoj, kiujn li de tiam regule intencis sendi, tio certe ne estus sufiĉe rekompencata, sed pri

pensionvizitoj kaj interparoladoj kun malgranda dekokjara gimnazianino li ne sentis sin taŭga.

„Kion do vi diras?“ demandis la onklo, kiu pro la letero forgesis ĉiun haston kaj ĉiun ekscitiĝon kaj ŝajne ankoraŭfoje legis ĝin.

„Jes, onklo“, diris K., „estas vere.“

„Vere, ĉu?“ vokis la onklo. „Kio estas vera? Kiel tio povas esti vera? Kia proceso? Ĉu tribunala proceso?“

„Tribunala proceso. “, respondis K.

„Kaj vi sidas trankvile ĉi tie kaj havas tribunalan proceson sur la nuko?“ vokis la onklo, kiu fariĝis pli kaj pli laŭta.

„Ju pli trankvila mi estas des pli bone estas por la eliro“, diris K. lace, „timu nenion.“

„Tio ne povas trankviligi min!“ vokis la onklo. „Josefo, kara Josefo, pensu pri vi, pri viaj parencoj, pri nia renoma nomo. Vi estis ĝis nun nia honoro, vi ne fariĝu nia hontego. Via sinteno“, li rigardis Josefon kun oblikva

kapo, „ne plaĉas al mi, tiel ne kondutu senkulpa akuzito, kiu ankoraŭ havas fortojn. Diru do rapide al mi, pri kio temas, por ke mi povu helpi al vi. Kompreneble temas pri la banko, ĉu?“

„Ne“, diris K. kaj ekstaris „sed vi parolas tro laŭte, kara onklo, la servisto staras verŝajne ĉe la pordo kaj orelumas. Tio estas malagrabla al mi. Ni prefere foriru. Mi tiam respondos al vi ĉiujn demandojn tiel bone, kiel tio eblas. Mi scias tre bone, ke estas mia devo raporti al la familio.“

„Ĝuste!“ kriis la onklo, „tre ĝuste, rapidu do, Josefo, rapidu!“

„Mi nur ankoraŭ devos disdoni kelkajn komisiojn“, diris K., li vokis pertelefone sian anstaŭiston al si, kiu enpaŝis post kelkaj minutoj. La onklo pro sia ekscitiĝo montris al li permane, ke K. vokis lin, pri kio ankaŭ sen tio ne estus dubo. K., kiu staris antaŭ la skribotablo, klarigis al la juna viro, kiu fride, sed atenteme aŭskultis, per mallaŭta voĉo kaj kun helpa uzado de diversaj skribaĵoj, kio dum sia malĉeesto ankoraŭ hodiaŭ estas plenumenda. La onklo

ĝenis per tio, ke li unue staris kun grandaj okuloj kaj nervoza lipomordado ĉe tio, sed sen aŭskulti, sed la ŝajno de tio estis jam sufiĉe da ĝeno. Sed poste li iradis en la ĉambro tien kaj tien kaj tie aŭ tie haltis antaŭ la fenestro aŭ antaŭ bildo, dum kio li ĉiam ion alian vokis kiel ekzremple: „Estas al mi tute nekompreneble!“ aŭ „Nun diru do al mi, kio fariĝu el tio?!“ La juna viro ŝajnigis sin tiel, kvazaŭ li ne rimarkus ion pri tio, li aŭskultis trankvile la komisiojn de K. ĝis la fino, de tempo al tempo li notis ion pri tio kaj foriris, post kiam li kliniĝis antaŭ K. Kaj la onklo. kiu ĝuste turnis la dorson al li, ĉar li rigardis el la fenestro kaj kun etenditaj manoj, kuntordis la kurtenojn. La pordo apenaŭ fermiĝis, kiam la onklo jam vokis: „Finfine la arlekeno foriris, nun ja ankaŭ ni povos foriri. Lastfine!“ Bedaŭrinde ne estis rimedo instigi la onklon preterlasi la demandojn pri la proceso en la antaŭhalo, kie staradis kelkaj oficistoj kaj servistoj, kiujn ĝuste krucis eĉ la vicdirektoro.

„Do, Josefo“, komencis la onklo, dum li respondis la kliniĝojn de la ĉirkaŭstarantoj per aludita salutado, „nun diru al mi malkaŝe, kia proceso estas.“ K. faris kelkajn

neniodirajn rimarkojn, ankaŭ ridis iom, kaj nur sur la ŝtuparo li klarigis al la onklo, ke li ne volis paroli malkaŝe antaŭ la homoj.

„Ĝuste“, diris la onklo, „sed nun parolu.“ Kun klinita kapo, fumante cigaron kun hastaj rapidaj enspiroj, li aŭskultis.

„Antaŭ ĉio, onklo“, diris K., tute ne temas pri proceso ĉe kutima juĝejo.“

„Tio estas terura“, diris la onklo.

„Kio?“ demandis K. kaj rigardis la onklon.

„Ke tio estas terura, mi opinias“, ripetis la onklo. Ili staris sur la perono, kiu kondukas al la strato; ĉar la pordisto ŝajne priaŭskultis ilin, tiris K. lin malsupren; la vigla strattrafiko akceptis ilin. La onklo, kiu kroĉis sin al brako de K., ne plu demandis tiom insiste pri la proceso, ili iris eĉ certan tempon silente plu.

„Sed kiel okazis?“ demandis fine la onklo, kiu tiel subite haltis, ke la homoj irantaj malantaŭ ili ektimigite evitis

flanken. „Tiaj aferoj ja ne okazas subite, ili antaŭprepariĝis delonge, certe estis signaloj. Kial vi ne skribis al mi? Vi scias, ke mi faras ĉion por vi, mi estas ja kvazaŭ ankoraŭ via kuratoro, kaj mi estis fiera pri tio ĝis hodiaŭ. Mi kompreneble ankoraŭ nun helpos al vi, nur estas tio nun, dum la proceso jam okazas, tre malfacila. Ĉiukaze estus plej bone, se vi nun iom ferius kaj venus al ni kamparen. Vi ankaŭ iom magriĝis, nun mi rimarkas. Kampare vi refortiĝos, tio estos bona, ja certe antaŭas vin streĉoj. Krome vi tiel estos kvazaŭ malhavebla por la juĝejo. Ĉi tie ili havas ĉiajn eblajn potencrimedojn, kiujn ili necese kvazaŭ uzos ankaŭ kontraŭ vi, sed kamparen ili devus sendi unue komisiitojn aŭ nur letere, telegrafe, telefone povus provi efiki al vi. Tio kompreneble malfortigas la efikon. Tio vin ja ne liberigos, sed ebligos al vi elspiri.“

„Ili povus ja malpermesi forveturi al mi“, diris K., kiun la parolo de la onklo tiris iom en ties rezonadon.

„Mi ne pensas, ke ili faros tion“, diris la onklo pripenseme, „tiom granda la perdo de potenco ne estus, kiun ili suferus pro via forveturo.“

„Mi pensis“, diris K. kaj kaptis la onklon ĉe brako por malhelpi ties ekstaradon, „ke vi ankoraŭ pli malmulte ol mi atentas la tuton, sed nun vi mem tiom serioze afliktiĝas pri tio.“

„Josefo“, vokis la onklo kaj volis liberigi sin de li por halti, sed K. ne lasis de li, „vi estas ŝanĝita, vi havis ja ĉiam tute ĝustan inteligentecon, kaj ĝuste nun ĝi forlasas vin, ĉu? Ja ĉu vi volas perdi la proceson? Ĉu vi scias, kion tio signifus? Tio signifus, ke vi simple estos elstrekita. Kaj, ke la tuta parencaro estos kunŝirita aŭ almenaŭ humiligita ĝis surgenue. Josefo, kondutu do kuraĝe. Via indiferenteco rabas al mi la menson. Se oni rigardas vin, oni preskaŭ emas fidi la proverbon, ke havi tian proceson, signifas, ke oni jam perdis ĝin.“

„Kara onklo, diris K., la ekscitiĝo estas tute malutila. Ĝi malutilas viaflanke, kaj ĝi malutilus ankaŭ miaflanke. Per ekscitiĝo oni ne gajnas la procesojn, ankaŭ iom rekonu miajn praktikajn spertojn, tiel, kiel mi ĉiam kaj ankaŭ nun respektas viajn, eĉ, se ili surprizas min. Ĉar vi diras,

ke ankaŭ la familio per la proceso devas suferi – kion mi, se temas pri mia opinio, tute ne povas kompreni, sed tio estas tute malgrava – mi volonte obeos al vi. Nur la kamparan restadon mi ne rigardas eĉ laŭ senco via kiel ion avantaĝan, ĉar tio havus la signifon de fuĝo kaj de kulpokonscio. Krome, kvankam mi estas ĉi tie pli persekutata, tamen mi mem povas pli entrepreni koncerne la aferon.“

„Vi pravas“, diris la onklo kun tono, kvazaŭ ili nun fine pli proksimiĝus reciproke, „mi faris la proponon ja nur, ĉar mi supozis, ke tiukaze, se vi restus ĉi tie, la afero pro via indiferenteco estus eĉ pli en danĝero kaj tial mi pensis, ke estus pli bone, se mi anstataŭ vi laborus por tio. Sed, se vi volas entrepreni ĉi tion per via tuta forto mem, tiukaze tiel kompreneble estos multe pli bone.“

„Pri tio ni do interkonsentiĝis“, diris K. „Kaj ĉu vi havas nun proponon por mi, kion mi faru kiel sekvan?“

„Kompreneble mi ankoraŭ devas pripensi la aferon“, diris la onklo, „vi devas konsideri, ke mi vivas nun jam dudek jarojn preskaŭ seninterrompe kampare, ĉe tio malpliiĝis

la flarsento pri tiaj aferoj. Diversaj gravaj ligoj al elstaruloj, kiuj pri tiaj aferoj eble pli spertas, jam fariĝis necertaj. Mi estas kampare iom forlasita, tion vi ja scias. Mem oni fakte rimarkas tion nur ĉe tiaj okazoj. Parte via afero trafis min ankaŭ neatendite, kvankam pro strangaj kaŭzoj mi jam divenis ion tian pro la letero de Erna kaj hodiaŭ ĉe via aspekto mi sciis tion preskaŭ kun certeco. Sed tio estas indiferenta, la plej grava estas nun ne perdi tempon.“ Jam dum sia parolado starante sur la piedfingroj, li mansalutis al aŭtomobilo kaj tiris nun, dum li samtempe vokis adreson al la veturigisto, sinjoron K., malantaŭ sin en la aŭtomobilon. „Ni nun estos veturigitaj al advokato Favor“ li diris, „li estis mia bona lerneja kolego“. Ankaŭ vi certe konas la nomon, ĉu? Ĉu ne? Tio estas ja stranga. Kiel advokato kaj advokato de povruloj li tamen havis konsiderindan reputacion. Sed mi speciale konfidas al li kiel homon.“

„Mi akceptos ĉion, kion vi entreprenos“, diris K., kvankam la hasta kaj trudiĝema maniero, per kiu la onklo traktis la aferon, kaŭzis malbonfarton al li. Ne estis tre ĝojige esti veturigata kiel akuzito al advokato de povruloj.

„Mi ne sciis“, li diris, „ke oni povas uzi en tia kazo ankaŭ advokaton.“

„Nu, kompreneble oni povas“, diris la onklo, tio estas ja memkomprenebla. Ja kial ne? Kaj nun rakontu al mi ĉion tute detale, kio ĝis nun okazis pri la afero, por ke mi estu precize informita pri tio.“

K. tuj komencis paroli sen prisilentigi ion, lia tuta malkaŝemo estis la unuura protesto, kiun li povis permesi al si kontraŭ la opinio de la onklo. La nomon de fraŭlino Brosisto li menciis nur unufoje kaj preterire, sed tio ne influis la malkaŝemon, ĉar fraŭlino Brosisto kun la proceso tute ne havis rilaton. Dum li parolis, li rigardis el la fenestro kaj observis, kiel ili ĝuste proksimiĝis al tiu antaŭurbo, en kiu estis la juĝejaj kancelarioj. Li atentigis la onklon pri tio, sed tiu ne rigardis la koincidon kiel precipe frapantan. La aŭtomobilo haltis antaŭ morna domo. La onklo sonoris tuj en la teretaĝo ĉe la unua pordo; dum ili atendis, li grincigis ridete siajn grandajn dentojn kaj flustris: „Estas la dudeka, nekutima tempo por vizitoj de klientoj. Favor tamen ne ofendiĝos pri mi. En la rigardofenestro de la pordo aperis du grandaj nigraj okuloj, ili

rigardis dum iom da tempo la gastojn kaj malaperis; sed la pordo ne malfermiĝis. La onklo kaj K. konfirmis reciproke la fakton, ke ili vidis la du okulojn. „Nova ĉambristino, kiu timas fremdulojn“, diris la onklo kaj frapis ankoraŭfoje. Denove aperis la okuloj, oni nun jam povis rigardi ilin kiel malĝojajn, sed eble tio estis nur iluzio estigita per la nefermita gasflamo brulanta forte siblante proksime super la kapoj, sed malmulte lumanta. „Malfermu“, vokis la onklo kaj batis per pugno la pordon. „Estas amikoj de la sinjoro advokato!“

„La sinjoro advokato estas malsana“, iu flustris malantaŭ ili. En pordo je la alia fino de la malgranda irejo staris viro en negliĝo, kiu sciigis tion per tre mallaŭta voĉo. La onklo, kiu jam pro la longa atendado estis kolera, turnis sin per hasta movo kaj vokis: „Malsana, ĉu? Vi diras, ke li estas malsana, ĉu?“ kaj iris preskaŭ minace, kvazaŭ la sinjoro estus la malsano mem, renkonte al li.

„Oni jam malfermis“, diris la sinjoro, montris al la pordo de la advokato, kuntiris sian negliĝon kaj malaperis. La pordo efektive estis malfermita, juna knabino – K. rekonis la malhelajn iom antaŭigitajn okulojn – staris kun longa, blanka antaŭtuko en la antaŭĉambro kaj tenis

kandelon mane.

„La sekvan tempon malfermu pli frue!“ diris la onklo anstataŭ saluti, dum la knabino per flekso de la genuoj riverencis ilin.

„Kunvenu, Josefo“, li diris tiam al K., kiu lante premis sin preter la knabino.

„La sinjoro advokato estas malsana“, diris la knabino, ĉar la onklo rapidis sen hezito al pordo. K. ankoraŭ rigardis kun miro la knabinon, dum ŝi jam parte turniĝis por ree rigli la loĝejan pordon. Ŝi havis pupoforman rondigitan vizaĝon, ne nur la palaj vangoj kaj la mentono havis rondigitajn konturojn, sed ankaŭ la tempioj kaj la fruntaj randoj.

„Josefo!“ vokis la onklo denove, kaj la knabinon li demandis: „Ĉu estas la korsuferado?“

„Mi pensas, ke jes“, diris la knabino, ŝi trovis la tempon antaŭiri kun la kandelo kaj malfermi la ĉambropordon. En angulo de la ĉambro, kien la lumo ankoraŭ ne penetris, leviĝis enlite vizaĝo kun longa barbo.

„Lenjo, kiu alvenis?“ demandis la advokato, kiu, blindigite de la kandelo, ne ekkonis la gastojn.

„Jen Albert, via malnova amiko“, diris la onklo.

„Aĥ, vi, Albert“, diris la advokato kaj lasis fali sin sur la kusenojn, kvazaŭ antaŭ tiuj vizitantoj ne necesus ŝajnigo.

„Ĉu vi vere fartas tiel malbone?“ demandis la onklo kaj sidiĝis sur la litorandon. „Mi pensas, ke ne. Estas atako de via korsuferado, sed ĝi pasos kiel la antaŭaj.“

„Eble“, mallaŭte diris la advokato, „sed mi pli malbonfartas ol iam. Mi spiras pene, tute ne dormas kaj ĉiutage perdas forton.“

„Tiel do“, diris la onklo kaj premis la panaman ĉapelon per granda mano firme sur genuon. „Jen malbonaj sciigoj. Cetere, ĉu vi havas la ĝustan flegadon? Estas tiel triste ĉi tie, tiel morne. Estis jam antaŭlonge, ke mi ĉi tie estis je la lasta fojo, tiam ĉio ŝajnis al mi pli agrabla. Ankaŭ via fraŭlineto ĉi tie ŝajne ne estas tre gaja, aŭ ŝi ŝajnigas sin tia.“ La knabino staris ankoraŭ kun la kandelo proksime de la pordo; laŭ tio, kion ŝia

nedifinebla rigardo lasis ekkoni, ŝi rigardis pli al K. ol al la onklo, eĉ tiam, kiam tiu parolis pri ŝi. K. apogis sin sur fotelo, kiun li ŝovis proksimen al la knabino.

„Se oni estas tiom malsana, kiom mi, „diris la advokato, oni bezonas trankvilon. Mi ne sentas malgajon.“ Post paŭzeto li aldonis: „Kaj Lenjo flegas min bone, ŝi estas kara.“

Sed la onklon tio ne povis konvinki, li estis evidente kontraŭ la flegistino, kaj kvankam li ne kontraŭdiris ion al la malsanulo, li tamen persekutis la flegistinon per severaj rigardoj, kiam ŝi iris nun al la lito, metis la kandelon sur la noktoŝranketon, sin klinis antaŭen super la malsanulon kaj ĉe la ordigado de la kusenoj flustris reciproke kun li. La onklo preskaŭ forgesis la respekton al la malsanulo, li ekstaris, iradis post la flegistino tien kaj ĉi tien, K. ne mirus, se li prenus ŝin malantaŭe ĉe la jupofinaĵoj kaj fortirus ŝin de la lito. K. mem observis ĉion trankvile, la malsanon de la advokato li eĉ iom bonvenigis, la fervoron, kiun la onklo evoluis por la afero de K., li ne povis kontraŭstari, la distro, kiun tiu fervoro nun ricevis eĉ sen lia kunagado, li volonte akceptis. Jen

diris la onklo, eble nur kun la intenco ofendi la flegistinon: „Fraŭlino, bonvolu, lasu nin dum certa tempo solaj, mi devas paroli kun mia amiko pri persona afero.“

La flegistino, kiu ankoraŭ vaste klinis sin super la malsanulon kaj ĝuste glatigis la tolaĵon ĉe la vando, turnis nur la kapon kaj diris tre trankvile, kio frape kontrastis al la onkla parolo, kiu haltis pro kolero kaj poste denove tro fluis: „Vi vidas, ke la sinjoro estas tre malsana, li ne povas priparoli aferojn.“ Ŝi verŝajne ripetis la vortojn de la onklo pro oportuneco, kaj certe eĉ ne-envolvito povus percepti tion kiel mokon. Sed la onklo kompreneble kiel ĵusa pikito ekfuriozis: „Damnitulino“, li diris dum la unua gargarado de la ekscitiĝo ankoraŭ preskaŭ nekompreneble. K. ektimis, kvankam li atendis ion tian kaj kuris al la onklo, kun la decida intenco per ambaŭ manoj fermteni lian buŝon. Sed bonŝance leviĝis post la knabino la malsanulo, la onklo prezentis mornan vizaĝon, kvazaŭ li glutus ion abomenindan, kaj tiam li diris pli trankvile: „Kompreneble ni ankoraŭ ne perdis la menson; se tio, kion mi postulus, ne eblus, mi ne postulus ĝin. Bonvolu foriri nun!“

La flegistino staris rekte ĉe la lito, tute turniĝinte al la onklo. Per unu mano ŝi karesis, kiel K. supozis rimarki, manon de la advokato. „Vi povas diri antaŭ Lenjo ĉion", diris la malsanulo, sendube kun la tono de insista peto.

„Ĝi koncernas ne min", diris la onklo, „tio estas ne sekreto mia." Kaj li turniĝis, kvazaŭ li intencus ne plu intertrakti, sed tamen ankoraŭ donus iom da pripensa tempo.

„Kiun koncernas?" demandis la advokato kun velkanta voĉo kaj rekuŝiĝis.

„Mian nevon", diris la onklo, „mi eĉ kunkondukis lin." Kaj li prezentis lin: „Jen prokuristo Josefo K."

„Ho", diris la malsanulo multe pli vigle kaj etendis manon al K. „Pardonu, mi tute ne rimarkis vin. Foriru do, Lenjo", li poste diris al la flegistino, kiu tute ne plu kontraŭstaris, kaj etendis manon al ŝi, kvazaŭ temus pri adiaŭo por longa tempo. „Do vi", li diris fine al la onklo, kiu same pacigite pli proksimiĝis, „ne venis por viziti min kiel malsanulon, sed vi venis pro negocoj." Estis, kvazaŭ la

imago pri malsanulvizito ĝis tiam paralizis la advokaton, tiom refreŝigite li nun aspektis. Li daŭre apogis sin sur kubuton, kio certe estis tre streĉa, kaj tiradis tufon en la mezo de la barbo.

„Vi aspektas jam multe pli sana“, diris la onklo, „de kiam tiu fi-sorĉistino estas ekstere.“ Li interrompis sin kaj flustris: „Mi vetas, ke ŝi orelumas nin!“ kaj li saltis al la pordo. Sed malantaŭ la pordo estis neniu. La onklo revenis, ne seniluziigita, sed amarsenta, ĉar tio, ke ŝi ne orelumas ilin, ŝajnis al li eĉ ankoraŭ pli granda malico.

„Vi prijuĝas tion malĝuste“, diris la advokato sen plu protekti la flegistinon; eble li volis per tio esprimi, ke ŝi ne estas protektbezona. Sed kun multe pli partoprenema tono li daŭrigis: „Koncerne la aferon de via nevo, mi rigardus min feliĉa, se mia forto sufiĉus por tiu ege komplika tasko; mi tre timas, ke ĝi ne sufiĉos, ĉiukaze mi intencas lasi nenion neprovita; se mi ne sufiĉos, oni ja povos konsulti ankoraŭ iun alian. Por esti sincera, la afero interesas min tiel, ke mi ne kapablus rezigni tute pri partopreno. Se mia koro ne eltenos la aferon, ĝi tiel almenaŭ trovos indan taskon tute fiaskiĝi.“

K. opiniis kompreni eĉ ne vorton el la tuta parolo, li rigardis la onklon por trovi de li klarigon, sed tiu sidis kun kandelo ĉemane sur la noktoŝranketo, de kiu jam medicinbotelo ruliĝis sur la tapiŝon, li kapjesis pri ĉio, kion la advokato diris, konsentis pri ĉio kaj rigardis de tempo al tempo al K. kun la postulo je simila konsento. Ĉu la onklo eble jam pli frue rakontis pri la proceso al la advokato? Sed tio tute ne eblis, ĉio, kion li vidis antaŭe, estis argumento kontraŭ tio.

„Mi ne komprenas – “, li tial diris.

„Ja, ĉu mi eble miskomprenis vin?“ demandis la advokato same tiel mirigite kaj embarasite kiel K.

„Eble mi estis tro rapida. Nu, pri kio vi volis paroli kun mi? Mi pensis, ke temas pri via proceso, ĉu?“

„Kompreneble“, diris la onklo kaj metis demandon al K. „Kion vi do volas?“

„Ja, sed de kie vi scias ion pri mi kaj pri mia proceso?“ demandis K.

„Aĥ, tiel“, diris la advokato ridete, „mi ja estas advokato, kaj mi frekventas juĝejajn rondojn, oni parolas tie pri diversaj procesoj, kaj atentokaptajn, speciale, se koncernas nevon de amiko, oni retenas en la memoro. Tio estas ja tute ne stranga.“

„Kion vi do volas?“ demandis la onklo ankoraŭfoje. „Vi estas tute maltrankvila.“

„Vi frekventas tiajn juĝejajn rondojn, ĉu?“ demandis K.

„Jes“, diris la advokato.

„Vi demandas kiel infano“ diris la onklo.

„Kiujn mi do laŭ vi frekventu, se ne homojn de mia fako?“ aldonis la advokato. Tio sonis tiom nekontestebla, ke K. eĉ ne respondis.

„Vi laboras ja en la juĝejo de la justicpalaco, kaj ne en tiu subtegmentejo“, li volis diri, sed ne povis decidigi sin vere diri tion.

„Vi ja devas pripensi“, daŭrigis la advokato kun tono,

kvazaŭ li klarigus tute superflue kaj preterire ion memkompreneblan, ke el tia societo mi tiras grandajn avantaĝojn ankaŭ por mia klientaro, kaj eĉ en multfojaj rilatoj, oni eĉ ne ĉiam rajtas paroli pri tio. Kompreneble mi estas nun sekve de mia malsano iom forbarata, sed tamen min vizitas bonaj amikoj de la juĝejo kaj mi ekscias tamen tion kaj tion. Mi ekscias eble eĉ pli ol kelkaj homoj, kiuj estas tre sanaj kaj pasigas la tutan tagon en la juĝejo. Tial mi havas ekzemple nun tre karan vizitanton.“ Kaj li montris al malhela ĉambra angulo.

„Sed kie do?“ demandis K. en la unua momento de la surprizo preskaŭ krude. Li ĉirkaŭrigardis necerte; la lumo de la kandeleto eĉ ne iom penetris ĝis la transflanka vando. Kaj efektive tie en la angulo io ekmoviĝis. En la lumo de la kandelo, kiun la onklo nun tenis alte, oni vidis sidi maljunan sinjoron ĉe eta tablo. Li ŝajne tute ne spiris, ĉar li restis tiom longe nerimarkita. Nun li ekstaris malrapidege, evidente nekontente pri tio, ke la onklo atentigis pri li. Estis, kvazaŭ li volus rifuzi per la manoj, kiujn li movis kiel mallongajn flugiletojn, ĉiujn prezentojn kaj bonvenigojn, kvazaŭ li neniel volus ĝeni la

aliajn per sia ĉeesto kaj kvazaŭ li petus insiste pri remetado en la malhelon kaj la forgesitecon de sia ĉeesto. Sed tion ili nun ne plu povis permesi al li.

„Vi ja surprizis nin“, klarigis la advokato kaj instige mansignis dum tio al la sinjoro, ke tiu proksimiĝu, kion tiu lante faris, sed heziteme ĉirkaŭrigardante kaj kun certa indo. „Jen Sinjoro kancelaria direktoro – ha, jes, mi petas pri pardono, mi ne prezentis ilin: – jen mia amiko Alberto K., jen lia nevo, prokuristo Josefo K., kaj jen la sinjoro kancelaria direktoro – la sinjoro kancelaria direktoro estis do tiel afabla viziti min. La valoron de tia vizito fakte povas aprezi nur iniciito, kiu scias, kiom la sinjoro kancelaria direktoro estas superŝutita per laboro. Nu, li venis tamen, ni interparolis pace, tiom, kiom permesis tion mia malforta stato. Kvankam ni ne malpermesis enlasi vizitanojn fare de Lenjo, ĉar neniuj atendeblis, sed nia opinio estis tamen, ke ni restadu solaj, sed tiam frapis viaj pugnobatoj, Alberto.“ La sinjoro kancelaria direktoro moviĝis kun la brakseĝo kaj la tablo en angulon, sed nun montriĝis, ke eble – tio estas, se la deziro pri tio ekzistas – ni interparolos pri komuna afero

kaj tial estus tre oportune denove kunmoviĝi, sinjoro kancelaria direktoro“, li diris kun kapklino kaj devota rideto kaj montris al brakseĝo apud la lito.

„Bedaŭrinde mi povos resti nur kelkajn minutojn“, diris afable la kancelaria direktoro, li sidiĝis larĝe sur la brakseĝon kaj rigardis sur la horloĝon, „la negocoj vokas min. Ĉiukaze mi ne volas preterlasi la okazon konatiĝi al amiko de mia amiko.“ Li klinis la kapon iom al la onklo, kiu ŝajne estis tre kontenta pri la nova konateco, sed sekve de sia naturo li ne povis esprimi sentojn de sindonemo kaj tial li akompanis la vortojn de la kancelaria direktoro per embarasita, sed laŭta ridado, kia malbela vidaĵo! K. trankvile povis observi ĉion, ĉar pri li okupiĝis neniu, la kancelaria direktoro, kiel ŝajne estis lia kutimo, ĉar li do jam estis ŝirita elangule, transprenis la regadon de la interparolado. La advokato, kies malforto ŝajne servis nur por forpeli la novajn vizitantojn, aŭskultis lin atenteme kun mano ĉeorele, la onklo kiel kandeloportanto, – li balancadis la kandelon sur unu el siaj femuroj, tial la advokato ofte afliktite rigardis tien, – estis baldaŭ libera de embaraso kaj nur plu ravita kaj de

la parolmaniero de la kancelaria direktoro kaj de la softaj ondecaj manmovoj, per kiuj la direktoro akompanis ĝin. K., kiu apogis sin je litofosto, eble eĉ intence estis komplete neglektita de la kancelaria direktoro kaj servis al la maljuna sinjoro nur kiel aŭskultanto. Cetere li apenaŭ sciis, pri kio temas kaj pensis baldaŭ jen pri la flegistino, kiel fie traktis ŝin la onklo, jen pri tio, ĉu li ne vidis jam foje la kancelarian direktoron, eble eĉ en la kunstarantaro dum sia unua esplorado. Eĉ se li eble erarus, la kancelaria direktoro tamen bonege enviciĝus en la unuan vicon de la kunstarantaj partoprenintoj, al la maljunaj sinjoroj kun la maldensaj barboj.

Subite bruo el la antaŭĉambro, simila al disrompiĝanta porcelano, ekaŭskultigis ĉiujn. „Mi rigardos, kio okazis“, diris K. kaj lante eliris, kvazaŭ li donus al la aliaj ankoraŭ la okazon reteni lin. Apenaŭ li iris en la antaŭĉambron kaj volis orientiĝi en la malhelo, metis sin sur lian manon, per kiu li ankoraŭ tenis la pordon, maneto multe pli malgranda ol tiu de K. kaj fermis mallaŭte la pordon. Estis la flegistino, kiu tie atendis.

„Okazis nenio“, ŝi flustris, „mi ĵetis nur teleron al la muro

por elĉambrigi vin.“ Pro sia embarasiteco diris K. „Ankaŭ mi pensis pri vi.“

„Des pli bone“, diris la flegistino, „sekvu min.“ Post kelkaj paŝoj ili atingis pordon el obtuza vitro, kiun la flegistino malfermis antaŭ K. „Enpaŝu do“, ŝi diris. Estis ĉiukaze la laborĉambro de la advokato, laŭ tio, kion oni povis vidi en la lunlumo heliganta tiumomente nur malgrandan, kvarangulan parton de la planko ĉe ĉiu el la tri grandaj fenestroj, la ĉambro estis ekipita per tri pezaj, malnovaj mebloj.

„Ĉi tien“, diris la flegistino kaj montris al malhela kesto kun ligna skulptita seĝapogilo. Ankoraŭ, kiam li sidiĝis, K. ĉirkaŭrigardis en la ĉambro. Ĝi estis alta, granda ĉambro, la klientaro de la advokato por povruloj devis senti sin tie perdita. K. imagis vidi la etajn paŝojn, per kiuj la vizitantoj avancis ĝis la giganta skribotablo. Sed poste li forgesis tion kaj havis plu okulojn nur por la flegistino, kiu sidis tute proksime de li kaj preskaŭ premis lin al la flanka brakapogilo.

„Mi pensis“, ŝi diris, „ke vi mem eliros al mi sen tio, ke mi

devos voki vin antaŭe. Tio estis tamen stranga. Unue vi rigardis min seninterrompe dum la eniro kaj poste vi lasis atendi min. Cetere, nomu min Lenjo“, ŝi ankoraŭ aldonis rapide kaj senpere, kvazaŭ neniu momento de tiu interparolado perdiĝu.

„Volonte“, diris K. „Sed, se temas pri tiu strangaĵo, Lenjo, ĝi ja facile klarigeblas. Unue mi ja devis aŭskulti la babilaĉon de la maljunaj sinjoroj kaj ne povis forkuri senkaŭze, due mi ne estas impertinenta, sed pli emas al timemo, kaj ankaŭ vi, Lenjo, efektive ne aspektas tia, kvazaŭ vi estus gajnebla per unu salto.“

„Tio ne estas la kaŭzo“, diris Lenjo, metis brakon sur la apogilon kaj rigardis al K., „sed mi ne plaĉis al vi kaj verŝajne ankaŭ nun ne plaĉas.“

„Plaĉi ja ne estus multe“, diris K. eviteme.

„Ho!“ ŝi diris ridete kaj gajnis per la rimarko de K. kaj per tiu eta elvoko certan superecon. Tial K. silentis dum certa tempo. Ĉar li jam kutimiĝis pri la malhelo de la ĉambro, li povis diferencigi diversajn detalojn de la ekipaĵo. Speciale

frapis lian atenton granda bildo, kiu pendis dekstre de la pordo, li kliniĝis por pli bone vidi ĝin. Ĝi montris viron en juĝista talaro: li sidis sur alta tronfotelo, kies ora ornamo multfoje frape konturiĝis sur la bildo. Nekutime estis, ke la juĝisto tie ne sidis trankvile kaj inde, sed la maldekstran brakon premis al la flanka apogilo, sed la dekstran brakon tenis tute libere kaj nur permane ĉirkaŭprenis la flankapogilon, kvazaŭ li volus eksalti en la sekva momento kun vehementa kaj eble indignita turnmovo por diri ion decidan aŭ eĉ deklari la verdikton. La akuzito certe estus pensenda malsupre de la ŝtuparo, kies plej supraj ŝtupoj sur la bildo estas videblaj, kovritaj de flava tapiŝo.

„Eble li estas mia juĝisto“, diris K. kaj montris perfingre al la bildo.

„Mi konas lin“, diris Lenjo kaj ankaŭ rigardis al la bildo, „li ofte venas al ĉi tie. La bildo devenas el lia juneco, sed li estis neniam eĉ nur simila al la bildo, ĉar li estas preskaŭ malgrandega. Tamen li lasis tiom longigi sin sur la bildo, ĉar li estas sensence vanta, tiel, kiel ĉiuj ĉi tie. Sed ankaŭ mi estas vanta kaj tre malkontenta pri tio, ke mi tute ne

plaĉas al vi.“

La lastan rimarkon respondis K. nur per tio, ke li ĉirkaŭbrakis Lenjon kaj tiris ŝin al si. Ŝi apogis silente la kapon ĉeŝultre de K. Sed pri la cetera li diris: „Kiun rangon li havas?“

„Li estas esplorjuĝisto“, ŝi diris, prenis la manon de K. per kiu li firmtenis ŝin kaj ludis kun liaj fingroj.

„Denove nur esplorjuĝisto“, diris K. seniluziigite, „la altrangaj oficistoj kaŝas sin. Sed li sidas tamen sur tronfotelo.“

„Ĉio ĉi estas eltrovaĵo“, diris Lenjo, la vizaĝon klinitan sur la manon de K., „fakte li sidas sur kuireja fotelo, sur kiu estas kunfaldita malnova ĉevalkovrilo. Sed ĉu vi devas seninterrompe pensi pri la proceso?“ ŝi aldonis lante.

„Ne, certe ne“, diris K., „mi pensas eble eĉ tro malmulte pri ĝi.“

„Tio ne estas la eraro, kiun vi faras“, diris Lenjo, „vi estas tro necedema, tion mi tiel aŭdis.“

„Kiu diris tion?“ demandis K., li sentis ŝian korpon je sia brusto kaj rigardis malsupren sur ŝian riĉan, malhelan, firme kunplektitan hararon.

„Mi perfidus tro multe, se mi dirus tion“, respondis Lenjo. „Ne plu demandu, mi petas, pri la nomoj, kaj ne ripetu vian eraron, ne plu estu tiom necedema. Kontraŭ tiu juĝejo oni ja ne povas defendi sin, oni devas fari la konfeson. Ĉe la sekva okazo do konfesu. Nur tiukaze la eblo elturniĝi estos donita, nur tiukaze. Sed eĉ tio sen fremda helpo ne eblos, sed pro tiu helpo vi ne devos timi, tiun mi mem havigos al vi.“

„Vi komprenas multe pri tiu juĝejo kaj pri la trompoj, kiuj tie necesas“, diris K. kaj levis ŝin, ĉar ŝi tro forte urĝis al li, sur sian sinon.

„Tiel estas bone“, ŝi diris kaj aranĝis sin sur lia sino per tio, ke ŝi glatigis la jupon kaj ordigis la bluzon. Poste ŝi pendigis sin per ambaŭ manoj al lia kolo, rektiĝis kaj longe rigardis lin.

„Kaj, se mi ne farus la konfeson, vi ne povus helpi al mi,

ĉu?“ K. demandis provante. Mi varbas helpantinojn, li pensis preskaŭ mirigite, unue fraŭlinon Brosisto, poste la edzinon de la juĝeja servisto kaj fine tiun malgrandan flegistinon, kiu ŝajne havas nekompreneblan bezonon pri mi. Kiel ŝi sidas sur mia sino, kvazaŭ ĝi estus ŝia ununura ĝusta loko!

„Ne“, respondis Lenjo kaj skuis lante la kapon, „tiukaze mi ne povus helpi al vi. Sed vi tute ne volas havi mian helpon, ĝi tute ne interesas vin. Vi estas obstina kaj ne lasas konvinki vin.“ Post certa tempo ŝi demandis: „ĉu vi havas amatinon?“

„Ne“, diris K.

„Ho, tamen“, ŝi diris.

„Jes, efektive“, diris K., „imagu, mi neis ŝin kaj eĉ portas ŝian fotografaĵon ĉe mi.“ Pro ŝiaj petoj li montris al ŝi fotografaĵon de Elinjo. Kunkurbigite sur la sino de K., Lenjo studis la bildon. Estis momentfotografaĵo, Elinjo fine de la kirlodanco estis fotita tiel, kiel ŝi volonte dancis ĝin en la vinrestoracio, ŝia jupo ankoraŭ flugis en la

faldoĵetado pro la turnmovo ĉirkaŭ ŝi, la manojn ŝi metis sur la firmajn koksojn kaj rigardis kun streĉita kolo ridante flanken; kiun celis ŝia ridado, oni ne povis ekkoni sur la bildo.

„Ŝi estis forte kunŝnurita“, diris Lenjo kaj montris la lokon, kie tio laŭ ŝia opinio estis videbla. „Ŝi ne plaĉas al mi, ŝi estis mallerta kaj kruda. Sed eblas, ke ŝi estas al vi softa kaj afabla, tio konkludeblus laŭ la bildo. Tia granda, forta ino, ofte ne scias ion alian krom esti softa kaj afabla. Sed ĉu ŝi povus oferi sin por vi?“

„Ne“, diris K., „ŝi estas nek softa, nek afabla nek ŝi povus oferi sin por mi. Krome mi nek tion nek tion jam postulis de ŝi. Jes ja, mi eĉ ne rigardis la bildon tiel detale kiel vi.“

„Do, ŝi ne tiom interesas vin“, diris Lenjo, „ŝi do tute ne estas via amatino.“

„Tamen“, diris K. „Mi ne reprenas mian frazon.“

„Eĉ, se ŝi nun eble estas via amatino“, diris Lenjo, „sed vi ne tre sentus malhavi ŝin, se vi perdus ŝin aŭ ŝanĝus ŝin por alia persono, ekzemple por mi.“

„Certe“, diris K. ridete, „tio estus pensebla, sed ŝi havas grandan avantaĝon kompare al vi, ŝi scias nenion pri la proceso, kaj eĉ, se ŝi scius ion pri la proceso, ŝi ne pensus pri tio. Ŝi ne provus persvadi min esti cedema.“

„Tio ne estas avantaĝo“, diris Lenjo. „Se ŝi ne havas aldonajn avantaĝojn, mi ne perdos la kuraĝon. Ĉu ŝi havas iun korpan eraron?“

„Ĉu korpan eraron?“ demandis K.

Jes“, diris Lenjo, „mi ja havas tian eraron, rigardu.“ Ŝi disetendis la mezan kaj la ringan fingrojn de sia dekstra mano, de kiuj la liga haŭteto etendiĝis preskaŭ ĝis la plej supra artiko de la mallongaj fingroj. K. en la malhelo ne rimarkis tuj, kion ŝi volis montri al li, ŝi kondukis tial manon de li tien, por ke li palpu ĝin.

„Kia naturludo“, diris K. kaj aldonis, kiam li jam superrigardis la tutan manon: „Kia linda ungo!“

Kun speco de fiero rigardis Lenjo, kiel K. kun miro ĉiam denove disetendis la du fingrojn kaj kunmetis, ĝis li fine haste kisis ilin kaj lasis.

„Ho!“ ŝi vokis tuj, „vi kisis min!“ Rapide, kun malfermita buŝo, ŝi grimpis per la genuoj sur lian sinon. K. preskaŭ perplekse rigardis supren al ŝi, nun, ĉar ŝi estis tiom proksima al li, eliris de ŝi amara, ekscitiga odoro, kiel de pipro. Ŝi prenis lian kapon al si, kliniĝis sur ĝin transen kaj mordis kaj kisis lian kolon, mordis eĉ lian hararon.

„Vi interŝanĝis ŝin por mi!“ ŝi vokis de tempo al tempo, „rigardu, nun vi interŝanĝis ŝin por mi!“ Jen ŝi elglitis per unu el la genuoj, kun eta krio ŝi falis preskaŭ sur la tapiŝon. K. ĉirkaŭbrakis ŝin por ankoraŭ reteni ŝin kaj estis de ŝi ŝirita malsupren.

„Nun vi apartenas al mi“, ŝi diris. „Jen la domŝlosilo, venu al mi, kiam ajn vi volos“, estis ŝiaj lastaj vortoj, kaj lasta kiso ankoraŭ trafis lin forirante surdorse. Kiam li paŝis el la dompordego, komenciĝis pluveto, li volis iri sur la mezon de la strato por eble ankoraŭfoje ekvidi Lenjon ĉe la fenestro, jen subite jetiĝis el aŭtomobilo staranta antaŭ la domo, kiun K. pro sia distriteco tute ne rimarkis, la onklo, kiu kaptis lin ĉebrake kaj puŝis lin al la dompordego, kvazaŭ li tie volus firmnajli lin.

„Knabo mia“, li vokis, „ja kial vi faris tion! Vian aferon, kiu estis sur bona vojo, vi terure damaĝis. Vi kaŝiĝis ĉe malpura, eta kaj fia estaĵo, kiu krome evidente estas la amatino de la advokato, kaj restis for dum horoj. Vi eĉ ne prezentas pretekston, kaŝas nenion, vi agas tute publike, kuris al ŝi kaj restis ĉe ŝi. Kaj intertempe ni kunsidis, la onklo, kiu penegas por vi, la advokato, kiu estu gajnita por vi, antaŭ ĉiu la kancelaria direktoro, tiu granda sinjoro, kiu fakte preskaŭ regas vian aferon en la nuna stadio. Ni volis interkonsiliĝi, kiel oni povus helpi al vi, mi devis trakti la advokaton delikate, kaj tiu siaflanke la kancelarian direktoron, kaj vi havus ja ĉian kaŭzon almenaŭ subteni min. Anstataŭ tio vi restis for. Fine ĝi ne plu lasis kaŝi sin, ili estas ĝentilaj, lertaj homoj, ili ne parolis pri tio, nu, ili indulgis min, sed fine ankaŭ ili ne plu povis venki sin. Kaj, ĉar ili ne povis paroli pri la afero, ili eksilentis. Ni sidis dum minutoj silente kaj aŭskultis, ĉu vi tamen fine revenos. Ĉio vanis. Lastfine la kancelaria direktoro, kiu restis multe pli longe ol li origine intencis, ekstaris, adiaŭis sin kaj evidente bedaŭris min sen povi helpi al mi, li atendis nekompreneble afable ankoraŭ dum certa tempo ĉe la pordo kaj poste foriris. Mi estis

kompreneble feliĉa, ke li estis for, mi jam ne povis spiri, pro manko de aero. La malsanan advokaton ĝi eĉ pli detruis, li, la bona viro, eĉ ne povis paroli, kiam mi adiaŭis de li. Vi verŝajne kunkaŭzis lian kompletan renversiĝon kaj tiel akcelas la morton de viro, kiun vi bezonas. Kaj min, vian onklon, vi lasas atendi ĉi tie en la pluvo dum horoj – palpu do, mi estas tute malsekigita – kaj ege afliktiĝi.“

# Sepa ĉapitro

## Advokato fabrikanto pentristo

Je vintra antaŭtagmezo – ekstere falis neĝo en obtuza lumo, – sidis K., spite al la frua horo jam tre laca en sia oficejo. Por almenaŭ protekti sin kontraŭ la malaltrangaj oficistoj, li komisiis la serviston neniun enlasi, laŭdire ĉar li estas okupita pri ampleksa laboro. Sed anstataŭ labori li turniĝadis sur sia fotelo, lante ŝovis kelkajn aĵojn sur la tablo tien kaj tien, sed poste li senmove sidis, sen konscii pri tio, kun brako tute etendita sur la tabloplato kaj kun klinita kapo.

La pensado pri la proceso ne plu forlasis lin. Jam ofte li pensis, ĉu ĝi estus bone ellabori defendoskribaĵon kaj transdoni ĝin al la juĝejo. Li intencis antaŭmeti biografieton kaj klarigi ĉe ĉiu iel grava okazaĵo, kial li agis tiel, ĉu tiu aŭ tiu agmaniero laŭ sia aktuala juĝo estus aŭ nefarinda aŭ aprobinda, kaj kiujn kaŭzojn li povus prezenti por tiuj aŭ tiuj. La avantaĝoj de tia defendoskribo kompare al nur-defendo de cetere ne

neriproĉindaj advokatoj, estis nedubindaj. K. ja tute ne sciis, kion la advokato entreprenas; multon li ĉiukaze ne faris, jam pli longe ol monaton la advokato ne lasis voki lin al si, kaj ankaŭ ĉe neniu el la pli fruaj interparoladoj li havis la impreson, ke tiu viro povus atingi por li multon. Antaŭ ĉio li preskaŭ tute ne eldemandis lin, kvankam pri la afero ja certe estis multaj demandoj. Demandi estus ja la ĉefafero. K. havis la senton, ke li mem povus meti ĉiujn necesajn demandojn pri tio. Sed la advokato parolis mem anstataŭ demandi, li mem rakontis aŭ sidis silente vidalvide al li, li iom kliniĝis antaŭen trans la tablon, verŝajne pro sia malbona aŭdkapablo, li tiradis barbotufon de sia barbo kaj rigardis sur la tapiŝon, eble ĝuste sur la lokon, kie K. antaŭe kuŝis kun Lenjo. Kelkfoje li diris neniodirajn riproĉojn, kiel oni diras ilin al infanoj. Kaj senutilajn kaj enuajn parolojn, kiujn K. ĉe la finkalulado intencis pagi per neniu helero. Post kiam la advokato ekpensis, ke li sufiĉe humiligis K.-on, li kutime rekomencis iom gajigi lin. Li diris tiam: „Mi jam gajnis multajn similajn procesojn aŭ tute aŭ parte, kiuj, eĉ se fakte ne tiel komplikaj kiel ĉi tiu, laŭ la ekstera ŝajno estis ankoraŭ pli senesperaj ol via. Registron de tiuj procesoj

mi havas en tirkesto“ – ĉe tio li frapis al iu tirkesto de la tablo – „sed la skribojn mi bedaŭrinde ne povas montri, ĉar temas pri oficaj sekretoj. Tamen la granda sperto, kiun mi akiris per ĉiuj ĉi procesoj, nun helpos al vi, sinjoro K. Mi tuj komencis eklabori, kaj la unua skribo nun jam estas preskaŭ preta, ĝi estas tre grava, ĉar la unua impreso, kiun faras la advokato, ofte difinas la tutan direkton de la proceduro. Sed bedaŭrinde okazas, mi devas atentigi vin pri tio, ke la unuaj petskriboj fare de juĝistoj en la juĝejo tute ne estas legataj, ĉar oni simple metas ilin al la aktujoj kaj atentigas pri tio, ke provizore la pridemandado kaj observado de la akuzito estas pli grava ol ĉio skribita. Oni aldonas, se la petskribinto fariĝas insista, ke antaŭ la decido, tuj kiam la tuta materialo estos kunkolektita, kompreneble konekse, oni kontrolos ĉiujn aktujojn, do ankaŭ tiun unan petskribon. Bedaŭrinde ankaŭ tio plej ofte ne estas ĝusta, ĉar kutime oni mislokas la unuan petskribon aŭ ĝi perdiĝas tute; kaj eĉ, se ĝi konserviĝas ĝis la fino, ĝi apenaŭ estas legata, kion mi eksciis tamen nur onidire. Tio ĉio estas bedaŭrinda, sed ne tute sen pravigiteco. Sinjoro K.,ne preteratentu, ke la proceduro ne estas publika, sed ke ĝi

povos fariĝi publika, se la juĝistoj rigardas tion necesa, sed la leĝo ne preskribas publikecon. Sekve tion ankaŭ la skriboj de la juĝejo, antaŭ ĉio la akuza skribo, al la akuzito kaj al la advokato ne estas alireblaj, tial oni ĝenerale ne scias aŭ almenaŭ ne precize scias, kontraŭ kio la petskribo estu direktata, tial ĝi povas enteni fakte nur hazarde ion, kio estas grava por la afero. Vere trafantajn kaj pruvantajn skribojn oni povos ellabori nur pli poste, se dum la kuro de la pridemandadoj de la akuzito la unuopaj akuzpunktoj kaj ties kaŭzigoj aperos pli konturite aŭ diveneblos. Sub tiaj cirkonstancoj troviĝas la defendo en tre malfavora kaj komplika situo. Ankaŭ tio okazas intence. La defendo laŭ la koncerna leĝo verdire ne estas permesata, sed nur indulgata, kaj eĉ pri tio, ĉu el la koncerns leĝoloko almenaŭ indulgo ellegeblu, estas kvereloj. Tial tute severe rigardate antaŭ la leĝo tute ne estas rekonataj advokatoj; ĉiuj advokatoj, kiuj agas antaŭ tiu juĝejo agas esence nur kiel dubindaj advokataĉoj. Tio kompreneble efikas tre senhonorige al la tuta advokataro. Se vi, sinjoro K., baldaŭ ĉeokaze iros en juĝejajn kancelariojn, vi povos rigardi advokatan ĉambron, por ke ankaŭ tion vi foje estu farinta. Supozeble vi ektimos la

societon, kiu tie kunestas. Jam la asignita malvasta kaj malalta ĉambreto montras la malestimon, kiun la juĝejo havas por tiuj homoj. Lumon ricevas la ĉambreto nur per luketo, kiu troviĝas tiom alte, ke tiukaze, se oni volas elrigardi, kie cetere la fumo de proksima kamentubo iras en la nazon kaj nigrigas la vizaĝon, unue devas serĉi kolegon, kiu grimpas sur la dorson. En la planko de tiu ĉambreto – por prezenti ankoraŭ plian ekzemplon pri tiaj aĉaj cirkonstancoj – estas nun jam pli ol jaro truo, ne tiom granda, ke homo povus fali tra ĝi, sed sufiĉe granda, ke oni sinkas en ĝin per gambo. La advokatoĉambro troviĝas en la dua etaĝo, se iu sinkas en ĝin, la gambo pendas en la unua etaĝo sub ĝi, kaj ĝuste en tiun irejon, kie atendas la klientoj. Tio ne estas troigita, se oni rigardas en advokataj rondoj tiajn rilatojn kiel skandalon. Petskriboj al la administrado havas eĉ ne la plej etan sukceson, sed tamen estas plej severe malpermesate al la advokatoj kion ajn ŝanĝi proprakoste en la ĉambro. Sed ankaŭ la traktado de la advokatoj havas kialon. Oni kiel eble plej bone volas ekskludi la defendon, por ke ĉio baziĝu sur la akuzito mem. Tio efektive ne estas malbona vidpunkto, sed nenio estus pli maltrafa ol konkludi el tio,

ke ĉe tiu juĝejo la advokatoj por la akuzito estas superfluaj. Male ĉe neniu alia juĝejo ili estas tiom gravaj, kiom ĉe tiu. La procedo estas sekreta ja ne nur ĝenerale en la publiko, sed ankaŭ por la akuzito. Kompreneble nur tiom, kiom tio eblas, sed ĝi eblas en tre vasta amplekso. Ankaŭ la akuzito ja ne havas la eblon legi en la juĝejaj skriboj, kaj estas tre malfacile konkludi el la aŭskultadoj la originajn skribojn, sed speciale por la akuzito, kiu ja estas embarasita kaj kiu havas ĉiujn eblajn zorgojn, kiuj detenas lin. Ĉimomente la defendo enmiksiĝas. Ĉe la aŭskultadoj la advokatoj ĝenerale ja ne rajtas ĉeesti, tial ili devas elesplori la akuziton tuj post la aŭskultadoj eble jam ĉe la pordo de la esplora ĉambro pri la pridemandado kaj preni el tiuj ofte jam miksitaj raportoj la taŭgan por la defendo. Tio tamen ne estas la plej grava, ĉar oni tiel ne povas ekscii multon, kvankam kompreneble ankaŭ en tiu kazo kiel en ĉiu lerta viro ekscias pli ol aliaj. Tamen plej gravas krome la personaj rilatoj de la advokato, ili estas la esenca valoro de la defendo. Vi, sinjoro K., nun certe jam spertis el la propraj travivaĵoj, ke la plej malsupra organizo de la juĝejo ne estas tute perfekta, ke ĝi enhavas devneglektajn kaj koruptajn dungitojn, pro kio kvazaŭ la

severa fermiteco de la juĝeĵo ricevas breĉojn. Tra tiuj breĉoj urĝigas sin do la plimulto de la advokatoj, ke jen oni subaĉetas kaj orelumas, eĉ okazis, almenaŭ en pli frua tempo, ŝteladoj de aktujoj. Ne estas kontesteble, ke tiel gajneblas por momento kelkaj surprize favoraj rezultoj por la akuzito, kun tiaj aferoj la naivaj advokatoj paradas kaj logas novajn klientojn, sed tio signifas nenion aŭ nenion bonan por la plia daŭrigo de la proceso. Efektivan valoron havas nur honestaj personaj rilatoj, kaj ja tiaj kun pli altrangaj oficistoj, kio inkludas kompreneble nur la pli altrangajn oficistojn de la malsupraj rangoŝtupoj. Nur per tio la daŭrigo de la proceso, eĉ se unue nur nerimarkeble, pli malfrue pli kaj pli influeblas. Tion kapablas nur malmultaj advokatoj kaj ĉikaze via elekto, sinjoro K. estis tre favora. Eble nur unu aŭ du advokatoj povas prezenti sin kun simile bonaj rilatoj, kiel mi, d-ro Favor. Sed tiuj ne okupiĝas pri la klientaro en la advokata ĉambro kaj ankaŭ ne havas iun rilaton al ĝi. Sed des pli intima estas la rilato kun oficistoj de la juĝejo. Tio eĉ ne ĉiam necesas, ke mi, d-ro Favor, iru al la juĝejo kaj atendu en la antaŭĉambroj de la esploraj juĝistoj je ties hazarda apero kaj tute laŭ ties kapricoj atingu nur ŝajnan sukceson aŭ eĉ

ne tiun. Nu, vi, sinjoro K., ja mem vidis, ke la oficistoj, inter ili eĉ sufiĉe altrangaj, venas mem, donas volonte sciigojn, senkaŝajn aŭ almenaŭ facile interpreteblajn, ili priparolas la sekvan daŭrigon de la procesoj, ja, ili en kelkaj malmultaj kazoj eĉ lasas konvinki sin kaj volonte akceptas la fremdan vidpunkton. Sed ĝuste en tiu lasta rilato oni ne tro fidu al ili, kiom ajn decide ili parolas sian intencon avantaĝa por la defendo, ili eble tamen iras en sian kancelarion kaj preparas por la sekva tago tribunalan decidon, kiu entenas ĝuste la malon kaj por la akuzito estas eble eĉ multe pli severa ol estis la unua intenco, kiun la esploraj juĝistoj tute forlasis, kiel li asertis antaŭe. Kontraŭ tio oni kompreneble ne povas defendi sin, ĉar tio, kion ili diris vidalvide, estas do dirite nur vidalvide kaj ne permesas publikan konkludon, eĉ se la defendo alikaze ne devus strebi konservi la favoron de la mastroj. Krome memkompreneble ĝustas, ke la sinjoroj konektiĝas ne nur pro homamo aŭ pro afablaj sentoj kun la defendo. Male ili dependas en certa rilato de ili. En tiu kazo montriĝas la malavantaĝo de juĝeja organizo, kiu eĉ en la unua procesfazo fiksas ĝin sekreta. Al la oficistoj mankas la ligo kun la loĝantaro. Por la kutimaj, averaĝaj

procesoj ili estas bone ekipitaj, tiaj procesoj deruliĝas preskaŭ per si mem sur sia spuro kaj oni bezonas nur ĉeokaze tie kaj tie iun impulson, sed kaj pri la tute simplaj kazoj kaj pri la precipe komplikaj ili estas ofte senkonsilaj. Ili havas, ĉar ili tage kaj nokte estas firmpinĉitaj en sian leĝon, ne la ĝustan sencon por homaj rilatoj, kaj tiun malhavon ili en tiaj kazoj sentas tre. Tiukaze ili venas al la advokato por ricevi konsilon, kaj post ili portas servisto la aktujojn, kiuj kutime estas sekretaj. Ĉe tiu ĉi fenestro oni povis renkonti kelkajn sinjorojn, de kiuj oni atendus tion plej malmulte, kiel ili preskaŭ senespere rigardis sur la strateton, dum mi, la advokato, studis ĉe la tablo la aktujojn, por povi doni al ili bonan konsilon. Cetere ĝuste ĉe tiaj okazoj oni povas konstati, ke la sinjoroj super ĉiuj mezuroj serioze traktas sian profesion kaj kiom forte ili pro malhelpoj, kiujn ili pro ties naturo ne povas venki, malesperiĝas. Ilia pozicio ankaŭ alikaze ne estas facila, oni ne estu maljusta al ili, kaj ne rigardu ilian pozicion oportuna. La ranga ordo de la juĝejo kaj ties altigo estas senfina kaj eĉ por iniciito ne antaŭdivenebla. La proceduro de la proceso en la justicaj kortumoj ĝenerale ankaŭ por la subrangaj oficistoj estas

sekreta. Tial la aferojn, kiujn ili prilaboras, ili apenaŭ povas persekuti tute dum ties plia pli malproksima daŭrigo, la juĝeja afero aperas en ilia horizonto do ofte sen tio, ke ili ofte scias, de kie ĝi venas, kaj ĝi estas daŭrigata sen tio, ke ili scias, kien. Do la instruo, kiun oni povas ĉerpi el la studado de la diversaj processtadioj, el la fina verdikto kaj de ties kialoj, nehavigeblas al tiuj oficistoj. Ili rajtas okupiĝi nur pri tiu parto de la proceso, kiu laŭ leĝo estas apartigita por ili, kaj ili scias de la plia, do de la rezultoj de ilia propra laboro plej ofte malpli ol la defendo, kiu ja kutime preskaŭ ĝis la fino de la proceso restos en konekto kun la akuzito. Ankaŭ tiurilate ili povas ekscii de la defendo diversajn valorplenajn informojn. Ĉu vi, sinjoro K., ankoraŭ miros, se vi ĉion tion priatentas, pri la incititeco de la oficistoj – ĉiu spertas tion - kiuj ĉeokaze kondutas tre ofendiĝeme kontraŭ la klientaro. Ĉiuj oficistoj estas incititaj, eĉ se ili aspektas trankvile. Kompreneble la simplaj advokatoj devas plej multe suferi pro tio. Oni rakontas ekzemple la sekvan rakonton, kiu laŭŝajne estas tute vera. Malnova oficisto, bona, kvieta viro, studis tagon kaj nokton seninterrompe – tiuj oficistoj estas efektive diligentaj kiel neniu krome –

komplikan juĝaferon, kiu speciale pro petskriboj de la advokato fariĝis tre konfuza. Ĉirkaŭ la mateno do, post dudekkvarhora, verŝajne ne tre sukcesa laboro li iris al la enirpordo, embuskis tie kaj ĵetis ĉiun advokaton, kiu volis enpaŝi, surŝtupare malsupren. La advokatoj kolektiĝis malsupre sur la ŝtupara placeto kaj interkonsiliĝis kion fari; unuflanke fakte ili ja ne povas pretendi esti enlasataj, tial ili laŭjure apenaŭ povis entrepreni ion kontraŭ la oficisto, kaj ili devas, kiel jam menciite, ankaŭ gardi sin inciti la oficistaron. Aliflanke ĉiu tago ne pasigita ĉe la juĝejo estas perdita por ili, kaj ili do havis interesegon tamen enpenetri. Fine ili interkonsentiĝis lacigi la maljunan sinjoron. Ĉiam denove ili elsendis advokaton, kiu kuris surŝtupare supren kaj tiam kun eble plej granda sed pasiva rezisto, lasis ĵeti sin malsupren, kie li tiam estis kaptita per brakoj de la kolegoj. Tio daŭris ĉirkaŭ horon, tiam la maljuna sinjoro, li ja ankaŭ de la nokta laboro estis tute elĉerpita, vere laciĝis kaj reiris en la kancelarion. Tiuj malsupre komence tute ne volis fidi pri tio kaj sendis unue viron, kiu malantaŭ la pordo rigardu, ĉu tie efektive neniu estas. Nur poste ili enmarŝis kaj verŝajne eĉ ne kuraĝis grumbli. La advokatoj – eĉ la plej

malgranda povas superrigardi la rilatojn almenaŭ parte – tute ne intencas enkonduki ĉe la juĝejo iujn plibonigojn aŭ celas sukcesigi ilin, dum – kaj tio estas tre karakteriza, – preskaŭ ĉiu akuzito, eĉ tute simple pensantaj homoj, tuj ĉe la komenco de la proceso pensas pri plibonigaj proponoj kaj per tio ofte disipas tempon kaj forton, kiuj alie multe pli bone estus uzeblaj. La sole ĝusta estas aranĝiĝi kun la estantaj rilatoj. Eĉ, se estus eble plibonigi detalojn – sed tio estas sensenca superstiĉo – , oni atingus ion en la plej bona kazo nur por estontaj kazoj, sed sin mem oni nur damaĝus super ĉiu mezuro, ĉar oni incitis la specialan atentemon de la ĉiam venĝema oficistaro. Nur ne frapi atenton! Oni kondutu trankvile, eĉ, se tio kiom ajn kontraŭas al la propra sento! Oni devas provi akcepti, ke tiu granda juĝeja organismo, kvazaŭ eterne restas en provizora stato, kaj, ke tiukaze, se oni memstare ŝanĝas ion je sia loko, al si mem forprenas la teron sub la piedoj kaj povas fali abismen, dum la granda organismo por la eta ĝena afero povos facile havigi al si je alia loko – ĉio estas ja interligita – anstataŭon kaj restos neŝanĝita, aŭ ĝi eble eĉ, kio estas eĉ tre verŝajna, fariĝos eĉ pli fermita, pli observema, pli severa kaj pli malica. Oni

ja translasu la laboron al la advokato anstataŭ ĝeni ĝin. Riproĉoj ja ne tre utilas, precipe tiukaze, se oni ne povas komprenigi ties kaŭzojn laŭ la tuta signifo, tamen mi devas diri, ke vi, sinjoro K., per via konduto antaŭ la kancelaria direktoro tre damaĝis vin. Tiu influa viro el la listo de tiuj, ĉe kiuj oni povus atingi ion por K., preskaŭ jam forstrekeblas. Eĉ preterirajn menciojn de la proceso li preteraŭdas evidente intence. Pri kelkaj aferoj oficistoj estas ja kiel infanoj. Ofte pro bagateloj, al kiuj tamen via konduto bedaŭrinde ne apartenas, ili povas esti tiom ofenditaj, ke ili eĉ ĉesas paroli kun bonaj amikoj kaj deturniĝas de ili, kiam ili renkontas ilin, kaj ke ili pri ĉio ebla laboras kontraŭ ili. Sed poste iam, surprize, sen speciala kaŭzo, ili lasas ridigi sin de ŝerceto, kiun oni kuraĝas rakonti nur tial, ĉar ĉio ŝajnas jam senperspektiva, kaj ili estas repacigitaj. Estas ja samtempe komplike kaj facile rilati al ili, reguloj por tio apenaŭ ekzistas. Kelkfoje estas mirige, ke ununura averaĝa vivo sufiĉas por kapti tiom da kompreno, ke oni povas certagrade sukcese labori ĉi tie. Venas tamen tristaj horoj, kiujn ja ĉiu havas, kiam oni supozas, ke oni atingis eĉ ne la plej minimuman, kiam ŝajnas al oni, ke

dekomence nur tiuj procesoj havis bonan finon, kiuj estis planitaj tiel, kio estus okazinta ankaŭ sen kunhelpo, dum ĉiuj aliaj procesoj estis perditaj, spite al ĉiu akompano, ĉiuj penoj, ĉiuj malgrandaj ŝajnsukcesoj, pri kiuj oni tiom ĝojis. Tiukaze evidente nenio plu ŝajnas certa al oni, kaj tiukaze oni eĉ ne plu kuraĝus nei, ke procesoj laŭesence bone finiĝantaj, ĝuste pro la kunhelpo estis misvojigitaj. Ankaŭ tio estas speco de memfido, sed ĝi estas la ununura, kiu tiam ankoraŭ restas. Al tiaj atakoj – estas kompreneble nur atakoj, nenio pli – advokatoj speciale tiukaze estas elmetitaj, se proceso, kiun ili kondukis jam sufiĉe longe kaj kontentiĝe, subite estas prenita el ilia mano. Tio estas certe la plej terura, kio povas okazi al advokato. Ne fare de akuzito oni forprenis la proceson de ili, tio certe okazas neniam. Akuzito, kiu iam foje prenis certan advokaton, devas resti ĉe li, eĉ se okazas kio ajn. Kiel li entute povus konservi sin ankoraŭ sola, se li foje jam akceptis helpon? Tio do ne okazas, sed certe kelkfoje okazas, ke la proceso turniĝas laŭ direkto, en kiu la advokato ne plu rajtas akompani lin. La proceso kaj la akuzito kaj ĉio simple estas forprenitaj de la advokato. Tiukaze ankaŭ la plej bonaj rilatoj al la oficistaro ne plu

helpas, ĉar ili mem scias nenion. La proceso simple ektroviĝas en stadio, kiam helpo ne plu estas permesata, ĉar prilaboras ĝin ne alireblaj kortumoj, tiam ankaŭ la akuzito por la advokato ne plu atingeblas. Tiukaze oni venas iutage al hejme kaj trovas sur sia tablo ĉiujn ĉi multajn petskribojn, kiujn oni faris kun kiel eble plej granda diligento kaj kun la plej belaj esperoj pri tiu afero. Ili estas resenditaj, ĉar ili ne estas transigeblaj en la novan processtadion. Ili estas senvaloraj ĉifonpaperoj. Tamen la proceso ne nepre estas perdita, tute ne, almenaŭ ne ekzistas decida kaŭzo por tiu supozo, oni nur ne plu ekscias ion pri tiu proceso kaj ankaŭ ne plu ekscios ion. Sed feliĉe tiaj kazoj estas esceptoj, kaj eĉ, se via proceso estas tia, ĝi tamen ankoraŭ estas tre malproksima de tia stadio. Tial ankoraŭ estas sufiĉe da okazo por advokata laboro, kaj, ke ĝi estas uzata utile, pri tio vi povas esti certa. La petskribo, kiel jam menciite, ankoraŭ ne estas transdonita, tio ankaŭ ne urĝas, multe pli grava estas la enkondukantaj priparoladoj kun elstaraj oficistoj, kaj tiuj jam okazis. Sukcese kaj malsukcese, kiel mi malkaŝe koncedas. Estas pli bone ne sciigi provizorajn detalojn, per kiuj vi, sinjoro K., estus nur malfavore

influata kaj tro esperoĝoja aŭ tro timema, nur tiom estu dirita, ke unuopuloj esprimis sin tre favore kaj montris sin ankaŭ tre helpoprete, dum aliaj malpli favore esprimis sin, sed neniel rifuzis sian kunhelpon. La rezulto do estas entute tre ĝojiga, oni nur ne tro frue speciale konkludu ion el tio, ĉar ĉiuj antaŭtraktadoj komenciĝas simile, tamen nur la plia evoluo montros la valoron de tiaj antaŭtraktadoj. Ĉiukaze ankoraŭ nenio estas perdita, kaj se ankoraŭ sukcesos spite al ĉio ankoraŭ gajni la kancelarian direktoron, – jam diversaj aferoj pro tiu celo estas entreprenataj, – tiukaze la tuto estas, kiel diras la kirurgoj, pura vundo, kaj oni povas trankviligite atendi tion, kio sekvos.

Pri tiaj kaj similaj paroloj la advokato estis neelĉerpebla. Ili ripetiĝis ĉe ĉiu vizito. Ĉiam io progresis, sed neniam la maniero de tiuj progresoj sciigeblis. Ĉiam oni laboris je la unua petskribo, sed ĝi ne pretiĝis, kio plej ofte ĉe la sekva vizito montriĝis granda avantaĝo, ĉar la lasta tempo, kion oni ne povis antaŭdiveni, por la transdono estis tre malavantaĝa. Se K. tute lacigite de la paroloj ĉeokaze rimarkis, ke eĉ kun konsidero de ĉiuj komplikaĵoj la afero

progresas nur tre lante, li ricevis la respondon, ke la afero tute ne progresas lante, sed certe oni estus jam pli progresinta, se K. sin sufiĉe frue estus turninta al la advokato. Sed tion li bedaŭrinde preterlasis. Kaj tiu preterlaso alportos ankoraŭ pliajn malavantaĝojn, ne nur tempajn.

La ununura bonfartiga interrompo de tiuj vizitoj estis Leni, kiu ĉiam povis aranĝi la aferon tiel, ke ŝi portis la teon al la advokato dum la ĉeesto de K. Tiam ŝi staris malantaŭ K., ŝajne rigardis, kiel la advokato kun speco de avido, profunde klinita al la taso, enverŝas kaj trinkas la teon, kaj ŝi lasis sekrete preni sian manon de K. Regis seninterrompita silento. La advokato trinkis. K. premis la manon de Leni, kaj Leni kelkfoje kuraĝis mankaresi softe la hararon de K.

„Vi ankoraŭ ĉeestas, ĉu?“ demandis la advokato, post kiam li trinkis. „Mi intencis ankoraŭ kunpreni la trinkilaron“, diris Leni, sekvis ankoraŭ lasta manpreno, la advokato purviŝis sian buŝon kaj komencis kun nova forto insiste paroli al K.

Ĉu tio estis konsolo ĉu despero, kion la advokato volis atingi? K. ne sciis, sed tamen li pensis tute certa, ke la propra proceso ne troviĝas en bonaj manoj. Povis esti ĝusta ja ĉio, kion la advokato rakontis, eĉ se estis klare rimarkeble, ke li intencis meti sin kiel eble plej bone en la antaŭon kaj verŝaĵne ankoraŭ neniam kondukis grandan proceson tian, kia estis la proceso de K., laŭ lia opinio. Sed suspekte restis la seninterrompe emfazitaj personaj rilatoj al la oficistoj. Ĉu ili estis ekskluzive ekspluateblaj nur avantaĝe al K.? La advokato neniam forgesis rimarki, ke temas nur pri subrangaj oficistoj, do pri oficistoj en tre dependaj pozicioj, por kies progresoj certaj turnoj de la procesoj verŝajne povis esti gravaj. Ĉu ili eble uzis la advokaton por atingi tiajn procesturnojn ĉiam malavantaĝajn por la akuzito? Eble ili ne faris tion tiel en ĉiu proceso, certe, tio ne estis verŝajna, certe okazis ankaŭ procesoj, en kies deruliĝo, ili havigis al la advokato avantaĝojn pro ties servoj, ĉar ili devis havi ja ankaŭ intereson pri tio konservi lian reputacion sen damaĝo. Sed, se vere tiel estis, kiel ili do miksiĝas en la proceson de K., kiu, kiel la advokato klarigis, estis tre komplika, do grava proceso kaj tuj dekomence frapis grandan atenton

ĉe la juĝejo? Ne povus esti tre dube, kion ili farus. Signon pri tio oni povis vidi jam je tio, ke la unua petskribo eĉ ankoraŭ ne estis transdonita, kvankam la proceso jam daŭris monatojn kaj tamen ĉio, laŭ la diroj de la advokato troviĝis ankoraŭ ĉekomence, kio kompreneble estis tre taŭga por endormigi la akuziton kaj konservi lin senhelpa por poste subite ataki lin per la decido aŭ almenaŭ per al sciigo, ke la finita esplorado, malfavora al li, estas transdonota al la pli alta instanco.

Estis nepre necese, ke K. entreprenu mem ion. Ĝuste en cirkonstancoj de granda laceco, kiel je tiu vintra antaŭtagmezo, kiam ĉio sen lia volo vagadis en lia kapo, tiu konvinko estis nerifuzebla. La malestimo, kiun li havis pli frue pri la proceso, aktuale ne plu validis. Se li estus sola en la mondo, facile li estus povinta malatenti la proceson, kvankam ankaŭ estus certe, ke tiukaze la proceso tute ne ekestus. Sed nun la onklo jam estis tirinta lin al la advokato, familiaj konsideroj ekludis rolon; lia situo ne plu estis tute sendependa de la procesa disvolviĝo, li mem malatenteme menciis kun certa neklarigebla kontentiĝo antaŭ konatoj la proceson, aliaj

je nekonata maniero eksciis ion pri ĝi. La rilato al fraŭlino Brosisto ŝajne ŝanĝiĝis laŭ la proceso – koncize esprimite, li apenaŭ plu havis la elekton akcepti la proceson aŭ rifuzi ĝin, li troviĝis meze de ĝi kaj devis defendi sin. Se li estus laca, tiukaze tio estus malbona.

Je troigita zorgo provizore ankoraŭ ne estis kaŭzo. Li kapablis leviĝi en la banko dum relative mallonga tempo en altan rangon kaj konservi ĝin, de ĉiuj agnoskata, en tiu ofico, li nur iom devos turni tiujn kapablojn, kiuj ebligis tion, al la proceso, kaj tiukaze ne estos dubo, ke ĉio finiĝos bone. Antaŭ ĉio, se oni celas atingi rezulton, estis necese, ĉiun penson pri ebla kulpo dekomence rifuzi. Ne estis kulpo. La proceso ne estis io alia krom granda proceso tia, kian li jam ofte reguligis avantaĝe por la banko, negoco, en kiu, kiel estis kutime, embuskis diversaj danĝeroj, kontraŭ kiuj oni ja sukcese devis defendi sin. Tiucele oni kompreneble ne povis ludi kun iuj pensoj pri certa kulpo, sed kiel eble plej bone firmteni la penson pri la propra avantaĝo. Laŭ tiu vidpunkto estis ankaŭ neeviteble, tre baldaŭ, plej bone ankoraŭ je tiu vespero, nuligi la reprezentatecon fare de la advokato.

Kvankam tio estis laŭ ties rakontado tute neimagebla, kaj verŝajne eĉ tre ofendiga, sed K. ne povis toleri, ke liaj penoj en la proceso renkontis malhelpaĵojn, kiuj eble estis kaŭzitaj fare de la propra advokato. Sed, se la advokato estos jam denukigita, tiam necesos tuj transdoni la petskribon kaj eble ĉiutage oni devos urĝi, ke oni priatentu ĝin. Por tiu celo kompreneble ne sufiĉos, ke K. sidos kiel la aliaj en la irejo kaj demetos la ĉapelon sub la benkon. Li mem aŭ la inoj aŭ aliaj heroldoj ĉiutage devos svarmi ĉirkaŭ la oficistoj kaj devigi ilin rigardi anstataŭ tra la krado al la irejo kaj sidiĝi al ties tabloj kaj studi la petskribon de K. De tiuj penoj oni ne devus delasi, ĉio devus esti organizita kaj kontrolata, la juĝejo foje kunpuŝiĝu kun akuzito, kiu scias konservi sian rajton.

Eĉ kvankam K. fidis pri tio, ke li povos fari ĉion tion, la malfacileco de la verkado de tiu petskribo estis superhoma. Antaŭe, ĉirkaŭ semajno pli frue, li povis pensi nur kun sento de honto pri tio, ke li iam estos devigita fari tian petskribon mem; ke tio povus esti eĉ komplika, pri tio li tute ne pensis. Li memoris, kiel iam antaŭtagmeze, ĝuste tiam, kiam li estis superŝutita per

laboro, li subite ŝovis ĉion flanken kaj prenis skriboblokon por prove skizi la pensaran sinsekvon de tia petskribo kaj eventuale disponigi ĝin al la flegma advokato kaj, kiel ĝuste tiumomente malfermiĝis la pordo de la direktora ĉambro kaj la vicdirektoro enpaŝis kun granda ridado. Tio estis tiam por li tre embarasiga, kvankam la vicdirektoro kompreneble ne ridis pri la petskribo, pri kiu li tute ne sciis ion, sed pri borsoŝerco, kiun li ĵus aŭdis, ŝerco, kiu bezonis por la kompreno desegnon, kiun la vicdirektoro, kliniĝinte sur la tablon de K., skizis per la krajono, kiun li prenis el la mano de K., sur la skriboblokon, kiu estis destinita por la petskribo.

Tiutage K. ne plu sciis ion pri honto, la petskribo necesis. Se li ne trovos tempon en la oficejo, kio estis tre verŝajna, tiukaze li devos fari ĝin hejme en la noktoj. Se ankaŭ la noktoj ne sufiĉus, li devus uzi forpermeson. Nur ne halti en la mezo de la vojdistanco, tio estas ne nur en negocoj, sed ĉiam kaj ĉie la plej sensenca. La petskribo kompreneble kaŭzis preskaŭ senfinan laboron. Oni ne devis havi tre timeman karakteron kaj tamen facile povis eksupozi, ke ne eblas pretigi la petskribon kiam ajn. Ne

pro pigremo aŭ malico, kiu sole povis malhelpi la pretigon fare de la advokato, sed tial, ĉar pro la nesciado de la ekzistanta akuzo, kaj eĉ de ties eblaj plivastigoj, la tuta vivo kun la plej detalaj agoj kaj okazaĵoj devis esti rememorigata, reprezentata kaj de ĉiuj flankoj kontrolata. Kaj kiom malĝojiga tia laboro krome estas. Ĝi eble taŭgas okupi, iam post pensiuliĝo, la infaneciĝintan spiriton kaj helpi al li pasigi la longajn tagojn. Sed tiutempe, kiam K. bezonis ĉiujn siajn pensojn por la laboro, kiam ĉiu horo, dum li ankoraŭ estis grimponta range kaj jam signifis minacon por la sinjoro vicdirektoro, pasis plej rapide kaj kiam li kiel juna homo volis ĝui la mallongajn vesperojn kaj noktojn, tiutempe li devis komenci per la skribado de la petskribo. Denove lia pensado finiĝis per plendoj. Preskaŭ senvole, nur por fini tion, li palpis per la fingroj la butonon de la elektra sonorilo, kiu kondukis en la antaŭĉambron. Dum li premis ĝin malsupren, li rigardis al la horloĝo. Estis je la dekunua, du horojn, longan kaj valorplenan tempon, li nur revis kaj estis kompreneble eĉ pli laca ol antaŭe. Almenaŭ la tempo ne estis perdita, li faris decidojn, kiuj povus esti valorplenaj. La servistoj alportis krom diversaj postaĵoj du vizitkartojn de sinjoroj,

kiuj jam dum pli longa tempo atendis sinjoron K. Estis eĉ tre gravaj klientoj en la banko, kiujn oni kutime atendigu neniukaze. Kial ili venis je tiu tiom malkonvena tempo, kaj kial, tiel ŝajne demandis la sinjoroj malantaŭ la fermita pordo, uzas la diligenta K. por privataj aferoj la plej bonan negocan tempon? Laca de la antaŭe okazinta kaj lace atendante la sekvan, ekstaris K. por akcepti la unuan el la sinjoroj.

Estis malgranda vigla sinjoro, fabrikisto, kiun K. bone konis. Li bedaŭris, ke li ĝenis sinjoron K. ĉe grava laboro, kaj K. bedaŭris siaflanke, ke li lasis atendi la fabrikiston tiom longe. Jam tiun bedaŭron li parolis tiel mekanike kaj kun preskaŭ falsa prononcado, ke la fabrikisto, se li ne estus tute okupita pri la negoca afero, devus rimarki tion. Anstataŭ tio li eltiris haste fakturojn kaj tabelojn el ĉiuj poŝoj, dismetis ilin antaŭ sinjoron K., klarigis diversajn erojn, plibonigis kalkulerareton, kiu frapis lian atenton eĉ dum supraĵa superrigardo. Li memorigis sinjoron K. pri simila negoco, kiun li faris kun li antaŭ jaro, li menciis preterire, ke ĉifoje alia banko preta por oferi tre multan, aspiras la negocon, kaj li fine silentiĝis por ekscii la

opinion de K. K. komence efektive bone sekvis la parolon de la fabrikisto, la penso pri la grava negoco poste ankaŭ lin ekokupis, sed bedaŭrinde ne kostante, baldaŭ li deflankiĝis de la aŭskultado, poste li ankoraŭ kapjesis dum certa tempo post la pli laŭtaj elvokoj de la fabrikisto, sed fine li ankaŭ tion preterlasis kaj limigis sin je tio rigardi la kalvan kapon klinitan super la paperoj, sin demandante, kiam la fabrikisto fine ekkonos, ke lia tuta parolo estas sensenca. Kiam li do silentiĝis, supozis K. komence efektive, ke tio okazas por doni al li la okazon konfesi, ke li ne kapablas aŭskulti. Nur kun bedaŭro li rimarkis pere de la streĉita rigardo de la fabrikisto, kiu evidente atendis kiun ajn obĵeton, ke la negoca priparolado estu daŭrigata. Li do klinis la kapon kvazaŭ atendante ordonon kaj komencis lante zigzagadi per la krajono tien kaj tien ĉi sur la papero. Tie kaj tie ĉi li haltis kaj gapis ciferon. La fabrikisto supozis obĵetojn, eble la ciferoj vere ne estis fiksaj, eble ili ne estis la decida, ĉiukaze la fabrikisto kovris la paperojn permane kaj komencis denove, tute proksimiĝante al K., ĝeneralan prezenton de la negoco.

„Estas komplike“, diris K., li tordis la lipojn kaj sinkis, sen la eblo iel povi firmteni, al braka apogilo – ĉar la ununure komprenebla – , la paperoj, estis kovritaj. Li eĉ nur iomete levis la rigardon supren, kiam malfermiĝis la pordo de la direktora ĉambro, kaj tie, ne tute precize videble kiel post gazovualo aperis la vicdirektoro. K. ne cerbumis pri tio, sed observis nur la senperan efikon, kiu estis tre ĝojiga por li. Ĉar la fabrikisto tuj saltis de la fotelo kaj rapidis al la vicdirektoro, sed K. volus fari lin ankoraŭ dekfoje pli rapida, ĉar li timis, ke la vicdirektoro povus denove foriĝi. La timo ne estis utila, la sinjoroj iris renkonte unu al la alia, etendis reciproke la manojn kaj iris kune al la skribotablo de K. La fabrikisto plendis, ke li trovis ĉe la prokuristo tiom malmulte da emo pri la negoco, kaj li montris al K., kiu sub la rigardo de la vicdirektoro denove kliniĝis sur la paperojn. Kiam poste ambaŭ apogis sin al la skribotablo kaj la fabrikisto komencis konkeri la vicdirektoron por si mem, K. havis la impreson, kvazaŭ super lia kapo la du viroj, kies alton li imagis troigite, debatas pri li mem. Lante, kun atenteme suprenturnitaj okuloj, li provis ekscii, kio supre okazas, li prenis iun el la paperoj de la skribotablo sen rigardi tien,

metis la paperon sur platan manon kaj suprenlevis ĝin iom post iom, dum li mem ekstaris, al la sinjoroj. Li pensis ĉe tio pri nenio konkreta, sed agis nur laŭ la sento, ke li devos konduti tiel, se li iam estos pretiginta la grandan petskribon, kiu senŝarĝigu lin tute. La vicdirektoro, kiu partoprenis la interparoladon kun granda atentemo, rigardis nur haste supraĵe sur la paperon, li eĉ ne superrigardis, kio tie legeblas, ĉar tio, kio gravis por la prokuristo, estis malgrava por li, li prenis la paperon el la mano de K. kaj diris: „Dankon, mi jam scias ĉion", kaj li remetis la paperon trankvile sur la tablon. K. rigardis lin amarsente de la flanko. Sed la vicdirektoro ne rimarkis tion aŭ iĝis, se li rimarkis tion, eĉ refreŝigita. Li ofte ekridis laŭte, kaj foje evidente metis la fabrikiston en grandan embarason, el kiu li tamen tuj tiris lin per tio, ke li mem obĵetis ion al si mem, kaj li invitis lin, ke li transiĝu en ties oficejon, kie ili povus fini la aferon. „Tio estas tre grava afero", li diris al la fabrikisto, „mi tute akceptas tion. Kaj al la sinjoro prokuristo" – eĉ ĉe tiu rimarko li parolis fakte nur al la fabrikisto – „estos certe agrable, se ni plenumos tion por li. La afero postulas trankvilan pripensadon. Sed li ŝajne estas tro ŝarĝita

hodiaŭ, krome atendas lin ja kelkaj homoj jam dum horoj en la antaŭĉambro.“ K. havis ankoraŭ ĝuste tiom da memrego forturni sin de la vicdirektoro kaj turni sian afablan, sed rigidan rideton nur al la fabrikisto, krome li tute ne entreprenis ion plian, li apogis sin ambaŭmane, iom antaŭkliniĝinte, sur la skribotablon kiel komizo post la pupitro kaj observis kiel ambaŭ sinjoroj plu interparolante prenis la paperojn de la tablo kaj malaperis en la direktora ĉambro. En la pordo ankoraŭ retroturniĝis la fabrikisto kaj diris, ke li ankoraŭ ne adiaŭas sin, sed ke li kompreneble raportos al la prokuristo pri la sukceso de la priparolado, ke krome li ankoraŭ devos sciigi informeton.

Finfine K. estis sola. Li eĉ ne pensis pri tio enlasi ankoraŭ iun alian klienton, kaj nur malprecize li konsciiĝis kiel agrabla tio estas, ke la homoj ekstere pensas, ke li ankoraŭ intertraktas kun la fabrikisto kaj tial ne enpaŝu eĉ la servisto al li. Li iris al la fenestro, sidiĝis sur la balustradon, firmtenis sin per mano je la klinko kaj rigardis eksteren sur la placon. La neĝo ankoraŭ tiam falis, ankoraŭ tute ne heliĝis.

Longe li sidis tiel sen scii, kio fakte afliktis lin, nur de tempo al tempo li rigardis iom timigite trans ŝultro al la antaŭĉambro, kie li erare supozis aŭdi bruon. Sed ĉar neniu venis, li fariĝis pli trankvila, iris al la lavtablo, lavis sin per frida akvo kaj reiris kun pli klara kapo al la fenestra sidloko. La decido preni sian defendon en la propran respondecon montriĝis pli malfacila ol li origine supozis. Tiom longe, kiom li metis la defendon sur la ŝultrojn de la advokato, li ja esence estis malmulte tuŝita de la proceso, li rigardis ĝin el malproksimo kaj senpere apenaŭ estis atingebla de ĝi, li povis rigardi, kiam li volis, kiel statas la afero pri li, sed li ankaŭ estus povinta retiri la kapon tiam, kiam li volis. Sed nun male, se li kondukus sian defendon mem, li devus – almenaŭ dummomente – tute fordoni sin al la juĝejo, la sukceso de tio pli malfrue estu ja lia tuta porĉiama liberigo, sed por atingi tiun, li provizore devis elmeti sin al multe pli granda danĝero ol ĝis tiam. Se li dubus pri tio, la aktuala kunesto kun la vicdirektoro kaj la fabrikisto sufiĉus por konvinki lin pri la malo. Kiom mizere li sidis jam nur pro la decido sin defendi mem, tute obtuzigite, sed kiel fariĝu pli poste? Kiaj tagoj antaŭas lin?! Ĉu li trovus la vojon, kiu

kondukos tra ĉio al bona fino? Zorgema defendo certe signifos – kaj ĉio alia estis sensenca – zorgema defendo certe signifos, ke samtempe estos necese, ke li devu apartiĝi kiel eble plej bone de ĉio alia. Ĉu li bonŝance eltenus tion? Kaj kiel li sukcesu fari tion en la banko? Temas ja ne nur pri petskribo, por kio forpermeso eble sufiĉus, kvankam la peto pri forpermeso ĝuste nun estus estus granda risko, temas ja pri tuta proceso, kies daŭro ne estas antaŭvidebla. Kia malhelpaĵo subite estis ĵetita al la vivokuro de K.! Kaj nun li laboru por la banko? Li rigardis super la skribotablo. – Nun li enlasu klientojn kaj intertraktu kun ili? Dum lia proceso plu ruliĝas, dum supre en la subtegmentejo la juĝejaj oficistoj sidas kliniĝinte sur la skribojn de la proceso, li plenumu negocojn de la banko? Ĉu tio ne aspektas kiel torturado, kiu agnoskata de la juĝejo, havas rilaton kun la proceso kaj akompanas ĝin? Kaj ĉu oni eventuale en la banko konsiderus lian specialan situon ĉe la prijuĝado de lia laboro? Neniu kaj neniam. Tute nekonata lia proceso ja ne estis, eĉ se ne estis tute klare, kiu sciis pri ĝi kaj kiom. Ĝis la vicdirektoro la onidiro espereble ankoraŭ ne penetris, alikaze oni jam devus klare vidi, kiel li eluzas

tion tute sen kolega kamaradeco kaj humaneco kontraŭ K. Kaj la direktoro, ĉu? Certe, li havis bonan opinion pri K., kaj li verŝajne tuj, kiam li ekscius ion pri la proceso, en la grado, en kiu tio dependis de li, certe provus krei kelkajn plifaciligojn por K., sed certe li ne sukcesus pri tio, ĉar li ja nun, ĉar la kontraŭpezo de K. komencis fariĝi pli malforta, pli kaj pli influata de la vicdirektoro, kiu krome eĉ eluzis la suferan staton de la direktoro por la fortigo de la propra potenco. Kion K. do povus esperi? Eble li malfortigis per tiaj pripensoj nur sian rezistoforton, sed estis ankaŭ necese ne trompi sin mem kaj vidi ĉion tiom klara, kiom tio momente eblis.

Sen precipa kaŭzo, nur por ankoraŭ ne devi reveni al la skribotablo, li malfermis la fenestron. Ĝi lasis malfermi sin nur malfacile, li devis turni la klinkon per ambaŭ manoj. Poste penetris la ĉambron laŭ ties tuta alto kaj larĝo nebulo miksita kun fumo kaj plenigis ĝin per brulodoreto. Ankaŭ kelkaj neĝflokoj estis blovataj internen.

„Estas aĉa aŭtuno“, diris malantaŭ K. la fabrikisto, kiu veninte el la ĉambro de la vicdirektoro, nerimarkite

enpaŝis. K. kapjesis kaj rigardis maltrankvile al la teko de la fabrikisto, el kiu li nun certe eltiros la paperojn por sciigi al K. la rezulton de la intertraktoj kun la sinjoro vicdirektoro. Sed la fabrikisto sekvis la rigardon de K., frapis sur sian tekon kaj diris, sen malfermi ĝin: „Vi volas aŭdi, kiel la afero statas, ĉu? Mi jam preskaŭ portas la negocan kontrakton en la teko. Rava homo estas via vicdirektoro, sed certe ne maldanĝera.“ Li ridis, skuis manon de K. kaj volis ankaŭ lin ridigi. Sed al K. tio ŝajnis suspekte, ke la fabrikisto ne volis montri la paperojn al li, kaj li trovis nenion ridinda je la rimarko de la fabrikisto.

„Sinjoro prokuristo“, diris la fabrikisto, „ĉu vi suferas pro la vetero? Vi aspektas hodiaŭ tiom korpremita.“

„Jes“, diris K. kaj tuŝis permane la tempion, „kapdolorojn, familiajn zorgojn.“

„Tre ĝuste“, diris la fabrikisto, kiu estis hasta homo, kaj neniun povis aŭskulti trankvile, „ĉiu devas porti sian krucon.“ K. spontane faris paŝon al la pordo, kvazaŭ li volus akompani la fabrikiston eksteren, sed tiu diris: „Mi havas, sinjoro prokuristo, ankoraŭ sciigeton por vi. Mi tre

timas, ke mi ĝuste hodiaŭ molestas vin per tio, sed mi estas jam duafoje en la lasta tempo ĉe vi kaj ĉiufoje forgesis tion. Sed, se mi prokrastos tion ankoraŭfoje, ĝi verŝajne tute perdos sian sencon. Sed tio estus domaĝe, ĉar eble mia sciigo tamen ne estas senvalora.“ Antaŭ ol K. havis tempon respondi, proksimiĝis paŝe la fabrikisto al K., frapis per fingroartiko softe lian bruston kaj diris mallaŭte: „Vi havas proceson, ĉu ne?“ K. retropaŝis kaj vokis tuj: „Tion diris la vicdirektoro al vi!“

„Ho, ne“, diris la fabrikisto, „de kie la vicdirektoro sciu tion?“

„Kaj vi, ĉu?“ demandis K. jam multe pli trankvila.

„Mi ekscias ĉeokaze ion de la juĝejo“, diris la fabrikisto, tio koncernas ja la informon, kiun mi volas sciigi al vi.“

„Tiom da homoj estas ligitaj kun la juĝejo!“ diris K. kun klinita kapo kaj kondukis la fabrikiston al la skribotablo. Ili denove sidiĝis kiel antaŭe kaj la fabrikisto diris: „Estas bedaŭrinde ne tre multe, kion mi povas sciigi al vi. Sed koncerne tiajn aferojn oni ne neglektu eĉ la plej

bagatelan. Sed krome ĝi urĝas min helpi iel al vi, kaj eĉ, se mia helpo estas kiom ajn eta. Ni estis ja ĝis nun bonaj negocaj amikoj, ĉu ne? Nu, do.“ K. volis pardonpeti pri sia konduto dum la tiutaga priparolado, sed la fabrikisto ne toleris interrompon, li ŝovis la tekon alte sub akselon por montri, ke li devas rapidi, kaj daŭrigis: „Pri via proceso mi scias pere de certa Titorelli. Li estas pentristo, Titorelli estas nur lia artista nomo, lian ĝustan nomon mi eĉ ne konas. Li venas jam de jaroj de tempo al tempo al mia oficejo kaj alportas pentraĵetojn, por kiuj mi – li estas preskaŭ almozpetisto – ĉiam donas specon de almozo. Cetere, estas beletaj pentraĵetoj, erikejaj pejzaĝoj kaj similaj motivoj. Tiuj vendoj – ni ambaŭ jam kutimiĝis al tio – okazis tute senprobleme. Sed iam la vizitoj ripetiĝis tamen tro ofte, mi riproĉis lin, ni komencis paroli kune, min interesis kiel li povas vivteni sin nur per la pentrado, kaj mi eksciis mirigita, ke lia plej esenca enspezfonto estas la pentrado de portretoj. Li diris, ke li laboras por la juĝejo. ‚Por kiu juĝejo?‘ mi demandis. Kaj poste li rakontis al mi pri la juĝejo. Vi certe plej bone povas imagi kiel mirigite mi estis pri tiuj rakontoj. De tiam mi aŭdas dum ĉiu vizito de li iujn novaĵojn pri la juĝejo kaj ricevas

iom post iom certan enrigardon en la aferon. Ĉiukaze Titorelli estas babilema, kaj mi ofte devas silentigi lin, ne nur tial, ĉar li certe ankaŭ mensogas, sed antaŭ ĉio tial, ĉar negocisto kiel mi, kiu preskaŭ renversiĝas pro la propraj negocaj zorgoj, sin ne okupu eĉ multe pri fremdaj aferoj. Sed tio nur preterire. Eble – tiel mi do pensis – Titorelli povas esti iom helpema al vi, li konas multajn juĝistojn, kaj eĉ se li eble ne havas grandan influon, li ja tamen povos doni konsilojn al vi, kiel oni povas ligi kontaktojn kun diversaj influriĉaj personoj. Kaj eĉ, se tiuj konsiloj per si mem ne estos decidaj por vi, ili tamen estos, laŭ mia opinio, en via posedo, tre gravaj. Vi estas ja preskaŭ advokato. Mi kutimas diri: Prokuristo K. estas preskaŭ advokato. Ho, mi ne havas zorgojn pro via proceso. Ĉu vi do intencas iri al Titorelli? Pro mia rekomendo li certe faros ĉion, kio eblas. Mi pensas efektive, ke vi devus iri al li. Kompreneble ne devas esti hodiaŭ, sed iam, ĉeokaze. Tamen vi ne estas eĉ iomete devigita – tion mi volas ankoraŭ aldone diri al vi – tial, ĉar mi donis la konsilon al vi – efektive iri al Titorelli. Ne, se vi pensas, ke Titorelli ne estas bezonata, tiukaze estos certe pli bone, se vi lasos lin tute flanke. Eble vi havas jam

tute precizan planon kaj Titorelli povus ĝeni ĝin. Ne, tiukaze kompreneble ne iru tien! Oni certagrade eĉ devas venki sin mem por akcepti konsilon de tia ulo. Nu, estu laŭ via plaĉo, jen la rekomenda letero kaj jen lia adreso.“

Seniluziigite prenis K. la leteron, kaj metis ĝin en sian poŝon. Eĉ en la plej favora kazo la avantaĝo, kiun la rekomendo povus porti al li, estis laŭ komparo multe pli malgranda ol la damaĝo, kiu ekestis, ĉar la fabrikisto sciis la proceson kaj, ke la pentristo disvastigis tion. Li preskaŭ ne povis devigi sin danki per kelkaj vortoj al la fabrikisto, kiu jam estis sur la vojo al la pordo. „Mi iros tien“, li diris, kiam li adiaŭis sin ĉe la pordo de la fabrikisto, „aŭ skribos al li, ĉar mi estas nun tre okupita, ke li venu foje al mia oficejo.“

„Mi ja sciis“, diris la fabrikisto, „ke vi trovos la plej bonan elirvojon. Tamen mi pensis, ke vi prefere evitus inviti en la bankon homon tian, kia estas Titorelli, por paroli ĉi tie kun li pri la proceso. Ankaŭ ne estas avantaĝe ĉiam doni leterojn manen al tiaj homoj. Sed vi certe ĉion trapensadis kaj scias, kion vi devas fari.“

K. kapjesis kaj akompanis ankoraŭ la fabrikiston tra la antaŭĉambro. Sed spite al ekstera trankvilo li estis tre terurigita pri si mem; ke li intencis skribi al Titorelli, li fakte diris ĝin nur por montri al la fabrikisto, ke li scias ŝati la rekomendon kaj tuj pripensos la eblon renkonti la pentriston. Sed, se li estus rigardinta la subtenon de Titorelli kiel ion valoran, li ankaŭ ne hezitus vere skribi al li. La danĝerojn, kiujn tio povus sekvigi, li ekkonis nur per la unua rimarko de la fabrikisto. Ĉu li vere jam tiom malmulte povas fidi al sia propra menso? Se eblas, ke li invitas dubindan homon per klara letero en la bankon por peti konsilojn de li, nur per pordo disigita de la vicdirektoro, ĉu tiukaze ne eblas kaj eĉ tre verŝajnas, ke li pretervidos ankaŭ aliajn danĝerojn aŭ kuros en ilin? Ne ĉiam iu staros ĉe li por averti lin. Kaj ĝuste tiam, kiam li prezentu sin kun kolektitaj fortoj, devas leviĝi pri lia propra atentemo tiaj duboj ĝis tiam tute nekonataj al li! Ĉu tiaj malfacilaĵoj, kiujn li sentis ĝis tiam nur dum la plenumo de sia oficeja laboro, komenciĝos nun ankaŭ en la proceso? Sed nun li tute ne plu komprenis, kiel eblis, ke li volis skribi al Titorelli por inviti lin en la bankon.

Li ankoraŭ skuis la kapon, kiam la servisto paŝis apud lin kaj atentigis lin pri tri sinjoroj, kiuj sidis tie en la antaŭĉambro sur benko. Ili atendis jam delonge esti enlasataj al K. Nun, kiam la servisto parolis al K., ili ekstaris kaj ĉiu volis uzi favoran okazon, por proksimiĝi al K. antaŭ la aliaj. Ĉar estis tiel senrespekte flanke de la banko lasi ilin perdi tempon tie en la atendoĉambro, ankaŭ ili ne plu volis esti indulgaj.

„Sinjoro prokuristo“, diris jam unu el ili.

Sed K. jam ordonis alporti sian vintromantelon kaj diris, dum li vestis sin per ĝi helpe de la servisto, al la triopo: „Pardonu, sinjoroj miaj, mi bedaŭrinde momente ne havas tempon akcepti vin. Mi petegas pri pardono, sed mi devas plenumi gravan negocan viziton kaj devos tuj foiri. Vi ja ĉiuj vidis tion, kiom longe mi nun estis retenita. Ĉu vi povus esti tiel afablaj reveni morgaŭ aŭ kiam ajn? Aŭ, ĉu ni parolu pri la afero eble telefone? Aŭ ĉu vi koncize povus diri al mi pri kio temas kaj mi donos al vi poste detalan skriban respondon? Plej bone tamen estus, se vi revenus baldaŭ.“ Tiuj proponoj de K. mirigis la sinjorojn, kiu do tute senutile estu atendintaj tie tiel, ke ili rigardis

sin silente reciproke.

„Ni do interkonsentiĝis, ĉu?“ demandis K., kiu jam turnis sin al la servisto, kiu nun ankaŭ la ĉapelon portis al li. Tra la malfermita pordo de la ĉambro de K. oni vidis, kiel ekstere la neĝofalo plifortigis sin. K. tial faldis la mantelan kolumon supren kaj fermbutonumis ĝin sub la kolo.

Jen ĵus paŝis el la apuda ĉambro la vicdirektoro, rigardis ridete, kiel K. en la vintromantelo intertraktis kun la sinjoroj, kaj li demandis: „Vi nun foriros, sinjoro prokuristo, ĉu?“

„Jes“, diris K. kaj rektiĝis, „mi devos foriri pro negoca afero.“

Sed la vicdirektoro jam turnis sin al la sinjoroj. „Kaj la sinjoroj, ĉu?“ li demandis. „Mi pensas, ke ili jam atendas delonge.“

„Ni jam interkonsentiĝis“, diris K. Sed nun la sinjoroj ne plu reteneblis, ili encirkligis sinjoron K. kaj klarigis, ke ili ne estus atendintaj dum horoj, se la aferoj ne estus gravaj

kaj ne nun kaj eĉ detale kaj sekrete inter kvar okuloj estus priparolendaj. La vicdirektoro aŭskultis ilin dum certa tempo, rigardis ankaŭ sinjoron K., kiu tenis la ĉapelon permane kaj je certaj lokoj purigis ĝin de polvo, kaj diris poste: „Sinjoroj miaj, estas ja tre simpla elirvojo. Se vi estos kontentaj pri mi, mi volonte transprenos la intertraktojn anstataŭ la sinjoro prokuristo. Viaj aferoj kompreneble devos esti traktataj tuj. Ni estas negocistoj kiel vi kaj scias prijuĝi la tempon de negocistoj ĝuste. Ĉu vi bonvolas enpaŝi ĉi tien?“ Kaj li malfermis la pordon, kiu kondukis al la antaŭĉambro de lia oficejo.

Kiel bone la vicdirektoro kapablis alproprigi al si ĉion, pri kio K. pro kazo de bezono devis rezigni! Sed, ĉu K. pli rezignis ol nepre necesus? Dum li kuris kun necertaj kaj, kiel li devis koncedi al si mem, nedifinitaj kaj tre malgrandaj esperoj al nekonata pentristo, trafis lian reputacion en la banko damaĝo, kiu ne ripareblis. Estus verŝajne multe pli bone demeti la vintromantelon kaj almenaŭ regajni por si la du sinjorojn, kiuj apude ja tamen ankoraŭ devos atendi. K. eble estus provinta tion, se li ne vidus, kiel la vicdirektoro serĉas ion en lia ĉambro

ĉe la librobretaro de K., kvazaŭ ĝi estus la propra. Kiam K. ekscitite proksimiĝis al la pordo, la vicdirektoro vokis: „Aĥ, vi do ankoraŭ ne foriris!“ Li turnis al li sian vizaĝon, kies multaj streĉitaj sulkoj ŝajne ne pruvis grandan aĝon, sed forton, kaj li tuj denove komencis serĉi ion. „Mi serĉas kontraktokopion“, li diris, „kiu, kiel la reprezentanto de la firmao asertas, devas troviĝi ĉe vi. Ĉu vi ne volas helpi al mi?“ K. faris paŝon, sed la vicdirektoro diris: „Dankon, mi jam trovis ĝin“, kaj reiris kun granda kolekto de diversaj skribaĵoj, kiu entenis ne nur la kontraktokopion, sed certe ankaŭ multajn aliajn tekstojn, en sian ĉambron.“

„Nun mi ne estas sufiĉe forta por alfronti lin“, diris K. al si, „sed se miaj privataj malfacilaĵoj estos forigitaj, tiam li efektive estu la unua, kiu sentu tion, kaj ja kiel eble plej amarsenta.“ Tra tiu penso iom trankviligite, donis K. al la servisto, kiu jam delonge tenis por li malfermita la pordon al la koridoro, la komision, ke li ĉeokaze sciigu al la direktoro, ke li foriris pro negoca afero. Li forlasis, preskaŭ feliĉa pri tio povi okupiĝi dum certa tempo tute pri sia afero, la bankon. Li veturigis sin tuj al la pentristo,

kiu loĝis en iu antaŭurbo, kiu estis tute kontraŭa al tiu, en kiu troviĝas la juĝejaj kancelarioj. Estis ankoraŭ pli mizera regiono, la domoj ankoraŭ pli malhelaj, la stratetoj plenaj de koto, kiu sur la degelita neĝo lante drivadis. En la domo, en kiu vivis la pentristo, estis malfermita nur duono de la pordego, en la alian estis rompita sube en la muro breĉo, el kiu ĝuste elspruĉis, kiam K. proksimiĝis, naŭza, flava, fumanta likvaĵo, pro kiu kelkaj ratoj fuĝis en la proksiman kanalon. Sube ĉe la ŝtuparo kuŝis surventre infaneto sur la tero kaj ploris, sed oni apenaŭ aŭdis tion pro la bruo, kiu ĉion supersonis, ĝi venis de la alia pordoireja flanko el tubista metiejo. La pordo de la metiejo estis malfermita, tri helpantoj staris en duoncirklo ĉirkaŭ iu aĵo, sur kiun ili batadis per marteloj. Granda plato de stanita lado, kiu pendis je muro, ĵetis palan lumon, kiu enpenetris inter du helpantoj kaj heligis la vizaĝojn kaj laborajn antaŭtukojn. K. ĉion nur haste rigardis, li volis kiel eble plej rapide fini la aferon ĉi tie, nur la pentriston elesplori per kelkaj vortoj kaj tuj reiri en la bankon. Se li havos ĉi tie eĉ nur la plej etan sukceson, tio certe ankoraŭ havos bonan efikon al lia nuna laboro en la banko. En la tria etaĝo li devis

moderigi sian paŝadon, li estis tute senspira, kaj la ŝtupoj kaj la etaĝoj estis supermezure altaj, kaj la pentristo laŭdire loĝas tute supre en subtegmentejo. La aero estis sufokiga, ne ekzistis ŝtupara kortego, la malvasta ŝtuparo sur ambaŭ flankoj estis enfermita de muroj, en kiuj nur tie kaj tie kaj preskaŭ tute supre estis enmetitaj etaj fenestroj. Ĝuste kiam K. iom haltis, kuris kelkaj knabinoj el loĝejo kaj rapidis kun ridado sur la ŝtuparo supren.

K. lante sekvis ilin, li atingis el la aro knabinon, kiu estis stumblinta kaj postrestinta malantaŭ la aliaj, kaj dum ili unu apud la alia grimpis pli supren, li demandis ŝin: „Ĉu ĉi tie loĝas pentristo Titorelli?“ La knabino, apenaŭ dektrijara, kun ĝibeto, puŝis lin post tio per kubuto kaj rigardis de la flanko supren al li. Nek ŝia juneco nek ŝia korpa manko povis malhelpi, ke ŝi estis jam tute fimorala. Ŝi eĉ ne ridetis, sed serioze rigardis sinjoron K. akre kaj postuleme. K. kondutis, kvazaŭ li ne rimarkis ŝian fikonduton, kaj li demandis: „Ĉu vi konas la pentriston Titorelli?“

Ŝi kapjesis kaj demandis siaflanke: „Kion vi volas de li?“ Al K. ŝajnis avantaĝe, ankoraŭ rapide iom instruiĝi pri

Titorelli: „Mi volas, ke li portretu min“, li diris.

„Ĉu portreti?“ ŝi demandis kaj supermezure malfermis la buŝon, facile batante permane al K., kvazaŭ li estus dirinta ion eksterordinare surprizan aŭ nelertan, kaj ŝi levis per ambaŭ manoj sian jam sen tio tre mallongan jupeton kaj kuris, tiom rapide, kiom ŝi povis, post la aliaj knabinoj, kies kriado jam malbone komprenebla perdiĝis en la alto. Ĉe la sekva turno de la ŝtuparo K. jam denove renkontis ĉiujn knabinojn. La ĝibulino evidente informis ilin de la intenco de K. kaj ili atendis lin. Ili staris je ambaŭ flankoj de la ŝtuparo, premiĝis al la muro, por ke K. oportune trairu inter ili, kaj glatigis permane siajn antaŭtuketojn. Ĉiuj vizaĝoj, tiel kiel tiu spalirformado, formis miksaĵon el infaneco kaj fieco. Supre je la pinto de la knabinoj, kiuj sin nun post K. ridante kuniĝis, estis la ĝibulino, kiu transprenis la gvidadon. K. dankis al ŝi, ke li trovis tuj la ĝustan voĵon. Li ja volis rekte plu grimpi, sed ŝi montris al li, ke li devas elekti branĉon de la ŝtuparo por atingi sinjoron Titorelli. La ŝtuparo, kiu kondukis al li, estis eksterordinare malvasta, tre longa, sen kurbiĝo, laŭ la tuta longo transvidebla kaj supre senpere finita

antaŭ la pordo de Titorelli. Tiu pordo, rilate al la ŝtuparo relative hele prilumata per malgranda oblikve super ĝi enmetita supra lumfenestro, estis kunmetita el nefarbitaj bretoj, sur kiuj estis ruĝe pentrita la nomo Titorelli per larĝstria peniko. K. kun sia sekvantaro estis ankoraŭ apenaŭ en la mezo de la ŝtuparo, kiam supre, evidente instigita de la bruo el multaj paŝoj, la pordo estis iom malfermita kaj viro ŝajne vestita nur per noktoĉemizo, aperis en la malfermita pordospaceto. „Ho!“, li vokis, kiam li vidis alveni la aron, kaj malaperis. La ĝibulino manklakis pro ĝojo, kaj la ceteraj knabinoj urĝis post K. por peli lin pli rapide antaŭen.

Sed ili eĉ ankoraŭ ne alvenis supren, kiam la pentristo supre malfermŝiris la pordon tute kaj kun profunda kliniĝo invitis enpaŝi sinjoron K. Sed la knabinojn li male detenis, li volis enlasi eĉ ne iun el ili, kiom ajn forte ili petis lin kaj kiom ajn ili provis enpenetri, se do ne kun lia permeso, do almenaŭ kontraŭ lia volo. Nur la ĝibulino sukcesis tragliti sub lia etendita brako, sed la pentristo rapidege persekutis ŝin, kaptis ŝin ĉe la jupo, kirle turnis ŝin unufoje ĉirkaŭ si kaj demetis ŝin poste antaŭ la pordo

ĉe la aliaj knabinoj, kiuj, dum la pentristo forlasis sian gardpostenon, tamen ne kuraĝis paŝi trans la sojlon. K. ne sciis kiel li devas prijuĝi la tuton, ĝi ja ŝajnis kvazaŭ la tuto okazas kun afabla konkordo. La knabinoj ĉe la pordo unu post alia etendis la kolojn supren, vokis diversajn ŝercajn vortojn al la pentristo, kiujn K. ne komprenis, kaj ankaŭ la pentristo ridis, dum la ĝibulino en lia brakumo preskaŭ flugis. Poste li fermis la pordon, kliniĝis ankoraŭfoje al K. kaj etendis manon al li kaj diris, sin prezentante: „Artpentristo Titorelli“.

K. montris al la pordo, post kiu la knabinoj flustris, kaj diris: „Vi ŝajne estas tre ŝatata en la domo.“

„Aĥ, tiuj grimaculinoj!“ diris la pentristo kaj provis vane fermbutoni sian noktĉemizon ĉe la kolo. Cetere li estis nudapieda kaj nur krome vestita per larĝa, flaveca linopantalono, kiu estis fiksita per rimeno, kies longa finaĵo pendis libere kaj batadis tien kaj tien. „Tiuj grimaculinoj estas vera ŝarĝo por mi“, li daŭrigis, dum li finis manipuli la noktoĉemizon, kies lastan butonon li ĝuste forŝiris. Li alportis fotelon kaj devigis sidiĝi sinjoron K. „Iun el ili mi foje pentris – hodiaŭ ŝi eĉ ne

ĉeestas – kaj de tiam ili ĉiuj persekutas min. Kiam mi estas mem ĉi tie, ili envenas nur, se mi permesas tion, sed, kiam mi foje forestas, tiam estas ĉiam almenaŭ iu el ili ĉi tie. Ili farigis ŝlosilon de mia pordo, kiun ili pruntedonas inter si. Oni apenaŭ povas imagi, kiel molesta tio estas. Ekzemple mi iras hejmen kun damo, kiun mi pentru, mi malfermas la pordon per mia ŝlosilo kaj trovas ekzemple la ĝibulinon tie ĉe mia malgranda tablo, dum ŝi kolorigas per peniko siajn lipojn ruĝaj, dum ŝiaj malgrandaj fratinoj, kiujn ŝi devas kvazaŭ guverni, ĉirkaŭvagadas kaj malpurigas la ĉambron en ĉiuj anguloj. Aŭ mi revenas, kiel okazis al mi nur hieraŭ, malfrue vespere hejmen – pardonu al mi kun konsidero pri tio la staton kaj la malordon en mia ĉambro – do mi revenas malfrue vespere hejmen kaj volas enlitiĝi, jen io pinĉas gambon de mi, mi rigardas sub la liton kaj eltiras denove tian estaĵon. Kial ili tiom urĝas min, mi ne scias, ke mi ne provas logi ilin al mi, vi certe ĵus rimarkis. Kompreneble mi estas tiel ĝenata ankaŭ pri mia laboro. Se oni ne estus disponiginta tiun ĉi atelieron senkoste al mi, mi delonge estus transloĝinta.“

Ĝuste vokis malantaŭ la pordo voĉeto, delikate kaj timeme: „Titorelli, ĉu ni rajtas jam enveni?“

„Ne“, respondis la pentristo.

„Ankaŭ ne mi sole?“ iu demandis denove.“

„Ankaŭ ne vi“, diris la pentristo kaj iris al la pordo kaj fermriglis ĝin.

K. intertempe ĉirkaŭrigardis en la ĉambro, li neniam mem ekpensus, ke oni povus nomi tiun aĉan etan ĉambron ateliero. Pli ol du longajn paŝojn laŭlonge kaj transverse oni apenaŭ povis paŝi tie. Ĉio, la planko, la vandoj kaj la plafono estis el ligno, inter la traboj oni vidis malvastajn fendetojn. Transe de K. apud vando staris la lito, kiu estis tro ŝarĝita per diverskoloraj litaĵoj. En la mezo de la ĉambro sur stablo estis bildo kovrita de ĉemizo, kies manikoj svingopendis ĝis la planko. Malantaŭ K. estis la fenestro, tra kiu oni pro la nebulo apenaŭ povis vidi pli malproksime ol trans la neĝe kovritan tegmenton de la najbara domo.

La turnado de la ŝlosilo en la seruro memoris sinjoron K.

pri tio, ke li intencis baldaŭ foriri. Tial li tiris la leteron de la fabrikisto elpoŝe, transdonis ĝin al la pentristo kaj diris: „Tiu sinjoro, via konato, sciigis min pri vi, laŭ lia konsilo mi venis al vi.“

La pentristo supraĵe tralegis la leteron kaj ĵetis ĝin sur la liton. Se la fabrikisto ne estus parolinta tute definitive pri sia konatoTitorelli, pri povrulo, kiu dependas de almozoj, oni tiumomente efektive povis pensi, ke Titorelli ne konas la fabrikiston aŭ almenaŭ ne povas memori lin. Krome demandis nun la pentristo: „Ĉu vi volas aĉeti bildojn aŭ mem pentrigi vin?“ K. rigardis mirigite la pentriston. Kio fakte legeblas en la letero? K. rigardis kiel memkomprenebla, ke la fabrikisto informis la pentriston pri tio, ke K.celis informi sin pri nenio alia krom pri sia proceso. Li kuris tro rapide kaj tro senpripensite tien! Sed li devis nun iel respondi al la pentristo kaj diris kun rigardo al la stablo: „Vi ĝuste laboras je bildo, ĉu?“

„Jes“, diris la pentristo kaj ĵetis la ĉemizon, kiu pendis super la stablon, kiel la leteron, sur la liton. „Ĝi estas portreto. Sukcesa laboro, sed ankoraŭ ne preta tute.“

La hazardo favoris sinjoron K. paroli pri la juĝejo, la eblo paroli pri la juĝejo estis kvazaŭ ofertata al li, ĉar ĝi evidente estis la portreto de juĝisto. Cetere ĝi estis okulfrape simila al la bildo en la laborĉambro de la advokato. Kvankam temis ĉi tie pri tute alia juĝisto, jen dika viro kun nigra, tufa plena barbo, kiu flanke atingis supren ĝis la vangoj. Krome tiu bildo estis olepentraĵo, sed tiu ĉi estis malforte paŝtelkolore neklare metita. Sed ĉio cetera estis simila, ĉar ankaŭ ĉi tie la juĝisto ĝuste volis levi sin minace de sia tronseĝo, kies brakojn li firmtenis. Ke tio estas ja juĝisto, K. tuj intencis diri, sed provizore ankoraŭ retenis sin kaj proksimiĝis al la bildo, kvazaŭ li volus studi ties detalojn. Grandan figuron, kiu staris en la mezo de la dorsa apogilo de la tronfotelo, li ne povis klarigi al si kaj demandis la pentriston pri ĝi.

„Ĝi bezonos ankoraŭ iom da prilaboro“, respondis la pentristo, alportis de eta tablo paŝtelkrajonon kaj faris kelkajn streketojn ĉe la randoj de la figuro sen fari ĝin per tio pli konturita por K. „Tio estas la justeco“,diris fine la pentristo.

„Nun mi jam ekkonas ĝin“, diris K., „jen la bendo ĉirkaŭ

la okuloj kaj jen la pezilo. Sed ja estas flugiloj ĉe la kalkanoj kaj ĝi ja kuras, ĉu ne?“

„Jes“, diris la pentristo, „mi devis pentri ĝin tiel laŭ la komisio, fakte ĝi estas la Justeco kaj la Venkodiino kune.“

„Tio ne estas bona ligo“, diris K. ridetante, „la Justeco devas stari trankvile, alikaze ŝanceliĝas la pezilo“, diris K. kun rideto, kaj ne eblos justa juĝo.“

„Mi obeas pri tio mian komisiiston“, diris la pentristo.

„Jes, certe“, diris K., kiu neniun volis ofendi per sia rimarko. „Vi pentris la figuron tiel, kiel ĝi efektive staras sur la tronfotelo.“

„Ne“, diris la pentristo, „mi vidis nek la figuron nek la tronfotelon, ĉio ĉi estas eltrovaĵo, sed estis dirite al mi, kion mi devas pentri.“

„Kiel?“ demandis K., li kondutis intence kvazaŭ li ne tute komprenas la pentriston. „Li ja estas juĝisto, kiu sidas sur la juĝista seĝo?“

„Jes“, diris la pentristo, „sed li ne estas alta juĝisto kaj neniam sidis sur tia tronfotelo.“

„Kaj tamen li pentrigas sin en tia solena sinteno, ĉu? Li sidas ja kiel juĝeja prezidanto“.

„Jes, vantaj estas la sinjoroj“, diris la pentristo. „Sed ili havas ja la permeson de pli alta instanco sin pentrigi tiel. Al ĉiu estas precize preskribita, kiel li rajtas pentrigi sin. Bedaŭrinde ĝuste laŭ tiu bildo oni ne povas prijuĝi la detalojn de la juĝista vesto kaj de la sidilo, la paŝtelaj koloroj por tiaj prezentoj ne taŭgas.“

„Jes“, diris K., „estas strange, ke ĝi estas pentrita paŝtelkolore.“

„La juĝisto deziras ĝin tiel“, diris la pentristo, „ĝi estas farita por damo.“ La vidaĵo de la bildo ŝajne instigis lian laboremon, li ruligis la manikojn supren, manprenis kelkajn krajonojn, kaj K. observis, kiel sub la zigzagantaj pintoj de la krajonoj poste formiĝis kape de la juĝisto ruĝeca ombro, kiu aŭreole al la rando de la bildo foriĝis. Iom post iom la ludo de tiu ombro ĉirkaŭis la kapon kiel

ornamo aŭ alta distingo. Sed ĉirkaŭ la figuro de la justeco regis plu helo, escepte de apenaŭ rimarkebla nuanco. En tiu heleco la figuro ŝajne precipe ŝoviĝis antaŭen, ĝi apenaŭ plu memoris pri la diino de la justeco, sed ankaŭ ne pri tiu de la venko, ĝi nun kontraŭe aspektis tute kiel la diino de la ĉaso. La laboraĵo de la pentristo altiris sinjoron K. pli ol li volis; sed fine li tamen riproĉis sin, ke li estis jam tiom longe ĉi tie kaj esence ankoraŭ nenion faris por la propra afero. „Kiel nomiĝas tiu juĝisto?“ li demandis subite.

„Tion mi ne rajtas diri“, respondis la pentristo, li jam kliniĝis profunde sur la bildon kaj evidente neglektis sian gaston, kiun li ja ĝuste ankoraŭ tiom respektoplene akceptis. K. trovis lin kaprica kaj ĉagreniĝis pri tio, ĉar li perdis tiel tempon. „Ĉu vi eble estas konfidindulo de la juĝeĵo?“ li demandis. Tuj la pentristo metis la krajonojn flanken, frotigis reciproke siajn fingrojn kaj ridetis al K. „Nu, tuj rekte parolu la veron“, li diris, „vi volas ekscii ion pri la juĝejo kiel ĝi ja ankaŭ legeblas en via rekomenda letero,kaj vi parolis unue pri miaj bildoj por gajni min. Sed mi ne ĉagreniĝas pri tio, vi ja ne povis scii, ke tio en

mia kazo estas vana. Ho, bonvolu!“ li diris akre rifuze, kiam K. volis obĵeti ion. Kaj li daŭrigis: „Cetere, vi tute pravas pri via rimarko, mi estas fidindulo de la juĝejo.“ Li paŭzetis, kvazaŭ li volus lasi tempon al K. akcepti tiun fakton. Oni aŭskultis tiumomente denove la knabinojn post la pordo. Ili urĝis sin verŝajne al la ŝlosiltruo, eble oni povus rigardi ankaŭ tra la fendetoj en la ĉambron. K. ne provis iel senkulpigi sin, ĉar li ne volis deturni lin, sed certe li ne volis, ke la pentristo tro orgojlos kaj tiel kvazaŭ fariĝos neatingebla, li demandis tial: „Ĉu tio estas oficiale agnoskata ofico?“

„Ne“, diris la pentristo mallonge, kvazaŭ per tio lia plia parolo estus sufokita. Sed K. ne volis, ke li eksilentu kaj diris: „Nu, ofte tiaj nerekonataj oficoj estas pli influaj ol la agnoskataj.“

„Ĝuste tiel estas en mia kazo“, diris la pentristo kaj kapjesis kun kuntirita frunto. „Mi parolis hieraŭ kun la fabrikisto pri via kazo, li demandis min, ĉu mi volas helpi al vi, kaj mi respondis, ke la viro ja foje povus viziti min, kaj nun mi ĝojas tiel baldaŭ vidi vin ĉi tie. La afero ŝajne ja tre afliktas vin, pri kio mi kompreneble tute ne miras.

Ĉu vi bonvolas unue demeti vian mantelon“ Kvankam K. intencis restadi tie nur tute mallongan tempon, la invito de la pentristo estis tamen tre bonvena al li. La aero en la ĉambro fariĝis iom post iom premanta al li, jam ofte li rigardis mirigite al malgranda, sendube ne hejtita fera forno en angulo, la sufokeco en la ĉambro estis neklarigebla. Dum li demetis la mantelon kaj ankoraŭ malfermbutonumis la ĵaketon, diris la pentristo, sin senkulpigante: „Mi bezonas varmon. Estas ĉi tie ja tre agrable, ĉu ne? La ĉambro tiurilate estas tre favore situanta.“

K. diris nenion pri tio, sed fakte ne estis la varmo, kiu malbonfartigis lin, sed multe pli la obtuza, la spiradon preskaŭ malhelpanta aero, la ĉambro verŝajne jam delonge ne estis aerumita. La malagrableco plifortiĝis por K. per tio, ke la pentristo ofertis al li sidiĝi sur la liton, dum li mem sidiĝis sur la solan sidlokon de la ĉambro antaŭ la stablo. Krome la pentristo ŝajne miskomprenis, kial K. restis nur ĉe la litorando, li petis, ke K. lokigu sin oportune, kaj li iris, kiam K. hezitis, mem al li kaj urĝis lin profunde sur la litaĵojn kaj la remburaĵon. Poste li reiris

al sia fotelo kaj metis fine la unuan seriozan demandon, kiu forgesigis al K. ĉion alian. „Ĉu vi estas senkulpa?“ li demandis.

„Jes“, diris K. La respondado de tiu demando fakte ĝojigis lin, speciale tial, ĉar ĝi okazis fronte de privata persono, do sen ĉiu respondeco. Ankoraŭ neniu demandis lin tiel rekte. Por elgustumi tiun ĝojon li ankoraŭ aldonis: „Mi estas tute senkulpa.“

„Tiel do“, diris la pentristo, klinis la kapon kaj ŝajne ekpensis. Subite li levis la kapon kaj diris: „Se vi estas senkulpa, tiukaze la afero estas ja tre simpla.“ La rigardo de K. seniluziiĝis, tiu laŭdira fidindulo de la juĝejo parolas kiel nescianta infano. „Mia senkulpeco ne simpligas la aferon“, diris K. Li devis rideti spite al ĉio ĉi, kaj li lante kapneis. Ĝi dependas de multaj detaletoj, en kiuj perdiĝas la juĝejo. Sed fine ĝi konkludas el io, kie origine estis tute nenio, grandan kulpon.“

„Jes ja, certe“ diris la pentristo, kvazaŭ K. nenecese ĝenas lian pensadon. „Sed vi estas ja senkulpa, ĉu?“

„Nu jes“, diris K.

„Tio estas la ĉefa afero“, diris la pentristo. Li ne estis influebla per kontraŭargumentoj, nur ne estis tute klare spite al ties deciditeco, ĉu li pro konvinko aŭ nur pro enuo parolas tiel. K. unue volis konstati tion kaj diris tial: „Vi konas ja la juĝejon certe multe pli bone ol mi, mi ne scias multe pli ol tio, kion mi aŭdis pri tio, cetere de tute diversaj personoj. Pri tio ĉiuj unuecas, ke petolaj akuzoj ne okazadas, kaj ke la juĝejo, se ĝi foje akuzas iun, estas firme konvinkita pri la kulpo de la akuzito kaj nur malfacile deturneblas de tiu konvinko.“

„Malfacile, ĉu?“ demandis la pentristo kaj kvazaŭ ĵetis manon alten. „Neniam la juĝejo deturneblas de ĝi. Se mi pentrus ĉi tie ĉiujn jugistojn apude sur unu tolaĵo kaj vi defendus vin antaŭ tiu tolaĵo, vi pli sukcesus ol antaŭ tiu efektiva juĝejo.“

„Jes“, diris K. por si mem kaj forgesis, ke li volis nur elespori la pentriston.

Denove knabino komencis demandi post la pordo: „Titorelli, ĉu li baldaŭ foriros, ĉu ne?“

„Silentu!“ vokis la pentristo al la pordo, „ĉu vi ne vidas, ke mi interparolas kun la sinjoro?“ Sed la knabino per tio ne kontentiĝis, sed demandis: „Ĉu vi pentros lin?“ Kaj kiam la pentristo ne respondis, ŝi diris ankoraŭ: „Bonvolu ne pentri lin, tian malbelan homon.“ Pelmelo de nekompreneblaj konsentaj vokoj sekvis. La pentristo saltis al la pordo, malfermis ĝin iomete – oni vidis la petante falditajn manojn de la knabinoj – kaj diris: „Se vi ne kvietos, mi ĵetos vin sur la ŝtuparo malsupren. Sidiĝu ĉi tie sur la ŝtupojn kaj kondutu trankvile.“ Verŝajne ili ne obeis tuj, tiel, ke li devis komandi: „Ek, sur la ŝtupojn!“ Nur poste ekestis kvieto.

„Pardonu“, diris la pentristo, kiam li revenis al K. Sinjoro K. apenaŭ turniĝis al la pordo, li tute translasis tion al la pentristo, ĉu kaj kiel li protektos lin. Li ankaŭ nun apenaŭ moviĝis, kiam la pentristo kliniĝis al li por ke oni ne aŭdu lin ekstere kaj flustris al li orelen: „Ankaŭ tiuj knabinoj apartenas al la juĝejo.“

„Kiel?“ demandis K., deflankigis la kapon kaj rigardis la pentriston. Sed tiu sidiĝis denove sur sian fotelon kaj diris duone ŝerce, duone klarige: „Apartenas ja ĉio al la juĝejo.“

„Tion mi ankoraŭ ne rimarkis“, diris K. koncize, la ĝenerala rimarko de la pentristo prenis de la sciigo pri la knabinoj ĉion trankviligan. Tamen K. rigardis dum certa tempo al la pordo, malantaŭ kiu la knabinoj nun sidis kviete sur la ŝtupoj. Nur unu el ili estis ŝovinta pajlotigon tra fendeto inter la traboj kaj kondukis ĝin lante supren kaj malsupren.

„Vi ŝajne ankoraŭ ne havas superrigardon pri la juĝejo“, diris la pentristo, li vaste estis etendinta la gambojn kaj klakis nur per la piedpintoj sur la plankon. „Sed tial, ĉar vi estas senkulpa, vi ankaŭ ne bezonos la superrigardon. Sole mi tiros vin el tio.“

„Kiel vi volas fari tion?“ demandis K. „Ĉar vi antaŭ mallonga tempo mem diris, ke la juĝejo tute ne estas alirebla por pruvkaŭzoj.“

„Nealirebla por pruvkazoj, kiujn oni prezentas antaŭ la tribunalo“, diris la pentristo kaj levis montrofingron, kvazaŭ K. delikatan diferencon ne rimarkis.

„Sed alie la afero statas, se oni provas tiurilate ion malantaŭ la publika tribunalo, do en la interkonsiliĝaj ĉambroj, en la koridoroj aŭ ekzemple ankaŭ ĉi tie, en la ateliero.“ Kion diris la pentristo nun, jam ŝajnis ne plu tiom nekredebla al K., ĝi male montris grandan akordon kun tio, kion K. aŭdis ankaŭ de aliaj homoj. Ja, ĝi estis eĉ tre esperiga. Ĉu la juĝistoj per personaj rilatoj efektive estas tiel facile gvideblaj, kiel la advokato rakontis tion? Tiukaze estus la rilatoj de la pentristo kun la vantaj juĝistoj precipe gravaj, kaj ĉiukaze neniel subtakseblaj. Tiukaze la pentristo tre bone enviciĝus en la rondon de helpantoj, kiujn K. iom post iom kolektiĝis ĉirkaŭ si. Oni iam laŭdis en la banko lian organizotalenton, nun, kiam li estis tute reĵetita al si mem, montriĝis bona okazo elprovi ĝin ĝis la ekstremo. La pentristo observis la efikon, kiun faris lia klarigo al K., kaj diris poste kun certa timemo: „Ĉu tio ne frapas vian atenton, ke mi parolas preskaŭ kiel juristo? Jen la seninterrompa kontakto al la sinjoroj de la

juĝejo, kiu tiom influas min. Mi kompreneble havas multe da gajno el tio, sed la artista svingo parte perdiĝas pro tio.“

„Kiel vi unuafoje kontaktiĝis kun la juĝistoj?“ demandis K., li volis unue gajni la konfidon de la pentristo antaŭ ol li kvazaŭ ekuzus ties servojn.

„Tio estis tre simpla“, diris la pentristo, „mi heredis tiun pozicion. Jam mia patro estis juĝeja pentristo. Tio estas pozicio, kiu ĉiam herediĝas. Por tio oni ne celas uzi novajn homojn. Por la pentrado de la diversaj oficistaj gradoj fakte estas metitaj tiom da diversaj, multoblaj kaj antaŭ ĉio sekretaj reguloj, ke ili tute ne konatiĝas ekstere de difinitaj familoj. Tie en la tirkesto mi havas ekzemple la notojn de mia patro, kiujn mi montras al neniu. Sed nur tiu, kiu scias ilin, estas kapabla pentri juĝistojn. Sed eĉ, se mi perdus ilin, restus al mi ankoraŭ tiom da reguloj, kiujn mi portas sole enkape, ke neniu povus kontesti mian pozicion. Ĉiu juĝisto volas esti desegnita tiel kiel la malnovaj, grandaj juĝistoj estis pentritaj, kaj tion povas fari nur mi.“

„Tio estas enviinda“, diris K., kiu pensis pri sia ofico en la banko.

„Via pozicio do estas neskuebla, ĉu?“

„Jes, neskuebla“, diris la pentristo kaj levis fiere la ŝultrojn. „Tial mi ankaŭ povas kuraĝi ĉeokaze helpi al kompatinda viro, kiu havas proceson.“

„Kaj kiel vi faras tion?“ demandis K., kvazaŭ tiu ne estus li, kiun la pentristo ĵus nomis kompatinda viro. Sed la pentristo ne lasis deflankigi sin, sed diris: „En via kazo, ĉar vi estas tute senkulpa, mi ekzemple entreprenus la sekvan.“

La ripetita mencio de lia senkulpo jam fariĝis molesta al K. Al li ŝajnis de tempo al tempo kvazaŭ la pentristo per tiaj rimarkoj faras favoran eliron el tiu proceso antaŭkondiĉo de sia helpo, kiu per tio kompreneble kunfalus per si mem. Spite al tiu dubo K. tamen devigis sin kaj ne interrrompis la pentriston. Li ne volis rezigni pri la helpo de la pentristo, pri tio li decidiĝis, krome tiu helpo ŝajnis al li neniel pli dubinda ol tiu de la advokato.

K. eĉ tre preferis ĝin al tiu, ĉar ĝi estis ofertita pli intuicie kaj pli malkaŝe.

La pentristo tiris sian fotelon pli proksime al la lito kaj daŭrigis paroli kun retenita voĉo: „Mi forgesis demandi vin unue, kian liberigon vi deziras. Estas tri ebloj, do la efektiva liberigo, la laŭŝajna liberigo kaj la proceshezitigo. La efektiva liberigo estas kompreneble la plej bona, sed mi ne havas eĉ la plej etan influon pri tia speco de solvo. Laŭ mia opinio ekzistas tute neniu unuopa persono, kiu havas influon pri la efektiva liberigo. En tiu kazo decidas verŝajne nur la senkulpo de la akuzito. Ĉar vi estas senkulpa, efektive eblus, ke vi fidu eksplicite nur pri via senkulpo. Tiukaze vi bezonos nek min nek iun alian helpon.“

Tiu ordigita klarigo komence unue perpleksigis sinjoron K., sed poste li diris same tiel mallaŭte kiel la pentristo: „Mi pensas, ke vi kontraŭdiras vin.“

„Kaj kiel do?“ demandis senpacience la pentristo kaj ridetante apogis sin malantaŭen. Tiu rideto vekis en K. la senton, kvazaŭ li nun komencus malkovri kontraŭdirojn

ne en la vortoj de la pentristo, sed en la proceduro de la proceso mem. Tamen li ne retroevitis kaj diris: „Pli frue vi rimarkis, ke la juĝejo por pruvoj ne estas alirebla, pli poste vi limigis tion je la publika tribunalo, kaj nun vi diris eĉ, ke la senkulpulo antaŭ la tribunalo ne bezonas helpon. Tio estas jam kontraŭdiro. Sed krome vi diris pli frue, ke oni povas influi la jugistojn kiel personojn, sed nun vi kontestas, ke la efektiva liberigo, kiel vi nomas tion, kiam ajn atingeblas per persona influo de juĝisto. Jen la dua kontraŭdiro.“

„Tiuj kontraŭdiroj facile klarigeblas“, diris la pentristo. „La parolo temas tiurilate pri du diversaj aferoj, pri tio, kio legeblas en la leĝo, kaj pri tio, kion mi spertis persone, tion vi ne rajtas interŝanĝi erare. En la leĝo, sed mi ne legis tion, legeblas kompreneble, ke la senkulpulo estu liberigata, sed ne legeblas tie, ke la juĝisto estas influebla. Sed mi spertis ĝuste la malon pri tio. Mi ne scias ion pri efektiva liberigo, sed certe pri multaj influoj. Kompreneble eblas, ke en ĉiuj kazoj konataj al mi, neniu senkulpo ekzistis. Sed ĉu tio ne estas neverŝajna? En tiom da kazoj eĉ ne unu senkulpulo, ĉu? Jam kiel infano mi

aŭskultis tre atente mian patron, kiam li parolis hejme pri procesoj, ankaŭ la juĝistoj, kiuj frekventis lin en ties ateliero, rakontis pri la juĝejo, en niaj rondoj oni parolas ja eĉ pri nenio alia; tuj, kiam mi ricevis la eblon iri mem al la juĝejo, mi ĉiam uzis la okazojn, sennombreble multajn procesojn mi aŭskultis en gravaj stadioj kaj, dum tio, kiam ili estis videblaj, observis, kaj – mi devas koncedi tion – eĉ ne unu efektivan liberigon mi travivis."

„Do, eĉ ne ununuran malkondamnon", diris K. tiel, kvazaŭ li parolus al si mem kaj al siaj esperoj. „Nu, tio konfirmas pri la juĝejo tion, kion mi jam opinias pri ĝi. Ĝi do ankaŭ de tiu flanko estas sensenca. Ununura ekzekutisto povus anstataŭi la tutan juĝejon."

„Vi ne ĝeneraligu", diris la pentristo malkontente, „mi parolis ja nur pri miaj spertoj."

„Tio ja sufiĉas", diris K. „Aŭ ĉu vi aŭdis pri malkondamnoj el pli fruaj tempoj?"

„Tiaj malkondamnoj", respondis la pentristo, „laŭdire efektive okazis. Estas nur tre malfacile konstati tion. La

finaj decidoj de la tribunalo ne estas publikataj, ili eĉ ne alireblas por la juĝistoj, sekve pri malnovaj juĝejaj kazoj konserviĝis nur legendoj. Tiuj eĉ plimulte entenas efektivajn liberigojn, oni povas fidi pri tio, sed pruveblaj ili ne estas. Tamen oni ne neglektu ilin tute, parton de vero ili entenas ja certe. Krome ili estas tre belaj, mi mem pentris kelkajn bildojn, kiuj enhavas tiajn legendojn.“

„Nur legendoj ne ŝanĝas mian opinion“, diris K., helpe de tiuj legendoj oni certe ne povas defendi sin antaŭ la tribunalo.“

La pentristo ridis. „Ne, tion oni ne povas“, li diris.

„Tiukaze do estas sensence paroli pri tio“, diris K. Li volis provizore akcepti ĉiujn opiniojn de la pentristo, eĉ, se li konsideris ilin malverŝajnaj kaj ili kontraŭdiris al aliaj raportoj. Li tiumomente ne havis la tempon, kontroli ĉion, kion diris la pentristo, ĉu ĝi veras ĉu ne, aŭ eĉ rifuti tion, la plej ebla estus jam atingita, se li povus decidigi la pentriston iel helpi al li, eĉ se nur en nedecida maniero. Tial li diris: „Ni do preteriru la efektivan liberigon, sed vi ankoraŭ menciis du aliajn eblojn.“

„La laŭŝajnan liberigon kaj la proceshezitigon. Sole pri tiuj povas temi“, diris la pentristo.

„Sed, ĉu vi ne volas, antaŭ ol ni parolos pri tio, demeti vian ĵaketon?“ Estas certe tro varme por vi.“

„Jes“, diris K., kiu ĝis tiam atentis pri nenio alia ol pri tio, kion diris la pentristo, sed kiu nun, ĵus memorigita pri la varmego, forte ekŝvitis sur la frunto.

„Estas preskaŭ neelteneble.“ La pentristo kapjesis, kvazaŭ li tute komprenus la malbonfarton de K.

„Ĉu oni ne povus malfermi la fenestron?“ demandis K.

„Ne“, diris la pentristo, „ĝi estas nur firme enmetita vitrotabulo, oni ne povas malfermi ĝin.“ Nun K. ekkonis, ke li dum la tuta tempo esperis, ke la pentristo aŭ li iros subite al la fenestro kaj malfermŝiros ĝin. Li estis antaŭpreparita enspiri eĉ la nebulon kun malfermita buŝo. La sento, ke li tie estis tute barita de la aero, kaŭzis kapturnojn en li. Li softe batis permane sur la litkovrilon apud si kaj diris kun malforta voĉo: „Tio estas ja maloportuna kaj malsaniga.“

„Ho,ne“, diris la pentristo, defendante sian fenestron, „tial, ĉar ĝi ne malfermigeblas, ĉi tie la aero, kvankam estas nur simpla vitrotabulo, estas pli bone retenata ol per duobla fenestro. Sed, se mi volas aerumi, kio ne tre necesas, ĉar tra ĉiuj bretofendoj enpenetras ĉie aero, mi povas malfermi unu el miaj pordoj aŭ eĉ ambaŭ pordojn.“

K., per tiu klarigo iom konsolite, ĉirkaŭrigardis por trovi la duan pordon. La pentristo rimarkis tion kaj diris: „Ĝi estas malantaŭ vi, mi devis meti la liton antaŭ ĝin.“

Nur nun K. vidis la pordeton en la vando. „Estas ja ĉi tie ĉio tro malgranda por ateliero“, diris la pentristo, kvazaŭ li volus rifuzi riproĉon de K. jam antaŭe. „Mi devis aranĝi ĉion ĉi tie tiel bone, kiel eblas. La lito antaŭ la pordo staras kompreneble sur tre malbona loko. La juĝisto, por ekzemplo, tiu, kiun mi ĵus pentras, envenas ĉiam tra la pordo ĉe la lito, kaj mi donis la pordoŝlosilon al li, por ke li povu atendi min en la ateliero ankaŭ tiukaze, se mi ne estas hejme. Sed kutime li venas frumatene, dum mi ankoraŭ dormas. Tio kompreneble ŝiras min el la plej profunda dormo, se apud la lito malfermiĝas la pordo. Vi perdus ĉiun respekton pri la juĝistoj, se vi aŭdus la

sakrojn, per kiuj mi akceptas lin, kiam li matene grimpas trans mian liton. Mi certe povus forpreni la ŝlosilon de li, sed tiel ĝi fariĝus nur des pli ĉagrenige. Oni povas rompi ĉi tie kun la plej eta peno ĉiujn pordojn el la hinĝoj.“

Dum tiu tuta parolo K. pripensis, ĉu li demetu la ĵaketon, sed li fine konvinkiĝis, ke tiukaze, se li ne faros tion, li ne kapablus restadi pli longe ĉi tie, tial li demetis la mantelon sur genuon, por povi revesti sin per ĝi, kiam la interparolado estos finita. Apenaŭ li demetis la mantelon, vokis iu el la knabinoj: „Li jam demetis la mantelon!“ kaj oni aŭdis, kiel ĉiuj premiĝis al la fendetoj por vidi la scenaron mem.

„La knabinoj ja supozas, ke mi pentros vin. Kaj, ke vi tial senvestas vin.“

„Tiel do“, diris K., nur malmulte gajigita, ĉar li ne sentis sin multe pli bone ol pli frue, kvankam li nun sidis en ĉemizo tie. Preskaŭ grumble li demandis: „Kiel nomiĝis la du aliaj ebloj?“ Li jam denove forgesis la esprimojn.

„La laŭŝajna liberigo kaj la procesa hezitigo“, diris la

pentristo. „Estas afero via, kiun vi elektos. Ambaŭ aferoj per mia helpo atingeblos, kompreneble ne sen peno, la diferenco tiurilate estas, ke la laŭŝajna liberigo postulas certatempan koncentriĝon, sed ke la hezitigo postulas multe malpli da peno, sed tamen daŭrantan. Unue do la laŭŝajna liberigo. Se vi deziras tiun, mi skribos sur paperfolion konfirmon de via senkulpo. La teksto de tia konfirmo estas heredaĵo de mia patro kaj tute ne atakebla. Kun tia konfirmo mi rondiros nun al la juĝistoj konataj al mi. Mi do komencos per tio, ke mi antaŭmetos al la juĝisto, kiun mi pentros aktuale, hodiaŭ vespere dum la kunsido la konfirmon, mi klarigos al li, ke vi estas senkulpa, kaj mi garantios vian senkulpon. Sed tio ne estas nur supraĵa, sed efektiva deviga garantiaĵo.“ En la rigardoj de la pentristo videblis riproĉo, ke K. volas ŝarĝi lin per tia garantio.

„Tio estus ja tre afabla“, diris K.“ „Kaj la juĝisto fidus al vi kaj tamen ne enliberigus min, ĉu?“

„Kiel mi jam diris“, respondis la pentristo. „Cetere tio certe ne estas sekurigita, ke ĉiu fidos al mi, kelkaj juĝistoj por ekzemplo postulos, ke mi kondukos vin mem al li.

Tiukaze vi do devus unufoje kunveni. Tamen en tia kazo la afero estas jam gajnita je duono, speciale tial, ĉar en tiu kazo mi kompreneble antaŭe detale instruus vin, kiel vi devos konduti ĉe la koncernata juĝisto. Pli terure estas ĉe juĝistoj, kiuj min – ankaŭ tio okazos – jam antaŭe rifuzos. Pri tiuj ni devos rezigni, kvankam mi certe plurfoje provos konvinki ilin, sed ni estas ankaŭ rajtigitaj pri tio, ĉar unuopaj juĝistoj en tiu kazo ne povos esti decidaj. Se mi tiam havos sur tiu konfirmo sufiĉan kvanton da subskriboj de la juĝistoj, mi iros kun tiu konfirmo al tiu jugisto, kiu aktuale gvidos vian proceson. Eble mi ricevos ankaŭ lian subskribon, tiukaze evoluiĝos ĉio ankoraŭ iom pli rapide ol alikaze. Ĝenerale tiukaze tute ne plu estos multaj malhelpaĵoj, tiam estos por la akuzito la tempo de la plej granda optimismo. Estas strange, sed vere, la homoj en tiu tempo estas pli optimismaj ol post la liberigo. Granda peno tiam ne plu necesos. La juĝisto posedas pere de la konfirmo la garantiaĵon de konsiderinda kvanto da juĝistoj kaj tial senaflikte povos liberigi vin, sed tamen nur post plenumo de diversaj formalaĵoj, kaj sendube li tiukaze faros tion plaĉe al mi kaj al aliaj konatoj. Vi do rajtos elpaŝi de la

juĝejo kaj estos libera.“

„Tiukaze mi do estos libera“, diris K. heziteme.

„Jes, sed nur laŭŝajne“, diris la pentristo, „aŭ pli bone dirate dum certa tempo libera. La plej subrangaj juĝistoj, al kiuj apartenas miaj konatoj, ne havas la rajton, por diri tion tiel, tute liberigi iun, tiun rajton havas nur la plej supra, por vi, por mi kaj por ni ĉiuj tute neatingebla juĝistaro. Kiel la afero ĉe ili statas, ni ne scias, kaj cetere ni ankaŭ ne volas scii. La grandan rajton liberigi de la akuzo ne havas do niaj juĝistoj, sed certe ili havas la rajton deigi iun de akuzo. Tio estas, se vi estos tiel liberigita, vi estos dum certa tempo deigita de la akuzo, sed ĝi ŝvebos plu super vi kaj povos, tuj, se venos la pli supra ordono, ekefiki. Ĉar mi havas tre bonajn kontaktojn al la juĝejo, mi povas diri al vi ankaŭ, kiel montriĝas tute oficiale la diferencoj de la efektiva kaj la laŭŝajna liberigoj en la regularoj por la juĝejaj kancelieroj. Ĉe efektiva liberigo la procesaktujoj estu tute formetitaj, ili foriĝos tute el la procedo, ne nur la akuzo, eĉ la proceso kaj eĉ la liberiga skribo estos neniigitaj, ĉio estos neniigita. Alie statas la afero ĉe laŭŝajna liberigo. La dokumentoj kvazaŭ

ne ŝanĝiĝas, okazis fakte aldone nur tio, ke la dokumentoj estas plivastigitaj per la konfirmo de la senkulpo, pri la liberigo kaj pri la kaŭzigo de la liberigo. Sed cetere la dokumentoj restos en la proceduro, ili estos, kiel postulas tion la seninterrompita interŝanĝo de la juĝejaj kancelarioj, plu senditaj al la pli altaj instancoj, ili revenos de tie al la pli malsupraj kaj pendolas tiel kun pli-malpli grandaj svingoj, kun pli-malpli grandaj interrompiĝoj supren kaj malsupren. Tiuj vojoj estas nekalkuleblaj. De ekstere rigardate povas ekesti ĉeokaze la impreso, ke ĉio delonge estas forgesita, la dokumentoj perditaj kaj la liberigo perfekta. Iniciito ne fidos tion. Ne perdiĝas dokumentoj, ne estas forgesado fare de la juĝejo. Iutage – neniu atendis tion – iu juĝisto pli atenteme reprenos la dokumentojn manen, li ekkonos, ke en tiu kazo la akuzo ankoraŭ estas aktiva, kaj ordonos tuj la arestigon. Mi supozis en tiu ĉi kazo, ke inter la ŝajna liberigo kaj la nova arestigo pasos longa tempo, tio eblas, kaj mi scias ion pri tiaj kazoj, sed same tiel bone eblas, ke la liberigito venos al hejme de la juĝejo kaj tie jam atendas komisiitoj por denove aresti lin. Tiam kompreneble la libera vivo estos finita.“

„Kaj la proceso komenciĝos denove, ĉu?“ demandis K., preskaŭ senfide.

„Certe“, diris la pentristo“, „la proceso komenciĝos denove, sed denove ekzistos la eblo, tiel, kiel pli frue, atingi laŭŝajnan liberigon. Denove oni kolektu ĉiujn fortojn kaj ne rezignu.“ La plej lastan la pentristo eble diris pro la impreso, kiun K. faris al li, ĉar li kvazaŭ estis iom kunfalinta.

K. demandis, ĉar li volis esti pli rapida ol iuj malkaŝoj de la pentristo: „Sed ĉu la atingo de dua liberigo ne estos pli komplika ol la unua?“

„En tiu rilato oni ne povas diri ion certan“, respondis la pentristo. „Ĉu vi eble opinias, ke la juĝistoj de la dua arestigo estas influataj rilate al sia juĝo, malfavore por la akuzito? Tio ne okazas. La juĝistoj ja jam dum la liberigo celis tiun arestigon. Tiu cirkonstanco do apenaŭ efikas. Sed certe pro multaj aliaj kaŭzoj la sinteno de la juĝistoj, tiel kiel ilia jura prijuĝo de la kazo povas ŝanĝiĝi, kaj la penado pri la dua liberigo tial devas adaptiĝi al la ŝanĝitaj cirkonstancoj. Kaj ĝenerale ili devas esti tiel fortaj kiel

antaŭ la unua liberigo.“

„Sed tiu dua liberigo estos ja denove ne efektiva“, diris K. kaj rifuze kapneis.

„Kompreneble ne“, diris la pentristo. „Al la dua liberigo sekvos la tria arestigo, al la tria liberigo, la kvara arestigo kaj tiel plu. Tio jam estas en la nocio de laŭŝajna liberigo.“

K. silentis.

„La laŭŝajna liberigo evidente ne ŝajnas avantaĝa al vi“, diris la pentristo, „eble la proceshezitigo pli konvenas al vi. Ĉu mi klarigu al vi la esencon de la hezitigo?“ K. kapjesis. La pentristo larĝe apogis sin malantaŭen en sia fotelo, lia noktoĉemizo estis vaste malfermita, li sub ĝin ŝovis manon, per kiu li karesis sian bruston kaj la flankojn.

„La proceshezitigo“, diris la pentristo kaj rigardis dum momento antaŭ sin mem, kvazaŭ li serĉus tute trafantan klarigon, „la hezitigo ekestas per tio, ke la proceso ĉiam estas konservata en la plej malsupra procesa stadio. Por atingi tion necesas, ke la akuzito kaj la helpanto, sed

precipe la helpanto, restu en seninterrompa persona rilato al la juĝejo. Mi ripetas, ke en tiu kazo ne necesas tiom forta streĉo, kiom ĉe la atingo de laŭŝajna liberigo, sed certe necesas multe pli granda atentemo. Oni ne rajtas perdi la proceson el la okuloj, oni devas frekventi la koncernatan juĝiston dum regulaj interspacoj kaj viziti je precipaj okazoj kaj je ĉiu maniero provi teni lin afabla al si mem; se oni ne estas persone konata al la juĝisto, oni devas influigi lin per konataj juĝistoj, sen dum tio rezigni pri la senperaj interparoloj. Se oni preteriras en tiu rilato nenion, oni povas supozi kun sufiĉe da certo, ke la proceso ne progresos trans sian unuan stadion. La proceso ja ne finiĝos per tio, sed la akuzito estas kontraŭ verdikto preskaŭ same tiel bone sekurigita kiel en tiu kazo, se li estus libera. Kontraŭe al la laŭŝajna liberigo havas la hezitigo la avantaĝon, ke la estonteco de la akuzito estas malpli necerta, li restas konservata kontraŭ la teruro de subitaj arestoj kaj ne devas timi, ĝuste en tempoj, kiam liaj ceteraj cirkonstancoj por tio estas malplej favoraj devi ŝarĝi sin per la streĉoj kaj ekscitiĝoj, kiuj estas ligitaj al la laŭŝajna liberigo. Sed ankaŭ la proceshezitigo por la akuzito havas certajn

malavantaĝojn, kiujn oni ne subtaksu. Mi pensas ĉe tio ne pri tio, ke la akuzito neniam estas libera, tio laŭ la fakta signifo li ja ankaŭ ne estas ĉe la laŭŝajna liberigo. Temas pri alia malavantaĝo. La proceso ne povas halti sen tio, ke ekzistas almenaŭ ŝajnaj kaŭzoj por tio. Tial en la proceso devas okazi io formala. De tempo al tempo necesas ordoni diversajn aferojn, la akuzito devas esti pridemandata, esploroj devas okazi kaj tiel plu. La proceso do seninterrompe devas esti turnata sur la malgranda cirklo, al kiu li estas limigita artifike. Tio kompreneble kaŭzas certajn malagrablaĵojn por la akuzito, kiujn vi tamen ne imagu tro teruraj. Estas ja ĉio nur formala, la pridemandadoj estas do ekzemple nur mallongaj, se oni foje ne havas tempon aŭ emon iri tien, oni rajtas senkulpigi sin, ĉe certaj juĝistoj oni rajtas eĉ fiksi la aranĝojn por longa tempospaco antaŭe. Temas esence nur pri tio, ke tial, ĉar oni estas akuzito, oni devas frekventi sian juĝiston de tempo al tempo.“ Jam dum la lastaj vortoj K. metis sian mantelon surbraken kaj ekstaris.

„Li jam ekstaras!“ vokis tuj iuj ekstere ĉe la pordo.

„Vi volas jam foriri, ĉu?“ demandis la pentristo, kiu ekstaris ankaŭ. „Estas certe la aero, kiu forpelas vin de ĉi tie. Tio estas tre embarasiga por mi. Mi ankoraŭ devus diri al vi tion kaj tion. Mi devis esprimi min tre koncize, sed mi esperas, ke mi esprimis min kompreneble.“

„Ho jes“, diris K., al kiu de la streĉo, per kiu li devigis sin aŭskulti, la kapo doloris. Spite al tiu konfirmo diris la pentristo, ĉion ankoraŭfoje resumante, kvazaŭ li volus konsoli sinjoron K. antaŭ ties hejmiro: „Ambaŭ metodoj havas la komunan, ke ili malhelpas verdikton al la akuzito.“

„Sed ili ankaŭ malhelpas la efektivan liberigon“, diris K. mallaŭte, kvazaŭ li hontis ekkoni tion. „Vi komprenas la kernon de la afero“, rapide diris la pentristo.

K. mantuŝis sian vintromantelon, sed eĉ ne povis decidi sin surmeti la vestaĵon. Plej prefere li estus kunpakinta ĉion kaj estus kurinta al la freŝa aero. Ankaŭ la knabinoj lin ne povis instigi vesti sin, kvankam ili, tro frue, vokis unu la alian, ke li vestas sin. La pentristo havis intereson iel interpreti la humuron de K., li diris tial: „Vi ŝajne

ankoraŭ ne decidiĝis rilate al miaj proponoj. Mi konsentas pri tio. Mi eĉ konsilus al vi tuj decidiĝi. La avantaĝoj kaj malavantaĝoj estas preskaŭ je haro samgradaj. Oni devas prijuĝi ĉion tute precize. Sed oni ankaŭ ne perdu tro da tempo.“

„Mi revenos baldaŭ“, diris K., kiu subite decidis sin surmeti la ĵaketon kaj kiu ĵetis la mantelon transŝultren kaj rapidis al la pordo, malantaŭ kiu la knabinoj nun komencis krii. K. supozis vidi la knabinojn tra la pordo.

„Sed vi devos plenumi vian promeson“, diris la pentristo, kiu ne sekvis lin, „alikaze mi iros en la bankon por mem demandi pri vi.“

„Ja malfermu la pordon“, diris K. kaj tiregadis la klinkon, kiujn la knabinoj, kiel li rimarkis pro la kontraŭpremo, ekstere firmtenis. „Ĉu vi volas esti molestata de la knabinoj?“ demandis la pentristo. „Prefere uzu tiun elirejon“, kaj li montris al la pordo malantaŭ la lito. K. estis kontenta pri tio kaj retrosaltis al la lito. Sed anstataŭ tie malfermi la pordon, la pentristo rampis sub la liton kaj demandis de sube: „Nur momenton plu, ĉu vi ankoraŭ

volas vidi bildon, kiun mi povus vendi al vi?“

K. ne volis esti malĝentila, la pentristo efektive akceptis lin kaj promesis, ke li volas helpi al li plu, kaj ankaŭ pro la forgesemo de K. ankoraŭ ne estis parolite pri la pago por la helpo, kaj tial K. nun ne povis rifuzi lin kaj permesis montri al si la bildon, kvankam li tremis eliri pro nepacienco el la ateliero. La pentristo eltiris sub la lito monton de nekadritaj bildoj, kiuj estis tiom kovritaj per polvo, ke tiu, kiam la pentristo provis forblovi ĝin de la plej supra bildo, dum longa tempo spirrabe dancis antaŭ la okuloj de K. „Jen erikejo“, diris la pentristo kaj donis la bildon al K. Ĝi prezentis du maldikajn arbetojn, kiuj staris kun granda distanco en malhela herbejo. En la fono estis multkolora sunsubiro. „Bele“, diris K., „mi aĉetos ĝin.“ K. senpripense tiel koncize parolis, li tial ĝojis, kiam la pentristo anstataŭ ĉagreniĝi pri tio levis duan bildon de la planko. „Jen kontraŭa versio al tiu bildo“, diris la pentristo. Eble ĝi estis intencita kontraŭversio, sed ne estis rimarkebla eĉ la plej eta diferenco kompare al la unua bildo, jen la arboj, jen la herbejo kaj jen la sunsubiro. Sed K. apenaŭ interesiĝis pri tio. „Estas belaj

pejzaĝoj“, li diris, „mi aĉetas ilin ambaŭ kaj pendigos ilin en mia oficejo.“

„La motivo ŝajne plaĉas al vi“, diris la pentristo kaj suprentiris trian bildon. „Jen bonŝanca hazardo, ke mi havas ankoraŭ similan bildon ĉi tie.“ Sed ĝi ne estis simila, estis la tute sama erikejo. La pentristo bone eluzis la okazon vendi malnovajn bildojn.

„Mi prenos ankaŭ tiun ankoraŭ“, diris K. „Kiom kostas la tri bildoj?“

„Pri tio mi ankoraŭ parolos kun vi“, diris la pentristo.

„Vi nun devas rapidi, kaj ni restos ja ligitaj. Cetere mi tre ĝojas, ke la bildoj plaĉas al vi, mi kundonos al vi ĉiujn bildojn, kiujn mi havas ĉi tie malsupre. Ili ĉiuj estas erikejoj, mi jam ofte pentris erikejojn. Kelkaj homoj rifuzas tiajn bildojn, ĉar ili estas tro mornaj, sed aliaj, kaj vi apartenas al ili, ĝuste ŝategas la mornan.“

Sed K. havis nun neniun sencon por la profesiaj spertoj de la almozpetanta pentristo. „Enpaku ĉiujn bildojn!“ li vokis. Interrompante la pentriston, li diris pli subtone

„morgaŭ venos mia servisto al vi kaj forportos ilin."

„Tio ne necesos", diris la pentristo. „Mi esperas, ke mi povos havigi portiston, kiu foriros tuj kun vi." Kaj li kliniĝis lastfine super la liton kaj malfermis la pordon.

„Grimpu sen hezito sur la liton", diris la pentristo, „tion faras ĉiu, kiu envenas ĉi tien." K. ankaŭ sen tiu postulo ne estus estinta respektema, li jam surmetis eĉ piedon mezen de la litkovrilo, jen li rigardis tra la malfermita pordo eksteren kaj retiris la piedon. „Kio estas tio?" li demandis la pentriston.

„Pri kio vi miras?" demandis tiu, siaflanke mirante.

„Estas la juĝejaj kancelarioj. Ĉu vi ne sciis, ke ĉi tie estas juĝejaj kancelarioj? Juĝejaj kancelarioj estas preskaŭ en ĉiu subtegmentejo, kial ili ĝuste ĉi tie manku? Ankaŭ mia ateliero apartenas fakte al la juĝejaj kancelarioj, sed la juĝejo disponigis ĝin al mi."

K. ne ekteruriĝis tiom pri tio, ke li trovis ankaŭ tie juĝejajn kancelariojn, sed li plej ekkteruriĝis pri si mem, pri sia nesciado en juĝejaj aferoj. Kiel baza regulo de la

konduto de akuzito ŝajnis al li ĉiam esti antaŭpreparita, neniam lasi surprizi sin, ne rigardi sendivene dekstren, se la juĝisto staras apud li maldekstre – kaj ĝuste tiun bazan regulon li ĉiam denove mem rompis. Antaŭ li etendiĝis longa irejo, el kiu blovis aero, kun kiu komparita la aero en la ateliero estis refreŝiga. Benkoj estis metitaj sur ambaŭ flankoj de la irejo, precize tiel, kiel en la atendejo de la kancelario, kiu estis plenpova por K. Ŝajne ekzistis precizaj regularoj por la aranĝo de kancelario. Momente ne estis tre granda frekvento de klientoj tie. Viro tie sidis parte kuŝante, la vizaĝon surbenke li kovris per siaj brakoj kaj ŝajne dormis; alia staris en la nehela fino de la irejo. K. paŝis nun super la liton, la pentristo sekvis lin kun la bildoj. Ili baldaŭ renkontis juĝejan serviston – K. ekkonis jam ĉiujn juĝejajn servistojn je la ora butono, kiun ili havis sur sia civila vesto inter kutimaj butonoj – kaj la pentristo komisiis lin akompani sinjoron K. kun la bildoj. K. pli ŝanceliĝis ol li iris, la naztuketon li premis al la buŝo. Ili estis jam proksime de la elirejo, kiam kuris al li impete kiel ŝtormo la knabinoj, de kiuj K. do same ne restis ŝirmita. Ili evidente vidis, ke la dua pordo de la ateliero malfermiĝis kaj kuris ĉirkaŭvoje por enpenetri de

tiu flanko.

„Mi ne plu povos akompani vin!“ vokis la pentristo ridante, pro la alstormado de la knabinoj. „Ĝis revido! Kaj ne pripensu tro longe!“

K. eĉ ne malantaŭrigardis al li. Sur la strateto li prenis la unuan kaleŝon, kiu envojiĝis.Li volis denukigi la serviston, kies ora butono seninterrompe frapis la atenton de liaj okuloj, eĉ se li krome verŝajne ne frapis la atenton de iu alia. Pro sia helpopreteco la servisto ankoraŭ volis sidiĝi sur la koĉeran benkon. Sed K. forpelis lin de tie. Tagmezo jam delonge estis pasinta, kiam K. atingis la benkon. Volonte li estus lasinta la bildojn en la kaleŝo, sed li timis, ke ĉe iu okazo li estos devigita legitimi sin per ili ĉe la pentristo. Li tial ordonis porti ilin en sian oficejon kaj kaŝis ilin en la plej malsupra tirkesto de sia tablo por almenaŭ dum la sekvaj tagoj sekurigi ilin kontraŭ la rigardoj de la vicdirektoro.

# Oka ĉapitro

## Komercisto Blok – Nuligo de la advokateco de la advokato

Fine K. tamen decidiĝis ĉesigi la defendon fare de sia advokato. Duboj pri tio, ĉu ĝi estas ĝusta agi tiel ĉu ne, ja ne ekstermeblis, sed la konvinko pri la neceso de tiu paŝo estis pli granda ol la malo. La decidiĝo je tiu tago, kiam K. volis iri al la advokato, forprenis multe de lia laborforto, li laboris precipe lante, li devis resti tre longe en la oficejo, kaj pasis jam la deka, kiam li fine staris antaŭ la pordo de la advokato. Ankoraŭ antaŭ ol li eksonoris, li pripensis, ĉu ĝi estus pli bone nuligi la advokatecon per telefono aŭ per letero, la persona interparolado certe fariĝos tre embarasiga. Tamen K. fine ne volis rezigni pri ĝi, ĉe ĉiu alia speco de la nuligo de la advokateco tiu estus akceptita silente aŭ per kelkaj formalaj vortoj, kaj K., se ne eventuale Leni povus elesplori ion, neniam ekscius ion pri tio, kiel la advokato reagos pri la nuligo de sia advokateco kaj kiujn sekvojn por K. povus havi tiu ĉi nuligo laŭ la ne malgrava opinio de la advokato. Sed, se li sidos vidalvide

al la advokato, kaj se la advokato estos surprizita, K. eĉ tiukaze, se la advokato ne lasus logi multon el si, povus facile konkludi el ties vizaĝo kaj konduto ĉion, kion li volas ekscii. Eĉ estis eĉ ne ekskludite, ke li estos konvinkita pri tio, ke tamen estus pli bone lasi al la advokato la defendon kaj, ke li tiukaze nuligus la nuligon de la advokateco.

La unua sonorado ĉe la pordo de la advokato estis, kiel kutime, senutila. „Leni povus esti pli rapida“, pensis K. Sed estis jam avantaĝo, se la aliaj ne enmiksiĝis, kiel ili faris tion kutime, ĉu per tio ke la viro en la nokotvesto aŭ iu ajn alia ekmolestas lin. Dum K. duafoje premis la butonon, li retrorigardis al la alia pordo, sed ĉifoje ankaŭ tiu restis fermita. Fine aperis ĉe la rigardotruo de la advokata pordo du okuloj, sed ne estis tiuj de Leni. Iu malfermŝlosis la pordon, sed ankoraŭ premis sin kontraŭ ĝi, iu vokis en la loĝejon: „Estas li!“ kaj malfermis la pordon nur tiam tute. K. urĝis la pordon, ĉar li jam aŭdis malantaŭ si kiel en la pordo de la alia loĝejo haste estis turnata ŝlosilo en la seruro. Kiam do la pordo antaŭ li fine malfermiĝis, li preskaŭ sturmis en la antaŭĉambron kaj

ankoraŭ vidis, kiel Leni, kiun celis la averta voko, forkuris en noktonegliĝo tra irejo, kiu troviĝis inter la ĉambroj. Li postrigardis ŝin dum certa tempo kaj tiam turniĝis al la malferminto de la pordo. Estis malgranda kaj magra viro kun plena barbo, kiu mantenis kandelon.

„Ĉu vi estas ĉi tie dungito?“ demandis K.

„Ne“, respondis la viro, „mi estas fremda ĉi tie, la advokato estas nur mia reprezentanto, mi estas ĉi tie pro jura afero.

„Sen vestoj, ĉu?“ demandis K. kaj montris per manmovo al la mankohava vestaro de la viro. „Ho, pardonu al mi!“ diris la viro kaj prilumis sin mem per la kandelo, kvazaŭ li vidus sin mem je la unua fojo en tiu stato.

„Leni estas via amatino, ĉu?“ demandis K. koncize. Li iom disetendis la gambojn, la manojn, per kiuj li tenis la ĉapelon, li malantaŭe interkroĉigis. Jam pro la posedo de la firma mantelo li sentis sin tre supera al la magra malgrandulo.

„Ho ve, Dio mia“, tiu diris kaj levis, terurigite defendante

sin, manon antaŭ la vizaĝon, „ne, ne, kiel vi povas pensi tion?“

„Vi aspektas fidinde, diris K. ridetante, „tamen – iru antaŭen.“ Li salutis lin per la ĉapelo kaj irigis lin antaŭ si. „Nu, kiel vi nomiĝas?“ demandis K. survoje.

„Blok, komercisto Blok“, diris la malgrandulo kaj ĉe tiu prezento turnis sin al K., li volis halti, sed K. ne permesis tion.

„Ĉu tio estas via vera nomo?“, demandis K.

„Certe“, Blok respondis, „kial vi dubas?“

„Mi pensis, ke vi povus havi kaŭzon sekretigi vian nomon“, diris K. Li sentis sin libera tiel, kiel oni sentas sin kutime nur, kiam oni parolas en fremda regiono kun homoj de malalta rango, se ĉion, kio koncernas la propran personon, oni retenas por si mem, se oni parolas nur indiferente pri la interesoj de la aliaj kaj tiel altigas ilin antaŭ si mem, sed ankaŭ laŭ plaĉo povus faligi ilin. Ĉe la pordo de la laborĉambro de la advokato K. haltis, malfermis ĝin kaj vokis al la komercisto, kiu obeeme iris

plu: „Ne tiel rapide! Prilumu por mi ĉi tie!“ K. pensis, ke Leni eble kaŝas sin ĉi tie, li ordonis, ke la komercisto rastu ĉiujn angulojn, sed la ĉambro estis malplena. Antaŭ la pentraĵo de la juĝisto K. retenis la komerciston malantaŭe per ties ŝelko. „Ĉu vi konas lin?“ li demandis kaj montrofingris supren. La komercisto levis la kandelon, rigardis palpebrume supren kaj diris: „Li estas juĝisto.“

„Ĉu altranga juĝisto?“ demandis K. kaj starigis sin flanke de la komercisto por observi la impreson, kiun faris la pentraĵo al la komercisto. La komercisto rigardis admire supren.“ „Li estas juĝisto altranga“, li diris.

„Vi ne estas informita bone“, diris K. „Inter la malsupraj esplorjuĝistoj, li estas la plej malaltranga.“

„Nun mi rememoras“, diris la komercisto kaj mallevis la kandelon, „ankaŭ mi jam aŭdis tion.“

„Tre kompreneble“, vokis K., „mi ja forgesis, kompreneble vi jam devis aŭdi tion.

„Sed kial do, kial do?“ demandis la komercisto, dum li

moviĝis, pelite de la manoj de K. al la pordo. Ekstere sur la irejo diris K. „Vi ja scias, kie Leni kaŝiĝas, ĉu?“

„Kaŝiĝas, ĉu?“ diris la komercisto, „ne, sed certe ŝi estas en la kuirejo kaj kuiros supon por la advokato.“

„Kial vi ne diris tion tuj?“ demandis K.

„Mi ja volis konduki vin tien, dum vi revokis min“, respondis la komercisto, kvazaŭ konfuzite de la kontraŭdiraj ordonoj.

„Vi eble pensas, ke vi estas tre ruza“, diris K., „do, konduku min!“ En la kuirejo K. ankoraŭ neniam estis, ĝi estis surprize granda kaj riĉe ekipita. Jam nur la fornelo estis trifoje pli granda ol kutimaj forneloj, de la cetero oni ne vidis detalojn, ĉar la kuirejo tiumomente estis lumigata nur per lampeto pendanta ĉe la enirejo. Ĉe la fornelo staris Leni kun blanka antaŭtuko, kiel ĉiam, kaj malplenigis ovojn en poton, kiu staris sur flamo de primuso. „Bonan vesperon, Josefo“, ŝi diris kun rigardo flanken.

„Bonan vesperon“, diris K. kaj montris permane al flanke

staranta fotelo, sur kiun sidiĝu la komercisto, kion tiu faris. Sed K. iris ĝis tute proksime malantaŭ Leni, transkliniĝis super ŝultron ŝian kaj demandis: „Kiu estas la viro?“

Leni brakumis sinjoron K. per unu brako, kun la alia mano ŝi kirlis la supon, ŝi tiris lin antaŭen al si kaj diris: „Li estas bedaŭrinda homo, povra komercisto, nomata Blok. Ja rigardu lin foje.“ Ili ambaŭ rigardis malantaŭen.

La komercisto sidis sur la fotelo, sur kiun K. mansignis al li. Li jam estingis la kandelon, kies lumo nun ne plu necesis, per blovado kaj premis per la fingroj la meĉon por malhelpi la fumadon. „Vi estis en negliĝo“, diris K. kaj turnis ŝian kapon denove al la fornelo. Ŝi silentis.

„Li estas via amato, ĉu?“ demandis K. Ŝi volis preni la supopoton, sed K. prenis ambaŭ ŝiajn manojn kaj diris: „Do, respondu!“.

Ŝi diris: „Akompanu min en la laborĉambron, mi ĉion klarigos al vi.“

„Ne“, diris K., „mi volas, ke vi klarigu tion ĉi tie.“ Ŝi

kroĉiĝis al li kaj intencis kisi lin. Sed K. deturniĝis defendante sin kaj diris: „Mi ne volas, ke vi kisu min nun.“

„Josefo“, diris Leni kaj rigardis lin petante kaj tamen rekte al liaj okuloj. „Vi ja ne estas ĵaluza pro sinjoro Blok, ĉu? – Rudi“, ŝi diris poste, turnante sin al la komercisto. „Do, helpu al mi, vi aŭdis, ke mi estas suspektata, lasu la kandelon.“ Oni povis pensi, ke li ne atentis ilin, sed li estis tute informita. „Ankaŭ mi ne scius, kial vi estu ĵaluza“, li diris ne tre respondosprite.

„Fakte ankaŭ mi ne scias tion“, diris K. kaj rigardis la komerciston ridetante. Leni ridis laŭte kaj uzis la malatenton de K. por kroĉigiĝi brake de li, kaj ŝi flustris: „Ne plu urĝu lin, vi ja vidas, kia homo li estas. Mi iom zorgas pri li, ĉar li estas ofta kliento de la advokato, pro neniu alia kaŭzo. Kaj vi, ĉu? Ĉu vi volas paroli ankoraŭ hodiaŭ kun la advokato? Li estas tre malsana hodiaŭ, sed, se vi volas, mi tamen anoncos vin. Sed tranokte vi restos ĉe mi, tute certe. Vi ankaŭ dum longa tempo ne estis plu ĉe ni, eĉ la advokato demandis, kie vi estas. Ne neglektu la proceson! Ankaŭ mi mem devas sciigi al vi diversaĵojn,

kiujn mi eksciis. Sed nun unue demetu vian mantelon!“ Ŝi helpis al li malvesti sin, ŝi prenis lian ĉapelon kaj kuris kun la vestaĵoj en la antaŭĉambron por pendigi ilin, poste ŝi retrokuris kaj okupiĝis pri la supo. „Ĉu mi unue anoncu vin aŭ unue portu la supon al li?“

„Unue anoncu min“, diris K. Li ĉagreniĝis, origine li havis la intencon detale priparoli kun Leni siajn aferojn, speciale la dubindan nuligon de la advokateco. Sed la ĉeesto de la komercisto ĉesigis lian emon por tio. Nun li opiniis sian aferon tamen tro grava por tio, ke la etkomercisto eble ankoraŭ decide enmiksiĝu. Kaj tial li retrovokis ŝin, Leni troviĝis jam en la irejo. „Portu tamen unue la supon al li, li fortigu sin por la interparolado kun mi, li bezonos tion.“

„Ĉu ankaŭ vi estas kliento de la advokato“, mallaŭte diris kvazaŭ konstatante la komercisto en sia angulo. Sed tio ne estis akceptata favore. „Kial tio koncernu vin?“ diris K. kaj Leni rimarkis: „Eksilentu, tuj – Tiukaze mi do unue portos la supon al li“, diris Leni al K. kaj verŝis la supon sur teleron. „Nur estas tiukaze atendeble, ke li baldaŭ ekdormos, post la manĝo li kutime baldaŭ ekdormas.“

„Tio, kion mi diros,tenos lin vekiĝinta“, diris K., li volis seninterrompe aludi pri tio, ke li intencas intertrakti gravan aferon kun la advokato, li celis, ke Leni demandu lin, kio tio estas, kaj nur poste demandi ŝin pri konsilo. Sed ŝi plenumis ĝustatempe nur la diritajn ordonojn. Kiam ŝi preteriris lin kun la taso, ŝi softe kaj intence puŝis lin kaj flustris: „Kiam li estos manĝinta la supon, mi tuj anoncos vin, por ke mi rericevu vin kiel eble plej rapide.“

„Iru do“, diris K., „iru do.“

„Nu, estu iom pli afabla“, ŝi diris kaj ankoraŭfoje tute turnis sin kun la taso en la pordo al li.

K. postrigardis ŝin; nun estis decidite kun certo, ke li nuligos la advokatecon de la advokato. Estis verŝajne pli bone, ke li antaŭe ne ankoraŭfoje povis interparoli kun Leni pri tio; ŝi apenaŭ havis sufiĉan superrigardon pri la tuto, ŝi certe malkonsilus tion al li kaj eble efektive detenus lin de la nuligo de la advokateco, tiukaze li estus plu plena de duboj kaj maltrankvilo kaj fine li tamen plenumus sian decidon post kelke da tempo, ĉar tiu decido estis fakte tro deviga. Sed ju pli frue ĝi estos

efektivigita des pli da damaĝo estos detenita de li. Eble la komercisto povos diri ion pri tio.

K. deturniĝis, apenaŭ rimarkis tion la komercisto, li volis tuj ekstari.

„Restu sidanta“, diris K. kaj tiris fotelon apud lin. „Ĉu vi estas jam malnova kliento de la advokato?“ demandis K.

„Jes“, diris la komercisto, „tre malnova kliento.“

„Kiom da jaroj li jam estas via advokato?“ demandis K.

„Mi ne scias kiel vi opinias tion“, diris la komercisto, „en negocaj juraj aferoj – mi havas grenkomercon – la advokato jam defendas min de kiam mi transprenis la negocon, do ĉirkaŭ dudek jarojn, ankaŭ en mia propra proceso, kiun vi verŝajne aludas, li defendas min dekomence, jam pli ol kvin jarojn. Ja, multe pli ol kvin jarojn“, li poste aldonis kaj eltiris malnovan paperujon, „ĉi tie mi enskribis ĉion; se vi volas, mi diros al vi la precizajn datenojn. Estas malfacile memorteni ĉion. Mia proceso daŭras verŝajne jam multe pli longe, ĝi komencis tuj post la morto de mia edzino kaj tio estis antaŭ pli ol

kvin kaj duono da jaroj.“

K. proksimiĝis al li. „La advokato do transprenas ankaŭ kutimajn jurajn aferojn, ĉu?“ li demandis. Tiu ligo de la juĝejoj kaj la juroscienco ŝajnis al K. treege trankviliga.

„Certe“, diris la komercisto kaj poste flustris al K.: „Oni eĉ diras, ke li estas pli fervora pri tiuj juraj aferoj ol pri la aliaj.“ Sed poste li ŝajne pentis pri la dirita, li metis manon sur ŝultron de K. kaj diris: „Mi tre petas vin, ne perfidu min.“

K. trankviligante lin, frapis lin femure kaj diris: „Ne, mi ne estas perfidulo.“

„Li estas ja venĝema“, diris la komercisto.

„Kontraŭ tiom fidela kliento li certe faros nenion“, diris K.

„Ho, tamen“, diris la komercisto, „se li estas ekscitita, li ne konas diferencojn, cetere mi vere ne estas fidela al li.“

„Sed kial ne?“ demandis K.

„Ĉu mi konfidu tion al vi?“ demandis la komercisto dubante.

„Mi pensas, ke jes“, diris K.

„Nu“, diris la komercisto, „mi konfidos tion parte al vi, sed ankaŭ vi devos diri sekreton, por ke ni ambaŭ reciproke apogu nin rilate la advokaton.“

„Vi estas tre memgardema“, diris K., sed mi diros al vi sekreton, kiu tute trankviligos vin. Kiurilate vi do malfidelas la advokaton?“

„Mi havas“, diris la komercisto heziteme laŭ tono, kvazaŭ li konfesus ion malhonoran, „mi havas krom li ankoraŭ diversajn juragentojn.“

„Tio ja ne estas fia ago“, diris K. iom seniluziigite.

„Ĉi tie tamen“, diris la komercisto, kiu ankoraŭ peze spiris de sia konfeso, sed sekve de la rimarko de K. li ekhavis pli da fido.

„Tio ne estas permesita. Kaj malplej permesite estas

akcepti krom tielnomata advokato ankoraŭ neoficialajn advokatojn. Kaj ĝuste tion mi faris, mi havas krom li ankoraŭ kvin juragentojn.“

„Kvin!“vokis K., nur la kvanto ekmirigis lin, kvin kaŝajn fuŝadvokatojn krom tiu, ĉu?“

La komercisto kapjesis: „Mi ankoraŭ intertraktas ĝuste kun la sesa.

„Sed por kio vi bezonas tiom da advokatoj?“ demandis K.

„Mi bezonas ĉiujn“, diris la komercisto.

„Ĉu vi ne volas klarigi tion al mi?“ demandis K.

„Volonte“, diris la komercisto. „Antaŭ ĉio mi ja ne volos malsukcesi miaprocese, tio estas ja memkomprenebla. Sekve de tio, mi rajtas preterlasi nenion, kio povus esti utila al mi; eĉ, se la espero pri utilo en certa kazo estas nur malgranda, mi eĉ tiukaze ne rajtas preterlasi ĝin. Mi uzis tial ĉion, kion mi havas, por la proceso. Tiel mi ekzemple eltiris de mia negoco mian tutan monon, pli frue plenigis la oficejoj de mia negoco preskaŭ tutan

etaĝon, sed nun sufiĉas ĉambreto en la postkorta domo, kie mi laboras kun metia lernanto. Tiun regreson kompreneble ne kaŭzis nur la eltirado de la mono, sed eĉ pli la forpreno de mia laborforto. Se oni volas fari ion por sia proceso oni apenaŭ povas okupiĝi pri aliaj aferoj."

„Vi do mem laboras ĉe la juĝejo, ĉu?" demandis K.„Ĝuste pri tio mi volus volonte ekscii ion."

„Pri tio mi povas raporti nur malmulte", diris la komercisto, „komence mi certe ankaŭ tion provis, sed mi baldaŭ lasis tion. Ĝi estas tro elĉerpiga kaj kaj ne havigas grandan sukceson. Eĉ labori tie kaj intertrakti almenaŭ por mi montriĝis tute neeble. Jam nur la atendado tie estas ja granda streĉo. Vi konas ja mem la pezan aeron en la kancelarioj."

„Sed kial vi scias, ke mi estis tie?" demandis K.

„Mi estis ĝuste en la atendejo, kiam vi trairis."

„Kia hazardo tio estas!" vokis K., tute obsedite kaj forgesante la pli fruan ridindecon de la komercisto. „Vi do vidis min! Vi estis en la atendejo, kiam mi trairis! Jes, mi

iam unufoje tie trairis.“

„Tio ne estas tiom granda hazardo“, diris la komercisto, „mi estas tie preskaŭ ĉiutaĝe.“

„Ankaŭ mi nun verŝajne devos iri ofte tien“, diris K., „sed mi apenaŭ estos denove akceptita tiel respektoplene kiel tiam. Ĉiuj ekstaris. Eble oni pensis, ke mi estas juĝisto.“

„Ne“, diris la komercisto, „ni salutis tiam la juĝejan serviston. Ke vi estas akuzito, tion ni sciis. Tiaj sciigoj disvastiĝas tre rapide.“

„Tion vi do jam sciis“, diris K., „tiukaze mia konduto eble ŝajnis orgojla al vi. Ĉu oni interparolis pri tio?“

„Ne“, diris la komercisto, „male. Sed tio estas stultaĵoj.“

„Kiaj stultaĵoj?“ demandis K.

„Kial vi demandas pri tio?“ diris la komercisto ĉagrenite. „Vi ŝajne ankoraŭ ne konas la homojn tie kaj eble miskomprenos tion. Vi devas pripensi, ke en tiu proceduro ĉiam denove estas priparolataj multaj aferoj,

por kiuj la menso ne plu sufiĉas, oni estas simple tro lacigita kaj deturnita de multaj aferoj, kaj tial kiel anstataŭaĵo devas servi la superstiĉo. Mi parolas pri la aliaj, sed mem estas tute ne pli bona. Tia superstiĉo estas ekzemple, ke multaj asertas ekkoni el la vizaĝo de akuzito, speciale el la konturo de la lipoj, la rezulton de la proceso. Tiuj homoj do asertis, ke vi, se oni konkludas tion laŭ viaj lipoj, certe kaj baldaŭ estos kondamnita. Mi ripetas, ke tio estas ridinda superstiĉo, kaj en la plej multaj kazoj ankaŭ komplete rifuzita per faktoj, sed, se oni vivas en tiu societo, estas malfacile eviti tiajn opiniojn. Pripensu nur kiom forte tiu superstiĉo povas efiki. Vi ja certan personon alparolis tie, ĉu ne? Sed li apenaŭ povis respondi al vi. Ekzistas kompreneble multaj kaŭzoj por tie povi esti konfuzita, sed unu el tiuj estis ankaŭ la vidaĵo de viaj lipoj. Li rakontis pli poste ankaŭ pri tio, ke li supozis vidi sur viaj lipoj ankaŭ la signon de sia propra kondamno.“

„Mia lipoj, ĉu?“ demandis K., eltiris poŝspegulon kaj rigardis sin. Mi ne povas trovi ion eksterordinaran je miaj lipoj. Kaj vi, ĉu?“

„Ankaŭ mi ne“, diris la komercisto, „Tute ne.“

„Kiom superstiĉaj tiuj homoj estas!“ vokis K.

„Ĉu mi ne diris tion?“ demandis la komercisto.

„Ĉu ili tre ofte societas kaj interŝanĝas opiniojn?“ diris K. „Ĝenerale mi ĝis nun tute aparte lokiĝis.“

„Ĝenerale ili ne societas kune“, diris la komercisto, „tio ne eblus, ĉar ili estas tiom multaj. Estas ankaŭ nur malmultaj komunaj interesoj. Se ĉeokaze en grupo la supozo pri komuna intereso aperas, ĝi baldaŭ montriĝas kiel eraro. Komune kontraŭ la juĝeĵo atingeblas neniu sukceso. Ĉiu kazo estas esplorata por si mem, ĝi estas ja la plej preciza juĝejo, kiu imageblas. Komune do neniu sukceso atingeblas, nur unuopulo sukcesas ĉeokaze sekrete; kaj nur, kiam la unuopulo jam sukcesis, ekscias tion la aliaj; neniu scias kiel ĝi okazis. Do ne estas iu komuneco, oni ja tie kaj tie kunvenas en atendejo, sed tie oni ne priparolas multon. La superstiĉaj opinioj konsistas ofte jam de praaj tempoj, kaj plimultiĝas fakte per si mem.“

„Mi vidis la sinjorojn tie en la atendejo“, diris K., „ilia atendado ŝajnis al mi tre senutila.“

„La atendado ne estas sensenca“, diris la komercisto, „senutila estas nur la memstara enmiksiĝo. Mi diris jam, ke mi havas krom tiu advokato ankoraŭ kvin aliajn. Oni ja pensu pro tio – mi mem supozis tion unue – ke mi nun povu translasi la aferon tute al ili mem. Sed tio estus tute malĝusta. Mi povas translasi la aferon malpli al ili ol tiukaze, se mi havus nur unu advokaton. Vi ŝajne ne komprenas tion, ĉu?“

„Ne“, diris K. kaj metis,por malhelpi la komerciston paroli tro rapide, manon trankviligante sur manon de li, „mi petas vin nur paroli iom pli lante, ĉio estas tre grava por mi, kaj mi vere ne povas kapti la sencon de ĉio ĉi.“

„Bone, ke vi memoras min pri tio“, diris la komercisto, „vi estas ja novulo, freŝdatulo. Via proceso aĝas duonon de jaro, ĉu ne? Jes, mi aŭdis pri tio. Tiom nova proceso! Sed mi trapensis tiujn aferojn jam sennombreble ofte, ili estas por mi la plej memkomprenebla surtere.“

„Vi ŝajne estas ĝoja, ke via proceso jam tiom progresis, ĉu?“ demandis K., li ne volis demandi rekte, kiel statas la aferoj de la komercisto. Sed li ankaŭ ne ricevis klaran respondon.

„Jes, mi ruligis mian proceson jam dum kvin jaroj plu“, diris la komercisto kaj klinis la kapon, „tio estas ne malgranda sukceso.“ Poste li silentis dum certa tempo.

K. aŭskultis, ĉu Leni jam venas. Unuflanke li ne volis, ke ŝi alvenu, ĉar li ankoraŭ havis multajn demandojn kaj li ankaŭ ne volis esti renkontata de Leni dum tiu konfidema interparolado kun la komercisto, sed aliflanke li ĉagreniĝis pri tio, ke ŝi spite al la propra ĉeesto tiom longe restadis ĉe la advokato, multe pli longe ol necesis por la transdonado de la supo.

„Mi ankoraŭ memoras precize pri la tempo“, denove komencis la komercisto, kaj K. tuj ekestis plena de atento, „kiam mia proceso estis proksimume tiom aĝa kiom nun via. Mi havis tiam nur tiun advokaton, sed mi ne estis tre kontenta pri li.“

„Ĉi tie mi ja ekscias ĉion, pensis K. kaj kapjesis vigle per la kapo, kvazaŭ li povus per tio instigi la komerciston diri ĉion sciindan.

„Mia proceso“, daŭrigis la komercisto, „ne progresis, kvankam okazis esploraj pridemandadoj, mi eĉ venis al ĉiu, kolektis materialon, antaŭmetis ĉiujn miajn negocajn librojn ĉe la juĝejo, kio, kiel mi eksciis pli malfrue, eĉ ne necesis, mi iris ĉiam denove al mia advokato, li faris ankaŭ diversajn petskribojn, –.“

„Diversajn petskribojn, ĉu?“ demandis K.

„Jes, certe“, diris la komercisto.

„Tio estas tre grava por mi“, diris K., „en mia kazo li ankoraŭ nun laboras pri mia petskribo unua. Li faris ankoraŭ nenion. Mi komprenas nun, ke li fie neglektas min.“

„Ke la petskribo ankoraŭ ne estas preta, povas havi diversajn rajtigitajn kaŭzojn“, diris la komercisto. „Cetere montriĝis ĉe miaj petskriboj pli poste, ke ili estis tute senvaloraj. Mi eĉ iun el ili pro la komplezo de juĝeja

oficisto mem legis. Ĝi ja estis erudicia, sed esence senenhava. Antaŭ ĉio ĝi entenis multe da latinlingva, kiun mi ne komprenas, krome multpaĝajn ĝeneralajn alvokojn de la juĝejo, krome flatojn de certaj individuaj oficistoj, kiuj ja ne estis nomataj, sed kiujn inciito ĉiukaze povas diveni. Krome mem laŭdis sin la advokato per tio, ke li humiligis sin kvazaŭ hundece antaŭ la juĝejo, kaj fine ĝi entenis esploradojn de juraj kazoj el malnovaj tempoj, kiuj laŭskribe estis similaj al mia. Tiuj esploroj, tiom, kiom mi povis kompreni ilin, estis tre zorgeme faritaj. Mi per ĉio tio ankaŭ ne volas juĝi la laboron de la advokato, krome la petskribo, kiun mi legis, estis nur unu el kelkaj, sed ĉiukaze, kaj pri tio mi volas nun paroli, mi tiam ne povis konstati en la proceso progresojn.“

„Sed kiun progreson vi volis konstati?“ demandis K.

„Vi demandas tute prudente“, diris ridetante la komercisto, „oni nur malofte povas konstati progreson en tiu procedo. Sed tiam mi ne sciis tion. Mi estas komercisto kaj tio mi estis tiam eĉ multe pli ol nun, mi volis havi evidentajn progresojn, la tuto proksimiĝu al la fino aŭ almenaŭ decide laŭregule progresu. Anstataŭ tio

estis nur pridemandadoj, kiuj plej ofte havis la saman enhavon; la respondojn mi jam parkerigis kiel litanion; plurfoje ĉiusemajne venis juĝejaj heroldoj al mia oficejo aŭ al mia loĝejo kaj kie ajn ili min krome renkontis; tio kompreneble estis ĝena (nun almenaŭ tiurilate estas pli bone, la telefona voko ĝenas onin multe malpli), ankaŭ ĉe miaj negocaj amikoj, speciale ĉe miaj parencoj ekdisvastiĝis onidiroj pri mia proceso, damaĝoj trafis min el ĉiuj flankoj, sed eĉ ne plej eta signo ne ekzistis pri tio, ke baldaŭ okazos eĉ nur la plej unua procesa intertraktado. Mi do iris al la advokato kaj plendis pri tio. Li, estas vere, donis al mi longajn klarigojn, sed decide rifuzis fari ion laŭ mia senco, ĉar laŭ li neniu havas influon urĝi la fiksigon de procesintertrakto. Urĝe insisti pri tio per petskribo – kiel mi postulis – laŭ li estis simple impertinenta kaj pereigus lin kaj min. Mi pensis, ke tio, kion la advokato ne volas aŭ ne povas fari, alia volos kaj kapablos fari. Mi do serĉis alian advokaton. Mi tuj diru tion antaŭe: neniu postulis la fiksigon de la ĉefintertraktado aŭ eldevigis ĝin, tamen spite al escepto, pri kiu mi ankoraŭ parolos, tio efektive ne eblas, rilate al tiu punkto tiu advokato do ne trompis min; cetere mi ne

devas bedaŭri, ke mi ankoraŭ turnis min al aliaj advokatoj. Vi certe jam aŭdis pere de d-ro Favor kelkon pri la fuŝadvokatoj, li verŝajne prezentis ilin kiel tre malestimindajn, kaj tio ili efektive estas. Tamen li ĉiam iomete eraras, kiam li parolas pri ili kaj sin kaj siajn kolegojn komparas al ili, eta eraro, pri kiu mi volas atentigi vin tute preterire. Li nomas tiukaze ĉiam la advokatojn de sia rondo „la grandaj advokatoj“. Tio estas malĝusta, kompreneble ĉiu povas nomi sin „granda“, se plaĉas al li, sed en tiu kazo decidas tamen nur la juĝeja uzo. Laŭ ĝi ja ekzistas krom la dubindaj advokatoj aldone malgrandaj kaj grandaj advokatoj. Sed tiu advokato kaj ties kolegoj estas tamen nur la malgrandaj advokatoj, sed la grandaj, pri kiuj mi nur aŭdis kaj kiujn mi neniam vidis, range troviĝas nekompareble pli alte super la malgrandaj advokatoj ol tiuj super la malestimataj fuŝadvokatoj.“

„La grandaj advokatoj, ĉu?“ demandis K. „Ja kiuj estas tiuj? Kiel oni atingas ilin?“

„Vi do ankoraŭ neniam aŭdis pri ili, ĉu?“ diris la komercisto. „Ekzistas apenaŭ iu akuzito, kiu, post kiam li

aŭdis pri ili, ne revus dum certa tempo pri ili. Sed prefere ne lasu tenti vin per tio. Kiuj estas tiuj grandaj advokatoj, mi ne scias, kaj atingi ilin hejme oni ŝajne tute ne povas. Mi ne konas kazon, pri kiu oni povus aserti kun certo, ke ili enmiksiĝis. Kelkajn ili defendas, sed per propra volo oni ne povus atingi tion, ili defendas nur tiun, kiun ili volas defendi. La aferon, kiun ili faras afero sia, certe jam devas esti trairinta la stadion de la malsupra juĝejo. Cetere estas pli bone ne pensi pri ili, alikaze la priparoladoj kun la aliaj advokatoj, ties konsiloj kaj helpagoj, ŝajnus al oni tro naŭzaj kaj tro senutilaj. Mi mem spertis tion, ke oni prefere forĵetus ĉion, ke oni volus enlitiĝi hejme kaj aŭdi pri nenio plu. Sed tio kompreneble estus la plej stulta, kaj oni ankaŭ ne havus dum longa tempo sian pacon en la lito."

„Vi tiam do ne pensis pri la grandaj advokatoj, ĉu?" demandis K.

„Ne longe", diris la komercisto kaj ridetis denove, „tute forgesi ilin oni bedaŭrinde ne povas, speciale la noktoj estas favoraj por tiaj pensoj. Sed tiam mi volis ja sukcesojn tuj, mi tial frekventis la tielnomatajn

fuŝadvokatojn.“

„Kiel vi ĉi tie sidas kune!“ vokis Leni, kiu revenis kun la taso kaj haltis sur la sojlo de la pordo. Ili efektive reciproke sidis kune, ĉe la plej eta movo ili devus kunpuŝiĝi per la kapoj, la komercisto, kiu sendepende de sia malgrandeco, eĉ tenis sian dorson kurbigite, K.-on devigis simile ekkaŭri, se li volis aŭdi ĉion.

„Ankoraŭ momenton!“ vokis K. rifuzante ŝin, kaj senpacience zigzagadis per la mano, kiun li ankoraŭ eĉ tiam tenis sur la mano de la komercisto.

„Li volis, ke mi rakontu pri mia proceso al li“, diris la komercisto al Leni.

„Rakontu, rakontu nur“, ŝi diris. Ŝi parolis al la komercisto kareseme, sed ankaŭ humilige, al K. tio ne plaĉis; kiel li nun ekkonis, havis la viro ja certan valoron, almenaŭ li havis spertojn, kiujn li kapablis sciigi bone. Leni juĝis lin ŝajne malĝuste. Li observis ĉagrenite, kiel Leni tiam forprenis de li la kandelon, kiun li firmtenis dum la tuta tempo, kiel ŝi purviŝis lian manon per sia

antaŭtuko kaj poste kaŭriĝis apud li por deskrapi iom da vakso, kiu gutis de la kandelo sur lian pantalonon.

„Vi volis rakonti al mi pri la fuŝadvokatoj“, diris K. kaj forŝovis sen plua rimarko la manon de Leni.

„Ja kion vi volas?“demandis Leni, ŝi etendis bateteme manon al sinjoro K. kaj daŭrigis sian laboron.

„Nu, pri la fuŝadvokatoj“, diris la komercisto kaj viŝis trans sian frunton kvazaŭ li pripensus tion.

K. intencis rapidigi lin kaj diris: „V ja volis havi sukcesojn tuj kaj tial frekventis la fuŝadvokatojn.“

„Tute ĝuste“, diris la komercisto, sed ne daŭrigis la paroladon.

‚Eventuale li ne volas paroli pri tio antaŭ Leni‘, pensis K., kaj subigis sian malpaciencon ekscii la plian tuj, kaj tial de tiam ne plu insistis pri respondo.

„Ĉu vi anoncis min?“ li demandis ŝin.

„Kompreneble“, ŝi diris, „ li atendas vin. Lasu nun tiun Blok, kun Blok vi povos interparoli ankaŭ pli poste, li restos ja ĉi tie.“

K. ankoraŭ hezitis. „Vi restos ĉi tie, ĉu?“ li demandis la komerciston. Li volis aŭdi ties propran respondon, li ne volis, ke Leni parolu pri la komercisto kiel pri malĉeestanto, li estis en tiu tago plena de sekreta ĉagreno pri Leni. Kaj denove respondis nun Leni: „Li dormas ofte ĉi tie.“

„Dormas ĉi tie, ĉu?“ vokis K., li pensis, ke la komercisto nur pro li atendos ĉi tie, dum li rapide plenumos la interparoladon kun la advokato, kaj ke poste ili kune foriros kaj ĉion detale kaj neĝenate priparolos.

„Jes“, diris Leni, „ne ĉiu kiel vi, Josefo, dum kiu ajn horo estas akceptata de la advokato. Vi ja ŝajne tute ne miras pri tio, ke la advokato akceptos vin spite al sia malsano ankoraŭ je la dudektria horo nokte. Vi akceptas tion, kion viaj amikoj faras por vi, vere tro memkompreneble. Nu,

viaj amikoj, aŭ almenaŭ mi faras tion volonte. Mi ne volas havi alian dankon kaj ankaŭ ne bezonas alian, ol ke vi sentu amon por mi.“

‚Mi sentu amon al vi, ĉu?‘ pensis K. en la unua momento, nur poste ĝi trafulmis lian kapon: ‚Nu do, mi sentas amon por ŝi.‘ Tamen, ĉion alian neglektante, li diris: „Li akceptas min, ĉar mi estas lia kliento. Se eĉ por tio fremda helpo estus necesa, oni devus ĉe ĉiu paŝo ĉiam samtempe almozpeti kaj danki.“

„Kiel terura li hodiaŭ estas, ĉu ne?“ demandis Leni la komerciston.

‚Nun estas mi la malĉeestanto‘, pensis K. kaj preskaŭ fariĝis kolera pri la komercisto, kiam tiu, transprenante la malĝentilecon de Leni, diris: „La advokato akceptas lin ankaŭ pro aliaj kaŭzoj. Lia kazo estas ja pli interesa ol mia. Krome lia proceso dum la komenco verŝajne ankoraŭ ne estas tre konfuzita, jen la advokato ankoraŭ volonte okupiĝas pri ĝi. Pli poste tio fariĝos alia.“

„Jes ja“, diris Leni kaj ridante rigardis la komerciston,

„kiel li babilaĉas! De li“, ŝi turnis sin al K., „fidu nenion. Tiel kara, kiel li estas, tiel babilema li ankaŭ estas. Eble la advokato ankaŭ tial ne ŝatas lin. Ĉiukaze li akceptas lin ĉiam nur tiam, kiam li estas en la humoro por tio. Mi jam ofte penis ŝanĝi tion, sed tio ne eblas. Imagu, kelkfoje mi jam anoncis Blokon, sed li akceptis lin nur je la tria tago poste. Sed, se Blok je tiu tempo, kiam li estas vokata, ne ĉeestas, ĉio estas perdita kaj oni denove devos anonci lin. Tial mi permesis al Blok dormi ĉi tie, okazis ja jam, ke li nokte sonorile vokis lin. Nun do Blok ankaŭ en la nokto estas preta. Tamen okazas nun ofte, ke la advokato, se montriĝas, ke Blok ĉeestas, nuligas sian komision permesi eniri lin.“

K. rigardis demandeme al la komercisto. Tiu kapjesis kaj diris tiel senkaŝe kiel li pli frue parolis al K., ĉar eble li estis konfuzita pro honto: „Jes, pli poste oni fariĝas tre dependa de sia advokato.“

„Li plendas ja nur ŝajne“, diris Leni. „li dormas ja ĉi tie tre volonte, kiel li ja jam ofte konfesis al mi.“

Ŝi iris al malgranda pordo kaj malfermpuŝis ĝin. „Ĉu vi

volas vidi lian dormoĉambron?“ ŝi demandis. K. iris tien kaj rigardis de la sojlo en la malaltan senfenestran ĉambron, kiu estis tute plenigita de malvasta lito. En tiun liton oni devis grimpi trans litofoston. Ĉe la kapfinaĵo de la lito estis niĉo en la muro, tie staris, tre ordeme aranĝita, kandelo, inkobareleto kaj plumo, krome fasko da paperoj, verŝajne proceskopioj.

„Vi dormas en la servoknabina ĉambro, ĉu?“ demandis K. kaj retroturnis sin al la komercisto. „Leni aranĝis ĝin por mi“, respondis la komercisto, „ĝi estas tre avantaĝa.“

K. rigardis lin dum longa tempo; la impreso, kiun li havis unue de la komercisto, eble estis tamen la ĝusta; spertojn li havis, ĉar lia proceso daŭris jam dum longa tempo, sed li pagis la spertojn multekoste. Subite K. ne plu eltenis rigardi la komerciston. „Ja konduku lin en la liton!“ li vokis al Leni, kiu ŝajne tute ne komprenis lin. Sed li mem volis iri al la advokato kaj per la nuligo de ties advokateco liberigi sin ne nur de li, sed ankaŭ de Leni kaj de la komercisto. Sed antaŭ ol li atingis la pordon, alparolis lin la komercisto per mallaŭta voĉo: „Sinjoro prokuristo“, K. turnis sin al li kun malica vizaĝo, „vi rompis vian

promeson“, diris la komercisto kaj etendiĝis petante de la sidloko sur la lito al K., „vi ankoraŭ volis diri sekreton al mi.“

„Efektive“, diris K. kaj ankaŭ turnis preteriran rigardon al Leni, kiu atenteme observis lin, „do aŭskultu: sed ĝi preskaŭ ne plu estas sekreto, mi iros nun al la advokato por nuli ties advokatecon.“

„Li nuligos lian advokatecon!“ vokis la komercisto kaj saltis supren de la fotelo kaj kuradis kun levitaj brakoj en la kuirejo tien kaj tien. Ĉiam denove li vokis: „Li nuligos lian advokatecon!“ Leni tuj volis ĵetiĝi sur sinjoron K., sed la komercisto baris la vojon, tial ŝi unufoje pugnobatis lin. Ankoraŭ kun la pugnigitaj manoj ŝi postkuris sinjoron K., sed tiu tre antaŭis. Li jam estis paŝinta en la ĉambron de la advokato, kiam Leni atingis lin. La pordon li preskaŭ fermis post si, sed Leni, kiu per piedo tenis malfermita la pordoduonon, kaptis lin ĉe brako kaj volis retiri lin. Sed li premis ŝian manartikon tiel forte, ke ŝi devis delasi lin kun ĝemo. Paŝi en la ĉambron ŝi ne tuj kuraĝis. Sed K. fermis la pordon per ŝlosilo.

„Mi atendas vin jam delonge“, diris la advokato el la lito, li metis skribaĵon, kiun li legis ĉe la lumo de kandelo, sur la noktoŝranketon kaj surmetis okulvitrojn, per kiuj li severe rigardis sinjoron K.

Anstataŭ peti pri pardono, diris K.: „Mi baldaŭ foriros.“

La advokato ne atentis la rimarkon, ĉar ĝi ne estis senkulpigo, kaj diris: „Estontece je tia malfrua horo mi ne plu akceptos vin.“

„Tio konvenas al mia intenco“, diris K.

La advokato rigardis lin demandeme. „Sidiĝu“, li diris.

„Ĉar vi deziras tion“, diris K., li tiris fotelon al la noktoŝranketo kaj sidiĝis.

„Ŝajnis al mi, ke vi fermŝlosis la pordon“, diris la advokato.

„Jes“, diris K., „mi faris pro Leni.“ Li ne havis la intencon

indulgi iun ajn.

Sed la advokato diris: „Ĉu ŝi denove estis trudiĝema?“

„Trudiĝema, ĉu?“ demandis K.

„Jes“, diris la advokato, li ridis, ektusetis, kaj kiam la tusado finiĝis, denove ridis. „Vi ja jam rimarkis ŝian trudiĝemon, ĉu?“ li demandis kaj frapis sur la manon de K., kiun tiu distrite apogis per la noktoŝranketo, kaj kiun li nun rapide fortiris.

„Vi ŝajne ne atribuas multe da signifo je tio“, diris la advokato, kiam K. silentis, „des pli bone. Alikaze mi eble devus senkulpigi min ĉe vi. Tio estas specialaĵo de Leni, kiun mi cetere jam delonge pardonis al ŝi kaj pri kiu mi ankaŭ ne parolus, se vi ĵus ne estus ferminta la pordon. Tiu specialaĵo, nu, al vi mi devus ja plej malmulte klarigi tiun, sed vi rigardas min tiel perplekse, kaj tial mi faras, tiu specialaĵo estas, ke Leni trovas, ke la plej multaj de la akuzitoj aspektas belaj. Ŝi pendigas sin al ĉiuj, amas ĉiujn, sed ŝajne ankaŭ estas amata de ĉiuj; por amuzi min, ŝi ĉeokaze parolas pri tio, se mi permesas tion al ŝi. Pri la

tuto mi ne estas tiel mirigita, kiel ŝajne vi estas. Se oni havas la ĝustan rigardon por tio, oni efektive ofte trovas, ke la akuzitoj estas belaj. Sed tio estas notinda, kvazaŭ naturscienca apero. Kompreneble sekve de la akuzo ne montriĝas klare ekkonebla tute precize difinebla ŝanĝo de la aspekto. Estas ja ne kiel ĉe aliaj juraj aferoj, la plej multaj restas en sia kutima vivmaniero, kaj, se ili havas bonan advokaton, kiu zorgas pri ili, ne estas malhelpataj de la proceso. Kaj tamen tiuj, kiuj spertas pri tio, kapablas ekkoni el granda amaso viron post viro la akuzitojn. Je kio? Vi demandos. Mia respondo ne kontentigos vin. La akuzitoj simple estas la plej belaj. Ne povas esti la kulpo, kiu beligas ilin, ĉar – tiel almenaŭ mi kiel advokato devas paroli – ja ne ĉiuj estas kulpaj, ankaŭ ne povas esti la ĝusta puno, kiu do beligas ilin, ĉar ja ne ĉiuj estas punataj, do povas kaŭzi tion nur nur la procesakuzo, kiu iel kroĉiĝis al ili. Tamen estas inter la beluloj ankaŭ precipe belaj. Belaj ili estas ĉiuj, eĉ Blok, la mizera vermhomo.“

K., kiam la advokato finis paroli, estis tute trankvila, li eĉ atentofrape kapjesis ĉe la lastaj vortoj kaj donis tiel al si

mem la konfirmon de sia malnova opinio, laŭ kiu la advokato ĉiam kaj ankaŭ ĉifoje provis deflankigi lin per ĝeneralaj sciigoj, kiuj ne apartenis al la afero, de la ĉefdemando, kion li faris kiel efektivan laboron por la afero de K. La advokato rimarkis certe, ke K. ĉifoje pli rezistis ol alitempe, ĉar li silentiĝis por doni al K. la eblon mem paroli kaj li demandis tiam, ĉar K. restis silenta: „Ĉu vi hodiaŭ venis kun certa intenco al mi?"

„Jes", diris K. kaj iom malintensigis permane la lumon de la kandelo por pli bone povi vidi la advokaton, „mi volis diri al vi, ke mi ekde hodiaŭ nuligas vian advokatan respondecon por mi."

„Ĉu mi komprenas vin bone?" demandis la advokato, sin je duono leviĝante de la lito kaj apogante sin per mano sur la kusenojn.

„Mi pensas, ke jes", diris K., kiu rigide rektiĝinte kvazaŭ embuske sidis.

„Nu, ni povos priparoli ankaŭ tiun planon", diris la advokato post certa tempo.

„Tio ne plu estas plano“, diris K.

„Povas esti“, diris la advokato, „ni tamen ne troigu la haston.“ Li uzis la vorton „ni“, kvazaŭ li ne havus la intencon liberigi sinjoron K. kaj kvazaŭ li volus, se li jam ne plu estu lia advokato, almenaŭ resti ties konsilisto.

„Ne estas troigita la hasto“, diris K., malrapide ekstaris kaj paŝis post la fotelon, „ĝi estas bone pripensita, kaj eble eĉ dum tro longa tempo. La decido estas definitiva.“

„Tiukaze permesu al mi ankoraŭ kelkajn vortojn“, diris la advokato, levis la litotukon kaj sidiĝis sur la litorandon. Liaj nudaj, blankhararaj gamboj tremis pro frido. Li petis sinjoron K. transdoni litkovrilon de la kanapo. K. alportis la kovrilon kaj diris: „Vi tute sennecese elmetas vin al fridetigo.“

„La kaŭzo estas sufiĉe grava“, diris la advokato, dum li vualigis per la litkovrilo sian supran korpoparton kaj poste vualis la gambojn en la kovrilon. „Via onklo estas mia amiko, kaj ankaŭ vi en la kuro de la tempo fariĝis

kara al mi. Mi koncedas tion tute publike, mi ne devas honti pri tio.“

Tiuj kortuŝaj vortoj de la maljuna viro estis tre malbonvenigata por K., ĉar ili devigis lin al pli detala klarigo, kiun li volonte evitus, kaj ili ankaŭ konfuzis lin, kiel li senkaŝe koncedis al si mem, kvankam ili tute ne povus nuligi lian decidon.

„Mi dankas al vi pro via afabla sinteno“, li diris, „mi ankaŭ rekonas, ke vi tre okupiĝis pri mia afero tiom, kiom eblis al vi, kaj kiel al vi ŝajnis avantaĝe por mi. Sed mi konvinkiĝis lastatempe, ke tio ne sufiĉas. Kompreneble mi neniam provos konvinki vin, tiom pli aĝan kaj tiom pli spertan viron, pri mia opinio; se mi kelkfoje senvole provis tion, mi petas pri via pardono, sed la afero estas, kiel vi esprimis tion mem, sufiĉe grava, kaj laŭ mia konvinko estas necese multe pli forte enmiksiĝi en la proceson ol tio okazis ĝis nun.“

„Mi komprenas vin“, diris la advokato, „vi estas senpacienca.“

„Mi ne estas senpacienca“, diris K. iom incitite kaj ne plu tiom atentante siajn vortojn. „Vi certe rimarkis dum mia unua vizito, kiam mi venis kun mia onklo al vi, ke la proceso ne tiom okupis min, se oni fakte perforte ne estus memorinta min pri ĝi, mi estus forgesinta ĝin tute. Sed mia onklo insistis pri tio, ke mi transdonu la advokatan reprezentadon al vi, mi faris tion, ĉar mi volis esti kompleza al li. Kaj poste oni ja devus atendi, ke la proceso ŝarĝos min eĉ malpli ol ĝis tiam, ĉar oni transdonas ja la respondecon al reprezentanto por iom forturni la ŝarĝon de proceso de si mem. Sed okazis la tuta malo. Neniam mi havis pli da zorgoj pri la proceso ol de tiam, kiam vi reprezentas min. Kiam mi estis sola, mi entreprenis nenion en mia afero, sed mi apenaŭ sentis tion, sed nun mi havis eĉ reprezentanton, ĉio estis aranĝita tiel, ke io okazu, seninterrompe kaj pli kaj pli streĉite mi atendis vian iniciaton, sed ĝi restis nefarita. Mi ja efektive ricevis de vi diversajn sciigojn pri la juĝejo, kiun mi eble povis ricevi de neniu alia. Sed tio ne povas sufiĉi al mi, ĉar la proceso nun sekrete ja kvazaŭ proksimiĝas pli kaj pli al mi.“ K. forpuŝis la fotelon de si kaj ekstaris rekte, kun la manoj en la ĵaketaj poŝoj.

„Ekde certa tempa momento de la praktiko“, diris la advokato mallaŭte kaj trankvile, „okazas nenio decide nova plu. Kiom da klientoj en similaj stadioj de la procesoj simile al vi staris antaŭ mi kaj parolis simile!“

„Tiukaze“, diris K., „ĉiuj ĉi similaj klientoj pravis same tiom, kiom mi. Tio tute ne refutas min.“

„Mi ne volis refuti vin per tio“, diris la advokato, „sed mi ankoraŭ volis aldoni, ke mi atendis ĉe vi pli da juĝforto ol ĉe aliaj, speciale tial, ĉar mi donis al vi pli da enrigardo en ĉion, kio koncernas la juĝejon kaj en mian agadon, ol mi faras tion kutime al klientoj. Kaj nun mi devas ekkoni, ke vi havas spite al ĉio ĉi ne sufiĉe da konfido al mi. Vi ne faciligas mian laboron.“

Kiom la advokato humiligis sin antaŭ K.! Sen ĉiu respekto al la ranga honoro, kiu certe en tiu punkto estas plej tikla. Kaj kial li faris tion? Laŭ la ŝajno li estis ja multokupata advokato kaj krome riĉa viro, nek enspezoperdo nek la perdo de kliento povis esti grava por li. Krome li estis malsaneta kaj mem devus atenti pri tio, ke laboro de li estu transdonita al aliaj. Kaj tamen li tiom kroĉiĝis al K.!

Kial? Ĉu estis persona kunsento por la onklo aŭ ĉu li vere rigardis la proceson de K. kiel eksterordinaran kaj esperis distingi sin aŭ por K,. aŭ – tiu eblo ja neniam tute ekskludeblis – por la amikoj ĉe la juĝejo? Je li mem nenio ekkoneblis, kiom ajn senrespekte K. kontrole rigardis lin. Oni preskaŭ povus pensi, ke li atendis kun intence fermita mieno la efikon de siaj vortoj. Sed li evidente juĝis la silenton de K. por si tro favore, dum li nun daŭrigis: „Vi certe rimarkis, ke mi ja havas grandan kancelarion, sed ne okupas helpantojn. Tio estis pli frue alie, estis tempo, kiam kelkaj junaj juristoj laboris por mi, nun mi laboras sola. Tio dependas parte de la ŝanĝiĝo en mia praktiko, per tio, ke mi pli kaj pli limigas min je juraj aferoj de la speco de via, kaj parte kun la pli kaj pli profunda ekkono, kiun mi ricevis de tiuj juraj aferoj. Mi trovis, ke mi translasu tiun laboron al neniu, se mi ne volas peki kontraŭ miaj klientoj kaj la takso, kiun mi transprenis. Sed la decido ĉiun laboron fari mem havis la naturajn sekvojn, ke mi devis rifuzi preskaŭ ĉiujn petojn esti reprezentanto kaj povis koncedi nur al tiuj, kiuj precipe kortuŝis min, – nu, ekzistas ja sufiĉe da fiuloj kaj eĉ tute proksime, kiuj ĵetiĝas sur ĉiun eron, kiun mi

forĵetas. Kaj krome mi fariĝis malsana pro trostreĉiĝo. Sed mi ne pentas pri mia decido, eblas, ke mi estus devinta rifuzi eĉ pli da reprezentoj ol mi faris, sed, ke mi tute sindediĉis al la transprenitaj procesoj, montriĝis kiel nepre necesa kaj pagiĝis per la sukcesoj. Mi iam trovis en skribo bele esprimita la diferencon, kiu estas inter reprezento de kutimaj juraj aferoj kaj inter reprezento de tiuj ĉi juraj aferoj. Legeblis tie: advokato kondukas sian klienton per kuntordita fadeno ĝis la verdikto, alia levis sian klienton tuj sur la ŝultrojn kaj portas lin, sen demeti lin, ĝis la verdikto kaj eĉ trans ĝin. Tiel estas. Sed ne estis tute ĝuste, ke mi diris, ke mi neniam pentas pri tiu granda laboro. Se ĝi, kiel en via kazo, estas tute misagnoskata, tiukaze, nu, tiukaze mi preskaŭ pentas pri ĝi.“

K. fariĝis pro tiuj paroloj pli senpacienca ol konvinkita. Li supozis iel elaŭdi el la paroltono de la advokato, kio okazus al li, se li cedus: denove komenciĝus konsoloj, la rimarkoj pri la progresanta petskribo, pri la plibonigita humoro de la juĝejaj oficistoj, sed ankaŭ pri la grandaj malfacilaĵoj, kiuj kontraŭmetiĝas al la laboro, – koncize

esprimite, ĉio ĉi konata ĝisgorĝe ripetiĝus por trompi K.-on per necertaj esperoj, kaj por turmenti lin per nedifinitaj minacoj. Tio lastfine estu finita, tial li demandis: „Kion vi faros en mia afero, se vi reprezentos min plu?“ La advokato obeis eĉ al tiu ofenda demando kaj diris: „Daŭrigi tion, kion mi jam entreprenis por vi“.

„Mi ja sciis“, diris K., „do nun ĉiu plua vorto estos superflua.“

„Mi ankoraŭfoje entreprenos provon“, diris la advokato, kvazaŭ tio, kio ekscitis sinjoron K., okazus al li kaj ne al K.

„Mi havas fakte la supozon, ke vi estas miskondukata ne nur al falsa prijuĝo de mia jura subteno, sed ankaŭ al via kroma miskonduto per tio, ke oni traktas vin, kvankam vi estas akuzito, tro bone aŭ pli ĝuste dirate, neglekteme, ŝajne neglekteme. Ankaŭ tio lasta havas sian kaŭzon; estas ofte pli bone esti en ĉenoj ol libera. Sed mi tamen volas montri al vi, kiel oni traktas aliajn akuzitojn. Eble vi sukcesos preni instruon el tio. Mi ja nun vokos Blokon ĉi tien, malriglu la pordon kaj sidiĝu ĉi tien apud la

noktoŝranketo!“

„Volonte“, diris K. kaj faris tion, kion la advokato postulis; li pretis lerni ĉiam. Sed por sekurigi sin por ĉiu kazo, li ankoraŭ demandis: „Sed vi ja notis, ke mi maldungis vin kiel mian reprezentanton, ĉu?“

„Jes“, diris la advokato, „sed vi ankoraŭ hodiaŭ povos senvalidigi tion.“ Li rekuŝigis sin en la liton, tiris la litaĵon ĝis la mentono kaj turniĝis al la vando. Poste li sonoris.

Preskaŭ samtempe kun la sonorila sonorado aperis Leni. Ŝi provis ekscii per rapidaj rigardoj, kio okazis; ke K. sidis trankvile ĉe la lito de la advokato, ŝajnis trankviliga al ŝi. Ŝi kapjesis ridete al K., kiu fikse rigardis ŝin.

„Alkonduku la ulon Blok“, diris la advokato. Sed anstataŭ alkonduki lin, ŝi paŝis nur antaŭ la pordon kaj vokis: „Blok! Al la advokato!“ kaj ŝi glitis tiam, verŝajne ĉar la advokato plu estis turniĝinta al la vando, kaj ne montris intereson, post la fotelon de K. Ŝi de nun ĝenis lin per tio, ke ŝi kliniĝis super la fotelan apogilon, aŭ per la manoj,

tamen tre tenere kaj atenteme karesis lian hararon, kaj tuŝis liajn vangojn. Fine K. provis malhelpi tion per tio, ke li prenis ŝin ĉe mano, kiun ŝi translasis al li post plurfoja rezisto.

Blok pro la alvoko tuj alvenis, sed restis staranta antaŭ la pordo kaj ŝajne pripensadis, ĉu li enpaŝu ĉu ne. Li levis la brovojn kaj klinis la kapon, kvazaŭ li aŭskultus ĉu ripetiĝos la ordono iri al la advokato. K. povus vigligi lin enpaŝi, sed li intencis definitive rompi la rilatojn ne nur kun la advokato, sed kun ĉiu, kiu estis ĉi tie en la loĝejo, kaj tial li kondutis senmove. Ankaŭ Leni silentis. Blok rimarkis, ke almenaŭ neniu forpelas lin kaj eniris sur la piedfingroj, kun malstreĉita vizaĝo, kun manoj kramfe kunkroĉitaj surdorse. La pordon li lasis malfermita por ebla retiriĝo. K.-on li eĉ ne rigardis, sed ĉiam nur la altan litkovrilon, sub kiu la advokato eĉ ne videblis, ĉar li tute ŝoviĝis al la vando. Sed tiumomente oni aŭdis lian voĉon: „Ĉu Blok tie?“ li demandis. Tiu demando donis al Blok, kiu moviĝis jam grandan distancon plu kvazaŭ puŝon en la bruston kaj poste puŝon en la dorson, li ŝanceliĝis, restis profunde kliniĝinte kaj diris: „Je via servo.“

„Kion vi volas?“ demandis la advokato, „vi aperas en la malĝusta tempo.“

„Ĉu mi ne estas vokita?“ demandis Blok pli sin mem ol la advokaton, li tenis protekte siajn manojn antaŭ si kaj estis preta forkuri.

„Vi estas vokita“, diris la advokato, „tamen vi aperas malĝustatempe.“ Kaj post paŭzo li aldondis: „Vi ĉiam aperas malĝustatempe.“ De kiam la advokato parolis, Blok ne plu rigardis al la lito, sed li rigardis ien en angulon kaj aŭskultis nur, kvazaŭ la aspekto de la parolanto estus tro blindiga, kvazaŭ li ne povus elteni ĝin. Sed ankaŭ la aŭskultado estis malfacila, ĉar la advokato parolis al la vando, kaj ja mallaŭte kaj rapide.

„Ĉu vi volas, ke mi foriru?“ demandis Blok. „Nun vi foje estas ĉi tie“, diris la advokato, „restu!“

Oni povus pensi, ke la advokato ne plenumis la deziron de Blok, sed minacis, ekzemple per batoj, Blokon, ĉar nun Blok efektive komencis tremi.

„Mi estis hieraŭ“, diris la advokato, „ĉe la Tria Juĝisto, jen

mia amiko, kaj iom post iom mi direktigis la interparoladon al vi. Ĉu vi volas scii, kion li diris?“

„Ho, mi petas pri tio“, diris Blok. Ĉar la advokato ne tuj respondis, Blok ankoraŭfoje ripetis la peton kaj kliniĝis, kvazaŭ li volus surgenuiĝi. Sed tiumomente K. atakis lin: „Kion vi faras?“ li vokis. Ĉar Leni volis malhelpi lian vokon, li prenis ankaŭ ŝian duan manon. Ne estis premo amema, per kiu li tenis ŝin, ŝi ĝemis ofte kaj provis detiri de li la manon. Sed por la voko de K. ricevis Blok la punon, ĉar la advokato demandis lin: „Nu, kiu estas via advokato?“

„Estas vi“, diris Blok.

„Kaj krom mi, ĉu?“ demandis la advokato.

„Neniu krom vi“, diris Blok.

„Tiukaze ankaŭ ne sekvu iun alian“, diris la advokato. Blok tute akceptis tion, li rigardis sinjoron K. per malicaj rigardoj kaj skuis vehemente la kapon kontraŭ li. Se oni tradukus tiun konduton en vortojn, tiukaze estus krudaj insultoj. Kun tia homo K. amikeme volis paroli pri la

propra afero! „Mi ne plu ĝenos vin“, diris K., apogante sin malantaŭen sur la fotelo. „Surgenuiĝu aŭ rampu sur la piedoj kaj la manoj, faru laŭplaĉe. Mi ne plu okupiĝos pri tio.“

Sed Blok havis tamen honorsenton, almenaŭ kontraŭ li, ĉar li iris renkonte al li kun minace svingataj pugnigitaj manoj kaj vokis tiom laŭte, kiom li kuraĝis tion proksime de la advokato: „Vi ne rajtas paroli tiel al mi, tio ne estas permesita. Kial vi ofendas min? Kaj krome eĉ ĉi tie antaŭ la sinjoro advokato, kie ni ambaŭ, vi kaj mi, estas tolerataj nur pro kompatemo. Vi ne estas pli bona homo ol mi, ĉar ankaŭ vi estas akuzita kaj havas proceson. Sed, se vi tamen estas sinjoro, ankaŭ mi estas tia sinjoro, se ne eble eĉ pli granda. Kaj mi ankaŭ volas esti alparolata kiel tia, ĝuste de vi. Sed se vi pensas vin preferata per tio, ke vi sidas ĉi tie kaj rajtas trankvile aŭskulti, dum mi, kiel vi esprimas vin, rampas sur miaj manoj kaj piedoj, tiukaze mi memorigas vin pri la malnova jura diro, ke por la suspektato la moviĝado estas pli bona ol la trankvilo, ĉar tiu, kiu ripozas, ĉiam povas esti, sen scii tion, sur pesilo kaj estis pesata rilate siajn pekojn.“ K. diris nenion, li

miris nur kun senmovaj okuloj pri tiu konfuzita viro. Kiom da ŝanĝoj jam nur en la lasta horo okazis al li! Ĉu estis la proceso, kiu ĵetis lin tiom tien kaj tien kaj ne permesis ekkoni al li, kie estas amiko kaj kie malamiko? Ĉu li vere ne vidis, ke la advokato intence humiligis lin kaj ĉifoje celis nenion alian krom fanfaroni antaŭ K. per sia potenco kaj per tio eble ankaŭ K.-on volis subigi? Sed se Blok ne estis kapabla ekkoni tion, aŭ se li timis la advokaton tiom, ke tiu ekkono ne povis helpi al li, kiel do okazis, ke li tamen estis tiel ruza aŭ tiel aŭdaca trompi la advokaton kaj prisilentigi al li, ke li krom li ankoraŭ aliajn advokatojn lasas labori por si? Kaj kiel li kuraĝis ataki sinjoron K., kvankam tiu tuj povus malkaŝi ties sekreton? Sed li kuraĝis eĉ pli, li iris al la lito de la advokato kaj komencis nun ankaŭ tie plendi pri K.: „Sinjoro advokato, ĉu vi aŭdis, kiel tiu viro parolis pri mi? Oni ankoraŭ povas nombri la horojn de lia proceso kaj tamen li jam volas instrui min, viron, kiu jam dum kvin jaroj troviĝas en proceso. Li eĉ insultas min. Li scias nenion kaj insultas min, kvankam mi precize studis, tiom, kiom sufiĉas miaj malgrandaj fortoj, kion postulas deco, devo kaj jura kutimo.“

„Afliktiĝu pri neniu“, diris la advokato, „kaj faru tion, kio ŝajnas ĝusta al vi.“

„Certe“, diris Blok, kvazaŭ li kuraĝigus sin mem, kaj surgenuiĝis kun mallonga flankrigardo tute proksime de la lito. „Mi jam surgenuas, advokato mia“, li diris. Sed la advokato silentis. Blok permane karesis delikate la litokovrilon. En la kvieto, kiu nun ekestis, diris Leni, dum ŝi liberigis sin de la mano de K.: „Vi dolorigas min. Lasu min. Mi iros al Blok.“ Ŝi iris al li kaj sidiĝis sur la litorandon. Blok pri ŝia alveno estis ĝojigita, li tuj petis ŝin per viglaj, sed senvortaj signoj, pledi ĉe la advokato por li. Li evidente tre bezonis la sciigojn de la advokato, sed eble nur por la celo eluzigi ilin de siaj ceteraj advokatoj. Leni sciis verŝajne detale, kiel oni sukcese povas influi la advokaton, ŝi montris al la mano de la advokato kaj pintigis la lipojn kvazaŭ por kiso. Tuj Blok kisis manon de la advokato kaj ripetis tion, kaj pro postulo de Leni ankoraŭ dufoje. Sed la advokato ankoraŭ silentis plu. Jen Leni kliniĝis al la advokato, la bela formo de ŝia korpo fariĝis videbla, kiam ŝi etendiĝis kaj, profunde klinita al lia vizaĝo, mankaresis la longan

blankan hararon de la advokato. Tio devigis lin nun tamen al respondo: „Mi hezitas sciigi ĝin al li“, diris la advokato, kaj oni vidis kiel li skuis iom la kapon, eble por iom pli partopreni la premon de la mano de Leni. Blok aŭskultis kun klinita kapo, kvazaŭ li transpaŝus per tiu aŭskultado leĝon.

„Nu, kial vi hezitas?“ demandis Leni. K. havis la senton, ke li aŭdas parkerigitan interparoladon, kiu ripetiĝis jam tiom ofte, kaj kiu ripetiĝos ankoraŭ ofte, kaj kiu nur por Blok ne povis perdi la novecon.

„Kiel li kondutis hodiaŭ?“ demandis la advokato anstataŭ respondi. Antaŭ ol Leni rimarkis ion pri tio, ŝi rigardis al Blok kaj observis lin dum certa tempo, kiel li levis la manojn al ŝi kaj petante frotis ilin reciproke. Fine ŝi kapjesis serioze, turnis sin al la advokato kaj diris: „Li estis trankvila kaj fervora.“ Malnova komercisto, viro kun longa barbo, petegis junan inon pri favora atesto. Eble li havis kaŝitajn pensojn, sed nenio povis pravigi lin antaŭ kunhomo. K. ne komprenis, kiel la advokato povis pensi, ke li gajnos lin per tiu prezento. Se li jam pli frue ne estus forpelinta lin, li atingus tion per tiu scenaro. Li preskaŭ

senhonorigis la spektanton. Tiel efikis do la metodo de la advokato, al kiu K., bonŝance ne estis elmetita sufiĉe longe, ke la kliento fine forgesis la tutan mondon kaj nur per tiu erarvojo esperis plu povi treni sin ĝis la fino de la proceso. Tiu ne plu estis kliento, li estis la hundo de la advokato. Se tiu ordonus al li rampi sub la liton kiel en hundokabanon, kaj de tie boji, li farus tion kun ĝojo. Kvazaŭ K. estus komisiita, ĉion, kio tie estis priparolata,precize memorteni kaj je pli alta loko sciigi tion per raporto, li aŭskultis skeptike kaj supere.

„Kion li faris dum la tuta tago?“ demandis la advokato. „Mi enfermis lin“, diris Leni, „por ke li ne ĝenu min dum la laboro, en la ĉambristinan ĉambron, kie li ja kutime restadas. Tra la fendo mi povis observi de tempo al tempo, kion li faras. Li ĉiam surgenuis enlite, li malfermis la skribaĵojn, kiujn vi pruntedonis al li, sur la fenestrobreto, kaj legadis ilin. Tio faris bonan impreson al mi, la fenestro kondukas ja nur en aerŝakton, kaj preskaŭ ne donas lumon. Ke Blok tamen legis, montris al mi, kiel obeema li estas.“

„Ĝojigas min aŭdi tion“, diris la advokato. „Tamen, ĉu li

legis ankaŭ kun komprenemo?“ Blok movis dum tiu parolado seninterrompe la lipojn, evidente li formis la respondojn, kiujn li esperis de Leni.

„Tion mi kompreneble ne povas respondi kun certeco“, diris Leni. „Ĉiukaze mi vidis, ke li legis detale. Dum la tuta tago li legis la saman paĝon kaj ĉe la legado kondukis la fingrojn laŭ la linioj. Ĉiam, se mi rigardis internen al li, li ĝemis, kvazaŭ la legado tre penigus lin. La skribaĵoj, kiujn vi pruntedonis al li, verŝajne estas malfacile kompreneblaj.“

„Jes“, diris la advokato, „tiaj ili efektive estas. Mi ankaŭ ne supozas, ke li komprenas ion el ili. Ili donu al li nur divenon, kiel malfacila estas la batalo, kiun mi entreprenas por lia defendo. Kaj por kiu mi kondukas tiun pezan batalon? Por – estas preskaŭ ridinde elparoli tion – por Blok. Ankaŭ, kion signifas tio, li ekkomprenu. Ĉu li studis seninterrompe?“

„Preskaŭ seninterrompe“, respondis Leni, „nur unufoje li petis min pri trinkakvo. Jen mi donis al li glason tra la luko. Je la dudeka mi poste ellasis lin kaj donis iom da

manĝo al li.“

Blok tuŝis sinjoron K. per flankrigardo, kvazaŭ ili tie parolus ion glorigan pri li, kio ankaŭ sinjoron K. devus impresi. Li tiumomente ŝajne havis bonajn esperojn, li moviĝis pli libere kaj surgenue iris tien kaj tien. Des pli klare montriĝis, kiel li rigidiĝis sub la sekvaj vortoj de la advokato.

„Vi laŭdas lin“, diris la advokato.

„Sed ĝuste tio malfaciligas la paroladon al mi. La juĝisto ja ne favore parolis, nek pri Blok mem, nek pri lia proceso.“

„Ne favore, ĉu?“ demandis Leni. „Kiel tio eblas?“ Blok rigardis ŝin per tiom streĉita rigardo, kvazaŭ li konfidus al ŝi la kapablon ankoraŭ nun turni la delonge elparolitajn vortojn de la juĝisto je sia favoro.

„Ne favore“, diris la advokato. „Li estis eĉ tre malagrable tuŝita, kiam mi komencis paroli pri Blok. ‚Ne parolu pri Blok‘, li diris. ‚Li estas kliento mia‘ diris mi. ‚Vi lasas misuzi vin‘, li diris. ‚Mi ne pensas, ke lia afero estas

perdita‘, diris mi. ‚Vi lasas misuzi vin‘, li ripetis. ‚Tion mi ne pensas‘, diris mi.‘Blok en sia proceso ĉiam diligentas kaj ĉiam okupiĝas pri sia afero. Li preskaŭ loĝas ĉe mi, por ĉiam esti informita pri la aktuala. Tian fervoron oni ne trovas ofte. Certe, persone li ne estas agrabla, li havas fiajn kondutmanierojn kaj estas malpura, sed en procesa rilato li ne estas riproĉinda.‘ Mi diris, ke neriproĉinda, mi troigis intence. Pri tio li diris: ‚Blok estas nur ruza, li kolektis multajn spertojn kaj komprenas hezitigi la proceson. Sed lia senscieco estas eĉ multe pli granda ol lia ruzo. Kion li dirus, se li ekscius, ke lia proceso ankoraŭ tute ne komenciĝis, se oni dirus al li, ke eĉ la sonorilsigno por la komenco de la proceso ankoraŭ ne estas farita?‘

„Trankvilu, Blok“, diris la advokato, ĉar Blok ĝuste komencis leviĝi per ŝanceliĝantaj genuoj. Kaj evidente li volis peti pri klarigo. Estis tiam la unua fojo, ke la advokato turnis sin per detalaj vortoj rekte al Blok. Per lacaj okuloj li rigardis parte sencele, parte malsupren al Blok, kiu sub tiu rigardo sinkis denove surgenuen.

„Tiu rimarko de la juĝisto havas por vi tute neniun signifon“, diris la advokato. „Ja ne ektimu ĉe ĉiu vorto. Se

tio ripetiĝas, mi perfidos tute nenion plu al vi.Mi ne povas komenci frazon sen tio, ke vi rigardas min, kvazaŭ venus nun via finverdikto. Hontu ĉi tie antaŭ mia kliento! Krome vi skuigas la konfidon, kiun li havas al mi. Ja kion vi celas? Ankoraŭ vi vivas. Ankoraŭ vi troviĝas sub mia protekto. Sensenca timo! Vi ie legis, ke la finverdikto en kelkaj kazoj okazas senpere, el iu ajn buŝo, je iu ajn tempo. Kun multaj limigaj kondiĉoj tio efektive estas vera, sed same tiom vere estas, ke via timo naŭzas min, kaj ke mi rigardas tion kiel mankon de necesa konfido. Ja kion mi diris? Mi redonis la rimarkon de juĝisto. Vi scias, ke la diversaj opinioj amasiĝas en proceduro ĝis nepenetreblo. Tiu juĝisto por ekzemplo supozas la komencon de la proceduro je alia tempomomento ol mi. Jen opiniodiferenco, nenio pli. En certa stadio de la proceso oni donas laŭ malnova uzo sonorilsignon. Laŭ la opinio de la juĝisto per tio komenciĝas la proceso. Mi nun ne povas diri al vi ĉion, kio kontraŭas al tio, vi ankaŭ ne komprenus tion, sufiĉu al vi, ke multaj aferoj kontraŭas al tio.“

Embarasite Blok movis malsupre siajn fingrojn tra la felo

de la apudlita tapiŝeto, la timo pro la diro de la juĝisto forgesigis al li dum certa tempo la propran obeemon rilate al la advokato, li pensis tiumomente nur pri si kaj turnis la vortojn de la juĝisto en ĉiuj direktoj.

„Blok“, diris Leni kun averta tono kaj tiris lin je la kolumo iom alten „Lasu nun la felon kaj aŭskultu la advokaton.“

(Tiun ĉapitron Kafka ne finis.)

# Naŭa ĉapitro

## En la katedralo

K. ricevis la komision montri al itala negocisto de la banko, kiu estis tre grava por ili kaj je la unua fojo restadas en la urbo, kelkajn artmonumentojn. Estis komisio, kiu je alia tempo certe estus rigardata kiel honoro de li, sed kiun li nun transprenis nur kontraŭvole, dum li jam povis konservi nur kun granda peno sian reputacion en la banko. Ĉiu horo, kiun li estis forigita de la oficejo, afliktis lin; kvankam li tute ne plu kapablis eluzi sian oficejan tempon tiom, kiom pli frue, ofte li pasigis la horojn apenaŭ per efektiva laboro, sed des pli grandaj estis liaj zorgoj, se li ne estis en la oficejo. Li supozis tiam vidi kiel la vicdirektoro, kiu ja ĉiam embuskis, venas de tempo al tempo en la oficejon, kiel li sidiĝas antaŭ ties skribotablo, rastas ties skribaĵojn, kiel li akceptas klientojn, kun kiuj K. jam delonge havis amikajn rilatojn, kaj kiel li forlogas ilin, ja kiel li eble eĉ malkovras erarojn, kiuj minacis sinjoron K. laŭ ties kompreno nun ĉiam en mil diversaj direktoj, kaj kiujn li ne povis eviti

plu. Do, se li estis komisiita en tiu tempo, eĉ se tio estis distinga, je negoca promeno aŭ je vojaĝeto – tiaj komisioj en la lasta tempo tute hazarde amasiĝis – tiukaze almenaŭ verŝajnis la supozo, ke oni volas forigi lin dum certa tempo el la oficejo kaj kontroli lian laboron, aŭ ke oni almenaŭ rigardas lin en la oficejo facile malhavebla. La plej multajn komisiojn li estus povinta rifuzi senprobleme, sed li ne kuraĝis fari tion, ĉar tiukaze, se lia supozo estus eĉ nur plej ete rajtigita, la rifuzo de la komisio signifus timon. Tial li akceptis tiajn komisiojn ŝajne indiferente kaj prisilentigis eĉ gravan malvarmumon, kiam li estis komisiita entrepreni dutagan negocvojaĝon, por ja ne elmeti sin al la danĝero pro la referenco pri la reganta pluva aŭtuna vetero esti detenita de la vojaĝo. Reveninte de tiu vojaĝo kun furiozaj kapdoloroj, li eksciis, ke li estas destinita akompani je la sekva tago la italan negocamikon. La tento almenaŭ ĉifoje rifuzi la komision estis tre granda, unuavice tio, kio tiukaze estis destinita al li, ne estis laboro senpere ligita kun lia negoco, sed la plenumo de tiu societa devo al la negoca amiko estis sendube sufiĉe grava, nur ne por K., kiu sciis bone, ke li povas teni sin en la ofico nur per

laboraj sukcesoj, kaj ke tiukaze, se tio ne sukcesus al li, ĝi estus komplete senvalora, se li neatendite povus eĉ prisorĉi tiun italon; li volis esti forigita eĉ ne dum unu tago el la laborejo, ĉar la timo ne povi reiri estis tro granda, jen timo, kiun li tre precize rekonis kiel troigitan, sed kiu tamen limigis lin. Sed en tiu kazo estis preskaŭ neeble eltrovi akcepteblan kaŭzon de rifuzo. Kvankam la scipovo de la itala fare de K. ne estis tre granda, ĝi estis almenaŭ sufiĉa; sed la decida estis, ke K. el pli frua tempo havis kelkajn artteoriajn sciojn, kio ekstreme troigite fariĝis konata en la banko per tio, ke K. dum certa tempo, cetere ankaŭ nur pro negocaj aferoj, fariĝis membro de la Unuiĝo por la konservado de la urbaj artmonumentoj. Sed la italo, kiel oni eksciis onidire, estis artŝatanto. Kaj la elekto de la akompanonto estis tial memkomprenebla.

Estis tre pluva, ŝtorma mateno, kiam K., plena pri ĉagreno pri tio, kio atendos lin, iris jam je la sepa en la oficejon por plenumi ankoraŭ almenaŭ kelke da laboro antaŭ ol la vizitonto forprenos lin de ĉio ĉi. Li estis tre laca, ĉar li pasigis duonon de la nokto pe la studado de la itala gramatiko por iom antaŭprepari sin; la fenestro ĉe

kiu li sidis dum la lasta tempo tro ofte, logis lin pli ol lia skribotablo, sed li rezistis la tenton kaj sidiĝis al la laboro. Bedaŭrinde ĝuste servisto envenis kaj sciigis a li, ke la sinjoro direktoro sendis lin por ke li rigardu, ĉu la sinjoro prokuristo jam ĉeestas; se tiel estus, li estu tiel afabla transveni en la akceptejon, ĉar la sinjoro el Italio jam alvenis.

„Mi tuj survojiĝos al li", diris K., li enpoŝigis vortareton, prenis subbraken albumon de urbaj sciindaĵoj, kiun li preparis por la fremdulo, kaj iris tra la oficejo de la sinjoro viprezidanto en la ĉambron de la direktoro. Li estis feliĉa pri tio, ke li venis tiom frue en la oficejon, kaj tuj estis je dispono, kion certe neniu atendis serioze de li. La oficejo de la vicdirektoro esti kompreneble ankoraŭ vaka kiel en plej profunda nokto, verŝajne la servisto ankaŭ lin devis voki en la akceptejon, sed tio ne sukcesis. Kiam K. paŝis en la akceptejon, leviĝis du sinjoroj el profundaj brakfoteloj. La direktoro ridetis afable, evidente li estis tre ĝojigita pri la alveno de K., li tuj transprenis la prezentadon, la italo skuis forte la salutmanon de K. kaj nomis ridetante iun frumatena

ellitiĝanto. K. ne precize komprenis, kiun li opiniis, tio estis krome stranga vortkombino, kies sencon li divenis nur post certa tempo. Li respondis per kelkaj glataj frazoj, kiujn la italo siaflanke dankante akceptis, dum kio li viŝis plurfoje nervoze permane siajn grizbluajn, hartufajn lipoharojn. Tiuj lipoharoj estis evidente parfumitaj, oni preskaŭ estis tentata proksimiĝi kaj odori. Kiam ĉiuj jam sidiĝis kaj malgranda enkondukanta interparolado komenciĝis, rimarkis K. kun granda malplaĉo, ke li komprenas la italon nur fragmente. Se li parolis tute trankvile, li komprenis lin preskaŭ komplete, sed tio estis nur raraj esceptoj, plej ofte fontis la parolado el lia buŝo, li skuis tiam la kapon kvazaŭ plena de ĝojo pri tio. Sed ĉe tiaj paroladoj li implikiĝis ĉiam denove en iun dialekton, kiu havis por K. nenion italan plu, kiun la direktoro tamen ne nur komprenis, sed eĉ parolis, kion K. ja estus povinta diveni jam antaŭe, ĉar la italo devenis el la suda Italio, kie ankaŭ la direktoro loĝis kelkajn jarojn. Ĉiukaze ekkonis K., ke la ebleco interkompreniĝi kun K. plej parte estis prenita de li, ĉar ankaŭ ties franca estis nur apenaŭ komprenebla, krome kaŝis la lipoharoj la lipomovojn, kies aspekto eble helpus kompreni lin. K. komencis antaŭvidi

multajn malagrablaĵojn, provizore li rezignis pri tio voli kompreni la italon – en la ĉeesto de la direktoro, kiu tiel facile komprenis lin, tio estus nenecesa peno, kaj li limigis sin pri tio grumble observi kiel li profunde, sed tamen leĝere ripozis en la brakfotelo, kiel li ofte tiris sian mallongan, akre trancitan jaketon kaj kiel li foje provis prezenti per levitaj brakoj kaj perartike loze movataj manoj ion, kion K. ne povis kompreni, kvankam li antaŭklinite ne lasis neobservataj la manojn. Fine ekrimarkeblis la pli frua laceco je K., kiu, krome senokupate, sekvis nur per mekanikaj rigardoj la tien kaj tien-iradon de la paroloj, kaj kvazaŭ surprizis sin ektimigite bonŝance ankoraŭ sufiĉe frutempe ĉe tio, kiel li distrite volis ekstari, forturniĝi kaj foriri. Fine la italo rigardis la horloĝon kaj eksaltis. Adiaŭinte de la direktoro, li urĝis sinjoron K. tiom, kaj tiom proksimiĝis al li, ke K. devis retroŝovi sian brakfotelon por povi moviĝi. La direktoro, kiu certe je la okuloj de K. rimarkis la urĝitecon de K., en kiu li troviĝis kontraŭe al tiu itala, miksiĝis en la interparoladon, kaj eĉ tiel prudente kaj tiel delikate, ke ĝi vekis la ŝajnon kvazaŭ li aldonas nur konsiletojn, dum li komprenigis envere tute koncize al K.

ĉion, kion la italo, nelacigeble interrompante lian parolon, sciigis. K. eksciis de li, ke la italo provizore ankoraŭ devos plenumi kelkajn negocajn aferojn, ke li bedaŭrinde havos ankaŭ entute nur malmulte da tempo, ke li krome neniel intencas rapide kuradi al ĉiuj vizitindaĵoj, ke li male decidis viziti nur la katedralon, sed tiun tute detale – tamen nur tiukaze, se K. konsentos tion, ĉar la lasta decido dependos do tute de li – ke li tre ĝojas povi entrepreni tiun viziton akompanata de tia erudicia kaj ĉarma viro – tio celis sinjoron K., kiu estis okupata pri nenio alia krom preteraŭdi la italon kaj rapide kapti la vortojn de la direktoro – ke li petas lin, se la tempo estos plaĉa al li, aperi post du horoj, do ĉirkaŭ je la deka, en la katedralo. Ke li esperas jam povi esti tie tute certe je tiu tempo. K. laŭ tio respondis tion kaj tion, la italo prenis unue manon de la direktoro, poste de K., tiam ankoraŭfoje manon de la direktoro kaj iris sekvate de ambaŭ, nur parte plu turnate al ili, sed ankoraŭ nun ne ĉesante la paroladon, al la pordo. K. restis poste ankoraŭ dum iom da tempo ĉe la direktoro, kiu ĝuste tiutage aspektis tre suferanta. Li supozis, ke iel li devas senkulpigi sin ĉe K. kaj diris tial– ili kunstaris konfideme

proksime – ke li unue intencis mem akompani la italon, sed poste – li ne sciigis iun pli detalan kaŭzon – decidis prefere sendi sinjoron K. Ke tiukaze, se li ne tuj komprenos la italon dekomence, li ne perpleksiĝu pri tio, ke la kompreno komenciĝos tre rapide, kaj ke tiukaze, se li apenaŭ komprenos ion, tio ne estos granda problemo, ĉar por la italo ne tre gravas, ĉu oni komprenas lin. Ke cetere la itala de K. estas surprize bona, kaj ke li certe bonege majstros la aferon. Per tio li jam adiaŭis sinjoron K. La tempo, kiu ankoraŭ restis al li, li pasigis per tio noti maloftajn vokablojn el vortaro, kiun li bezonis por la ĉiĉeronado en la katedralo. Tio estis tre molesta laboro, servistoj alportis poŝtaĵojn, oficistoj aperis kun diversaj demandoj kaj ekstaris ĉe la pordo, ĉar ili vidis, ke li estas okupata, sed ili ne formoviĝis antaŭ ol K. aŭskultis ilin, la vicdirektoro ne preterlasis la okazon ĝeni sinjoron K., li ofte envenis, prenis la vortaron el la mano de K. kaj foliumis evidente tute sensence en ĝi; eĉ klientoj, se malfermiĝis la pordo, aperis en la duonlumo de la antaŭĉambro kaj kliniĝis heziteme – ili volis atentigi pri si, sed ne certis pri tio, ĉu oni vidas ilin–, ĉio ĉi moviĝis ĉirkaŭ K., kvazaŭ li estus la mezpunkto, dum li mem

kunmetis la vortojn bezonatajn, poste serĉis ilin en la vortaro, poste notis ilin, ekzercis ties prononcadon kaj fine provis parkerigi ilin. Sed lia pli frua bona memorkapablo ŝajne tute forlasis lin, kelkfoje li fariĝis tiom kolera pri la italo, kiu kaŭzis tiun penon al li, ke li kaŝis la vortaron sub paperoj, kun la firma intenco ne plu antaŭprepari sin, sed poste li reakceptis, ke li ja ne povos iri silente kun la italo tien kaj tien antaŭ la artverkoj en la katedralo, kaj kun eĉ pli granda kolero li denove eltiris la vortaron.

Precize je la naŭa kaj duono, kiam li volis foriri, sekvis telefonvoko. Leni deziris al li bonan matenon kaj demandis pro lia farto. K. dankis haste kaj rimarkis, ke li nun tute ne povas akcepti interparoladon, ĉar li devas iri en la katedralon.

„En la katedralon, ĉu?“ demandis Leni.

„Nu jes, en la katedralon.“

„Kial en la katedralon?“ demandis Leni. K. provis klarigi tion koncize al ŝi, sed apenaŭ li komencis per tio, Leni

diris, „ili ĉasas vin.“ Bedaŭron, kiun li ne postulis kaj ne atendis, K. ne povis elteni. Li adiaŭis sin per du vortoj, sed diris tamen, dum li rependigis la aŭskultilon en ties lokon, parte al si mem kaj parte al la fora knabino, kiu jam ne aŭdis lin: „Jes, ili ĉasas min.“

Sed nun jam estis malfrue, estis preskaŭ jam la danĝero, ke li malfruiĝos. Per aŭtomobilo li veturis tien, en la lasta momento li ankoraŭ memoris pri la albumo, kiun transdoni li frue matene ne trovis la okazon, kaj kiun li tial nun kunprenis. Li tenis ĝin sur siaj genuoj kaj maltrankvile tamburis sur ĝi dum la tuta veturo. La pluvo fariĝis pli malforta, sed la vetero estis malseka, frideta kaj morna, en la katedralo oni ne vidos multon, sed certe tie, sekve de la longa starado sur la fridaj kaheloj, fariĝos la malvarmumo de K. tre aĉa. La katedrala placo estis tute senhoma. K. memoris, ke jam en la infanaĝo tio frapis lian atenton, ke en la domoj de tiu malvasta loko preskaŭ ĉiam ĉiuj fenestraj kurtenoj estis ruligitaj malsupren. Ĉe la aktuala vetero ĝi tamen certe estis pli kompreneble ol krome. Ankaŭ en katedralo ŝajne estis neniu, kompreneble ekhavis neniu la ideon veni al ĉi tie. K.

trapaŝis ĉiujn flankajn navojn, li renkontis nur maljunulinon, kiu, vualite en varman tukon, surgenuis antaŭ bildo de Maria kaj rigardis ŝin. El granda distanco li ankoraŭ vidis, kiel lamira servisto malaperis en mura pordo. K. venis ĝustatempe, ĵus, kiam li envenis, batis la sonorilo la dekan, sed la italo ankoraŭ ne ĉeestis. K. retroiris al la ĉefa enirejo, staris tie dum certa tempo sendecide, kaj poste iris en la pluvo ĉirkaŭ la katedralon por rigardi, ĉu la italo eble atendas ĉe flanka enirejo. Li troveblis nenie. Ĉu la direktoro eble miskomprenis la tempindikon? Ja kiel kompreni tiun homon ĝuste? Kiel ajn estis, ĉiukaze K. devis atendi lin almenaŭ dum duono de horo. Ĉar li estis laca, li volis sidiĝi, li iris denove en la katedralon, li trovis sur ŝtupo malgrandan tapiŝecan ŝiraĵon, li tiris ĝin per piedpinto antaŭ proksiman benkon kaj volviĝis pli firme en la mantelon, li faldis la kolumon supren kaj sidiĝis. Por distri sin, li malfermis la albumon, foliumis iom en ĝi sed baldaŭ devis ĉesi, ĉar fariĝis tiom tenebre, ke, kiam li rigardis supren, en la proksima flanknavo li apenaŭ povis ekkoni detalon.

Malproksime radiis sur la ĉefa altaro granda triangulo de

kandelaj lumoj. K. ne povus diri kun certeco, ĉu li jam pli frue vidis ilin.

Eble ili estis lumigataj nur nun. La katedralaj servistoj estas profesiaj ŝtelirantoj, oni ne rimarkas ilin. Kiam K. hazarde turniĝis, li vidis ne malproksime de si altan, fortan je kolono pendigitan kandelon, kiu same brulis. Tiel bele, kiel tio estis, ĝi tamen tute ne sufiĉis prilumigi la altarbildojn, kiuj plej ofte pendis en la tenebro de la flankaltaroj, male ĝi kvazaŭ plifortigis la tenebron. La italo agis kaj prudente kaj malĝentile per tio, ke li ne aperis, sed estus videbla nenio, ili devus kontentiĝi per elektra poŝlampo de K. rasti kelkajn bildojn colon post colo. Por provi, kio atendeblus de tio, iris K. al proksima flanka kapelo, grimpis kelkajn ŝtupojn ĝis malalta marmorbalustrado, kaj trans ĝin kliniĝinte, li prilumis per la lampo la altarbildon. Ĝenante ŝvebis la eterna lumo antaŭ ĝi. La unua, kion K. vidis kaj parte divenis, estis granda kirasita kavaliero, kiu estis prezentata je la ekstrema rando de la bildo. Li apogis sin sur sian glavon, kiun li puŝis en la platan teron antaŭ si – nur kelkaj

herbotigoj tie kaj tie montriĝis. Li ŝajne atenteme observis okazaĵon, kiu deruliĝas antaŭ liaj okuloj. Estis mirige, ke li tiel haltis kaj ne proksimiĝis. Eble estis lia tasko gardostari. K., kiu jam dum longa tempo ne plu vidis bildojn, rigardis la kavalieron dum pli longa tempo, kvankam li ĉiam devis okulumi, ĉar li ne eltenis la verdan lumon de la lampo. Kiam poste li glitigis la lumbrilon trans la ceteran parton de la bildo, li trovis entombigon de Kristo laŭ kutima maniero, cetere ĝi estis pli novdata bildo. Li enpoŝigis la lampon kaj reiris denove al sia loko.

Estis nun ŝajne jam nenecese plu atendi la italon, sed ekstere certe torente pluvis, kaj ĉar en la katedralo ne estis tiel fride, kiel K. atendis, li decidis, provizore restadi tie. Najbarece al li troviĝis la granda predikejo, sur kies malgranda ronda tegmento estis metitaj du duone kuŝantaj vakaj oraj krucoj, kiuj per sia plej supra pinto reciproke transiĝis. La ekstera vando de la balustrado kaj la transiro al portanta kolono, estis formitaj de verda foliaro, en kiun anĝeletoj metis siajn manojn, baldaŭ vigle baldaŭ ripoze. K. paŝis antaŭ la predikejon kaj esploris ĝin de ĉiuj flankoj, la prilaborado de la ŝtono estis tre

detala, la morna malhelo inter la foliaro kaj post li ŝajnis kvazaŭ kaptita kaj firmtenita, K. metis manon en iun el la malplenaĵoj kaj atenteme palpis la ŝtonon, de la ĉeesto de tiu predikejo li ĝis tiam eĉ ne sciis ion. Jen li rimarkis hazarde en la sekva bankovico katedralan serviston, kiu staris en pendanta faldita nigra vesto, kiu tenis en la maldekstra mano snufan tabakujon kaj observis lin. Kion celas la viro? pensis K. Ĉu mi estas suspekta al li? Ĉu li celas obolon? Sed eksentante sin rimarkata de K., la katedrala servisto signis per la dekstra mano, inter du fingroj li ankoraŭ tenis pinĉprenon de la tabako, en iu necerta direkto. Lia konduto estis preskaŭ nekomprenebla, K. atendis ankoraŭ iom da tempo, sed la katedrala servisto ne ĉesis signi ion permane kaj ankoraŭ plifortigis la signon per kapjesado.

„Kion li do volas?“ demandis K. mallaŭte, li ne kuraĝis voki ĉi tie; sed poste li eltiris la monujon kaj ŝoviĝis tra la sekva benko por atingi la viron. Sed tiu tuj faris permane rifuzan movon, li levis la ŝultrojn kaj lamire foriĝis. Per simila irmaniero, kia estis tiu hasta lamirado, K. kiel infano provis imiti la rajdadon sur ĉevaloj.

„Jen infaneca maljunulo“, pensis K., „lia menso sufiĉas plu nur por la katedrala servo. Kiel li haltas, kiam mi haltas, kaj kiel li embuskas, ĉu mi intencas iri plu.“

Ridetante sekvis K. la maljunulon tra la tuta flanka navo ĝis la ĉefaltaro, la maljunulo ne ĉesis montri ion, sed K. intence ne turniĝis, ties montrado ne havis alian sencon krom deturnigi lin de la spuro de la maljunulo. Fine li vere delasis lin, li ne volis tro timigi lin, krome li volis ne tute forpeli la aperinton, por la kazo, ke la italo tamen ankoraŭ envenos.

Paŝante en la ĉefan navon por serĉi la sidlokon, sur kiu li lasis kuŝi sian albumon, li rimarkis je kolono preskaŭ aliĝanta al la benkoj de la altarĥorejo malgrandan apudpredikejon, tute simplan el senornama pala ŝtono. Ĝi estis tiom malgranda, ke ĝi aspektis el la malproksimo kiel ankoraŭ vaka niĉo, kiu estis rezervita por la prezento de sanktula statuo. La predikisto certe ne povis retroiri tutan paŝon de la balustrado. Krome la ŝtona volbiĝo de la predikejo komenciĝis nekutime malalte kaj leviĝis, kvankam sen ĉiu ornamo, tiel komete alten, ke mezgranda viro tie ne povis stari rekte, sed daŭre devis

kliniĝi antaŭen trans la balustradon. La tuto celis kvazaŭ la turmentigon de la predikisto, ĝi estis nekomprenebla por kio oni bezonis tiun predikejon, ĉar oni havis ja je dispono la alian, la grandan kaj tiel artplene ornamitan.

Ankaŭ tiu malgranda predikejo ne estus frapinta la atenton de K., se supre ne estus fiksita lampeto, kian oni kutime disponigas mallonge antaŭ prediko. Ĉu nun eble okazu prediko? En la senhoma preĝejo, ĉu? K. rigardis malsupren laŭ la ŝtuparo, kiu, kvazaŭ karese alpremanta sin al la kolono, kondukis al la predikejo kaj estis tiel malvasta, kvazaŭ ĝi volus servi ne al homoj, sed nur kiel ornamo de la kolono. Sed malsupre ĉe la kolono, K. ridetis pro miro, staris efektive ekleziulo, kun mano sur la balustrado kaj preta grimpi supren, li rigardis al K. Poste li klinetis perkape, pro kio K. krucosignis sin kaj kliniĝis, kion li estu farinta jam pli frue. La ekleziulo donis al si svingeton supren kaj grimpis per etaj rapidaj paŝoj predikejen. Ĉu vere komenciĝu prediko? Ĉu eble la katedrala servisto tamen ne estis tute forlasita de la menso kaj intencis peli sinjoron K. al la predikisto? Tio estis ja certe tute necesa en la senhoma katedralo. Cetere,

estis ja ie antaŭ la altarbildo de Maria maljunulino, kiu venu ankaŭ. Kaj se jam estu prediko, kial ĝi ne estas enkondukata de orgeno? Sed ĝi restis kvieta kaj trembrilis nur malforte el la tenebro de sia granda alto.

K. pensis pri tio, ĉu li nun rapide malaperu; se li ne farus tion nun, ne estus perspektivo, ke li povus fari tion dum la prediko, tiukaze li devus resti tiom longe, kiom ĝi daŭros. En la ofico li perdis tiom da tempo; li tute ne plu estis devigita atendi la italon, li rigardis al la horloĝo, estis la dekunua. Sed ĉu vere prediko eblus? Ĉu K. sola povus prezenti la komunumon? Kiel, se li estus nur fremdulo, kiu nur intencas viziti la katedralon? Esence li ja ne estis iu alia. Estis sensence pensi pri tio, ke nun sekvu prediko, nun, je la dekunua, je labortago, ĉe tia terura vetero. La ekleziulo – ekleziulo li estis sendube, juna viro kun glata morna vizaĝo, – iris evidente supren nur tial por estingi la lampon, kiu erare estis ekbruligita.

Sed ne estis tiel, la ekleziulo male kontrolis la lumon, kaj ankoraŭ iom malfermŝraŭbis ĝin, poste li lante turniĝis al la balustrado, kiun li manprenis per ambaŭ manoj je la eĝa ĉirkaŭbarado. Tiel li staris dum certa tempo kaj

ĉirkaŭrigardis, sen movi la kapon. K. retroevitis granddistance kaj apogis sin per kubuto sur la plej antaŭa katedrala benko. Per necertaj okuloj li vidis ie, sen precize difini la lokon, la katedralan serviston, kiu kun kurbigita dorso, pace kiel post farita laboro, kunkaŭriĝis. Kia kvieto regis en la katedralo! Sed K. devis ĝeni ĝin, li ne havis la intencon resti ĉi tie; se estis la devo de la ekleziulo prediki je certa horo sen konsidero de la cirkonstancoj, li faru tion, ĝi sukcesus ankaŭ sen la subteno de K. tiel, kiel la ĉeesto de K. la efikon certe ne pligrandigus. Lante K. do ekiris, li palpis sin sur la piedpintoj laŭ la benko kaj poste iris en la larĝan mezovojon kaj iris tie tute senĝenate, okazis nur, ke la ŝtona planko eĉ sub la plej mallaŭta paŝo eksonis, dum malforte eĥis la volbiĝoj, tamen sen interrompo, multfoje regule progresante. K. sentis sin iom forlasita, kiam tie, eble observate de la ekleziulo, li trairis inter la vakaj benkoj, krome la grando de la katedralo troviĝis certe por li je la ekstremo de la ĝuste ankoraŭ eltenebla. Revenante al sia pli frua sidloko, li haste kaptis sen plua restado la albumon tie postlasitan kaj prenis ĝin al si. Preskaŭ jam forlasinte la terenon de la benkoj kaj proksimiĝante al la libera loko, kiu troviĝas

inter ili kaj la elirejo, li aŭdis je la unua fojo la voĉon de la ekleziulo. Jen potenca, ekzercita voĉo. Kiom ĝi trapenetris la larĝan katedralon pretan akcepti ĝin! Sed ne estis la paroĥanoj, kiujn la ekleziulo alvokis, sed estis tute sendube li, ne eblis elturniĝo, li vokis: „Josefo K.!“

K. haltis kaj rigardis antaŭ sin sur la plankon. Provizore li estis ankoraŭ libera, li ankoraŭ povus iri plu kaj fuĝi tra unu el la tri mornaj lignopordetoj, kiuj ne estis malproksimaj de li. Tio signifus, ke li ne komprenas, aŭ ke li ja komprenas, sed ne volas okupiĝi pri tio. Sed, se li turniĝus, li estus firmtenita, ĉar tiukaze li konfesus, ke li bone komprenas, ke li efektive estas la alvokito kaj, ke li intencas ankaŭ obei. Se la ekleziulo estus vokinta lin je dua fojo, K. certe estus foririnta, sed ĉar ĉio restis kvieta, kiom ajn longe K. atendis, li tamen iom turniĝis la kapon, ĉar li volis vidi, kion la ekleziulo faras nun. Li staris trankvile en la predikejo kiel antaŭe, sed estis evidente, ke li rimarkis la kapmovon de K. Estus infaneca kaŝludo, se K. nun tute ne turniĝus. Li faris tion kaj de la ekleziulo estis perfingre vokata proksimiĝi. Ĉar nun ĉio povas okazi publike, li kuris – li faris tion ankaŭ pro scivolo kaj por

koncizigi la aferon – per longaj, flugantaj paŝoj renkonte al la predikejo. Ĉe la unuaj benkoj li haltis, sed por la ekleziulo la distanco ŝajne estis ankoraŭ tro granda, li etendis manon kaj montris per akre mallevita montrofingro sur lokon tute proksime de la predikejo. K. obeis eĉ ĉifoje. Sur tiu loko li devis klini la kapon jam tre malantaŭen por ankoraŭ povi vidi la ekleziulon.

„Vi estas Josefo K.“, diris la ekleziulo kaj levis manon sur la balustrado kun necerta movo.

„Jes“, diris K., li pensis pri tio, kiel senkaŝe li pli frue ĉiam diris sian nomon, sed de certa tempo tiu estis ŝarĝo al li, konis ĝin nun laŭnome eĉ homoj, kiujn li renkontis la unuan fojon, kiel agrable estis unue prezenti sin kaj nur poste esti konata.

„Vi estas akuzita“, diris la ekleziulo tre mallaŭte.

„Jes“, respondis K., „jes, oni sciigis tion al mi.“

„Tiukaze vi estas tiu, kiun mi serĉas“, diris la ekleziulo. „Mi estas la prizona kapelano.“

„Aĥ, tiu“, diris K.

„Mi alvokigis vin ĉi tien por paroli kun vi“, diris la ekleziulo.

„Mi ne sciis tion“, diris K. „Mi venis ĉi tien por montri al italo la katedralon.“

„Lasu flanke la akcesoran“, diris la ekleziulo. „Kion vi tenas en la mano? Ĉu ĝi estas preĝolibro?“

„Ne“, respondis K., „ĝi estas albumo kun la urbaj vidindaĵoj.“

„Demetu ĝin“, diris la ekleziulo. K. forĵetis ĝin tiel vehemente, ke ĝi disfaldiĝis kaj kun dispremitaj paĝoj treniĝis certan distancon sur la planko.

„Ĉu vi scias, ke via proceso statas malbone?“ demandis la ekleziulo.

„Ankaŭ al mi tio ŝajnas tiel“, diris K. „Mi tre penis ĝis nun, sed sen sukceso. Sed la petskribon mi ankoraŭ ne finpretigis.“

„Kiel vi imagas la finon?“ demandis la ekleziulo.

„Pli frue mi pensis, ke ĝi devos havi bonan finon“, diris K., „nun de tempo al tempo mi dubas mem pri tio. Mi ne scias kiel ĝi finiĝos. Ĉu scias vi?“

„Ne“, diris la ekleziulo, „sed mi timas, ke ĝi finiĝos malbone. Oni opinias, ke vi estas kulpa. Via proceso eble ne transiros malaltan tribunalon. Almenaŭ provizore oni rigardas vian kulpon pruvita.“

„Sed mi estas senkulpa“, diris K. „Tio estas eraro. Cetere, kiel homo entute povus esti kulpa? Ni estas ja ĉi tie ĉiuj homoj, ĉiu el ni.“

„Tio estas ĝusta“, diris la ekleziulo, „sed tiel kutime parolas kulpuloj.“

„Ĉu ankaŭ vi havas antaŭjuĝon kontraŭ mi?“ demandis K.

„Mi ne havas antaŭjuĝon kontraŭ vi“, diris la ekleziulo.

„Mi dankas al vi“, diris K., „sed ĉiuj aliaj, kiuj partoprenas je la proceduro, havas antaŭjuĝon kontraŭ mi. Ili influas

tiel ankaŭ nepartoprenantojn. Mia situo fariĝas pli kaj pli komplika.“

„Vi miskomprenas la faktojn“, diris la ekleziulo, „la verdikto ne okazas per unu fojo, la proceduro iom post transiras en la verdikton.“

„Tiel do estas“, diris K. kaj klinis la kapon.

„Kion vi faros baldaŭ por via afero?“ demandis la ekleziulo.

„Mi ankoraŭ volas serĉi helpon“, diris K. kaj levis la kapon por vidi kiel la ekleziulo juĝas tion. „Estas ankoraŭ certaj ebloj, kiujn mi ankoraŭ ne eluzis.“

„Vi serĉas tro da fremda helpo“, diris la ekleziulo malŝate, „kaj speciale ĉe inoj. Ĉu vi do ne rimarkas, ke tio ne estas la vera helpo?“

„Kelkfoje kaj eĉ ofte mi povus diri al vi, ke vi pravas“, diris K. „sed ne ĉiam. La inoj havas grandan potencon. Se mi povus instigi kelkajn inojn, kiujn mi konas, ke ili komune laboru por mi, mi devus sukcesi trapenetre.

Speciale ĉe tiu juĝejo, kiu konsistas preskaŭ nur el aviduloj pri inoj. Montru al esplora juĝisto inon nur el la malproksimo kaj li renversige kuros trans la tribunalan tablon kaj la akuziton por ankoraŭ sufiĉe frutempe atingi la inon.“

La ekleziulo klinis la kapon al la balustrado, nur nun la tegmento de la predikejo ŝajne premis lin malsupren. Kia veteraĉo eble estas ekstere? Tio ne plu estis morna tago, tio estis jam tenebra nokto. Neniu vitropentraĵo de la grandaj fenestroj kapablis interrompi la tenebran vandon eĉ nur per briltremo. Kaj ĝuste nun komencis la katedrala servisto estingi la kandelojn sur la ĉefaltaro, ĉiun unuope.

„Ĉu vi koleras pri mi?“ demandis K. la ekleziulon. „Eble vi ne scias, al kia juĝejo vi servas.“ Li ne ricevis respondon. „Estas ja nur miaj spertoj“, diris K. Supre ankoraŭ nun restis silento.

„Mi ne volis ofendi vin“, diris K.

Jen kriis la ekleziulo malsupren al K.: „Ĉu vi vidas eĉ ne du paŝojn antaŭen?“ Tio estis kriita kolere, sed samtempe

kvazaŭ de homo, kiu vidas kiel iu falas kaj, ĉar li mem, ekteruriĝis, malgardeme al si mem, krias senvole.

Nun ambaŭ silentis dum longa tempo. Certe la ekleziulo en la malhelo, kiu regis tie malsupre, ne povis ekkoni precize sinjoron K., dum K. bone vidis la ekleziulon en la lumo de la malgranda lampo. Kial la ekleziulo ne grimpis malsupren? Prediko tio ja ne estis, sed nur kelkaj sciigoj al K., kiuj, se li atentus ilin precize, verŝajne pli damaĝus ol helpus al li. Sed certe la intenco de la ekleziulo estis bona por K., ne estus ne eble, ke tiukaze, se li grimpus malsupren, li povus interkonsentiĝi kun li, ne estus neeble, ke li ricevus decidan kaj akcepteblan konsilon de li, kiu ekzemple montrus al li, ne kiel la proceso estus influebla, sed kiel oni povus eskapi la proceson, kiel oni povus ĉirkaŭiri ĝin, kiel oni povus vivi ekstere de la proceso. Tiu eblo devis ekzisti, K. lastatempe ofte pensis pri tio. Sed, se la ekleziulo scius tian eblon, li eble perfidus ĝin, se oni petus lin pri tio, kvankam li mem apartenas al la juĝejo kaj kvankam li subpremis sian karan manieron, kaj eĉ kriis al K, kiam K. atakis la juĝejon.

„Ĉu vi ne volas grimpi malsupren?“ diris K. „Ja ne estos farenda prediko. Grimpu malsupren al mi.“

„Nun mi jam povas grimpi malsupren al vi“, diris la ekleziulo, eble li pentis pri sia kriado. Dum li dekroĉigis la lampon de la hoko, li diris: „Mi devis unue paroli el granda distanco kun vi. Alikaze mi lasus tro facile influi min kaj forgesus mian servon.“

K. atendis lin malsupre ĉe la ŝtuparo. Malsuprenirante, la ekleziulo etendis jam sur alta ŝtupo manon al li.

„Ĉu vi havas iom da tempo por mi?“ demandis K.

„Tiom da tempo, kiom vi bezonos“, diris la ekleziulo kaj donis al K. la malgrandan lampon, por ke li portu ĝin. Ankaŭ proksime certa soleno en lia konduto ne ŝanĝiĝis.

„Vi estas tre afabla al mi“, diris K., ili iris unu apud la alia tien kaj reen en la morna flanka navo.

„Vi estas escepto inter ĉiuj, kiuj apartenas al la juĝejo. Mi havas pli da fido al vi ol al iu ajn el ili, kiom ajn mi konas el ili. Kun vi mi povas paroli senkaŝe.“

„Ne trompu vin“, diris la ekleziulo.

„Pri kio mi povus trompi min?“ demandis K.

„Pri la juĝejo vi trompas vin“, diris la ekleziulo, „en la enkondukantaj skriboj pri la leĝo legeblas: Antaŭ la leĝo staras pordogardisto. Al tiu pordogardisto venas viro de la kamparo kaj petas pri tio, ke oni enlasu lin en la leĝon. Sed la pordogardisto diras, ke li nun ne povas permesi la enlason al li. La viro pripensas tion kaj tiam demandas, ĉu li do poste rajtos eniri.

‚Estas eble‘, diras la pordogardisto, ‚sed ne nun.‘ Ĉar la leĝo estas malfermita kiel ĉiam kaj la pordogardisto paŝas flanken, la viro kliniĝas por vidi tra la pordo internen. Rimarkante tion, la pordogardisto ridas kaj diras: ‚Se tio logas vin tiom, tiukaze provu eniri do spite al mia malpermeso. Sed notu: Mi estas potenca. Kaj mi estas nur la plej suba pordogardisto. De salonego al salonego tamen staras pordogardistoj, kiuj estas pli kaj pli potencaj. Jam la aspekton de la tria eĉ mi ne povus elteni plu.‘ Tiajn malfacilaĵojn la viro de la kamparo ne atendis; la leĝo estu alirebla ja por ĉiu kaj ĉiam, li pensas, sed

kiam li nun pli zorgeme rigardas la pordogardiston kun ties peltomantelo, lian grandan pintan nazon, la longan maldensan nigran tataran barbon, li decidas tamen prefere atendi, ĝis li ricevos la permeson eniri. La pordogardisto donas al li tabureton kaj permesas al li eksidi flanke de la pordego. Tie li sidas dum tagoj kaj jaroj. Li ofte provas esti enlasata kaj lacigas la pordogardiston per siaj petoj. La pordogardisto ofte iom esplordemandas lin, demandas lin pri ties hejmlando kaj pri multaj aliaj aferoj, sed estas indiferentaj demandoj, kiajn metas grandaj sinjoroj, kaj je la fino li ĉiam diris denove al li, ke li ankoraŭ ne povas enlasi lin. La viro, kiu ekipis sin por la vojaĝo per multaj aĵoj, uzas ĉion, kiel ajn valora ĝi estas, por subaĉeti la pordogardiston. Tiu ja ĉion akceptas, sed dum tio diras: ‚Mi akceptas tion nur tial, por ke vi ne supozu, ke vi preterlasis ion.' Dum la multaj jaroj la viro observas la pordogardiston preskaŭ seninterrompe. Li forgesas la aliajn pordogardistojn, kaj tiu unua ŝajnas al li la ununura obstaklo por povi eniri en la leĝon. Li malbenas la malfeliĉigan hazardon en la unuaj jaroj laŭte, pli poste, maljuniĝante, li nur grumblas plu al si mem. Li fariĝas infaneca, kaj ĉar dum la multjara

studado de la pordogardisto li konatiĝis ankaŭ kun la puloj en ties peltokolumo, li petas ankaŭ la pulojn helpi al li ŝanĝi la opinion de la pordogardisto. Finfine lia vidkapablo malfortiĝas, kaj li ne scias, ĉu vere malheliĝas ĉirkaŭ li, aŭ ĉu nur liaj okuloj trompas lin. Sed certe nun li rimarkas en la malhelo brilon, kiu neestingeble penetras el la pordego de la leĝo. Nun li ne plu vivos longe. Antaŭ lia morto kolektiĝas en lia kapo ĉiuj spertoj de la tuta tempo en unu demando, kiun li ĝis nun ankoraŭ ne metis al la pordogardisto. Li mansignas al la pordogardisto, ĉar li ne plu povas rektigi sian rigidiĝantan korpon. La pordogardisto devas profunde kliniĝi al li, ĉar la altodiferenco ŝanĝiĝis tre malfavore al la viro.

‚Kion vi nun do ankoraŭ volas scii?' demandas la pordogardisto, ‚vi estas nesatigebla.'

‚Ĉiuj aspiras ja la leĝon', diras la viro. ‚Kial okazis, ke dum tiuj multaj jaroj neniu krom mi deziris la enirpermeson?' La pordogardisto rimarkas, ke la viro jam proksimas al la fino, kaj por ankoraŭ atingi la orelojn de la surdiĝanto, li kriegas al li: ‚Tie ĉi neniu alia krom vi povis ricevi la

enirpermeson, ĉar tiu enirejo estis destinita nur por vi. Mi nun iros kaj fermos ĝin.‘

„La pordogardisto do trompis la viron“, tuj diris K., tre fascinita de la rakonto.

„Ne tro hastu“, diris la ekleziulo, „ne transprenu la fremdan opinion sen kontrolo. Mi laŭvorte rakontis al vi la historion el la skribo. Pri trompo tie nenio legeblas.“

„Ĝi estas tamen evidenta“, diris K., „kaj via unua interpretado estis tute ĝusta. La pordogardisto faris la liberigan sciigon nur tiam, kiam ĝi ne plu povis helpi al la viro.“

„Li ne estis pli frue demandata“, diris la ekleziulo, „pripensu ankaŭ, ke li estis nur pordogardisto, kaj kiel tiu li plenumis sian devon.“

„Kial vi supozas, ke li plenumis sian devon?“ demandis K., „li ne plenumis ĝin. Lia devo eble estis bari ĉiujn fremdulojn, sed tiun viron, por kiu estis destinita la

enirejo, li estus devinta enlasi."

„Vi ne havas sufiĉe da respekto rilate la skribon kaj ŝanĝas la tekston", diris la ekleziulo. „La rakonto entenas du gravajn klarigojn de la pordogardisto pri la enlaso en la leĝon, unu el ili je la komenco kaj la alia je la fino. Unu klarigo tekstas, ke nun li ne povas permesi la eniron al li, kaj la alia: ke la enirejo estis destinita nur por la viro. Se inter ambaŭ klarigoj estus kontraŭdiro, vi pravus, kaj la pordogaristo estus trompinta la viron. Sed ne ekzistas kontraŭdiro. Male, la unua klarigo eĉ atentigas pri la dua. Oni preskaŭ povus diri, ke la pordogardisto faris pli ol sian devon per tio, ke li malfermis al la viro perspektivon pri estonteca eblo ricevi la enirpermeson. Je tiu tempo ŝajne estis lia devo nur rifuzi la viron, kaj efektive miras multaj klarigistoj de la skribo pri tio, ke la pordogardisto efektive faris tiun aludon, ĉar li ŝajne ja ŝatas precizecon kaj severe gardas sian oficon. Dum multaj jaroj li ne forlasis sian postenon kaj fermis la pordegon nur tute laste, li estas konscia pri la graveco de sia servo, ĉar li diras, ke li estas potenca. Li respektas siajn superulojn, ĉar li diras, ke li estas nur la plej suba pordogardisto, li ne

estas babilema, ĉar laŭdire li metas dum multaj jaroj demandojn indiferentajn. Li ne estas subaĉetebla, ĉar li diris pri donaco, ke li akceptas ĝin nur tial, por ke K. ne pensu, ke li preterlasis ion. Li estas, se temas pri la plenumo de siaj devoj nek kortuŝebla nek acidigebla, ĉar estas skribite pri la viro, ke lin lacigas la pordogardisto per ties petoj. Fine ankaŭ lia eksteraĵo aludas pedantan karakteron, la granda pinta nazo kaj la longa, maldensa, nigra tatara barbo. Ĉu povus ekzisti pordogardisto pli fidela al la devoj? Sed miksiĝas en la pordogardisto ankoraŭ aliaj esencaj trajtoj, kiuj estas tre favoraj por tiu, kiu postulas la enirpermeson en la leĝon, kaj kiuj almenaŭ faras tion komprenebla, kial li iom povis transiri sian devon per la aludo pri estonteca eblo. Ĝi ja ne estas kontestebla, ke li estas iomete naiva kaj pro tio iom aroganta. Kvankam liaj diroj pri sia potenco kaj la potenco de la aliaj pordogardistoj kaj pri ties aspektoj neelteneblaj al li, – mi volas diri, kvankam ĉiuj liaj diroj per si mem povus esti ĝustaj, tamen montras la maniero kiel li prezentas tiujn dirojn, ke lia percepto estas obtuzigita per naiveco kaj arogo. La klarigistoj diras pri tio, ke ĝusta percepto de afero kaj miskomprenado de la

sama afero ne ekskludigas sin tute. Ĉiukaze oni devas supozi, ke tiuj naiveco kaj arogo, kiom ajn minimume ili eble montriĝas, tamen malfortigas la gardadon de la enirejo, ili estas mankoj en la karaktero de la pordogardisto. Al tio aldoniĝas ankoraŭ, ke la pordogardisto laŭ sia natura karaktero ŝajne afablas, li tute ne estas ĉiam nur ofica persono. Tuj en la unuaj momentoj li mistifikis la viron per tio, ke li invitis la viron eniri spite al la eksplicite daŭrigata malpermeso, poste li ne ordonis foriri al li, sed donis al li, kiel estas skribite, tabureton kaj permesis ke li povu sidiĝi flanke de la pordego. La pacienco, kun kiu li eltenas dum la multaj jaroj la petojn de la viro, la malgrandaj esplordemandoj, la akcepto de la donacoj, la nobleco kun kiu li permesas, ke la viro apud li laŭte sakras pri la malfeliĉiga hazardo, kiu starigis tie la pordogardiston, – ĉio ĉi konkludigas ekscitojn de kompato. Ne ĉiu pordogardisto estus aginta tiel. Kaj fine li ankoraŭ profunde kliniĝis pro mansigno al la viro por doni al li lastan okazon demandi. Nur malforta malpacienco – la pordogardisto ja scias, ke la vivo de la viro estas preskaŭ finita – esprimiĝas en la vortoj: ‚Vi estas nesatigebla.‘ Kelkaj klarigantoj en tiu speco de

klarigo eĉ pli avancas kaj opinias, ke la vortoj, ‚Vi estas nesatigebla‘, esprimas specon de afabla admiro, kiu tamen ne estas tute libera de arogo. Ĉiukaze la persono de la pordogardisto tiel alikaze finiĝas ol vi supozis.“

„Vi konas la rakonton pli precize ol mi kaj dum pli longa tempo“, diris K. Ili silentis dum certa tempo.

Poste K. diris denove: „Vi do pensas, ke la viro ne estas trompita, ĉu?“

„Ne miskomprenu min“, diris la ekleziulo, „mi montras al vi nur la opiniojn, kiuj ekzistas pri tio. Vi ne tro atentu opiniojn. La skribo estas neŝanĝebla kaj la opinioj estas ofte nur esprimo de la despero pri tio. En tiu kazo estas eĉ opinio, laŭ kiu ĝuste la pordogardisto estas la trompito.“

„Tio estas opinio tre aberacia“, diris K.

„Kiel oni bazas tiun?“

„Oni bazas tiun“, diris la ekleziulo, „sur la naiveco de la pordogardisto. Oni diras, ke la pordogardisto ne konas la internon de la leĝo, sed nur la vojon, kiun li ĉiam denove

devas iradi antaŭ la enirejo. La imagojn, kiujn li havas pri la interno, oni opinias infaneca, kaj oni supozas, ke li tion, per kio li volas timigi la viron, mem timas. Jes ja, li timas tion pli ol la viro, ĉar tiu celas ja nenion alian krom eniri, eĉ de kiam li aŭdis pri la teruraj pordogardistoj en la interno, sed la pordogardisto male ne volas eniri, almenaŭ oni ekscias nenion pri tio. Aliaj ja asertas, ke li iam devis esti interne, ĉar li ja iam estis akceptita kiel servisto de la leĝo, kaj tio povis okazi nur interne. Pri tio oni devas respondi, ke li ankaŭ per voko el la interno povus esti vokita al la pordogardisto, kaj ke almenaŭ profunde li certe ne estis en la interno, ĉar li jam la aspekton de la tria pordogardisto ne plu povis elteni. Krome oni ne raportis ion pri tio, ke dum la multaj jaroj li krom la rimarko pri la pordogardistoj rakontis ion pri la interno. Eble tio estis malpermesita al li, sed ankaŭ pri malpermeso li rakontis nenion. El ĉio ĉi oni konkludas, ke li scias pri la aspekto kaj la signifo de la interno nenion kaj havas iluziojn pri tio. Sed ankaŭ pri la viro de la kamparo li laŭdire trompas sin mem, ĉar li estas subranga al tiu viro kaj ne scias tion. Ke li traktas la viron kiel subrangulon, oni ekkonas el multaj aferoj, kiujn vi

certe ankoraŭ memoras. Sed, ke li efektive estas subrangulo de li, laŭ tiu opinio same tiel evidente montriĝas. Antaŭ ĉio la liberulo superrangas ligiton. La viro ja efektive liberas, li povas iri tien, kien li volas, nur la eniro en la leĝon estas malpermesita al li, kaj cetere nur de unuopulo, de la pordogardisto. Se li sidiĝas sur la tabureton flanke de la pordego kaj tie restas dum sia tuta vivo, tiukaze tio okazas libervole, la rakonto ne raportas pri iu devigo. Sed la pordogardisto male al tio per sia ofico estas ligita al tiu posteno, li ne rajtas ekstere foriri, kaj tre verŝajne ankaŭ ne iri en la internon, eĉ, se li intencus tion. Kvankam li servas ja por la leĝo, li servas nur por tiu ĉi enirejo, do ankaŭ nur por tiu viro, por kiu tiu enirejo ekskluzive estas destinita. Ankaŭ pro tiu kaŭzo li estas subrangulo de li. Estas supozeble, ke li certasence servis vane dum tiuj multaj jaroj do fakte dum tuta viraĝo, ĉar estas sciigite, ke alvenas viro, do plenkreskinta viro, ke do la pordogardisto dum longa tempo devis atendi antaŭ ol plenumiĝis lia tasko kaj, ke li ja tiom longe devis atendi, kiom plaĉis al la viro, kiu iris tien ja libervole. Sed ankaŭ la fino de la servo estas difinita per la vivofino de la viro, do ĝisfine li restos subranga al li.

Kaj ĉiam denove oni emfazas, ke la pordogardisto ŝajne nenion scias pri ĉio ĉi. Sed tio ne estas rigardata kiel io okulfrapa, ĉar laŭ tiu opinio troviĝas la pordogardisto en multe pli grava iluzio, ĝi koncernas lian servon. Laste li ja parolas pri la enirejo kaj diras: ‚Mi nun iros kaj fermos ĝin.' Sed komence legeblas, ke la leĝo estas malfermita kiel ĉiam. Sed, se ĝi estas malfermita ĉiam, tio estas, sendepende la virodaŭro de la viro, al kiu ĝi estas destinita, tiukaze ankaŭ la pordogardisto certe ne povus fermi ĝin. Pri tio la opinioj disiĝas, ĉu la pordogardisto per la sciigo, ke li fermos la pordegon, nur volas doni respondon aŭ emfazi sian servodevon aŭ ankoraŭ en la lasta momento volas meti la viron en penton kaj bedaŭron. Sed pri tio multaj konsentas, ke li ne povus fermi la pordon. Ili supozas eĉ, ke li, almenaŭ je la fino, ankaŭ rilate sian scion subrangas al la viro, ĉar tiu vidas la brilon, kiu penetras el la enirejo de la leĝo, dum la pordogardisto kiel tia certe kun la dorso staras al la enirejo kaj ankaŭ per neniu rimarko montras, ke li rimarkis ŝanĝiĝon."

„Tio havas bonan kaŭzon", diris K., kiu duonlaŭte ripetis

al si kelkajn partojn el la klarigo de la ekleziulo. Tio havas bonan kaŭzon, kaj mi supozas nun ankaŭ, ke la pordogardisto estas trompita. Sed tial mi ne deflankiĝas de mia pli frua opinio, ĉar ambaŭ parte identas. Estas nedecide, ĉu la pordogardisto komprenas ĉion aŭ ĉu li estas trompita. Mi diras, ke la viro estas trompata. Se la pordogardisto komprenus ĉion, oni povus dubi pri tio, sed se la pordogardisto ne estus trompita, tiukaze lia trompiĝo necese devus transiĝi al la viro. La pordogardisto tiukaze ja ne estus trompisto, sed tiom naiva, ke oni tuj devus ĵeti lin el la servo. Vi ja devas pripensi, ke la iluzio, en kiu troviĝas la pordogardisto, neniel damaĝas al li, sed al la viro milope."

„Ĉikaze vi tuŝas kontraŭopinion", diris la ekleziulo. „Kelkaj diras ja, ke la rakonto donas al neniu la rajton juĝi pri la pordogardisto. Kiel ajn li aperas al ni, li ja tamen estas servisto de la leĝo, do apartenanta al la leĝo, do transe de homa juĝo. Tiukaze oni ankaŭ ne rajtas fidi, ke la pordogardisto estas subrangigita al la viro. Esti ligita enserve al la leĝo, eĉ se tio nur estas enireje de la leĝo, estas nekompareble pli multe ol vivi libere en la mondo.

La viro unue iras al la leĝo, la pordogardisto estas jam tie. Li estas servigita de la leĝo, dubi pri lia indeco signifus, ke oni dubas pri la leĝo.“

„Tiun opinion mi ne konsentas“, kapskue diris K., „ĉar tiukaze, se oni aliĝus al tiu opinio, oni devas pensi vera ĉion, kion diras la pordogardisto. Sed, ke tio ne eblas, vi ja mem detale kaŭzigis.“

„Ne“, diris la ekleziulo. „Oni devas ne ĉion rigardi kiel veron, oni devas rigardi ĝin nur necesa.“

„Jen trista opinio“, diris K. „La mensogo fariĝas tiel monda ordo.“

K. diris tion parolfine, sed lia finjuĝo tio ne estis. Li estis tro laca por povi transvidi ĉiujn sekvojn de la rakonto, tio ankaŭ estis nekutimaj intersekvoj de pensoj, en kiujn la rakonto kondukis lin, nerealaj aferoj, pli bone taŭgaj por la priparolado de la societo de la juĝejaj oficistoj ol por li. La simpla rakonto fariĝis senforma, li volis deskui ĝin de si, kaj la ekleziulo, kiu pruvis nun grandan delikatan senton, indulgis tion kaj silente akceptis la rimarkon de

K., kvankam ĝi tute certe ne akordiĝis kun lia opinio.

Ili iris dum certa tempo silente plu, K. restis proksime de la ekleziulo sen scii, kie li troviĝas. La lampo en lia mano delonge estingiĝis. Foje trembrilis rekte antaŭ li la arĝenta statuo de sanktulo nur per la rebrilo de la arĝento kaj tuj denove ludece malaperis en la malhelo. Por ne resti tute dependa de la ekleziulo, demandis lin K.: „Ĉu ni nun estas proksimaj al la plej granda enirejo?“

„Ne“, diris la ekleziulo“, ni estas tre malproksimaj de ĝi. Ĉu vi jam volas foriri?“

Kvankam K. ĝuste tiumomente ne pensis pri tio, li diris tuj: „Certe mi devas foriri. Mi estas prokuristo en banko, oni atendas min, mi iris ĉi tien nur por montri al eksterlanda negocamiko la katedralon.“

„Nu“, diris la ekleziulo kaj etendis manon al K., „tiukaze foriru.“

„Sed mi ne povas orientiĝi en la malhelo“, diris K.

„Iru maldekstre al la muro“, diris la ekleziulo, „poste plu

laŭ la muro sen forlasi ĝin, tiel vi trovos elirejon.“ La ekleziulo malproksimiĝis nur kelkajn paŝojn, sed K. vokis jam tre laŭte: Bonvolu atendi ankoraŭ!“

„Mi atendas“, diris la ekleziulo.

„Ĉu vi ne deziras ankoraŭ ion de mi?“ demandis K.

„Ne“, diris la ekleziulo.

„Vi estis antaŭe tiom afabla al mi“, diris K. „kaj vi ĉion klarigis al mi, sed nun vi adiaŭas vin de mi kvazaŭ mi estus tute indiferenta al vi.“

„Vi ja devos foriri“, diris la ekleziulo.

„Nu jes“, diris K., „do akceptu tion.“

„Akceptu unue vi, kiu mi estas“, diris la ekleziulo.

„Vi estas la prizona vikario“, diris K. kaj pli proksimiĝis al la ekleziulo, lia tuja reveno en la bankon ne necesis tiel, kiel li prezentis tion, li tute senzorge ankoraŭ povis resti tie.

„Mi do apartenas al la juĝejo“, diris la ekleziulo. „Kial mi do deziru ion de vi? La juĝejo deziras nenion de vi. Ĝi akceptas vin, kiam vi venas, kaj ĝi adiaŭas vin, kiam vi foriras.“

# Deka ĉapitro

## Fino

Je la antaŭvespero de lia tridekunua naskiĝtago – estis je la naŭa vespere, la tempo de la kvieto sur la stratoj – venis du sinjoroj al la loĝejo de K., en surtutaj vestoj, palaj kaj grasaj, kun ŝajne nemoveblaj cilindraj ĉapeloj. Post ceremonieto ĉe la loĝeja pordo pro la unua enpaŝo, ripetiĝis la sama ceremonieto pli grandskale antaŭ la pordo de K. Sen tio, ke tiu vizito estis anoncita al li, sidis K., same nigre vestinte en fotelo proksime de la pordo kaj malrapide tiris sur la fingrojn novajn tre streĉantajn gantojn, kun sinteno per kiu oni atendas gastojn. Li tuj ekstaris kaj rigardis la sinjorojn scivoleme.

„Vi do estas destinitaj por mi, ĉu?“ li demandis. La sinjoroj kapjesis, unu el ili kun la cilindra ĉapelo enmane montris al la alia. K. koncedis al si, ke li atendis alian viziton. Li iris al la fenestro kaj rigardis ankoraŭfoje al la malhela strato. Ankaŭ preskaŭ ĉiuj fenestroj sur la alia stratflanko estis jam malhelaj, en multaj fenestroj la

kurtenoj jam estis malsuprenigitaj. En prilumata fenestro de etaĝo kune ludis infanetoj, en kradolito. Ankoraŭ malkapablaj formoviĝi de siaj lokoj, ili permane palpis unu post la alia.

„Maljunajn subrangajn aktorojn oni sendas al mi“, diris K. al si kaj ĉirkaŭrigardis por ankoraŭfoje konvinkiĝi pri tio.

„Oni provas per malkara metodo denukigi min.“ K. turniĝis subite al ili kaj demandis: „En kiu teatro vi aktoras?“

„Teatro, ĉu?“ demandis unu el la sinjoroj per nervoze kuntirataj buŝanguloj la alian pri ties konsilo. La alia gestis kiel mutulo, kiu batalas kun kontraŭstaremaj korpofunkcioj.

„Vi ne estas antaŭpreparitaj esti pridemandataj“, diris K. al si kaj foriris por alporti sian ĉapelon.

Jam sur la ŝtuparo la sinjoroj volis brake kroĉiĝi ĉe K., sed K. diris: „Nur sur la strateto, mi ne estas malsana.“ Sed tuj antaŭ la pordejo la sinjoroj kroĉiĝis ĉe K. tiel, kiel

K. ankoraŭ neniam estis irinta kun homo. Ili proksime tenis la ŝultrojn post tiu, ne faldis la brakojn, sed uzis ilin por ĉirkaŭpreni la brakojn de K. dum ties tutaj longoj. Malsupre ili prenis la manojn de K. per ekzercita nerezistebla kapto. K. iris tute rektiĝinte inter ili, ili formis nun kiel triopo tian tutecon, ke tiukaze, se oni estus disbatinta iun el ili, oni estus disbatinta ĉiujn. Estis tuteco, kiun preskaŭ nur senviva povas formi.

Sub la lanternoj K. ofte provis vidi sian akompanantojn pli precize, kiel ajn malfacile tio fareblis pro tiu kunkroĉigo, ol tio estus ebla en la krepusko de lia ĉambro.

„Eble estas tenoruloj“, li pensis dum la rigardo de iliaj vizaĝoj pro ties ampleksa duobla mentono. Lin naŭzis la pureco de iliaj vizaĝoj. Oni kvazaŭ vidis ankoraŭ la purigantan manon, kiu viŝadis iliajn okulangulojn, kiu frotadis ilian supran lipon, kiu glatigis la faldojn de ilia mentono.

Kiam K. rimarkis tion, li haltis, sekve tion ankaŭ la aliaj haltis; ili troviĝis ĉe la rando de libera, senhoma placo kun ornamitaj bedoj.

„Kial oni ĝuste vin sendis?!“ li demandis preskaŭ vokante. La sinjoroj ŝajne ne sciis respondon, ili atendis, ĉiu kun sia pendanta libera brako, kiel malsanulejaj flegistoj, se malsanulo volas ripozi.

„Mi ne iros plu“, prove diris K. Tion la sinjoroj ne devis respondi. Sufiĉis, ke ili ne malstreĉigis la kapton kaj provis forlevi sinjoron K. de la loko, sed K. rezistis. „Mi ne bezonos plu multe da forto, mi uzos nun mian tutan“, li pensis. Li memoris pri la muŝoj, kiuj kun disŝirantaj kruretoj strebas for de la glukaptilo. „La sinjoroj havos streĉegan laboron.“

Jen antaŭ ili suprengrimpis placen el pli profunde troviĝanta strateto sinjorino Brosisto. Ne estis certe, ĉu vere estis ŝi, sed la simileco kompreneble estis tre granda. Sed K. ankaŭ ne nepre volis scii, ĉu certe estas sinjorino Brosisto, nur la senvaloreco de lia rezisto tuj fariĝis konscia al li. Ne estus heroaĵo, se li rezistus, se li nun kaŭzus malfacilaĵojn al la viroj, se li nun dum defendo ankoraŭ volus ĝui la lastan ŝajnon de la vivo. Li ekiris, kaj de la ĝojo, kiun li per tio kaŭzis ĉe la sinjoroj, ankoraŭ iom transiris eĉ al li mem. Ili toleris ĝin nun, ke li decidis

la vojdirekton, kaj li decidis sin por la vojo, kiun la fraŭlino iris antaŭ ili, ne eble tial, ĉar li volis atingi ŝin, sed, ĉar li volis vidi kiom eble plej longe, sed nur por ne forgesi la averton, kiun ŝi signifis por li. „Jen la ununura, kion mi nun povas fari“, li diris al si, kaj la samtaktado de liaj paŝoj kaj la paŝoj de la aliaj konfirmis liajn pensojn, „la ununura kion mi nun povas fari estas reteni ĝis la fino mian trankvilan ordigantan penson. Mi volis ĉiam per dudek manoj enmiksiĝi en la mondon, kaj krome por ne aprobebla celo. Tio estis malĝusta. Ĉu mi nun montru, ke eĉ la unujara proceso ne povis instrui min? Ĉu mi foriru nun kiel malkomprenema ulo? Ĉu oni rajtu diri, ke mi komence de la proceso volis fini ĝin kaj nun je la fino denove ĝin volas komenci? Mi ne volas, ke oni diru tion. Mi estas dankema por tio, ke sur tiun vojon oni kundonis al mi tiujn preskaŭ mutajn senkomprenajn sinjorojn, kaj ke oni translasis al mi diri la necesan al mi mem.“

tiam faris, la sinjoroj volprete cedis, kiam li turniĝis iom al la balustrado, turniĝis ankaŭ ili tutfronte tien. La lunlume treme brila akvo disdividiĝis ĉirkaŭ insuleto, sur kiu, kvazaŭ kunpremitaj, amasiĝis foliaraj amasoj de arboj kaj arbustoj. Inter ili, nun jam nevideblaj troviĝis kondukantaj gruzopadoj kun oportunaj benkoj, sur kiujn K. etendiĝis kaj streĉiĝis en ne malmultaj someroj.

„Mi ja tute ne volis halti“, li diris al siaj akompanantoj, hontigita pro ties volpreteco. Unu el ambaŭ akompanantoj ŝajne softe riproĉis la alian pro la miskompreniga halto, tiam ili iris plu.

Ili iris tra kelkaj grimpantaj stratetoj, en kiuj tie kaj tie staris aŭ iris policanoj; baldaŭ malproksime, baldaŭ tre proksime. Unu el ili kun hartufa lipobarbo, kun la mano ĉe la tenilo de la sabro, paŝis kvazaŭ intence al la ne tute nesupektema grupo. La sinjoroj hezitis iri plu, la policano ŝajne jam ekmalfermis la buŝon, sed jen K. forte tiris la sinjorojn antaŭen. Ofte li turniĝis, ĉu sekvas la policano; sed, kiam ili jam havis angulon inter la policano kaj kaj si, K. ekkuris, kaj la sinjoroj devis spite al granda spirbezono ankaŭ kunkuri.

Tiel ili facile elurbiĝis, la urbo en tiu direkto aliĝis preskaŭ sen transiro al la kampoj. Malgranda ŝtonrompejo, forlasita kaj trista, troviĝis en la proksimo de ankoraŭ tute urba domo. Ĉi tie la sinjoroj haltis, ĉu tial, ĉar tiu loko dekomence estis ilia celo, ĉu tial, car ili estis tro lacigitaj por iri ankoraŭ plu. Nun ili delasis sinjoron K., kiu silente atendis, ili deprenis la cilindrajn ĉapelojn, kaj forviŝis per naztukoj sian ŝviton de la frunto, dum ili ĉirkaŭrigardis. Ĉie estis la lunlumo kun siaj natureco kaj kvieto, kiuj estas donitaj al neniu alia lumo.

Post la interŝanĝo de kelkaj ĝentilecoj rilate tion, kiu devos fari la sekvajn taskojn, – la sinjoroj ŝajne nedivite ricevis la komisiojn – iris unu el ili al K. kaj malvestis ties surtuton, la kamizolon, kaj fine la ĉemizon. K. frostotremis kvazaŭ aŭtomate, pro kio unu el la sinjoroj lin batis unufoje softe trankvilige sur la dorson. Poste li zorgeme kunmetis la vestaĵojn, kiel aĵojn, kiujn oni ankoraŭ uzos, eĉ se ne kiel eble plej baldaŭ. Por ne elmeti sinjoron K. sen movado al la almenaŭ frideta nokta aero, li prenis lin ĉebrake kaj iom iris kun li tien kaj tien, dum la alia sinjoro rastis la ŝtonrompejon pro taŭga loko.

Trovinte ĝin, li mansignis, kaj la alia sinjoro kondukis sinjoron K. tien. Estis proksime de la rompovando, tie kuŝis elrompita ŝtono. La sinjoroj sidigis sinjoron K. sur la teron, apogis lin per la ŝtono kaj surmetis lian kapon supre. Spite al ĉiuj penoj, kiujn ili entreprenis, kaj spite al ĉiu helpemo, kiun K. montris, lia sinteno restis tre devigita kaj ne fidinda. Unu el la sinjoroj tial petis la alian, ke li translasu dum certa tempo la remetadon de K. sole al li, sed ankaŭ per tio ne fariĝis pli bone. Fine ili lasis sinjoron K. en situo, kiu estis eĉ ne la plej bona el la jam atingitaj. Poste malfermis unu el la sinjoroj sian surtuton kaj prenis el ingo, kiu pendis je streĉita zono, longan sveltan viandistan tranĉilon ambaŭeĝe akrigitan, levis ĝin kaj kontrolis la akrecon en la lumo. Denove komenciĝis la naŭzaj ĝentilecoj, unu el ili transdonis al la alia la tranĉilon super la kapon de K., tiu redonis ĝin super trans sinjoron K. Tiu sciis nun tute ne pridubeble, ke estus estinta lia devo, kapti la tranĉilon, kiam ĝi ŝvebante transmoviĝis de mano al mano super lin, kaj piki ĝin mem en sin. Sed li ne faris tion, sed turnis la kolon ankoraŭ liberan kaj ĉirkaŭrigardis. Tute senriproĉeble li ne kapablis agi, ne transpreni la tutan

laboron de la instancoj, la respondecon por tiu lasta eraro havis tiu, kiu rifuzis al li la reston de la necesa forto por tio. Liaj rigardoj falis sur la lastan etaĝon de la domo, kiu limigis la ŝtonrompejon. Kiel ekfulmas lumo, tiel dispartiĝis tie la flugiloj de fenestro, jen homo malforta kaj svelta en la malproksimo kaj alto kliniĝis per subita movo tre antaŭen kaj ankoraŭ pli etendis la brakojn. Kiu estis? Ĉu amiko? Ĉu bona homo? Ĉu iu, kiu kunsentis? Ĉu iu, kiu volis helpi? Ĉu estis unuopulo? Ĉu estis ĉiuj? Ĉu helpo ankoraŭ eblis? Ĉu ekzistis obĵetoj, kiujn oni forgesis? Certe estis tiaj. Kvankam la logiko estas neskuebla, al homo, kiu volas vivi, ĝi tamen ne rezistas. Kie estis la juĝisto, kiun li neniam vidis? Kie estis la alta tribunalo, ĝis kiu li neniam penetris? Li levis la manojn kaj etendis ĉiujn fingrojn.

Sed al la gorĝo de K. metiĝis la manoj de unu el la sinjoroj, dum la alia puŝis la tranĉilon profunde en lian koron kaj tie dufoje turnis ĝin. Kun malfortiĝantaj okuloj K. ankoraŭ vidis, kiel la sinjoroj, proksime ĉe ties okuloj, apogitaj vangon al vango, atendis la decidan momenton. „Kiel hundo!“ li diris, kvazaŭ la honto transvivu lin.

## Lingvaj rimarkoj

1.

Kiel traduki la originalan nomon *„Franz"* ĝuste? Ĉar *Franz* estas germane la mallonga karesformo de Francisko oni devus traduki la karesnomon per „Francĉjo", sed tio estas fakte katolika nomo, do, tiu traduko eble miskondukus la leganton en la kazo de la judo Kafka. Tial mi elturniĝis por la titolo per „F. Kafka". Mi mem tradukus la nomon eventuale per „Franc", ĉar „Franco" povus konduki al la supozo, ke temas pri franco. Por fari diferencon al K. mem, mi tradukas la gardiston *Franz* per Francĉjo, tio estas ankaŭ kuntekste la pli bona elekto. (cez)

2.

lante = malrapide

Mi ĉiam intence uzas la neologismon, ĉar mi tiel volas honori la meritoplenan esperantiston Lanti, kaj ankaŭ tial, ĉar la vorto estas agrable belsona. (cez)

3.

fotografaĵo: Se tio eblis, mi provis redoni kiel tradukisto ankaŭ iom la historian fonon de la romano, ĉi-kaze per la uzado de la arkaa vorto ‚fotografaĵo'. (cez)

## Enkonduko I

„Mia granda amo apartenas al F. Kafka, kiun mi legas ĉiam denove – jen tute granda unika fantaziulo (sed kiu efektive kapablis tion)…“. tion skribis George Grosz en la jaro 1948 al sia amiko kaj bofrato *Otto Schmalhausen* kaj poste ankoraŭfoje „… bonvolu legi la romanon „La Proceso“ de F. Kafka, kie iu volas iri ien, por ekzemplo en „La kastelo“, li volas iri al la kastelo, sed neniam alvenos tien…“

Kurt Tucholsky entuziasme verkis en la jaro 1921: „… *Franz Kafka*. Li skribas la plej klaran kaj plej belan prozon, kiu momente estas kreata en la germana lingvo. Li floras el fantasmo kaj el fantazio – sed firme kaj reale estas formitaj liaj frazoj kaj la ritmo. Nenio de la konvencia softeco de Prago, la urbo, en kiu li loĝas – nenio de modomovado. Tio kreskis el alia mondo…“

Franc[1] Kafka, aŭstra verkisto, naskiĝis la trian de julio en la jaro 1883 en Prago kiel filo de la juda komercisto Hermann kaj ties edzino Julie Kafka.

Dum la jaroj 1901 ĝis 1906 li studis unue dum mallonga tempo germanistikon, kaj poste juron. En la jaro 1906 li estis promociita kiel dr-o de la juroscienco; en la jaro 1908 li dungiĝis kiel juristo en la Laboristo-Akcidento-Asekurejo, kie li restis ĝis sia pensiuliĝo en la jaro 1922. En la jaro 1904 li konatiĝis al Maks Brod, romanverkisto kaj teatro- kaj muzikkritikisto de la gazeto *„Prager Tagblatt“* (Ĉiutaga gazeto de Prago). Tiu longe ne sciis ion pri la aktiva literatura agado de Kafka, sed poste ĉiam denove urĝis lin publiki ion, de kiam li konvinkiĝis pri ties talento. Maks Brod lanĉis la verkiston Kafka, ĉar li havis la necesajn ligojn al eldonejoj. Eble tio estis necesa, ĉar F. Kafka ofte estis nedecidema, li pensis, ke liaj fruaj verkoj ankoraŭ ne indis publikon, li supozis, ke li ankoraŭ ne donis sian plej bonan. Teksto, kiu antaŭ liaj kritikaj okuloj havis valoron, estis la rakonto „La verdikto“, ĝi estiĝis en septembro de la jaro 1912 dum unu nokto. Li verkis ĝin kvin semajnojn post la unua renkontiĝo kun Felice Bauer, al kiu li konatiĝis en la domo de la familio Brod. En majo de la jaro 1914 okazis la oficiala gefianĉiĝo, sed en julio jam la nuligo de ĝi.

En la jaro 1915 okazis denova renkontiĝo kaj en julio 1917 okazis la dua gefianĉiĝo.

En aŭgusto li sputis je la unua fojo sangon pro elfluo de sango en la spirorganoj. Je la kvara de septembro en la jaro 1917 oni konstatis ĉe Kafka tuberkulozon de la laringo. En decembro de la jaro 1917 okazis la dua kaj definitva nuligo de la gefianĉiĝo.

En tiuj kvin jaroj Kafka estis tre produktiva: Ekestis „La metamorfozo“, „La hejtisto“, „En la punkolonio“, „Raporto por akademio“, li laboris plu je la romanoj „La proceso“ kaj „La malaperinto“(Amerika), tiel, kiel je vico de pluaj rakontoj. Sed antaŭ ĉio li verkis leterojn, preskaŭ ĉiutage li skribis al Felice Bauer en Berlino.

Kafka uzis forpermeson de sia ofico kaj transloĝiĝis al sia fratino Ottla kamparen al la vilaĝeto Siřem, ĉirkaŭ kvindek kilometrojn oriente de la nuna *Karlovy Vary*. En la jaro 1919 estis publikitaj inter aliaj tekstoj „Letero al la patro“ kaj „En la punkolonio“.

Komence de la jaro 1929 konatiĝis Kafka al la verkistino Milena Jesenská, kiu tradukis la tekstojn de Kafka en la ĉehan.

Ekestis intima amikeco, ja amrilato, komence plena de espero kaj feliĉo, sed pli poste ĝi turniĝis en tristecon. En la jaro 1922 okazis la disiĝo.

Ekde la komenco de la malsano necesis pluraj kuracejaj restadoj, li laboris ankaŭ ĉiam denove en la sama asekurejo, ĝis kiam li estis pensiuligita. En julio de la jaro 1923 li konatiĝis en la germana urbo Müritz al Dora Diamant, kaj poste li transloĝiĝis al Berlino, kie ili ambaŭ kune vivis, pro la inflacio parte kun konsiderindaj financaj malfacilaĵoj. Ekestis la kvar noveloj „Malsatula artisto". Por malmultaj semajnoj li revenis en la jaro 1924 al Prago, ĝis li iris en aprilo al Kierling ĉe Vieno, en sanatorion, kie li mortis je la tria junio de la jaro 1924.

F. Kafka postlasis tri romanfragmentojn, multnombrajn taglibrojn, vojaĝajn taglibrojn, rakontojn, leterojn, novelojn, skizojn kaj aforismojn.

Kafka por multaj homoj estas la enkorpigo de malfeliĉa kaj interne disŝirita individuo. Sed, se oni legas atente kaj liajn leterojn kaj taglibrojn kaj memorojn de tempaj kunuloj pri li, formiĝas pli taŭga bildo. Ni ekkonas homon, kiu komprenis ĝui la vivon, kiu amuziĝis kun amikoj en la nokta vivo de Prago, kiu apenaŭ rezignis pri teatra prezento, kiu interesiĝis por teknikaj novaĵoj, ekzemple pri aviadiloj kaj aŭtomobiloj, kaj kiu eĉ dum forpermesoj veturis kun motorciklo sur la vojoj de Bohemio kaj kiu kun entuziasmo frekventis kinejojn.

La kritikisto Willy Haas, kiu apartenis al la literatura rondo ĉirkaŭ Kafka esprimiĝis tiel: „Kafka, kiu sur bildoj aspektas tiom etstatura, estis en vero granda svelta viro, kun plej ofte iom klinita kapo, kiu havis specialan esprimforton en siaj manfingroj. Li akompanis ne nur siajn vortojn per fingraj gestoj, li eĉ povis sorĉi artoplenajn ombroludojn al vando.“ Haas, kiu kapablis klarigi la verkon de Kafka tiel bone kiel apenaŭ iu alia, opiniis, ke oni fakte devus koni Pragon por kompreni lin. „Ĉu juĝejo ĉu beno, Kafka ĉiam komenciĝas per la fino.

En la proceso estas la morto, kiu fine klariĝas ĉion, en la punkolonio la prizonuloj devas solvi la enigmon, kion ili krimis, je la ricevita puno, jen la ŝlosilo“, interpretis Haas tion.

Kurt Tucholsky verkis pri „La proceso“: „Dum mi metas la plej sinistran kaj plej fortan verkon de la lastaj jaroj el mano... mi nur malfacile povas raporti pri la kaŭzoj de mia anima skuiĝo.“ En tiu romano kiu restis fragmento, estas prezentataj kulpo kaj memverdikto de homo, kiu volas rifuzi sian respondecon por komunaj taskoj.

Oni devas revizii ankaŭ la opinion, ke la aŭtoro en la jaro 1924 mortis preskaŭ tute nekonata kaj nur jarcenton post sia morto trovis legantojn. Tute male liaj rakontoj, kiel ekzemple „La verdikto“, „La metamorfozo“ kaj „En la punkolonio“ fariĝis la bazo de lia famo. La bibliografio de la publikaĵoj jam je lia vivtempo ampleksas ne malpli ol kvindek titolojn.

F. Kafka petis sian fidelan amikon Maks Brod, „forbruligi sen restaĵo kaj nelegita ĉion, kio troviĝas en mia postlasaĵo, ĉu manuskriptojn, ĉu taglibrojn ĉu leterojn, ĉu

desegnojn kaj tiel plu.“ Maks Brod ne agis laŭ tio kaj publikis la manuskriptojn „La proceso“ (1925), „La kastelo“ (1926) kaj „La perdiĝinto“, nun konata sub la titolo „Amerika“ (1927), lian tutan postlasaĵon, kiun li savis.

Dum la nazia regado apartenis F. Kafka al la malpermesitaj verkistoj.

Nur ekde la jaro 1945 lia verko trovis mondvastan resonon, de tiam ekzistas ankaŭ la vorto „kafkaeska“. Kiom forte la verkistoj estis influataj de li, montras letero de Hermann Kesten al Klaus Mann: „Mi havis nek la intencon verki simbolecan romanon nek postkafkai la verkiston Kafka, kiel la gazeto ‚New Yorker‘ riproĉis min…“

La tuta verkaro de Kafka provokis en la lastaj kvindek jaroj parte pro sia teksta nealireblo, sed ankaŭ pro rakontiste teknikaj precipaĵoj torenton de klarigoj. Tamen la pli novaj esploristoj de Kafka substrekas ĝis nun apenaŭ priatentatan dimension de la „kafkaeska“, tiun de la absurda groteska komiko.

Pro tiu fono eblas tute novspece esplori la verkojn de F. Kafka.

(S.E.F./ MAW)

# Enkonduko II

Ĉar mi iam legis, ke Kafka legis siajn tekstojn antaŭ amikoj ofte kun granda ridado, kio min tiam tre pensigis, tio kondukis ankaŭ min al tute nova interpreto de la verkoj de Kafka, kaj tion mi kompreneble neniam forgesis dum mia tradukado. Oni povas tre miskompreni la verkiston Kafka, se oni ne atribuas al li certan emon al absurda sarkasma humuro, kiu estas saturita per akra socikritiko.

Oni ankaŭ nepre sciu, ke Kafka estis influata ne nur de Robert Walser, sed ankaŭ de anarkiismaj ideoj, tamen lia anarkiismo estas tiel rafinita, ke eĉ maldekstruloj ofte misinterpretis lin. Kafka estis ofta vizitanto de anarkiista klubo en Prago, kie li aŭdis prelegojn, kiujn aŭdis ankaŭ Jaroslav Haŝek,  kiu estisa alia fama vizitanto de tiu influriĉa klubo. Estas vere, ke tiu, kiu ne scias ion pri Prago kaj la tempo de Kafka, ne vere povas tute enpenetri en la intencojn kaj celojn de la ŝajne „mistera“ Kafka, sed tamen ĉiu el ni, egale en kiu lando li vivas,  iel povas senti ilin.

Min lia radikala moderneco, kiu tute ne similas al aliaj famaj verkistoj el la komenco de la deknaŭa jarcento, ĉiam denove perpleksigas.

Ja kion Kafka ne antaŭpensis, se temas pri literatura modernismo? Jen la kaŭzo, kial la dadaisto Grosz tiom admiris lin. „La punkolonio" estas certe lia plej ŝokiga profetaĵo, tiu de la gulago kaj de ties teruraj sekvoj tutmonde. Sed la verko de Kafka entenas ankaŭ jam certajn elementojn de la marksisma amaspsikologio de Vilhelmo Reich, do li ŝajne tute ne estis adepto de Freud, sed lin jam interesis la problemoj de la atomigita individuo en la amasa socio."

Tio memoras min ankaŭ pri alia literatura giganto, kiu avancis sian tempon, pri E.A. Poe, kiu jam tre frue priskribis kiel la homo sin perdiĝas en la homamaso, kaj kiel la atomigita socio perdiĝas en senanima memdetruo. La impresa ĉeĥa E- poeto Schulhof, anima parenculo de la skeptika Kafka, distingis sin per simila seniluzieco, kiu montras sin speciale en ties defia poemo: „Desperanto", el la jaro 1911. (Hans-Georg Kaiser)